

# GENERALO VENAS DE LA GÂNGALO

## B.Traven



Mahagonciklo romano 6

<b>Aŭtoro</b>	B.Traven
<b>Titolo</b>	Generalo venas de la ĝangalo
<b>Tradukis</b>	Dorothea & Hans-Georg Kaiser (Donjo & Cezar) laŭ la unua eldono de la romano „Ein General kommt aus dem Dschungel”
<b>Lingve</b>	eldonejo Allert de Lange, Amsterdamo en la jaro 1940, dua eldono
<b>kontrolis</b>	Vladimir Türk
<b>Aranĝis</b>	Frank Vohla Hans-Georg Kaiser
<b>Finredakto</b>	je la 14-a de oktobro en la jaro 2016

**„TIERRA Y LIBERTAD!“**

# Ĉapitro 01

01

„*TIERRA Y LIBERTAD!*“ Per tiu ĉiu batalkrio sude de la respubliko marŝis armeo de indiĝenoj el la ĝangalo por renversi la diktaturon kaj konkeri la landon kaj la liberon por si.

Kia ajn simpla kaj konciza tiu batalkrio estis, ĝi sonis por la marŝantoj kiel heroa kanto.

Tion, kion ili sentis en sia premiteco kaj en sia kompatinda nescieco pri poezio, pri sia sopiro je beleco, je deziro pri paco, pri amo al homoj kaj kreitaĵoj, pri natura kredo pri neskuebla justeco, kiu ie devas esti trovebla, kaj kion ili sentis pri profunda funebro pri kamaradoj, kiujn oni fie murdis aŭ bestaĉe torturis ĝismorte, ĉio ĉi kaj multe pli de tio, kio nekonscie dormis en ili, ili kapablis esprimi en tiu batalkrio. Eĉ, kvankam ili kiel kunigita amaso pelata de la sama volo, suprenetendis siajn pugnojn per unu fojo, kvazaŭ ili volus instigi Dion ne forgesi ilin, kaj ili samtempe elkriegis kun unuecigita voĉo universen, ke tio eksonis kvazaŭ ĵetiĝus giganta

ondo de la maro kontraŭ la rokojn, elsentis tamen ĉiu unuopulo el ili klare sian propran voĉon, ĉar ĉiu sentis tiun en sia animo, kvazaŭ ĝi estus la prapropa kaj prae persona preĝo.

Popolkantoj, bele sonantaj rimoj, politikaj kaj patriotaj frazaĉoj perdas tuj sian sencon kaj sian signifon kaj evidentigas sian stultecon en tiu momento, kiam oni esploras ilin sobre kaj sinsekve pripensas ilin. Kaj ja eblus, ke ankaŭ tiu militkrio de ribelantaj indiĝenoj sen antaŭjuĝo esplorata solviĝus en nurajn sensignifajn vortojn.

Kiam iliaj suferoj, iliaj turmentoj, malhavo kaj sendefendeblo kontraŭ la mastroj, do al la mahagonkoncesiistoj kaj ties vasaloj en la ĝangalo, fariĝis tiom neelteneblaj, ke ili ekkonis – kaj ĉiuj strange preskaŭ je la sama tempo kaj samtempe en la plej malproksimaj regionoj de la tropikaj praarbaroj – ke estas pli bone kaj pli hominde pereii en ribelo ol vivi ankoraŭ pli longe sub tiaj humiligoj kaj turmentoj, jen ili ekagis kun emfazo. Ili ekagis plenaj de energio por fari laste finon al ĉio ĉi, aŭ finon al sia propra vivo aŭ finon al

la vivo de siaj tiranoj.

Spite al la suferoj kaj humiligoj konserviĝis en ili ankoraŭ resteto da kompreno pri ilia mizera situacio. Vidalvide kun la birdoj de la ĝangalo kaj eĉ kun milionoj de insektoj, kiuj ĉiuj kun libero kaj vivĝojo alvenis kaj foriris tiel, kiel plaĉis al ili, ili perdis neniam la sopiron pri libero.

Unue timeme, heziteme kaj nesekure; tuj poste forte kaj energie, ili fine decidis sin por la ribelo.

Kiam la komenco estis farita, ĉio okazis pli rapide ol ili kiam ajn aŭdacis pensi.

La posedantoj, adminstrantoj kaj inspektistoj de la monterioj, kiuj sekve de sia potenco kaj krueleco estis pli timataj ol eĉ la ĉiopotenca Dio, ŝrumpis en la unuaj horoj de la ribelo, tuj kiam ili vidis, ke ilia aŭtoritato disrompiĝis eĉ en la plej timigita kaj plej tradraŝita bovistoknabo, al senhelpaj kompatindaj pupoj, kiuj ŝajne subite forgesis kiel paroli, kiel moviĝi kaj kiel akcepti kun deco sian delonge merititan justan pagon.

Dum mallonga batalo ili mortbatis ĉiujn, kiuj ne apartenis al ili, do al la ribelantaj indiĝenoj. Ĉe tio la ribeluloj konkeris kelkajn armilojn. Ili ne estis multaj. Estis ĉirkaŭ dudek kvin revolveroj, ne ĉiuj bonkvalitaj. Proksimume dekdu ĉasfusiloj. Kelkaj el ili nefidindaj kaj tute rustitaj en la eterne varmege malseka klimato de la ĝangalo. Aldoniĝis ankoraŭ kelkaj malpezaj birdopafiloj kaj dek malnovaj hispanaj pafiloj buŝe ŝarĝendaj. La akiritaj malmultaj municioj estis malegalaj laŭ kalibro tion, kiom estis la armiloj.

Sed ĉiuj *muchachos* portis kiel bonegajn armilojn maĉetojn, veprotranĉilojn, hakilojn kaj toporojn. Tiujn armilojn ili kapablis trakti pli bone kaj pli lerte ol ripetkarabenojn, ĉar ili estis devigitaj ĉiutage batali per tiuj maĉetoj kaj toporoj kontraŭ la ĝangalo.

Kompare al la moderne armitaj federaciaj trupoj kaj al la trupoj de la *rurales*, la ribelantaj mahagonlaboristoj kompreneble ne povis paroli pri laŭorda armiteco. Kontraŭ la oficialaj trupoj ilia kuraĝo, ilia malamego, ilia sovaĝa kolero kontraŭ siaj subigantoj devis anstataŭi tion, kio mankis je armiloj. Tion sciis ĉiu el ili. Kaj ĉiu

rigardis tiun malamegon kaj tiun koleregon kiel pli grandan batalvaloron ol superfluan je municio.

### **Rimarkoj**

*muchachos* = knaboj, junuloj, eŭfemisme: servistoj

*rurales*: sub Porfirio Diaz ili estis policaj helptrupoj de la registaraj polictrupoj (federaloj) kaj gardotruoj de la diktaturo.

*Tierra y libertad!* = Tero kaj libero!



En la diktaturo neniu estis pli timata – escepte de la diktatoro, *El Caudillo* – sed ankaŭ neniu pli malamata ol la *rurales*.

La *rurales* estis ŝtat- kaj rurpolico provizita per rajdobestoj, la speciala armilo de la diktatoro, kiu de tempo al tempo ne estis tute certa pri la lojaleco de la oficiroj de l' federacia armeo. La *rurales*, precipe timataj de ribelantaj kaj strikantaj laboristoj, estis elektita trupo el viroj kaj servosoldatoj de oficiroj. Ili estis bonege armitaj, bone dresataj kaj flegataj kaj pagataj. Centojn de junaj viroj oni envicigis en la trupojn speciale pro ties sadistaj instinktoj. Por la agoj kaj faroj, arestoj kaj ekzekutoj faritaj de la *rurales* iliaj oficiroj respondecis al neniu juĝisto, sed nur al *El Caudillo*, al la diktatoro mem. Ili estis la ilo de l' teroro kun kies helpo *El Caudillo* ĉiun, ankaŭ la plej etan reziston aŭ kritikon kontraŭ ties regado senkompatate kaj senpardone subigis. Se, kiel okazis en pluraj strikoj de la tekstilindustriaj laboristoj, la oficiroj de la armeo rifuzis, post subigo de striko entrepreni

bestaĉan buĉadon kontraŭ la humiligitaj kaj venkitaj gelaboristoj, kiel tio estis komandita al ili fare de *El Caudillo*, oni sendis rapidmarŝantan trupon de *rurales* en la regionon. Kaj kion la ofikoroj de la armeo rifuzis fari, la *rurales* tiam entreprenis, kaj ili entreprenis tion per tia brutaleco, ke ili indulgis neniun, kiu havis la malbonŝancon troviĝi en tiu fabriklaborista vilaĝo aŭ en tiu urboparto, kiu estis encirkligita de la *rurales*. Ĉu laboristoj kaj nelaboristoj, ĉu inoj, infanoj, maljunuloj, malsanuloj, neniun diferencon oni faris. Kaj tio ne okazis dum striko, sed ĝi okazis tagojn, ja ofte du semajnojn post la fino de striko, kiam la laboristoj jam revenis en la fabrikojn kaj la loko ree tute trankvilis. Ĝi estis la pun-kaj venĝotribunalo, kiun la diktatoro ordonis kiel averton al ĉiuj, kiuj ne konsentis rilate al la avantaĝoj de la ora kaj gloriĉa erao, kiun li, *El Caudillo*, donis al la popolo. Renkonti batalionan duonon de tiu ĉi *rurales* en la marŝo devis signifi laŭ prudenta juĝo de ĉiu prudenta viro la sekuran pereon de la ribelularo de ĝangalolaboristoj, kaj per ties neniigo la rapidan finon de la revolucio en la regionoj de l' ĝangalo.

## **Rimarkoj**

*El Caudillo* = La gvidanto

Kvankam la militkrio de la *muchachos*, kiuj leviĝis por faligi la diktaturon, ŝajnis klara kaj evidenta, se ĝi estis kriita plena de entuziasmo, ĉiuj homoj fariĝus preskaŭ senvortaj, se iu demandus ilin, kion ili do propre imagas pri tero kaj libero, por kiu batali ili decidis sin.

Ĉiu unuopulo el ili portis en si alian pure individuecan ideon pri *tierra y libertad*. Ĉar por ĉiu el ili tero kaj libero signifis ion alian laŭ ties deziroj, afliktoj, rilatoj kaj esperoj.

Kelkaj el ili, venditaj kiel kontraktlaboristoj en la monteriojn pro propraj ŝuldoj aŭ pro ŝuldoj de sia patro aŭ por nepagitaj policaj punoj aŭ tribunalaj punoj aŭ kiel garantiantoj por nepagikapablaj parencoj mortintaj, posedis en sia hejmlanda vilaĝo pecon da propra tero, kiun ili amis kaj kiun ili ŝanĝus por neniu alia konkerita terpeco, eĉ se ĝi estus pli bona kaj pli riĉa. Por tiuj homoj la batalekrio ŝajne tute ne havis signifon, ĉar ili jam posedis terpecon. Sed, por povi kultivi sian terpecon kaj por povi ĝui la produktojn de sia laboro en paco kaj

trankvilo, por tio mankis al ili je libero.

Kaj mankis al ili je libero kontraŭ miloj de koruptaj oficistoj de ĉiu speco, grandaj kaj malgrandaj, breditaj de la diktaturo por ties protekto kaj konservo, kiuj devis esti grasigitaj por ke ili ne fariĝu danĝero por *El Caudillo*.

Neniu juĝisto eldiris verdikton kontraŭ ili. Se okazis, ke iliaj agoj efektive tro kriis ĉielen, oni senkulpigis ilin per tio, ke oni diris, ke ili agis tro fervore por la intereso de la ŝtata bonfarto kaj pro sindono al sia adorata *El Caudillo*.

Kiu ajn el tiuj, kiujn oni liberigis de tiuj parazitoj, rajtigite povis diri, ke li nun scias, kio estas libero.

Por aliaj *tierra y libertad* signifis la nemalhelpatan liberon rajti reiri al siaj gepatroj, al siaj edzinoj, al siaj infanoj, al siaj fianĉinoj, al siaj amikoj kaj parencoj, al siaj hejmaj vilaĝoj. Pluaj aliaj rigardis tiun *tierra y libertad* kiel la simplan rajton labori tie, kie plaĉas al ili kaj por tiu, kiu bone traktas ilin kaj por salajro, kiun ili rigardis kiel justan.

Por la plimulto el tiuj indiĝenaj mahagonlaboristoj, kiuj

estis naŭdek procentoj el la homoj de la kamparo, densiĝis la nocio libero al la simpla kaj klara deziro simple esti lasata en paco de ĉio, kio nomiĝas registaro, ŝtata bonfarto, amo de la patrio, altigo de la produktado, ekonomia ekspansio, konkero de la merkatoj, obeo, devoj kaj rajtoj, fleksebla enmeto en la popoltuton kaj kio ajn plu ekzistas el tiuj senpensaj kaj sensencaj kaj absurdaj virtoj, kiujn oni dorlote grasigadis en la diktaturo por stultigi la cerbojn de la regatoj kaj malhelpi al ili rigardi tien, kie la radiko de ĉiuj aĉaĵoj trokreskas.

Se ili kriis pri *libertad*, la *muchachos* esperis, ke ili, post gajnita batalo pri la libero, povos aranĝi sian vivon laŭ sia propra maniero, nemolestate de viroj, kiujn ili ne povis konfidi, ĉar ili komprenis nenion pri ties bezonoj kaj zorgoj kaj ne penis ekkompreni ilin, sed ĉiam kaj ĉiam nur alvenis kun notfolietoj, kiuj estis plenigendaj kaj pagotaj. La liberigontoj volis ĝui la produktojn de sia dura laboro sole; kaj ili ne volis esti prirabataj de cent aŭ eĉ pli da publikaj oficejoj je parto de tiuj produktoj aŭ je konsiderinda parto de sia laboro por celoj, kiuj estis por ili tute sensencaj kaj senvaloraj kaj kiuj servis nur por tio,

doni al *El Caŭdillo* pli da okazoj kaj rimedoj plenblovi ties regadon en ties ora erao.

Kiel ajn neprecizaj la nocioj tero kaj libero por la ribeluloj estis, ili sentis tamen instinkte ĝuste kaj tute ĝuste, kion ili celis. Kaj kion ili celis, tio estis ne plu esti regataj kaj ne plu komandantaj. Partopreni je la grandaj kulturaj valoraĵoj de la civilizacio tiel, kiel postulis tion la industria proletaro de la civilizitaj landoj, tia deziro estis fremda al ili. Ili ne komprenus tian postulon eĉ tiukaze, se oni provus klarigi tion al ili dum tagoj aŭ semajnoj. Ili sciis nenion pri demokratio, socialismo, organizo. Kaj se iu eĉ parolus pri tio, ke ili postulu lokon en la parlamento aŭ en la kongreso de la nacio, ili pensus pri tiu, kiu konsilis tion, ke li estas trompisto, kiu volas nur konfuzi ilin kaj sendube ili respondintus: „Kial koncernu nin parlamento kaj kongreso? En paco oni lasu nin, ĉe la diablo, kaj nun foriĝu de ĉi tie, mensogistoj!

La malinda, hontiga kaj kruela traktado, kiun ili kaj ankau ĉiuj aliaj anoj de la sama socia rango suferis en la longaj jaroj de la diktaturo, ŝanĝis la ribelulojn karaktere profunde en ĉiu rilato.

El pacemaj agrokulturistoj, lignohakistoj, karbobrutilistoj, potistoj, kovrilteksistoj, ĉapelpлектistoj, tanistoj aŭ matofaristoj, kiuj havis neniun alian vivcelon krom sen molesto rajti labori, kultivi sian terpecon, bredi sian bestaron, porti siajn varojn sen ĝeno al la foirplacoj, fondi familion, havi infanojn, ĉeokaze festi feston kaj unufoje aŭ dufoje dum jaro migri al la grandaj *ferias* de la federaciaj ŝtatoj kaj poste oldiĝintaj morti kviete kaj en paco kaj en la rondo de bonaj amikoj kaj najbaroj, la diktaturo sukcesis fari homojn venĝavidajn, kontraŭstaremajn, eterene misfidajn, kverelemajn, hipokritajn, brandavidajn sovaĝulojn. Tial, kaj nur tial pensis tiuj sovaĝuloj, post kiam la ribelo foje ekis, pri nenio alia krom detrui ĉion, al kio ili proksimiĝis kaj senkompatate neniigi ĉiun, kiu havis uniformon aŭ nur



uniformĉapon sur la kapo, kaj ĉiujn tiuj, kiuj laŭ ofico aŭ profesio devis esti rigardataj de ili kiel turmentistoj kaj subigistoj.

Kiel neplenaĝajn sklavojn, kiu rajtis malfermi la buŝon nur tiukaze, se oni demandas ilin, oni traktis ilin. Kaj same al tiaj sklavoj, kies katenoj subite disŝiriĝis, ili nun kondukis.

La bestaĉoj kun homaj vizaĝoj torturis kaj skurĝis, humiligis ilin kaj batis ilin sur la buŝon. Kaj kiel bestaĉoj ili tiam eksvarmis por detruigi la landon kaj mortbati ĉiun, kiu ne apartenis al ilia klaso.

Se tiam iutage ĉio estos detruita kaj dezertigita ĉio, kion kreis *El Caudillo* per ilia sango, per ilia ŝvito, per ilia mizero, per iliaj afliktoj kaj ploroj, la oran eraon de la respubliko, tiam ili iros hejmen, kontentigitaj pri sia venĝo, reen al siaj loĝlokoj, vilaĝoj, setlejoj kaj kabanaroj kaj de tiam vivi pacan vivon laŭ ilia plaĉo.

Estis antaŭvideble, ke la fariseoj kaj skribistoj el ĉiuj landoj en siaj priskriboj kaj historiaj esploroj metus ĉiujn

bestaĉajn agojn ekzercitajn sur la flankon de la sovaĝuloj, kiuj ne komprenis la grandan tempon, en kiu ili vivis.

Kaj estis samtempe antaŭvideble, ke la sentronigitaj tiranoj kaj ties admirantoj tie kaj ĉie en la mondo, kiam ĉio ĉi estos pasinta, sciigos al la frapatentigita mondo, ke nun ĉiu povas vidi kaj kompreni, kial la diktaturo pravis tiel trakti la sovaĝulojn, kiel ili traktis ilin en la diktaturo, kaj kial la diktaturo, fereca kaj senkompata diktaturo estas la sola speco de regado, per kiu oni povas regi plej avantaĝe por sia propra utilo popolon konsistan el sklavoj kun nura sklavsento. Surtereniĝu la dekadenta putranta demokratio!

Vivu la vivofreŝa kaj plijuniga diktaturo!

La ribelularo havis preskaŭ sescent virojn. Neniu nombris ilin precize. Estus estinte malfacile ricevi precizan nombron.

Ĉiutage dum la marŝo tra la ĝangalo aliĝis tie kaj tie sur la padoj malgrandaj grupoj aŭ izolitaj homoj, kiuj dizertis el la plej malproksimaj distriktoj de la ĝangalo, kie ili laboris, jam antaŭ ol komenciĝis la ĝenerala ribelo en ĉiuj monterioj. Ankaŭ peonoj, kiuj fuĝis de bienoj kaj poste kaŝis sin en la regionoj proksime de la ĝangalo, uzis la okazon je daŭro liberigi sin el sia ŝuldodependeco kaj ili marŝis bonhumore kun la armeo, feliĉaj, ke ili renkontis la ribelulojn, pri kiuj penetris kelkaj nebulaj kaj neklaraj onidiroj en tiujn regionojn.

Dum la komplika marŝo tra la granda ĝangalo multaj perdiĝis. Kelkaj dronis ĉe la travado de rivero, kelkaj sinkis en marĉojn kaj ŝlimojn; aliajn voris malario dum unu tago, kelkajn mordis serpentoj kaj pikis venenaj insektoj; pluaj estis mortbatitaj per la hufoj de timigitaj ĉevaloj aŭ muloj, kiam ili troviĝis sur malvastaj montaraj

padoj, kaj ili rapide falis en la abismojn. Pluaj aliaj mortis pro vundoj, kiujn ili ankoraŭ havis sur la korpo pro sia laboro aŭ pro torturoj, kiujn iliaj kamaradoj ne povis kuraci. Tial ŝanĝiĝis la kvanto de la homoj ĉiutage. En la trupo marŝis ankaŭ konsiderinda kvanto de inoj kaj knabinoj kaj certe dudek kvin infanoj aŭ eĉ pli da ili, jen familanoj de la laboristoj, kiujn oni vendis en la monteriojn. Tiuj inoj kaj infanoj ne forlasis siajn edzojn, patrojn, fratojn kaj nevojn kaj libervole migris kun ili en la ĝangalon.

La armeon gvidis juna viro, kiu havis dudek unu jarojn. Li nomiĝis Juan Mendez aŭ almenaŭ nomis sin tiel, sed ĉiuj *muchachos* simple nomis lin Generalo.

Li apartenis al la grupeto de la laboristoj, kiuj komencis la ribelon. Ĉar li posedis militistan kvalifikon, estis tute normale, ke oni konfidis la ĉefkomandon de la armeo al li.

Laŭ sia raso li estis indiĝeno de la regiono *La Huasteca*, laŭ la aspekto miksitaj kun iom da hispana sango. Kiam li aĝis dek ses jarojn, li aliĝis libervole al la armeo. Tie li rapide fariĝis, ankoraŭ antaŭ ol li estis deknaŭjara, serĝento. Li instigis sian plej ŝatatan fraton, kiu estis kelkajn jarojn pli juna ol li, same fariĝi soldato kaj aliĝi en la sama bataliono. Dum soldata servo li permesis al si neakuratecon sen granda sekvo.

Sub kutimaj cirkonstancoj oni punus tian neglekton per du tagoj da aresto aŭ per kelkaj malagrablaj kromaj gardostaroj. Kamaradece sentanta leŭtenanto malice

insultus lin per vortkanonado kaj poste la delikto estus forgesita. Sed en la diktaturo oni estis levinta la superrangulojn kaj en la federacia armeo kaj des pli ĉe la *rurales*, pli kaj pli en la rangon de seneraraj sanktuloj, kiuj devis anstataŭi Dion surtere. La subranga soldato kontraŭ sia superrangulo posedis neniun alian rajton krom blinde obei kaj silente akcepti, kion oni ŝargis sur lin. Tiel okazis, ke la knabo pro tiu neglekto fare de oficiro, kiu eble estis eĉ ebria, estis kape trempita en akvositelon kaj per ties botoj tenita tiom longe sub la akvo ĝis li dronis. La murdiston oni ne punis, sed li ricevis en la ordono por la tago laŭdantan mencion por tio, ke li agis en la intereso de severa disciplino, tiel kiel estis lia devo, ĉar la disciplino estis la plej sankta sakramento.

La serĝento ankoraŭ ne tute estis stultigita en la senco de la diktaturo, eble ĝuste tial, ĉar li estis pli indiĝeno ol pacienca soldato. Li forgesis dum horo la diosimilecon de la oficiro kaj mortbatis lin sen senti eĉ la plej etan penton pri sia ago. Tiu ago necesigis, ke li devis dizerti kaj translasi ĝin al la armeo, kiel ĝi evoluu plu sen lia

kunhelpo.

Lia plej bona kamarado en la bataliono estis kaporalo, tiel kiel li, kun indiĝena deveno. Li estis la ununura viro, al kiu li konfidis tion, kion li faris, kaj kie li kaŝis la kadavron de la idolo por gajni tempon por la fuĝo. Al la kaporalo valoris fidela amikeco pli ol la amo al la patrio kaj krome pli ol la solena ĵuro de fideleco, kiu estis tiel indiferenta al li kiel al ŝnurdancanta simio eksedziĝo en Tlaxcala. „Sciu, Juanĉjo“, li diris simple al sia kamarado, „mi iros kun vi, la tuta de Dio damnita armeo iru kun kondamno en la inferon kaj kun la tuta stinkanta feko pri amo al la patrio, kaj patria honoro, kiun, pro mi, la hundoj pripisu, se ili volas, tio ne interesas min.“ Tiel ambaŭ ekmarŝis.

Ili havis la intencon fuĝi al Honduro aŭ al San-Salvadoro. Nur for de tiu ĉi sankta patrio. Sur la vojo ili renkontis varbitan trupon de indiĝenaj laboristoj, kiujn oni forpelis kiel kontraktlaboristojn en la monteriojn. Ili lasis varbi sin por tiu trupo. En la monterioj neniu serĉos ilin kaj des malpli forkondukos ilin de tie, tute egale, kiu serĉus ilin kaj kion ili krimis. Tiu, kiu estis kontraktlaboristo en

monterio, havis dekfoje pli aĉan sorton ol iu en pundomo aŭ en El Valle de Muerte, en la timata koncentrejo por politikaj kaptitoj, el kiu nur malofte iu revenis, kaj se li revenis, li estis disrompita dum la tuta resto de sia vivo.

Tiun kaporalon, kiu nomiĝis Lucio Ortiz, Generalo nomumis kolonelo de la armeo.

Kiel sian estron de la ĉefa stabo li nomumis la kamaradon Celso Flores, kiu estis cocil-indiĝeno. Celso laboris kelkajn jarojn kiel hakisto en monterioj, kvankam li ne sciis legi kaj skribi. Tiel, kiel ĉiuj mahagonlaboristoj, li tamen posedis grandan naturan inteligentecon.

Samtempe li havis la maloftan doton entuziasmigi homojn al la plej ekstremaj fortostreĉoj, plej ofte laŭ indiĝena maniero. Li postulis nenion, kion li ne mem povus fari kaj montri kaj pli bone plenumi ol iu alia, se oni asertus, ke ne eblas plenumi lian ordonon.

Kiel sian provizgeneralon la *muchachos* nomumis Andreon, celtalan indiĝenon, kiu laboris en la monterio kiel bovoservisto ĉe la fortrenado de la hakitaj trunkoj. Li povis legi kaj skribi kaj akiris spertojn pri certaj



ekonomiaj kaj negocaj aferoj, dum li estis unu el la bovoservistoj de la ĉarkaravanoj, kiuj veturigis komercajn varojn kaj veturgastojn de la fervoja stacio ĉe la bordo ĝis distanco de kvarcent kilometroj internen de la federacia ŝtato.

La spirita ĉefa estro, la cerbo de la armeo estis Profesoro, kiel nomis lin la *muchachos*. Profesoro estis instruisto en mezlernejo. Iom post iom li lernis kompreni la veran situacion, en kiu vivis la popolo sub la diktaturo. Tiel okazis, ke li rifuzis pli kaj pli, pere de postaĵtamburado de la lernantoj – tiel, kiel fariĝis kutima en ĉiuj lernejoj – enkapigi honoradon kaj diigon de la sistemo. Ju pli li vekiĝis des malpli sklavigita li fariĝis anime. Tiel li komencis ĉie, kie li havis la okazon, en la lernejo, sur la strato, en manĝokuirejoj kaj en kafejoj malestime kraĉi pervorte al la diktatoro kaj ties regado, kvankam li sciis, kio okazus, se li ne fariĝus prudenta tiel, kiel liaj profesiaj kolegoj. Foje ekkoninte la situacion ĝuste, li ne plu povis teni fermita sian buŝon. El bone pagitaj dungoj en lernejoj de pli alta grado kaj en la grandaj urboj oni transŝovis lin pli kaj pli malsupren. Ĉiun transŝoviĝon

antaŭis kelkaj monatoj en prizono aŭ en koncentrejo.

Lastfine li venis en malgrandan minejan urbon kaj tie oni dungis lin en la plej aĉa popollernejo de la plej suba grado, kiun frekventis la infanoj de la plej povraj kaj plej malbone pagataj minejaj laboristoj. Li estis nur tri semajnojn sur la nova posteno, kiam okazis ĉiuvespere en iu alia aĉa *adobe*-kabano de la laboristoj renkontiĝo de la gepatroj kaj pli aĝaj fratoj de liaj lernejoj kaj knaboj. Ses semajnojn poste eksplodis jen tie jen tie minogalerio, ja tutaj regionoj en la minoj. Dio estis flanke de la *mineros*, ĉar ĉiukaze okazis tiel, ke mortis ĉe neniu eksplodo kaj subakvigo de mino iu el la proletoj, sed tre ofte militistaj gardistoj kaj agentoj de la sekreta ŝtatpolicio, kiuj en minejoj, kamuflite kiel laboristoj, estis lanĉitaj por malkovri, kial la elminigo malkreskis kaj kiu metis la dinamiton en la malĝustajn bortruojn. Kiam okazis eĉ strikoj kaj malfermaj ribeloj, kiam oni ĵetadis stonojn al la konstruaĵoj de la mineja administrado kaj la polictrupoj komencis suke pafi en la amason de la labormalvolemaj *mineros*, oni ree arestis Profesoron. Ĉifoje la registaro ŝajne por ĉiam volis detiri lin el la

publikeco. Ĉifoje eĉ la patroj kaj fratoj de ties pli fruaj lernantoj de la mezlernejoj ne plu povis atingi mildigon por li, tiel, kiel ili ĉiam povis fari tion kun sukceso ĝis tiam, ĉar ili havis influricajn postenojn. Ĉifoje oni envicigis Profesoron en la transporton de la neplibonigeblaj kaj nekonvinkeblaj, kiu estis kondukata kiel aro da negrosklavoj en la dekoka jarcento al *El Inferno*, jen koncentrejo por politikaj kaptitoj, kiu estis nomata nur tial „la infero“, ĉar neniu pli fortan vorton, per kiu oni povus priskribi tiun ĉi inferon ĝis tiu tago eĉ la plej sprita popoldiranto, ne povis eltrovi. Ankaŭ tie Profeso ne tenis fermita sian provokan buŝon. De tempo al tempo oni tenis ĝin fermita dum sepdek du horoj per buŝostopilo. Oni donis al li nek akvon nek permesis al li ombbron sub la tropika suno. Sed apenaŭ oni deprenis lian buŝostopilon kaj apenaŭ la kramfo forlasis ties torturitajn lipojn, jen tuj la unua, kion li kriis, estis: „*Abajo El Caudillo! Pereu la gvidanto! Que muere la dictadura! La morton al la diktaturo! Viva la revolucion social! Vivu la sociala revolucio! Sufragio efectivo! Efektiva balotrajto! No Reeleccion! Neniu reelekto! Viva la revolucion del pueblo! Vivu la revolucio de la popolo!*“ Kaj tuj oni

denove ŝtopis lian buŝon. Kaj tuj oni kunŝnuris lin kiel pakaĵon kaj metis lin sub la ardantan sunon sur la sablon. Fine li sukcesis fuĝi kun kelkaj el la suferkunuloj, el kiuj kompreneble tre multaj aŭ mortis aŭ ree estis kaptitaj kaj poste malrapide torturitaj ĝismorte. Fuĝante li renkontis la kaporalon kaj la serĝenton, kiuj aspektis kiel damnitaj ĉifonuloj kaj ne distingeblis de migrantaj indiĝenaj etkampanoj. Kaj kun ambaŭ ankaŭ li lasis varbi sin kiel mahagonlaboristo por monterio, atendante esperi la eksplodon de la revolucio, kiu jam ĉie en la lando ardetis, por de tie ekbati en la profundo de la ĝangalo kaj gajni la sudon por la revolucio.

La armeo estis dividita en ok kompaniojn, ĉiu gvidata de kapitano kaj de *teniente*, do de leŭtenanto, kaj kun kaporaloj kiel grupkomandantoj.

Dum la marŝo tra la ĝangalo marŝis ĉiu kompanio kun tempa distanco de tago ĝis la sekva, parte pro la pli ol cent kvindek ĉevaloj, muloj, azenoj, bovoj kaj kaprinoj, kiuj estis kunkondukataj; sed parte ankaŭ por doni tempon post la tramarŝo de kompanio al la tute marĉigita ĝangala vojo, por ke ĝi iom sekiĝu kaj tiel plifaciligu la marŝon al la sekva kompanio. Kiam kompanio jam marŝis kun siaj bestoj tra tiu malvasta ĝangala pado, ĝi postlasis vojon, kiu konsistis el kaĉa tenaca ŝlimo, en kiu homoj kaj bestoj sinkis ĝis la genuoj, ja ĝis la ventro.

**Rimarko**

*teniente* = leŭtenanto

Post marŝo, longa semajnojn, peniga kaj laciga, tiel, devas marŝo tra tropika ĝangalo, kies grundo neniam fariĝas seka, la armeo atingis la unuan setlejon ĉe la ekstrema rando de la ĝangalo.

Pro la malfacileco de tiu marŝo, pro la trairado de la marĉoj, pro la travado de riveregoj kaj riveroj, pro la trapaso de multnombraj montarĉenoj, la ribeloj havis sufiĉe da okazo riveli tion, kion ili kapablas fari.

Neniu akademie edukita kaj sperta generalo de kutima armeo plenumus tiun marŝon tra la ĝangalo kun tiom malmultaj perdoj kaj kun tiom malmultaj malsaniĝintoj, kiel sukcesis al la oficiroj de la ribeloj. Ĝi estis bonega instruo por ili mem kaj por ĉiuj, kiuj apartenis al la armeo. Armeo, kiu tiom sukcese povis venki tiun ĝangalon, rajtigite povis esperi venki ankoraŭ aliajn potencojn. Kaj tiuj aliaj potencoj, kiuj pribatalendis kaj venkendis, proksimiĝis nun ĉiun tagon dum kiu la armeo marŝis pli kaj pli profunde en la malferman landon, kie estis la grandaj bienoj, la *fincas*, la *finqueros*, la feŭduloj,

kie estis lokoj, vilaĝoj, urboj, postenejoj de militistoj, militaj patroloj, vagadantaj eskadronoj de la *rurales*.

La armeo marŝis en la landon sen havi difinitan celon. „La celo ja troviĝos, se la marŝo foje komenciĝis“, diris Profesoro kaj Generalo.

Por la *muchachos* certa difinita celo certe tiam ne taŭgus, tiel kiel programo aŭ statuto neniel taŭgus. Gvidis ilin nur ilia ideo konkeri teron kaj liberon. Tie, kie ili trovis ambaŭ aferojn kaj povis certe konservi ilin, tie ili setlis, tiel, kiel la *nahuas* setlis post centjara marŝo en tiu regiono, kiu plaĉis al ili kaj kiu garantiis teron kaj liberon al ili.

*Tierra y libertad* kompreneble estis konkereblaj nur tiukaze, se tiuj, kiuj posedis tiujn aferojn kaj defendis ilin, estis venkitaj. Tial estis la unua tasko renkonti tiujn defendantojn. La dua tasko estis batali kontraŭ ili, venki ilin, tute surgenuigi ilin kaj ekstermi. La sekva tasko estis poste subigi ĉiujn, kiuj aŭ malhelpemis la gajnon de *Tiera y Libertad* aŭ povus fariĝi malhelpemaj por ĝi. Tiel certe ankaŭ necesis, ke ili marŝu al la ĉefurbo de la ŝtato,

por ke ili okupu la registaran konstruaĵon, por ke ili mortbatu la guberniestron kaj ĉiujn liajn burokratojn kaj el tiu konstruaĵo ordonu, kio okazu plu, kaj ke oni de tiu tago severe atentu pri tio, ke ĉio ĉi, kio okazos plu, okazu en la intereso kaj por la bonfarto de la venkintoj.

Tio estis en grandaj kaj tre vastaj trajtoj proksimume la ideo de la pli prudentaj en la armeo. Profesoro donis en tiu rilato plej ofte nur koncizajn klarigojn. Li preferis diri ĉiam, ke unue venku la revoluciuloj, ke ili unue devos liberigi sin de ĉiuj malamikoj, ke post tio estos la ĝusta tempo interkonsiliĝi pri tio, kio tiam estos farenda. Antaŭe multe babili pri tio por li estis nur disipo de tempo kaj fortoj, kiuj aktuale estas pli bezonataj por la plej urĝa. El ĉio, kio urĝis, nenio pli urĝis, nenio pli gravis ol ricevi armilojn. Kaj tiujn armilojn la ribeluloj povis ricevi nur per tio, ke ili forprenis la armilojn de tiuj, kiuj posedis ilin en tiu momento. Kaj tiuj estis la soldatoj de la *rurales*.



Komencante ekde tiu setlejo la unuopaj kompanioj nun ne plu migris kun distanco de plena tago, unu post la alia. De tiam la kompanioj marŝis malpli dise, tiel, ke ĉiu unuopa kompanio de la sekvanta malproksimis nur ĉirkaŭ du horojn da marŝtempo. Povis esti, ke baldaŭ la unuaj bataloj estas elbatalotaj. Pro tiuj cirkonstancoj estus taktika eraro lasi marŝi la kompaniojn tro malproksime unu de la alia.

Je la dua tago de la marŝo ekde tiu setlejo atingis la armeo la ranĉon *Santa Margarita*.

Estis posttagmeze, kiam la Unua Kompanio tie alvenis.

*Santa Margarita* konsistis el mastrodomo, kiu estis konstruita el adoboj, do el ne bakitaj argilaj brikoj. Al tio apartenis du *bodegas*, speco de remizoj, same el adoboj. Tie oni konservadis la rikoltitan maizon, la fabojn kaj fazeolojn, la sisalon por la farado de ŝnuregoj kaj matoj. Tie troviĝis ankaŭ la rajdoseloj kaj pakseloj kaj la malmulto da agrokulturaj iloj, kiujn posedis la ranĉisto.

Kvar aĉaj kabanoj troviĝis tuj apud la *bodegas*.

Ĉiuj ĉi konstruaĵoj formis kortegon aŭ pation, ĉar ili estis konstruitaj kvarangule. Sed unu el la flankoj estis malferma. Tie disigis kruda latbarilo la pation de la *corral*, de la elkurejo, kie nokte staris la ĉevaloj kaj bovinoj. Je la flanko plej proksima al la mastrodomo troviĝis senkonstruaĵa loko, kiu same estis fermita kontraŭ ekstero per dorna barilo. Tie kondukis pordo el la patio eksteren al la pado, kie migris la vojaĝantoj kaj ĉiuj karavanoj, kiuj renkontis tiun ranĉon.

La ranĉo troviĝis sur monteto. La monteto estis ĝuste tiom granda, ke la konstruaĵoj, la patio kaj la *corral* kun ĉiuj ĉirkaŭbariloj trovis lokon sur ĝi.

Distrite ĉirkaŭ la monteto troviĝis la primitivaj palmkabanoj de la peonoj, kiuj apartenis al la ranĉo. Estis kvardek tiaj kabanoj. En la tri tre aĉaj kabanoj, kiuj kiel la mastrodomo troviĝis en la patio, loĝis la majordomo kaj la ŝnuristo kaj la respondeca vakero, jen la viro, kiu respondecas pri la bruto. Tiuj tri familioj estis parte *ladinos*, dum la peonoj kaj ties familioj, kiuj loĝis dise en

la kabanaj ĉirkaŭ la monteto, estis indiĝenoj.

La mastrodomo kompreneble estis mastrodomo nur tie ĉi, kie ĉiuj ceteraj loĝkonstruaĵoj estis nur tre aĉaj *chozas*, palmkabanaj de la plej primitiva maniero. Ĝi ne havis fenestrojn, nur pezajn krudajn pordojn el masiva mahagono. La planko konsistis el malbone bakitaj argilaj brikoj, la tegmento el vende detruataj lignaj ŝindoj. La domo posedis nur du ejojn. La ununura aĵo en la mastrodomo, kiu memoris tion, ke la loĝantoj ne vivis en la kvara jarcento, kaj samtempe la ununura aĵo, kiun oni povis nomi meblo, estis usona kudromaŝino, kiu jam komencis konsiderinde rustiĝi.

La tablo kaj la seĝoj estis el mahagono, krude prilaboritaj per maĉeto. La litoj estis simplaj stabloj el ebono, trans kiuj krucforme estis etenditaj rimenoj el bovohaŭto, sur kiuj kuŝis dikaj bastmatoj teksitaj el la basto de palmtrunkoj. Malpuraj kusenoj remburitaj per Luiziano-musko, kiu abunde ĉeestis en la proksima vepro.

Tiu mastrodomo validis kiel nobla kaj la mastro kiel bonstata. El tio konkludeblis, sen vidi ĝin, kiel tiukaze

loĝis kaj vivis la peonoj.

Ĉion, kion la familio bezonis, krom la silko, kotonŝtofoj kaj feraĵoj, oni produktis en la ranĉo. Tie oni destilis brandon, teksis la lankovrilojn, selojn kaj sandalojn, ŝnuregojn kaj firmajn sisalfadenojn, el kiuj oni plektis retojn, saketojn kaj hamakojn.

La mastrino estis la antaŭpreĝantino kaj antaŭkantistino en la kapelo de la ranĉo. Tiu kapelo estis malgranda halo sen muroj kaj kun palmtegmento. Je unu finaĵo de la halo staris kruda tablo, sur kiu troviĝis bildo de Sankta Virgulino de Guadalupo. Ĉiam estis freŝaj floroj antaŭ tiu bildo. Serĉis kaj plukis ilin en la vepro la edzinoj kaj filinoj de la peonoj, kiuj ĉiutage matene envazigis kaj poste starigis tien. Ĉiun dimanĉan matenon oni abunde ŝutis verdajn branĉojn sur la teran plankon de la kapelo tiel, ke la preĝantoj sur ĝi povis surgenui kvazaŭ sur tapiŝo. La mastrino samtempe estis ankaŭ kuracistino kaj akuŝistino por la homoj, kiuj apartenis al la ranĉo.

Kontantan monon ili havis malofte pli ol cent pesojn, ofte eĉ nur kvin pesojn en la tuta ranĉo, inkludite la

gemastrojn kaj la peonojn. Oni pruntis ĉion. Unu el ili pruntis ĝin de alia. Kaj ĉiuj pruntis monon de la gemastroj. La gemastroj sentis same tiom moralan kiel sobran ekonomian devigon vivteni en sana stato la peonojn.

Kion revolucio tie kaj sub tiuj rilatoj, kiel ili ekzistis dum alveno de la ribeluloj kaj tie antaŭe ekzistis dum kvarcent jarcentoj, plenumu kaj ŝanĝu, tio konfuzus eĉ la plej radikalan eŭropan teoriulon, se oni postulus de li liberigi la peonojn el ties sklaveco kaj doni al ili pere de la revolucio iom pli ol ili posedis ĝis tiam.

Ne estis io por disdono. Kaj libero, kiujn ili dankus al la revolucio, postlasus tiujn peonojn je duono pli povraj kaj pli senhelpaj ol ili estis tiam.

Estis sufiĉe da tero je dispono. La ranĉo validis kiel granda bieno. Sed kvar kvinonoj de la terposedo estis vepro kaj ĝangalo, ŝtonecaj kaj montecaj. De la cetera kvinono parto estis prerilando, kiu taŭgis por paŝtejoj de bovinoj, ĉevaloj kaj muloj. Nur dekono de la terposedo estis kultivita agrokulturo, aŭ en la seka sezono dura kiel

cemento aŭ en la pluvsezono ŝlima kaj tubera. Se la pluvsezono daŭris tro longe, ĉiu el la loĝantoj de la ranĉo, inklude de la potenca ranĉero kaj lia familio, estis same tiom proksimaj al la malsatmorto kiel la ceteraj. La efektiva riĉo konsistis el la bovinoj, ĉevaloj kaj muloj, kiujn la ranĉero bredis. Por povi bredi tiujn bestojn, li bezonis kapitalon, ĉar li devis kunaĉeti bredobestojn kaj tiam atendi dum jaroj ĝis la bestoj estos sufiĉe grandaj por vendo. Se la seka sezono daŭris tro longe, fortmortis ankaŭ la bestoj. Kion tie la ribelo, kiu estis certe necesa en la monterio, povus ŝanĝi favore al la peonoj? Eĉ se ĝi havigus al ili liberon de tiu patrono, la ĉielo baldaŭ forprenus tiun liberon de ili; ĉar ilia libero estus senvalora, se ili ne havus ion por manĝi, ĉar nenio kreskas kaj ĉar la peonoj, post kiam ili estus liberigintaj sin, ili uzus tiun liberon labori malpli multe ol antaŭe. Neniu instruis ilin al si mem ordoni, sen komando kaj sen kontrolo labori. Neniu donus al ili semaĵojn, ĉar aliaj, kiuj estus pli proksimaj al la disdonejoj, se tiaj ekzistus, la semaĵojn bezonus pli ol ili. Neniu instruis ilin kiel organizi sian laboron, kiel kuniĝi al kooperativaj komunumoj. Ilia komuna sento estis evoluita tiom malmulte, aŭ tiom

detruita, se ĝi efektive iam ekzistis, ke kooperativa komunumo malmulte helpus al ili; ĉar ĵaluzo, envio kaj eternaj kvereloj pri la regado iom post iom detruus la kooperativan komunumon. Homoj, kiuj dum kvarcent jaroj, ja eĉ dum kvardek mil jaroj vivis en sklaveco kaj dum tiu tuta tempo estis devigitaj translasi ĉiun pensadon, ĉiun respondecon, ĉiun organizadon, ĉiun paroladon kaj interkonsiliĝon, ĉiun komandadon al siaj mastroj kaj al la aŭtoritatoj, ne povas esti faritaj per ribelo interne de unu jaro al liberaj kamparanoj, kiuj memstare pensas, agas kaj mastrumadas kaj kiuj bezonas neniun, kiu ordonas ilin, ke ili frue matene je la kvara surpiedu por kultivi la agron.

La ribeluloj, kiuj venis nun al tiu ranĉo, kompreneble ne rigardis tion sia tasko pensi pri tio, ke revolucio sistemon sole ne ŝanĝas, sed ke ĝi nur interŝanĝas la posedon, ke nur la nomoj de la posedantoj ŝanĝiĝas, kaj ke la nacio aŭ la ŝtatkapitalismo povas esti pli brutala, pli senrespekta kaj pli tirana ol la pli fruaj mastroj estis kiam ajn. Sistemoj ribelulojn ne interesis, ĉu novaj, ĉu malnovaj.

Oni skurĝis kaj pendumis ilin tiom longe, tiom longe

humiligis ilin kaj prirabis ilin pri senmalhelpata parolado, ke ilia komuna sento, kiu ligis ilin kun ĉiuj aliaj popolanoj pro tute naturaj kaŭzoj, estis mortigita. Ili konis nur plu venĝon kaj rekompencan. Detruo estis la ununura, kion ili komprenis. Ju pli ili detruis, ju pli ili mortigis iujn el tiuj, kiujn ili rigardis siaj malamikoj, des pli liberaj ili sentis sin fariĝi. Ĉar ĉio, kio ekzistis kaj vivis kaj ne apartenis al ili, estis la kaŭzo de ilia sklaveco. Se ili volis saviĝon el la sklaveco, jen ili devis detruiri. Ne afliktis ilin plu la futuro, afliktis ilin nur la hieraŭ, kiam oni turmentis ilin.

Ne, ke estas diktatoroj kaj, ke povas esti diktatoroj, estas tragika, sed, ke kiu ajn diktaturo, ankaŭ la plej prospera kaj ŝajne plej benoplena, finiĝas per detruo, dezertigo kaj kaoso kaj neeviteble devas finiĝi tiel laŭ feraj leĝoj de la naturo, kiujn neniu homo kapablas ŝanĝi aŭ influi, tio estas la ververe tragika, ĉar tio reĵetas la homaron je jarcentoj rilate al sia nesubigebla instinkto pri lastfina liberigo el la besteca kaj neorganizita.



## **Rimarkoj**

*adobo* = nebakita briko el argilo, sekigita de la suno

*corral* = elkurejo por ĉevaloj, bovoj ktp.

*patio* = korto (interna korto de hispanaj domoj)

Kiam la antaŭtrupo alvenis ĉe la ranĉo, la *muchachos* trovis, ke ĉiuj kabanoj estas forlasitaj. La patrono iris kun sia familio profunde en la ĝangalon. Ĉiuj familioj de la peonoj sekvis lin.

„Jen do la pruvo, ke iu perfidis nian alvenon kaj nian marŝon“, diris Generalo. „Ili ĉi tie ricevis la sciigojn kaj la timo ĉiujn forpelis.“

„Scii tion, tio multe valoras“, opiniis Profesoro. „Nun ni povas esti certaj, ke ni renkontos en unu el la du sekvaj bienoj la *rural*-policon.“

Du el la *muchachos* deĵetis sian pakaĵon kaj aŭskultis, kion Generalo kaj Profesoro kune interparolis. Unu el ili diris: „Generalo, ni trovos la patronon facile en la ĝangalo. Vi devas nur diri ĝin kaj ni ekiros kaj altrenos lin kun lia tuta kanajlaro.“

„Kiun sencon tio havus?“ kontraŭdiris Generalo. „Buĉu la tutan brutaron, tion, kion vi trovos kaj foje satmanĝu.“

Tio, kio postrestos, ni kunprenos por la marŝo. Kaj la lasta kompanio ekbruligos ĉion. Tiukaze ne restos fortikaĵo en nia dorso. La peonoj tie ja povis atendi nin. Sed, se ili kaŭras ĉe sia patrono, tiukaze tiu povos ankaŭ konstrui novajn kabanojn por ili. Vi, Nicasio, heroldos al ĉiu almarŝanta kompanio, ke ni ĉi tie kampados dum la nokto. Ree pluvos kaj tial ni povos uzi la kabanojn por la nokto. Mi iros kun Profesoro kaj Celso en la domon de la patrono, kaj kun tiom da aliaj, kiom trovos lokon tie. Frue je la kvara ni ekmarŝos.“

Je la mateno, kiam la trupo surmetis la pakaĵojn, ĝi estis prilumata; ĉiuj domoj kaj kabanoj flamiĝis. Estis apenaŭ plu ardetanta restaĵo, kiam la lasta kompanio forlasis la ranĉon. Ĉiujn porkojn kaj bovinojn ili buĉis kaj ĉiujn ĉevalojn kaj azenojn ili kunkondukis kiel militpredon.

Ĉirkaŭ tagmezo la trupo venis al la ranĉo *Santa Isabel*. Tiel, kiel en Santa Margarita, ankaŭ tie la kabanoj estis forlasitaj. La bovinojn kaj la porkojn la homoj evidente kulpelis en la vepron. Nur ses katoj etendiĝadis dormeme ĉe la diversaj kabanoj. Du aŭ tri hundoj, kiuj verŝajne vagadis kaj revenis tro malfrue por fuĝi kun la

loĝantoj, bojis atakeme antaŭ la trupo, sed retiriĝis malantaŭ la kabanojn, kiam la hundoj de la trupo ekĉasis la ranĉohundojn.

La trupo ankoraŭ ne je duono preteriris, kiam jam brulis ĉiuj kabanoj, la mastrodomo, la *bodega* kaj la pordego kaj la latbarilo. Antaŭ ol ili ekbruligis la ranĉon, la *muchachos* serĉis selojn kaj maĉetojn, sed trovis neniujn. Ĝi faris efektive la impreson, kvazaŭ la loĝantoj jam hieraŭ forlasus la konstruaĵojn, se ne jam antaŭhieraŭ. Ĉiuj kuirfajrejoj estis fridaj kaj malsekaj. Nur kelkaj argilaj akvopotoj estis tio, kio ankoraŭ troviĝis tie en la kabanoj.

Dum la plua marŝo malkovris la *muchachos*, ke eĉ la malgrandaj setlejoj de sendependaj indiĝenaj etkampanoj estis forlasitaj. Pigraj hundoj kaj katoj kuŝadis aŭ misfideme ŝtelforiris de la vojo ĉe la alveno de la trupo.

„La famo, kiu antaŭiras nin“, diris Profesoro al Generalo, kiam li rimarkis la solecon kaj la fantomecan aspekton de la forlasitaj kabanoj, „estas malica. Mi volus scii, kiu

fifamigis nin kiel murdistojn, brulofaristojn kaj banditojn.“

„Tio glitas de ni kiel pizo de la muro, kion oni diras pri ni.“ Celso proksimiĝis, demetis sian pakaĵon kaj kaŭriĝis sur la tero por ripozi dum minuto. „Ni estas ribeluloj. Aŭ ĉu ni eble ne estas ribeluloj? Ni venas ĉi tie ne kun sukeraĵ bakaĵetoj. Kaj tiu, al kiu ne plaĉas ĉi tie, trankvile foriĝu. Ni paŝas antaŭen kaj faras tion, kion ni pensas farenda.“

„Celso pravas“, opiniis pri tio Generalo. „Kio koncernu nin tio, ĉu la *inditos* timas aŭ ne? Iutage ili ja ekakceptos, ke ni ne estas banditoj. Se ili nun ne volas helpi al ni fari ordon rilate la tiranojn, ili simple kelkajn jarojn devos plu toleri la patronojn kaj skurĝojn. Ni ne plu toleros fian traktadon. Kion vi opinias, *muchachos*?“ Li turniĝis al la amaso de la almarŝintaj viroj, kiuj intertempe venis sur la firmtretitan placon de la vilaĝeto, kiel Celso forĵetante siajn pakaĵojn kaj kaŭrigante sin por kolekti novan spiron kaj freŝajn fortojn por la plumarŝo. Mankis ankoraŭ du aŭ tri horoj ĝis tiu loko sur la vojo, kie la sekva kampadejo estis starigota.

Tiu *pueblito* konsistis nur el dek kabanoj, el kiuj ĉiu havis nur unu ĉambron. Ankaŭ tie la revolucio ne povis plibonbigi ion al la etkampanoj. La revolucio devus alporti pli fekundan teron, bruton kaj herbojn por la bruto, kelkajn sakojn da vestĉifonaĵoj, por ke tiuj povraj kampanoj kaj ties edzinoj kaj idoj povu havi la plej necesan je vestoj. De la loĝantoj de tiu eta pueblo posedis nur po tri familoj kune unu maĉeton, ĉiu viro rustitan kaj disrompiĝeman tranĉilon. Ĉiu familio havis nur unu kurbigitan kuleron. Neniu lito, neniu seĝo, neniu tablo tie troveblis en la tuta vilaĝo. Neniu plugilo videblis, neniu hakilo, neniu najlo. Ĉirkaŭ dudek metrojn da drato oni kunhavigus, se oni serĉus en ĉiuj kabanoj. Estis drato, kiun la viroj dum siaj longaj marŝoj en lando pecope trovis kaj kolektis aŭ tranĉis de malsuprenpendantaj telegrafaj dratoj aŭ deŝiris de dratbariloj preterirataj de ili. Ĉio, kion ili bezonis por prilabori la magran ŝtonecan agron, estis dika pintigita paliso, kiun ili puŝis en la teron, se ili semis maizgrajnojn.

Ankaŭ tiuj viroj kaj ties familioj forlasis siajn mizerajn loĝejojn kaj fuĝis profunde en la ĝangalon pro timo, ke la

ribeluloj povus mortbati ilin la ribeluloj almarŝantaj kun la militvoko: „*Tierra y libertad!*“

Plenan tagon ili povus aŭskulti Profesoron, kion li sciis diri pri diktaturoj, tiraneco kaj sklaveco de la proletaro, kaj ili tamen ne komprenus lin. Ili posedis tie teron kaj liberon kaj nenion alian ili postulis de la vivo kaj de la tiranoj krom tio, ke oni ne murdu ilin, ke oni ne priŝtelu ilin kaj, ke oni lasu ilin en paco mortaĉi, se la magra tero pro mankanta pluvo aŭ pro fordrivado de la minca tersurfaco sekve de la pluelverŝiĝoj, fariĝis ankoraŭ pli magra kaj la mizera rikolto je maizo, fazeoloj kaj faboj estis vorita je triono de la ratoj kaj je plua triono de la maizvermoj kaj fazeolaj larvoj. Ili estus dankemaj al la revolucio, se tiu protektus ilin kontraŭ agloj, akcipitroj, martesoj kaj kojotoj, kiuj ŝtelis iliajn kokinetojn, kaj kontraŭ la jaguaroj kaj aligatoroj, kiuj fortrenis iliajn porketojn kaj bovidojn. Iliaj problemoj estis tiel simplaj, ke ankaŭ la plej bela revolucio kaj la plej glorriĉa ribelo, kiu liberigis la landon de la diktaturo – en dikaj historiaj libroj parte aŭreole glorata kaj parte damnata kaj malbenata – preteriris ilin kaj ilian vivon sen trovi ilian

atenton. La revolucion ili rimarkus nur per tio, ke sur la foirplaco en la sekva loketo ne plu *don* Damaso enkasigas la foirplacan imposton de ili, sed *don* Dionisio, kaj ke ili, se ili volas vendi por dudek kvin centavoj ŝaflanon, nun devas pagi kvin centavojn kiel foirplacan imposton pro kromimposto por kampara lernejo, kiu neniam estos konstruita, dum ili devis pagi antaŭ la revolucio du centavojn kiel foirplacan imposton.

Oni estus povinta facile kontentigi la ribelulojn per iuj parceloj, kiuj abunde ĉeestis kaj disdoneblus el la centmiloj de hektaroj el terposedo, kiu ja apartenis al bieno, sed kiun neniu kultivis, kaj kiun la posedantoj kultivus neniam. Estus estinte pli malkare por la bienuloj, por la posedantoj de grandaj bienoj, libervole transdoni tiujn nekultivitajn terpecojn. Estus estinte pli malkare forigi la peonisman, la ŝuldosklavecon. Kaj por la tuta popolo kaj la gloro de la diktatoro estus estinte milfoje pli bone, se oni estus doninta al la popolo finfine nelimigitan balotrajton kaj se estus pritrancitaj la aŭtokrataj rajtoj por la diktatoro. Estus estinte pli bone, se la diktatoro devus respondi sian agadon antaŭ la parlamento, eĉ,



kvankam la parlamento konsistis el viroj, kiuj parolis dum horoj sen diri ion kaj interkonsiliĝis dum tagoj sen decidi ion. Estus estinte pli bone kaj pli malkare kaj por la popolo pli utile, se la diktatoro estus doninta al ĉiuj popolanoj la nelimigitan rajton, egale ĉu ili estis liaj amikoj, ĉu liaj malamikoj, paroladi ĝis la buŝaĉo malsekiĝas. Sed kiel ĉiuj diktatoroj, kies nomon konservis la historio, li permesis nenium kontraŭdiron. Tion, kion li ordonis, estis leĝo, sen tio, ke oni donis la rajton al la viro, kiu obeu kaj atentu la leĝon, kunparoladi iel ĉe la leĝofarado. Li konis nur unu respondon al la deziroj kaj postuloj de la ŝtatanoj, kaj tio estis la respondo per la bastonoj kaj revolveroj de liaj servistoj en unifomoj.

Estus estinte tiel simple, se la *Jefe Politico* estus sendinta de la distrikto kelkajn prudentajn kaj trankvilajn virojn al la trupo, kiam li ricevis la sciigon pri la almarŝo. Tiuj viroj certe pli estus atingintaj kaj pli valoran por la ŝtato ol la *rurales*, kiujn la *Jefe Politico* elsendis kun la ordono ne permesi iujn intertraktadojn, sed simple suke ekpafi, tuj kiam ekaperos la banditoj kaj murdistoj.

## Ĉapitro 02

01

La trupo marŝis nun sur larĝa vojo. La vojo ne estis farita, sed larĝa kaj malferma tial, ĉar ĝi kondukis tra prerio. Tiu prerio apartenis al la bieno *Santa Domingo*, kies blanke kalkita preĝejo nun jam videblis sur monteto. Tiom distance, kiom rigardis malproksimen la okuloj kaj dekstren kaj maldekstren, estis ĉio posedo de la bieno.

Kvardek peonaj familioj vivis tuj apud la mastrodomo en siaj kabanoj. Kvindek pluaj familoj vivis en kvar etaj setlejoj, kiuj estis distritaj en la kvar anguloj de la granda biena tereno. Lokigi tiujn setlejojn de aliaj peonoj tiom malproksimen de la mastrodomo, havis la avantaĝon, ke la peonoj, kiuj estis bovpaŝtistoj, pli bone povis gardi kaj kunteni la gregojn, kiuj vagadis vaste en la tereno.

Generalo, Profesoro kaj Celso ripozis sur la monteto, de kie ili povis vidi la preĝejon de la bieno. Je pli ol duono de la distanco de la monteto ĝis la bieno troviĝis profunda terkavaĵo, kiu, kiel takseblis de la monteto, certe larĝis du

kilometrojn. La preria tereno estis ondeca kaj interrompata de multaj montetoj. La montetoj malofte estis pli altaj ol dekkvin metroj, plej ofte pli malaltaj. Sed sude leviĝis en grize blua foro montoĉeno, kiu etendiĝis ankoraŭ en viddistanco laŭ la horizonto. En la tereno ankaŭ troviĝis distrite kelkaj arboj, unuope, kaj kelkaj grupope unuigitaj en arbaretoj po dek ĝis dudek arboj. Intere, simile distrita en la tuta tereno, videblis tie kaj tie sovaĝaj arbustoj, unuope kaj pogrupe.

Ekde la monteto, je kies malsupro nun laŭvice almarŝis la Unua Kompanio, oni bone povis rigardi per la okuloj la vojon ĝis la korto de la bieno. La vojo konsistis el kvar aŭ kvin firmtretitaj padoj, unu apud la aliaj. Je certaj lokoj ili unuiĝis al nur tri aŭ du padoj aŭ ili disbranĉiĝis en kvin aŭ eĉ ok kaj naŭ padojn. Tiuj padoj aspektis kvazaŭ la radoj de ĉaroj ruliĝis trans ilin. Sed en tiu regiono oni ne uzis ĉarojn. Tiujn padojn firmtretis sur la verda preria lando la brutoj, kiam ili promenis vespere de la paŝtejoj al la korto kaj matene ree elmarŝis. Krome migris tie ĉiuj mulokaravanoj, kiuj de Hucutsin moviĝis al la bienoj kaj al la monterioj. Krome tie trotis la indiĝenoj, kiam ili

frekventis la foirplacon.

Tiuj padoj tiom firmtretiĝis, ke sur ili ne pu kreskis herboj. Tial oni klare povis vidi la padojn ĝis distanco de multaj kilometroj malproksime.

La herboj ne estis altaj, apenaŭ metron. Ili ne estis densaj, sed staradis en formo de herbotufoj. Vastdistance la herboj altis apenaŭ duonon de metro. Tamen la herboj ĝuste estis tre verdaj kaj sukaj, sekve de la pluvsezono.

Ĝis tie la vojo eliĝinta de la ĝangalo kvankam jam dum du horoj larĝa kaj malferma, estis limigita ambaŭflanke de vepro. Sed de tie la vepro ambaŭflanke de la vojo retiririĝis pli kaj pli al la flankoj, pro kio la vasta preria ebenaĵo ŝajne fariĝis pli granda kaj vasta ol ĝi efektive estis. La akre hela suno, kiu ŝargis la prerion, malaperigis la ebenaĵon pli malantaŭe en briletanta minca vualo tia, ke de tempo al tempo malvidebliĝis la blanka preĝejeto de la bieno kaj la korto aŭ reaperis en alia loko, ne tie, kie oni supozis ĝin ĝis tiam. Trans distanco de pli ol tri kilometroj fariĝis ĉiuj aĵoj – ju pli Suno leviĝis kaj des pli ardante ĝi radiis malsupren – nedifineblaj laŭ la formoj.

Bovoj aspektis iafoje kiel hundoj en la briletanta kaj flagranta lumo, el grandaj ŝtonoj fariĝis domoj, elbruligitaj arbotrunkoj, kiuj staris rekte, kaj elbruligitaj prerijaj palmoj jen aspektis kiel falintaj kolonoj de forlasitaj temploj jen kiel brunaj figuroj de indiĝenoj elrigardantaj. Kutime renkontis la vojaĝantaj karavanoj tie tutajn gregojn de bruto kaj sovaĝiĝantajn ĉevalojn, kiuj estis posedo de la bieno. Iam kaj tiam oni eble povis vidi galopi proksime aŭ malproksime du aŭ tri peonojn aŭ vakerojn sur ĉevaloj, kiuj serĉis tiujn gregojn por trovi bovidojn nokte naskitajn aŭ malsanajn bovojn aŭ ĉevalojn por kapti ilin per lazo kaj rekonduki ilin al la korto, por ties protekto kaj kuracado.

Sed hodiaŭ sur la granda vasta prerio ne videblis grego, nur tie kaj tie unuopaj, vojerariĝintaj distraj bovoj. Neniu vakero, neniu peono videblis. Dek vulturoj aŭ eĉ pli cirklis alte en la aero. Kaj en la malproksima korto de la bieno oni ekvidis de tempo al tempo, kiel leviĝis flagranta fumkolono kvazaŭ tordita, kiu eliĝis tie jen el la kuirejo de bieno jen el unu el la peonaj kabanoj.

„Tio estas damne granda kaj bela bieno, nomata *Santo Domingo*“, diris Celso kaŭriĝante kaj volvante cigaron.

„Tiun mi konas, ĝi apartenas al *don Patrico*. Mi konas ĝin bone. Mi tie tranoktis kelkajn fojojn, ĉe la peonoj. Ĝi estas granda kaj riĉa bieno.“

„Ankaŭ mi konas ĝin sufiĉe bone, kaj ankaŭ vi“, diris Generalo turnante sin al Profesoro. „Ni restadis ĉi tie unu tagon kaj tranoktis dufoje, kiam ni marŝis al la monterioj.“

Proksimiĝis nun kelkaj pliaj *muchachos* sur la monteton kaj sidiĝis al ili.

Profesoro ekstaris kaj retrorigardis sur la vojon, de kie en tiu ĉi momento almarŝis la dua kompanio kaj same kaŭriĝonta por ripozo, kiam ĝi trovis la unuan ripozantan.

„Nu, jen do ni ĉi tie“, diris Profesoro subite kun ŝanĝita voĉo: „Kion ni faru nun? Alvenintaj ĉe la unua granda

bieno ni estas. Io nun farendos. Ni povus pretermarŝi ĝin kaj pluri kvazaŭ ni ne vidus ĝin. Sed por kio ni estas do ribeluloj, se ni celus iri plu sen levi la unuan grandan mordaĵon trovitan survoje? Kaj, se ni serioze faros revolucion kaj volas doni al ĉiuj peonoj *tierra y libertad*-on, tiukaze oni ja iam devos komenci tion. Grava principo en la revolucio estas, ke oni ne postlasu malamikon en la dorso! Se ni ĉi tie pretertrotus kvazaŭ ŝafgrego, tiukaze ni havus fortan malamikon endorse. Do, kion vi opinias?“

„La saman, kion opinias vi“, respondis Generalo.

Celso elblovis dikan fumnubon kaj diris seke: „Ĝuste. Por kio la bienulo kaj lia fia idaro regu tie ĉi ankoraŭ pli longe? Estas tempo, ke ankaŭ la aliaj foje estos en la vico, kiuj tiom longe estis regataj kaj ne rajtis malfermi la buŝon.“

Profesoro ridis dirante: „Tiukaze ni ja denove ĉiuj samopinias kaj pri la pensado kaj pri la agado kaj pri la batalo. Ĉu ne, *muchachos*?“ li vokis kun laŭta voĉo trans la homojn, kiuj tie ripozis.

„*Tierra y libertad!*“ vokis ĉiuj samtempe. Kaj poste ili kriis: „*Viva, Profesor! Arriba, General! La muerte a los tiranos y todos los patrones y dictadores! Libertad para todos!*“

Kiam Profesoro ree sidis, diris Celso: „La bieno ne estas forlasita. Alikaze tie ne estus videbla fumo.“

„Ĝuste tio estas, kio donas al mi novaĵon por pripensado.“ Profesoro rigardis al la korto. „Kial tie estas fumo en la mastra domo kaj en la kabanjoj? Ĉar neniu forkuris, kvankam ili ĉiuj scias, ke ni estas multaj kaj havas revolverojn kaj fusilojn. Kaj kial neniu forkuris?“ Li rigardis demandante al Celso kaj Generalo.

„Ĉar ili pensas, ke ni forprenos nur kelkajn bovojn por buĉi ilin kaj poste iros plu sur nia vojo“, respondis Generalo, ironie okulumante.

„Kaj vi, Celso, kion opinias vi?“

„Ili havas tiujn *rurales* en la bieno aŭ federaciajn soldatojn“, respondis Celso.



„Celso, mi nomumos vin kolonelo“, diris Profesoro ridante. „Ĉu vi konfirmos tion, Generalo?“

„Konfirmite.“

„Bone, Celso“, diris Profesoro pri tio, „vi estas damne prudenta knabo. Tio, kion vi diris, estas ĝusta. La bieno estas plena de *rurales*. Certe jam antaŭ kelkaj tagoj en Balun Canan aŭ Aĥlumal alvnis mesaĝo pri nia almarŝo, alikaze la *rurales* ankoraŭ ne estus ĉi tie.“

„Sed ankaŭ eblas, ke la *rurales* faras inspektan rajdadon al la bienoj por rigardi, ĉu ĉie estas trankvilo kaj neniuj ribeloj kaj neniuj brutŝteladoj de la baĥajontekoj.“

„Celso, vi foje denove pravas. Tio estas multe pli verŝajna, ke tie en la bieno troviĝas komandita inspektotrupo. Dudek aŭ dudekkvar soldatoj, kapitano, serĝento, tri aŭ kvar suboficiroj. Ili havas karabenojn kaj kutime mitralon ĉe si.“

Aŭskultinte tion, la *muchachos*, kiuj kaŭradis ĉirkaŭ la monteto, fariĝis ekscititaj: „Karabenoj kaj revolveroj: „*Viva las armas!* Huraon al la armiloj!“ ili vokis, eksaltis

kaj dancadis, kvazaŭ ili jam venkis en la batalo.

„Vere ne eblas, ke sciigo jam atingis la urbon Balun Canan“, parolis Profesoro plu, „kaj en Achlum kaj en Hucutsin estas malgrandaj gardaj komandetoj nur ĉeokaze. Sed certe la sciigo jam estas sur la vojo al Jovel, kaj tiukaze avancis duono de bataliono. Kie, Generalo, ili laŭ vi momente troviĝas?“ demandis Profesoro.

„Se ni estis komanditaj por gardi ĉi, ni ne atendis en bieno, ne en la korto, mi celis diri. Ni atendis aŭ en subĉiela tereno aŭ moviĝis atakeme al la ribeluloj.“

„Kial vi ne atendis en la korto, kiu ĉirkaŭe havas murojn kaj do formas bonan kovrejon?“

„Simple tial, ĉar unuavice ekestus tro da damaĝoj en la bieno, kaj due, ĉar ni sidus interne de korto facile kvazaŭ en kaptilo, speciale en tiu kazo, se la ribeluloj havis ĉirkaŭ kvincent virojn je dispono kaj ni nur dudekkvin virojn. En la libera tereno ni estis kun la mitralo, kun la karabenoj kaj kun bone dresitaj soldatoj eĉ tiukaze plu pli fortaj, se ni havis nur dudek virojn kaj la ribeluloj kvincent da ili.“

„Sekve vi pensas, ke ili renkontos nin ĉi tie sur la malferma ebenaĵo, ĉu?“

Tion mi ne nur pensas, sed mi certas, ke ili faros tion. Mi estis ja ne por nenio serĝento. Mi scias, kiel oni faras tion. Mi faris mem.“

„Kontraŭ peonoj kaj laboristoj, ĉu?“

„En tiu kazo, se vi jam estas enmeze de la armeo, vi ne plu povas fari multon. Tio iradas kiel maŝino, ĉu vi volas, ĉu ne, vi kun-devas, vi povus ŝanĝi tion nur, se vi mortpikus kelkajn oficirojn aŭ rompmartelus iliajn konusojn kaj poste skuus la polvon de la piedoj. Sed, se vi scias, ke vi havas kelkajn dekojn en la bataliono je via flanko kaj vi havas la necesan sangofridecon kaj faras tion en la ĝusta momento, tiukaze vi tiros la tutan batalionon al via flanko. Ili estas ja ĉiuj turmentitaj sklavoĵoj kiel vi mem.“

### **Rimarko**

„*Viva, Profesor! Arriba, General! La muerte a los tiranos y todos los patrones y dictadores! Libertad para todos!*“ = „Vivu Profesoro! Supreniĝu Generalo! La morton al la tiranoj kaj al ĉiuj patronoj kaj diktatoroj! Liberon por ĉiuj!“

Dum Generalo babilis, Celso pigre kaj leĝere kaŭradis tie, fumis cigaron kaj palpebrume okulumis al la korto de la bieno.

Subite li aŭdigis duone glutitan brueton. La cigaro glitis el lia fummano. Li sanĝis sian kaŭrantan pozicion en surgenuan, li apogis ambaŭ pugnojn antaŭ si sur la tero kaj kliniĝis kaj etendegis la kapon antaŭen.

„Ĉe la diablo, kio tiom perpleksigas vin?“ demandis Profesoro.

Kelkaj *muchachos*, kiuj jam kolektiĝis sur la monteto, ekuzis la saman pozon kiel Celso. Estis ilia natura pozico, se ili rigardis ion malproksiman, kion ili ĝuste volis ekkoni kaj prijuĝi antaŭ ol ĝi proksimiĝis.

„Generalo pravas“, diris Celso duonlaŭte al la *muchachos*, kiuj estis plej proksimaj al li.

Generalo kaj Profesoro rampis pli proksimen al li.

„Kion vi diras, Celso?“ demandis Generalo.

„Ili sidas en la terokavaĵo“, respondis Celso tiom mallaŭte, kvazaŭ li timus, ke la *rurales* povus aŭdi lin. Estis pli ol tri kilometroj ĝis la terkavaĵo.

„Mi vidis ekfulmojn je diversaj lokoj en la kavaĵo. Povus esti iliaj ĉapoj aŭ la fusiltuboj aŭ butonoj. Ili estas *rurales* aŭ *federales*.“

„Damne, Celso, nun ankaŭ mi vidis la fulmadon, kaj eĉ tri diversajn en la sama momento“, diris Generalo.

Olegario, unu el la *muchachos*, kiuj kunrampis sur la monteton, demandis: „Kion vi supozas, Generalo, kiom da ili povus esti, kiuj atendas nin?“

„Unu gardokompanio certe estas. Eble dudek kvin viroj.“

Alia *muchacho*, Herminio, aŭdinte tion, vokis laŭte:

„Volu tion iu kara Dio en la ĉielo, ke ili estas du regimentoj. Kiom da belaj revolveroj, karabenoj, mitraloj kaj kartoĉoj ni havus tiukaze, se ili estus du regimentoj.“

Generalo ridis: „Estu tute trankvila , *muchacho*, ni havos sufiĉe da penoj pri la mitralo, kiun tiu manpleno da soldosklavoj havas ĉe si. Sed ni ja konkeros ĝin. Nur ne zorgu vin. Kaj se ni foje estos glutintaj tiun kompanion, kiu tie nazblovas kaj gapi provas, tiukaze ni jam povos trankvile konfronti tutan batalionon. Nur ne provu havi ĉion per unu fojo, *muchachos*. Pecon post peco ni kaptu ĉion. Kaj ne faru erarojn. Mi diru tion jam nun antaŭe al vi, ke tiukaze, se ni estos vorintaj ilin tie transe, vivos eĉ ne duono plu de nia tuta *compania*.“

Tion diris Olegario: „Ĉu ni ankoraŭ vivos aŭ ne, tio estas valora tiom, kiom koto, kiom hundokoto. Sed tiuj, kiuj restos vivantaj, tiukaze almenaŭ scios, kial ili vivas kaj por kio. Mi volas havi karabenon, ĉe la diablo, kaj la kartoĉojn aldone. Mi atakos ilin sola, se vi ne volas.“

„Ĉi tie vi restu, diodamnita bubo“,diris Generalo kolere. „Vi ekiros, se mi diros tion al vi, kaj kiam ni ĉiuj ekiros. Eble vi ja ricevos la karabenon, sed puŝitan en vian ventron, se vi volas fari la militon laŭ via propra plaĉo.“

„Generalo pravas, Olegario“, diris Celso trankviligante al

la *muchacho*.

„Ĉi tie ne ĉiu povas komandi kaj neniu agi laŭplaĉe.  
Tiukaze oni buĉus ĉiun el ni laŭvice kaj neniu postrestus.  
Ni ĉiuj ekatakos kune, kaj ne nur unu, kaj ni ekiros, kiam  
Generalo diros, ke estas jam la tempo.“

La *muchachos* rampis malsupren de la monteto. La du kompanioj, kiuj kampadis ĉirkaŭ la monteto, ne videblis de la *rurales*, kaj ĉu la malmultaj *muchachos* sur la monteto estis vidataj aŭ ne, ne estis tute certa. Sed Generalo diris, ke li supozas, ke la *rurales* vidis ilin, ĉar la kapitano certe havas binoklon ĉe si.

Intertempe alvenis plua kompanio. Generalo ordonis, ke ili ekkampadu, kaj, ke tiukaze se ili volos iri tien kaj tien, ke tiukaze nur kliniĝintaj. Li volis eviti, ke la *rurales* eksci, kiom granda estas la tuta trupo, kiu momente tie kampadas.

Li pruvis per tio, kion li nun interkonsiliĝis kaj ordonis, ke li, kvankam nur filo de povra indiĝena etkomparano, kun bona rajto povus esti generalo en armeo. Neniu sperta oficiro de la *federales* povus fari tion pli bone. Kun certeco oni rajtas diri, ke verŝajne el cent trejnitaj oficiroj de la federacia armeo eĉ ne du estis, kiuj farus tion same tiel bone aŭ eĉ pli bone ol li, do tion, kion li elpensis kaj poste entreprenis.



Li vokis al si Profesoron, Celson, Santiagon kaj la alvenintajn kompaniajn gvidantojn, por interkonsiliĝo kaj por sciigi siajn planojn.

„Se ni nun ekmarŝus kiel ŝafoj, ili klakadigus sian mitralon kaj eĉ ne unu el ni postrestus vivanta; kaj eble la ribelo en tiu ĉi federacia ŝtato, sed certe en tiu ĉi distrikto estus finita en tiu ĉi jaro. Ni devos ellogi ilin de tiu ĉi terkavaĵo.“

„Dekdu da *muchachos* povus ataki ilin. Tiukaze ili elvenus kaj ni ĉiuj leviĝus kaj atakus ilin“, konsilis la kapitano de la tria kompanio.

„Ne, tiel ili ne elirus de siaj truoj. Ili lasus alveni la dekduopon sen pafi eĉ unu pafon, kaj nur tiumomente, kiam la *muchachos* marŝus en la kavaĵon, la soldsklavoj jetiĝus sur ilin kaj mortpikus ilin, por ke la postsekvantuloj ne aŭdu kaj ne sciu tion, kio okazas tie.“

„En ordo, tiukaze ni ĉiuj kune ataku sturmante“, konsilis unu el la *muchachos*, kiu sidis apude kaj ne apartenis al la milita interkonsilantaro.

„Tio estus ankoraŭ pli stulta“, diris Celso, „tion povus kompreni ja eĉ vi mem, kvankam vi nur nutris la bovojn en la monterio.“

„Ĝuste, tio estus la plej stulta, kion ni povus fari.“  
Generalo prenis la vorton. „Ni povus ĉi tie aranĝi grandan kampadejon kun multe da leviĝantaj fumkolonoj. Se ni faros tion, la sklavoj respondus laŭ unu el pluraj manieroj. Unu maniero estas, ke ili reiros al la bieno, ĉar ili ne kuŝos tutan tagon kaj tutan nokton ĉi tie ekstere en malsekeco; por tio ili estas tro pigraj, tro oportunaj kaj tro manĝegemaj. Tie en la bieno ili atendos je batalionduono da *federales* por plifortiĝo.“

„Eble ili ne scias, kiom multaj ni estas kaj supozas, ke ni estas ĝuste nur sesdek *muchachos*, el ne pli ol unu monterio“, diris Profesoro.

„Tio ŝajnas al mi ĝuste, Profesoro. Ĉar eĉ tiukaze, se ni estus perfiditaj, neniu el la perfiduloj sciis, kiom da homoj ni estas, ĉar ni marŝis ja ne unuformacie. Nur en la ranĉeto, kie la peonoj denukigis sin de *don Chucho*, la peonoj, kiuj tie loĝis, sciis, kiom da homoj ni estas. Sed el

tiuj neniŭ forkuris antaŭe. Mi okupiĝis pri tio ekscii, kiom da ili estis, kiam ni almarŝis, kaj kiom da ili ankoraŭ ĉeestis, kiam ni formarŝis. Ili estis kompletaj. Sed el unu de la aliaj pli malgrandaj kortoj devas esti rajdinta la patrono aŭ la majordomo al la bieno. Sed estas tute egale, kiu heroldis la sciigon al la bieno aŭ eĉ ĝis Hucutsin aŭ Achlum, li sciis nur la proksimuman kvanton de la *muchachos* el la Unua *compania* – de nia avangardo – kaj la *rurales* opiniis, ke temas pri nur unu trupo.“

„Kiel vi povas scii tion?“ demandis Celso.

„Tio estas tre simpla. Se la *rurales* scius, ke ni avancas kun proksimume dekcent da viroj kaj havas proksimume dudek revolverojn kaj dek aŭ dekdu ĉasknalilojn kaj krome sescent maĉetojn, ili ĉi tie ne atendus nin kun nur unu gardokompanio kaj nur unu mitralo; tiel, kiel mi konas tiujn *esclavos* de la diktatoro. Ne tiuj uniformitaj soldoservistoj. Tiuj torturuloj kaj skurĝantoj estas nur kuraĝaj, se ili kunas dekope, ĉiu kun klabo kaj revolvero kaj, se ili havas antaŭ si arestiton, kiu ne povas defendi sin. Jen foje rigardu kiel kuraĝaj ili estas. Sed ĉi tie en la subĉiela tereno, se ili estas dudekkvinopo kun mitralo kaj

ĉiu el ili kun karabeno kaj ni kelkaj centoj kun kelkaj revolveroj kaj maĉetoj, tiukaze ili atendos eĉ ne dek minutojn kaj fuĝos kiel leporoj kaj eĉ ne prenos la tempon al si senhokigi la mitralon kaj surŝarĝi ĝin, ĉar alikaze ili povus perdi sian felon. Kaj ĝuste tial, ĉar ili tie kaŭras transe en la kavaĵo, mi scias, sen devi demandi ilin, ke ili supozas nin ne pli ol ĉirkaŭ sesdek aŭ sepdek sufiĉe elmalsatigitaj *muchachos*. Ili pensas, ke ili povos vori nin kvazaŭ preterire kiel tagmanĝon. Ili certe jam mendis en la bieno la bankedon por festi kun la bienulo kaj ties najbaroj la venkon.“

Plua kompanio marŝante proksimiĝis.

Celso ĉirkaŭrigardis kaj observis la nubojn, kiuj okcidente malhele buliĝis kaj en ĉiuj aliaj direktoj allogis la sencertigite tien kaj tien ŝvebantajn nubetojn, kiuj evidente ne sciis kion fari, kaj kiuj tiel rapide pligrandigis la malhelan griznuban amasiĝon. Ju pli ampleksa ĝi fariĝis, des pli rapide ĝi proksimiĝis kun tondrado. Suno, kiu leviĝis nun al la kulmina punkto, estis ankoraŭ hela kaj ardanta. „Jen la Dio de la indiĝenoj ekhelpas al ni, kaj je la ĝusta tempo“, diris Celso. „Se ili ne volas malsekiĝi, ili nun devos rampi el siaj truoj; la malsekiĝon ili timas ja pli ol maljunaj katoj. Ĉu vi ne same pensas, Generalo?“

„Tion mi ja jam diris al vi, ke ili ne volonte malsekiĝas. Tio tamen ne ŝanĝos ion je mia plano, ĝi nur plirapidigos ĝin. Vi, Olegario, denove grimpu tie sur la monteton. Sed kaŝu vian kapon. Vi observu, kaj vi observu bone! Ili baldaŭ komencos kape aperi. Kaj ĝuste pro la komenciĝonta pluvo ili provos rapide fini la renkontiĝon por povi reiri al la bieno kaj kaŭri sekeje.“

„Estas tamen eble“, objëtis Profesoro, „ke ili tute ne ekriatas al ni kaj tiel kondutos kvazaŭ ili ne vidis nin. Tiukaze ili simple formarŝos kaj lasos al ni ataki la bienon.“

„Tio apartenas al mia plano.“ Generalo sekvis kun siaj okuloj Olegarion kaj atendis ricevi signon de li, kion la *rurales* do entreprenos. „Tion la friponoj, Profesoro, volonte farus, tion ili tre volonte farus, retiriĝi al la bieno por tie drinki, manĝaĉi kaj fikadi kun la inoj. Sed tion ili tiel simple ne povus fari. En la bieno kaj certe ankaŭ en ĉiuj aliaj bienoj de la ĉirkaŭa regiono, scias ĉiu, ke ni marŝas. Ili devas atendi nin, jam tial por konservi plu la reputacion kiel kuraĝaj soldatoj. Ili ne povas ridindigi sin, kaj tion ili ankaŭ ne faros, jam pro la inaĉoj, kaj ankoraŭ malpli pro la bienuloj.“

„La plej gravan vi forgesis, Generalo“, Celso diris ridante. „Tiu ja ne povus forkuri de indiĝenoj, kaj eble eĉ de peonoj. Ili povus montri sin plu antaŭ neniu ladino. Sur la vizaĝon oni kraĉus ilin, se ili kiel *rurales*, armitaj ĝis la radikoj de la hararo per karabenoj kaj *ametralladoras*, pro ni, pro pedikohavaj kaj kotaj monteriuloj skuis la

polvon de la piedoj. Antaŭ la mililtribunalo aŭ antaŭ speciala tribunalo de la *jefe* de l' Sekreta Politika Polico ili krome retroviĝus. Kaj oni pafmortigus ilin.“

„Vi estas bona lernanto, Celso.“ Profesoro ridis laŭte.  
„Antaŭ tri monatoj vi sciis nenion pri *ametralladoras* kaj vi havis eĉ ne ideon pri Sekreta Politika Ŝtat-polico, kiu respondecas nur al la maljuna kaciko. Kaj nun vi parolas pri tio kaj elĵetadas la esprimon tiel elokvente kvazaŭ vi farus en via tuta vivo nenion alian krom legi malpermesitajn gazetojn.“

„Ne miraklas“, diris Celso, kiu pro embaraso ruĝiĝis vizaĝe, „mi havis ja bonan profesoron. Krome mi estas kolonelo, ne forgesu tion.“

„*Ha!*“ vokis en tiu momento Olegario de la monteto malsupren. „Fariĝas vigle tie! Tri el ili ekstari, ili rigardas transen al ni kaj al ĉiuj flankoj. Unu el ili havas ion antaŭ la okuloj, per kio li rigardas.“

„Tio estas binoklo.“ Generalo fariĝis nun agema. Sed li ne montris ekscitiĝon. Li agis tiel trankvile kaj malstreĉite

kvazaŭ li preparus leporoĉasadon, tiel, kiel li kutimis fari tion kun la knaboj de sia hejma vilaĝo.

„Restadu tie supre kaj observu bone plu, tion, kion ili faros.“ Turninte sin al la *muchachos* de sia stabo, li diris: „Ni devos provoki atakon de ili. Ni ne povus ataki ilin, se ili restus en la terkavaĝo. Eĉ ne unu viron de ni ni povus traigi kaj ĝi estus nur sensenca buĉado. Ke ni estas proksimaj, ili nun scias. Ankaŭ el kiu direkto ni venas, ili scias. Tial ili ekstaris, por transrigardi la bataalkampon. Se ni foje estos eligintaj ilin, ili ne povos retiriĝi en la kavaĝon kaj feki en siajn pantalonojn. Tie transe, sur tegmento de la konstruaĵoj staras la bienulo kaj la majordomo, kaj eble eĉ najbaraj bienuloj, ili havas ĉasbinoklojn antaŭ la vizaĝo kaj vidas ĉion, kio okazas ĉi tie. Kaj nun ek do, ni logu ilin el ilia truo.“



Iom post iom ekestis softa stria pluvo.

Generalo vokis Santiagon al si. Tiam li mangestis Fidelon, ke li venu. „Vi ambaŭ estas ekde nun serĝentoj. Vi, Santiago, prenu al vi dek el la *muchachos*, ĉiujn kun ties pakaĵo surdorse, kaj ekmarŝu. Sed ne rekte antaŭen, ne al la terkavaĵo, kie la uniformitaj sklavoj kaŭras kaj atendas, ke ni ekkuru al ilia mitralo, por ke ili plezure povu falĉi nin per kuglosvarmo. Vi marŝu dekstren, ĉiam dekstren, transverse, ĉu komprenite? Unue vi marŝadu kun viaj viroj proksime de la vepro. Jen tie malproksime, ĉu vi vidas la pintan montsupraĵon?“

„Kompreneble mi vidas ĝin.“

„Bone, tien marŝu do. Ĝi devas aspekti observata de la kavaĵo tiel, kvazaŭ vi survoje volus eviti kun viaj kunuloj tiujn *rurales*. Ili eksciis, ke vi scias, ke ili sidas tie en la tersulko. Ili supozu, ke vi intencas preteriri ilin. Se ili ekpafos al vi, jen vi laŭlonge sternu vin, deprenu viajn ĉapelojn kaj ligu la ĉapelojn sur viajn pakaĵojn. La pakaĵoj

estas pli altaj ol viaj dorsoj. Tiukaze tiuj hunduloj pensos, ke vi havas viajn kapojn sub la ĉapeloj. Tute precize ili ne povos vidi tion. Ili estos tre malproksimaj de vi. Tiam vi rampu ĉiam klinite surtere antaŭen, por ke la ĉapeloj moviĝu kun viaj pakoj. Ĉiam plu al la fora monto. Se vi estos marŝintaj ĉirkaŭ tri kilometrojn en tiu direkto, tiam turnu flanken kaj transverse ataku rapide la bienon. Se ili ĝis tiam ne estos rampintaj el sia sulko, tiukaze ili eliros tiumomente, ĉar ili volos protekti la bienon. Tuj, kiam ili eliros kaj atakos vin, vi returniĝu kaj kuru klinite rekte al la vepro. Devas apekti tiel, kvazaŭ al vi firmgluiĝis pro timo la pantalonoj sur la postaĵo. Tuj se ili elestos el la kavaĵo kaj saltos sur la selojn de siaj „kaprinoj“ kaj sturme kuros al vi, tiam ni eksaltos kaj logos ilin ĉi tien. Tiam ili lasos vin en paco. Kaj vi tiam iru plu ĝis vi estos en la vepro. Kaj tuj, se vi estos en la vepro, rapide proksimiĝu al la loko, kie ni nun estas. Ni logos ilin pli en la vepron, kaj tiel vi kaptos ilin dorse kaj ni antaŭe, tiel, ke neniu povos forŝteliĝi. Vi, Fidel, prenu al vi same dudek virojn. Kaj al tiu, kiu ne volos sekvi al vi, poluru per viaj pugnoj la grimacon.“

„Mi ne devos poluri al iu la grimacon, Generalo.“ Fidel ridis optimisme. „Ili kvazaŭ kverelas pri la honoro, kiu saltos unue al la *rurales*. Ni bezonas karabenojn kaj kartoĉojn, kaj ankaŭ bonajn ĉemizojn kaj pantalonojn ili havas.“

„Tion vi ja scias, ke ĉiu karabeno, kiu estos konkerita, apartenos al tiu, kiu estos venkinta la koncernatan viron. Prenu ankaŭ la kartoĉojn, kaj tion, kion tia stinkanta ulo krome havas: la horloĝon aŭ ringojn. Sed la monon vi transdonos. Ni bezonos la monon en la ĉefstabo. Se ni ne ricevos monon, tio ne damaĝos multe. Mi ja ĉion havigos, kion ni bezonos krome, se ne per mono, tiukaze do sen mono. Vi, Fidel, kompreneble ne iros el la vepro. Vi iru nur flanken en ĝin, kaj sufiĉe profunde, por ke oni ne povu vidi vin kaj viajn *muchachos*, vi ataku ilin, kiam ni havos ilin survoje en la vepro, tiel, ke ankaŭ vi havos ilin dorse, tiel kiel Santiago. Ĉu vi ambaŭ komprenis, kion vi faru? Se ne, jen mi trovos ankaŭ aliajn serĝentojn, kiuj komprenos tion.“

„Nur ne afliktiĝu, Generalo“, respondis Santiago. „Ĉu komprenite, ĉu ne komprenite, ni ja kaptos ilin gorgê.“

„Ek do, vi ambaŭ, al viaj postenoj.“

Post malpli ol tridek sekundoj ambaŭ novaj serĝentoj kunstarigis siajn kompaniojn. Estis necese nur ekparoli pri la ordonita atako kontraŭ la *rurales*, kaj jam cent *muchachos* eksaltis por partopreni. Ke tiuj du kompanioj estis kaptontaj tiujn *rurales* dorse kaj tial havos precipe favoran okazon forpreni la armilojn de ili, faris la partoprenon en tiu kompanioj tre alloga. Pri la danĝero de mortpafiteco aŭ kaptiteco pensis eĉ ne unu el la *muchachos*. Ribeluloj devas ataki kaj venki. Se ribeluloj ne venkas, tiukaze estas en ĉiu kazo pli bone ne transvivi. Kion signifus malsukcesa ribelo, neniu devis rakonti aŭ klarigi al la *muchachos*. La tuta brutaleco, bestaĉeco, krueleco kaj retenita perverseco de hipokritaj idiotiĝintaj bierbarelaj etburĝoj, kiuj rajtis rigardi sin dum certa tempo kiel mastroj kaj policianoj, plej naŭze eksplodis ĝuste ĉiam en tiu momento, kiam ajn indiĝenaj proletoj kuraĝis leviĝi kontraŭ la tiraneco kaj diktaturo kaj la ribelo estis sufokita. Por ĉiu flavbekulo en unifomo, kiu mortis en batalo, oni torturis, skurĝis kaj poste mortbatis kiel hundojn cent aŭ ĉeokaze eĉ tricent indiĝenajn

proletojn aŭ oni pendumis ilin same al rabistoj dudekope je la sama arbo. La hororrakontoj, kiuj legeblis de tempo al tempo en usonaj gazetoj, rakontis eĉ ne dekonon pri tio, kio okazis efektive.

Sed la viroj ne okupiĝis pri la malvenko, ili okupiĝis nur pri la venko. Ilia aktuala zorgo ne estis ricevi teron kaj liberon, sed venki por preni de la uniformitaj sklavoĵ la armilojn kaj la sklavoĵn antaŭe portintajn la armilojn lasi kuŝi por la vulturoj.

### **Rimarkoj**

bierbarelaj etburĝoj = la esprimo certe devenas de la usona „*Beer Barrel Man*“ = bierbarelviro

## Ĉapitro 03

01

Ambaŭ kompanioj ekmarŝis. Ĉiu en tiu direkto, kiun Generalo ordonis.

La kompanioj apenaŭ forestis cent paŝojn, kiam Generalo alvokis ĉiujn *muchachos*, kiuj troviĝis proksime, teni sin pretaj por la ekmarŝo. La granda trupo, kiu kampadis pli malantaŭe, ricevis la ordonon surmeti la pakaĵojn kaj ekmarŝi, tamen ne antaŭen, sed reen al la vojo, sur kiu la *companias* alvenis tiutage.

Pluvis ne forte, sed en longaj tristaj strioj. Pro tiu pluvo la travideblo fariĝis malpli bona, sed ĝis tiu terkavaĵo la tereno sufiĉe bone observeblis.

La Santiago-kompanio intertempe marŝis kilometron kaj troviĝis proksimume en la alto de la sulko.

En tiu ĉi momento la *rurales*, kiuj embuskis en la sulko, ŝajne rimarkis, ke por ili ekzistas la danĝero, ke ili estos

ĉirkaŭrataj. Tion ili devis malhelpi, des pli, ĉar per tiu ĉirkaŭrado la *muchachos* povus sukcesi ŝovi sin inter la *rurales* kaj la bieno. Se la *muchachos* jam estus interne de la ĉirkaŭmuroj de la bieno, ili havus tre fortan avantaĝan pozicion, plifortigitan per tio, ke ili povus uzi la bienulon kaj ties familion kiel ostaĝojn.

Eksonis akra fajfsono en la tersulko, kaj tuj poste aperis la *rurales*. Kelkaj jam surseliĝis. Aliaj, kaj tiuj estis la plimulto, tiris siajn ĉevalojn post si ĝis supren al la rando de la sulko, por pli rapide supreniri la deklivon. Supre alveninte, ili saltis sur la ĉevalselojn kaj atendis pluajn komandojn de sia kapitano. La ĉevaloj karakolis tien kaj tien, evidente maltrankviligitaj pri siaj rajdistoj, kiuj ŝajne tre rapide volis fini la bataleton. La kaŭzo de tiu fervoro kompreneble ne estis kuraĝo aŭ milita entuziasmo, sed la fakto, ke la softa stria pluvo kvazaŭ flegme kaj heziteme pisetinta ĝis tiu momento – *chipichipi*-maniere kiel dirus indiĝeno – estis eksplodonta dum tridek minutoj en fulmotondran gravan tropikan *aguacero*-n, do en torentan pluvolverŝiĝon. Ju pli rapide la rekontiĝo finiĝus, des pli rapide la *rurales*

estus denove en la bieno. La kvindek pedikohavajn indiĝenojn la ekzercitaj *rurales* laŭ propra opinio transmondigus interne de dek minutoj. Ili ja spertis pri tiaj aferoj.



Kiam ili ĉiuj sursidiĝis, ili tuj komencis trote rajdi al la kompanio de Santiago. La stumbliga mola tero, en kiun sinkis la hufoj de la ĉevaloj, se ili paŝis tro firme, ne permesis rapidan galopon.

Unue videblis nur dek viroj. Generalo supozis, ke tiuj dek viroj estas la duono de tiu rura milico, kiu embuskis ĉi tie la marŝantajn ribelulojn. Sed ne daŭris longe ĝis pli kaj pli da rajdistoj aperis el la tersulko. Fine Generalo vidis mirigite, ke la *rurales* havis ĉirkaŭ la povon de sesdek viroj; kaj – kiel li povis taksu laŭ la akompananta mulokvanto – ili havis du mitralojn kun si.

„Damne! Damnite! Malbenite kaj surfekite!“, li diris. „Tio estas ja preskaŭ tuta *compania*, kiu tie elrampas. Nun fariĝos gaje ĉi tie ĉirkaŭe.“

„Espereble ĝi fariĝos gaje“, vokis iu. „Du mitraloj estas pli bonaj ol nur unu, kaj sesdek karabenojn ni bezonas pli ol nur dudek. Kion vi opinias, *muchachos*?“ li demandis ĉiujn tiujn, kiuj troviĝis proksime de li.

Antaŭ ol ili povis respondi, Generalo ordonis, ke ĉirkaŭ sesdek viroj el tiuj, kiuj kuŝadis tie, pretigu sin por povi ekiri en la sekvaj kvin minutoj.

Generalo vokis Profesoron: „Prenu la ĉefan trupon kaj komencu retromarŝi sur la sama vojo, tra kiu ni venis.“

La viroj faris tion malvolonte. Profesoro ne havis tempon klarigi al ĉiuj, kiun planon Generalo sekvas.

Generalo tenis la sesdek virojn proksime ĉe si kaj vokis al ili: „Tuj kiam mi pafos per mia revolvero, leviĝu kaj ekmarŝu malantaŭ mi al la bieno. Mi diros al vi, kiam vi ataku. Se vi pli frue atakos ol mi diros al vi, mi pafmortigos ĉiun unuopulon el vi laŭvice. Ĉe la diablo!“

La *rurales* nun tiom proksimiĝis al la Santiago-kompanio, ke ili distancis nur plu ĉirkaŭ kvincent metrojn de ili. Per tio estis barita al tiu kompanio la vojo al la bieno.

Nun, sekvante ĝuste kaj fidele la planon de Generalo, ordonis Santiago al siaj viroj, ke ili ŝajnu sin timemaj kaj kiel eble plej rapide retrokuru al la vepro por tie trovi protekton.

Kiam la viroj tiel timeme komencis kuri, rigardis tion la majoro komandanta la ruran milicon kiel signon de la certigita venko. Li diris rikane al la leŭtenanto: „Jen vi vidas tion. Kion mi ĉiam asertis? Tiu pedikohava indiana fatraso estas impertinenta nur profunde en la ĝangalo. Sed, se tiuj kotaj kanajloj nur ekvidas uniformĉapon oblikve surorele, jen ili forkuras kiel kunikloj, kun malseka merda suko gutanta el la ĉifonita pantalonfundaĵo. Ek do, buĉu ilin! Tiu, kiu portas armilon aŭ maĉeton aŭ tranĉilon, tuj senpardone estos pafmortigenda! Kiu nenion, tute nenion portas, tiun tuj

ligu al la lazo kaj trenu al la bieno, kie ni konservos ilin por hodiaŭ vespere. La inaĉoj havos plezuron pri tio kiel ni traktos la prizonulojn. Ek! Antaŭen! La mitraloj provizore restadu ĉi tie, sed estu pretaj por fortransporto. *Marcha adelante!*“

*El Corneta* blovis la signalon. La soldatoj ektritis pli haste. Sed la ĉevaloj stumblis kaj kaptiĝis en la fortaj tufoj de la herboj. Tial la atako ne okazis tiel militece elegante, kiel tion la majoro kaj la leŭtenanto deziris. Ambaŭ sciis tute bone, ke oni observas ilin en la bieno de la mastrodoma tegmento per ĉasbinokloj.

### **Rimarkoj**

*Marcha adelante!* = Marŝu antaŭen!

*El Corneta* = La korno

Generalo kuŝante longe etendite sur la tero, ekapogis sin nun pli altigante sin sur siaj brakoj. Nun li eltiris la revolveron. Sekvis kelkaj sekundoj de tre streĉita atendado ĉe la *muchachos*, kiuj turnis siajn okulojn al ĉiu movo de Generalo.

La kompanio de Santiago retrokurante nun alvenis ĉe la rando de la vepro. La *rurales* troviĝis nur ĉirkaŭ ducent metrojn for de ili. Spite al la aĉa tereno ili en ĉiu kazo volis komenci rapidan galopon por ankoraŭ malhelpi, ke la kompanio de Santiago ankoraŭ sufiĉe frutempe atingu la vepro, ĉar en la vepro fariĝus pli malfacile kapti la virojn ol en la bone transrigardebla ebenaĵo.

La galopsignalo estis donita. La ĉevaloj baŭmis kaj eksaltis.

Sed samtempe knalis de la monteto du pafoj, unu el la revolvero de Generalo, kaj unu el tiu de *muchacho*, al kiu Generalo mansignis tion. Ankoraŭ en la sama sekundo la komanditaj *muchachos* staris sur la piedoj. Tuj

ekkurante, ili komencis rekte sturmi al la bieno. Ili kuris, sekvante la komandon de Generalo, ne ĉiuj en unu granda bloko, sed grupope, kvin- aŭ sesope, por malhelpi esti tro bonaj celoj.

La militplano, kiun Generalo ellaboris, estis inda al sperta kaj genia militestro. Ellogi la kaŝitajn *rurales* el ties sekura sulko, kie ili pro siaj pli bonaj armiloj kaj sia militeca trejniteco estis fakte neatakeblaj, kaj eligi ilin en la neprotektitecon de la prerilando, jam tio estis por si mem verko de majstro. En la libera tereno la *rurales* spite al siaj ĉevaloj estis ne nur atakeblaj, sed eĉ venkeblaj. La ĉevaloj tie estis pli malhelpemaj ol utilaj, tiom pli ĉar ju pli pluvis des pli ree moliĝis la prerilando, kiu jam estis tute moligita de la longa pluvsezono. La majoro de la *rurales* ekkonis tro malfrue, kiel malgrabra estas la tereno tie. Ĝi estis pli firma ekde la bieno ĝis tiu tersulko, kaj li supozis, ke tio estas simila inter la sulko kaj la vepro. Li ne pripensis, ke ĉiu tereno ju pli ĝi proksimas al ĝangalo aŭ vepro des pli alprenas la ecojn de la vepro, tial, ĉar tie ĉiu malseko multe pli longe konserviĝas ol en la libera prerilando, kie pro la influo de la tropika suno la tereno eĉ post la plej drastaj pluvolverŝiĝoj elsekiĝas dum kelkaj tagoj.

Generalo konsideris tiun konatan fakton en sia plano. Ju pli proksime li povus logi la *rurales* al la vepro, des pli malbone ili povus uzi siajn ĉevalojn. Krome estas por la homoj kun botoj multe pli malfacile marŝi en moligita veprotereno ol por nudapiedaj indiĝenoj. Nudapieda indiĝeno kapablas kuri sur tia ŝlima tero, male al tio viro kun botoj ege devas peni entute antaŭeniĝi. Tiom da atento li devas uzi por sia vojo, ke li, envolvita en batalon, fariĝas preskaŭ senhelpa.

Ankaŭ la pluvo al Generalo estis tre bonvena, kvankam la pluvo estis pli neatendita – tamen danke salutata aliancano – ol helptrupo, kiu jam antaŭe trovis konsideron.

Sed tio, kio faris el Generalo kapablan militestron multe superan al la majoro de la *rurales*, estis lia doto povi pensi kvazaŭ per la cerbo de la kontraŭlo. Ĝis la lasta kaj plej eta ideo li ĝuste antaŭkonsideris, kion faras oficiro de la *rurales* aŭ de la *federales* en tiaj cirkonstancoj kaj kiel li agas.

Estis laŭnature, ke la oficiroj de la *rurales* trovis tion sia



plej grava devo protekti la loĝantojn de la bieno, en kiu ili estis gastoj, kaj la *caballeros* sentis sia plej nobla tasko savi la inajn membrojn de la bienula familio kontraŭ la krudaj kaj nelavitaj manoj de la indiĝenaj ribeluloj.

Tial la kompanio de Santiago nepre ne estu venanta en la dorson de la *rurales*. Krome la komandanta oficiro pro militecaj kaŭzoj devis malhelpi, ke la ribeluloj eble eĉ ĉirkaŭiros la bienon kaj moviĝos al Hucutsin, kiu momente estis senigita de soldatoj. Tial pro tiu kompanio de Santiago la majoro havis la devon forlasi kontraŭvole kaj kontraŭ sia plano la sekuran tersulkon kaj eliri en la prerilandon.

Necesis nun nur plu logi tiujn *rurales* al la ĉeftrupo. Tio estis pli komplika. Sed Generalo solvis tiun taktikan taskon simile genie, kiel li solvis la alian taskon, kiu estis eldevigi la kontraŭulojn en la prerion.

Estis lia plano logi tiujn *rurales* en la vastan prerian senarbejon, kiu etendiĝis kelkajn kilometrojn kiel larĝa strato en la vepron.

Dum la *rurales*, por povi noti grandiozan venkon, persekutis la kompanion de Santiago, kies membroj ŝajne jam pro timo fekis en siajn pantalonojn, retiriĝis la Fidel-kompanio maldekstre laŭ la limo de la vepro proksime al la enirejo de la senarbejo. Samtempe Generalo plenigis la vepron ambaŭflanke de la senarbejo tiamaniere, ke la kaŝitaj viroj ne estos videblaj de la *rurales*, se tiuj eniros la senarbejon.

Post kiam ĉio estis preparita por la batalo, Generalo devis nur ankoraŭ logi la kontraŭulojn en la senarbejon. Li faris tion tiel lerte, kiel povis fari tion pli bone eĉ ne sperta militestro.

Kiam ambaŭ pafoj knalis, unu el ili pafita de li mem kaj la alia fare de lia apudulo, la rajdantaj *rurales* haltis senescepte, sen atendi komandon, tiel neatenditaj estis al ili tiuj du pafoj, el la direkto, en kiu ili tute ne atendis la ribelulojn.

Ili vidis en la sama momento la trupon kun ĉirkaŭ sesdek viroj, kiun gvidis Generalo, kaj kiu sovaĝe ekkuris al la bieno. Dum la viroj kuregis, pafis tri *muchachos* per pafiloj, sekvante al la *rurales*, laŭ la ordono de Generalo.

„Ĉe ĉiuj sanktuloj!“ vokis la majoro al la leŭtenanto rajdanta je la maldekstra flanko, „jen ni estas ja sur mizere malĝusta spuro.“

La leŭtenanto algalopis.

„Tie transe, jen la kanajloj, kiujn ni devus persekuti efektive“, diris klarigante la majoro. „La *muchachos*, kiujn ni persekutas ĉi tie, kvazaŭ ili estus leporoj, estas nur mizeraj fuĝintaj buboj, nenion plu. Verŝajne ili

forkuras de la hundecaj ribeluloj, kiuj volas ŝteli de ili ties pene perlaboritajn *centavitos*. Ek, kornisto, blovu la signalon! Turniĝon dekstren! Atakon plenarmitan!“

La signalo eksonis kaj la dissvarminta vico de la *rurales* alidirektiĝis kaj galopis al la senarbejo, el kiu saltis la sturmantaj ribeluloj. Ĉirkaŭ du kilometroj disigis ilin reciproke.

Apenaŭ la *rurales* turniĝis novdirekte, retiriĝis la kompanio de Santiago en la vepron. Jen manovro, pri kiu la majoro supozis, ke ĝi okazis pro timo, ke la ribeluloj volis nur eviti la batalon, kiun ili vidis proksimiĝi, por ke ili ne estu trafitaj de vagantaj kugloj. Se la kompanio de Santiago ne estus aginta tiel kaj kuregus plu en la malnova direkto, tiukaze la majoro certe sendus suboficiron kun ses viroj, por ke ili persekutu la virojn. Tio estus kontraŭ la plano de Generalo, kiu devis malhelpi, ke la kompanio de Santiago estos implikita en batalon, per kio ekscius la komandanto de la *rurales*, ke la Santiago-kompanio apartenas al la ribelula armeo kaj, ke ties flanksalto estis nur taktika manovro.

Tuj kiam Generalo vidis, ke ĉiuj *rurales* rajdas al la avangardo, li ordonis al ĉiu viro, kiu havis pafilon, unufoje pafi al la *rurales*. Du ĉevaloj de la *rurales* renversiĝis. Ĉu ili estis trafitaj aŭ nur stumblis trans altajn tuberojn de la grandaj drataj herbotufoj, ne videblis. Sed du *rurales*, kies ĉevaloj ne renversiĝis, estis vunditaj. Tio observeblis de la *muchachos* sekve de la spasmecaj movoj, kiujn faris la trafitoj.

Sen tiuj trafoj, kiuj necesis por la sukceso de la plano de Generalo, povus okazi, ke la majoro rekondukus siajn soldatojn al la sulko por atendi la ribelulojn tie aŭ por ataki alimaniere, aŭ por eĉ retroiri preskaŭ ĝis la konstruaĵoj de la bieno kaj ekde tie svarme disfaldiĝi kiel ventumilo trans la tutan terenon.

Denove Generalo konsideris ĝuste la cerbon aŭ, en tiu speciala kazo, la strangan psikologion de la oficiro. Ĉu ili komandas hajdukojn aŭ flavbekulojn kun brunaj, verdaj aŭ nigraj ĉapoj, ili ĉiuj estas la samaj. Ilia honoro estas vundita, se proleto ĵetas koton kontraŭ ili aŭ pavimŝtonojn. Des pli mortige akre vundita estis ĉikaze la honoro de *rurales*-oficisto, ĉar kotaj kaj pedikohavaj

indiĝenoj aŭdacis pafi al li. Rigide indiĝeno staru, se oficisto staras antaŭ li. Rigide li staru kaj kruco la manojn super la brusto kaj profunde kliniĝu, se tiu alparolas lin; ĉar rigardi ties vizaĝon estis por peono pli granda krimo ol provi esplori la vizaĝon de Dio.

La pluvo, kiu tiumomente forte kaj vipe torentis malsupren, fihumurigis la majoron eĉ pli. Kial ne povas brili Suno, se brava militisto volas batali batalon! Foriĝu inferen, diodamnita pluvo! Oni estas malseka ĝis la ostoj sub la makulita ĉemizo kaj nun oni devas eĉ postkuregi la pedikohavajn indianojn. Kial, diablo sciu, oni ne simple buĉis ĉiujn indiĝenojn tuj en la unua jarcento post la malkovro? Tiukaze oni havus pacon, povus nun bonfarte kaj plezure sidi en la bieno kaj ludi sub la jupoj de la servistinoj kaj forludi de la bienulo cent pesojn per la kartludo „Sep kaj duono“

„Eksaltu! Sur la fibandon! Ni ja instruos al ili, kion signifas, se oni pafas al honestaj soldatoj. Eĉ ne unu el ili restu vivanta, kiu havas eĉ nur eron de iu armilo aŭ tranĉilon ĉe si. Tio estas ordono! Ĉu komprenite?“

Ŝanceliĝante kaj stumblante rajdis la *rurales* al la senarbejo. Ĉiuj, sen escepto, fihumuris pro la torenta pluvo, tiel, kiel nur povas fihumuri iu, kiu devas kuradi en la pluvo kaj scias kun certo, ke pluvos tiel dum kelkaj horoj plu. Ili gluiĝis al siaj ĉevaloj, kuntiriĝinte, kvazaŭ ili esperus per tio pli bone povi gardi sin kontraŭ la pluvo. Iliaj gumitaj pluvrezistaj manteloj ne uzebilis, ĉar ili en la batalo estus malhelpemaj.

Sed la avangardo de la *muchachos* marŝis plu al la bieno. Kiam Generalo troviĝis tiel profunde en la preria ebenaĵo, ke li kaj lia trupo havus por la retromarŝo aŭ la marŝo antaŭen al la elirejo de la senarbejo proksimume tiom da tempo, kiom la *rurales*, li ordonis turniĝi al ili kaj komandis, ke la *muchachos* ekpafu. Denove ŝajne du aŭ tri soldatoj estis trafitaj, sed ili restis sur siaj ĉevaloj kaj rajdis antaŭen al la senarbejo. La kornisto blovis la signalon kaj la *rurales* provis rajdi perfektan atakon. Sed pro la tereno kaj malhelpita de la pluvo la atako denove daŭris ne longe. La majoro haltigis la soldatojn kaj

komandis kelkminutan pafadon al la avangardo de la *muchachos*. Tiuj respondis per kelkaj malmultaj pafoj kaj tiam, fidele al la komando de Generalo, ili kuris kvazaŭ en granda timo kiel pelmela aro en la stratsimilan senarbejon de la vepro.

Nun la majoro pensis, ke venis la ĝusta tempo doni al la ribeluloj la neniigan finbaton. Li sekvis la konfuzitan trupon en la senarbejon. Tiu senarbejo estis prikreskata per rigidaj, duraj malaltaj herboj. La tersurfaco estis tial malpli mola ol en la prerio. Tiel la polico kapablis pli rapide galopi. La *muchachos* kuris kiel ĉasataj kunikloj. Persekuti ilin plezurigis la policanojn. La plezuro estis des pli agrable perceptita, ĉar la forta pluvo maldensiĝis kaj la nuboj klariĝis.

„Ne pafu“, komandis la majoro, „ĝis mi donos la signalon.“ Li turniĝis al la leŭtenanto. „Rigardu tien, *teniente*, pli profunde en la senarbejo estas ankoraŭ pli granda aro. Se ni havos la arojn unu apud la alia, mi ordonos, ke oni pafadu per la mitraloj al ili kvazaŭ tambure. *Caray*, ha, jen vi foje rigardu, kiom draste la *ametralladoras* povas koleregi. Bone por vi scii, kiel ili



falĉos la vicojn. Tio apartenas al la militinstruado.“

La retrokuranta avangardo renkontis aliajn kompaniojn, kiuj jam longe antaŭe ricevis la ordonon retiriĝi en la vepron. La kuranta aro, pligrandigata per tiuj *companias*, konsistis nun el proksimume ducent viroj. La aro aspektis sufiĉe konfuzita kaj estis do tute normale, ke la *rurales* ĝojis pri la persekuto de tiu kuranta bulo. Tio estis pli granda plezuro ol bloki brutarojn. Inter la kurantaj *muchachos* estis ja ankaŭ multnombraj ĉevaloj, muloj kaj azenoj, kiuj estis kunkondukataj el la monterioj. Tiuj fortimigitaj bestoj, kiujn oni vipadis, por ke ili pli rapide kuru, konfuzigis la fuĝantan amason tiel, ke la tiel bone dresitaj kaj tiel bone ordigitaj alrajdantaj *rurales* havis la impreson, ke tiu tute panike kuranta pelmelaro neniam denove povus rekolektiĝi laŭorde.

Sed la majoro, kiu estis tiel certa pri sia venko, ne rimarkis, kaj ŝajne ankaŭ neniu el ties viroj, ke tiu neimagebla konfuziĝo servis nur por kaŝi militruzaĵon, kiun elpensis Generalo.

La fuĝanta amaso okupis la tutan larĝon de la vasta vojo.

Ĝi tiom etendiĝis al ambaŭ flankoj, ke la flankuloj preskaŭ tuŝis la vepron, kiu etendiĝis dekstre kaj maldekstre de tiu senarbejo. La ĉasataj *muchachos* estis tiel konfuzitaj, ke ili, por povi fuĝi pli rapide, premiĝis ĉe la randoj en la vepron por havi liberan vojon, kiun ili meze de la amaso ne povus havi.

Tio aspektis tiel neimageble gaja en la okuloj de la *rurales*, kiel tiuj *muchachos* simile al panikaj formikoj kvazaŭ rampas kaj stumblas antaŭen. Sed la *rurales* ne rimarkis, ke tiuj *muchachos*, kiuj premiĝis kaj puŝiĝis en la randojn, tuj kiam ili malaperis el la amaso, pli profunde forŝteliĝis flanken en la vepron kaj pli kaj pli profunde kuris en ĝin kaj inter la arboj atendis, ĝis kiam la *rurales* estos en sama linio kun ili. Tuj kiam la *rurales* estis preterhastintaj, ĉiam persekutantaj la fuĝantojn, forŝteliĝis tiuj *muchachos* ankoraŭ plu restante en la vepro, denove laŭdirekte al la bieno. Se ili iris jam kelkajn cent metrojn en tiu direkto, ili denove reaperis proksime de la veprorando. Ili ekde tiam troviĝis en la dorso de la *rurales*.

Se kontraŭus al la majoro ekzercitaj soldatoj aŭ spertaj

revoluciuloj gvidataj de kapablaj oficiroj, li certe estus pli atentema. Verŝajne li eĉ ne rajdus en tiun senarbejon, sed atendus la ribelulojn, kiuj ja finfine iam devus eliri en la ebenaĵon. Sed tiuj pedikohavaj kaj kotaj indiĝenoj laŭ li ja ne povas pensi mem. Tial ili bezonas tiranojn kaj diktatorojn, kiuj forprenas de ili la negocon de la pensado. Kaj ĉar tiuj kotaj friponoj ne povas pensi, ili ankaŭ ne kapablas fari planojn. Tial, ek do kaj ĉiam rekte antaŭen!

Nur la membroj de la du Unuaj Kompanioj komprenis, kion Generalo intencis fari; ĉar ili aŭskultis Generalon, kiam li klarigis la planon al la *capitanes*. Sed la pli antaŭaj trupo en la kompanio ne sciis ion pri la plano. Ili vidis nur la fuĝadon kaj estis kunŝiritaj de la fuĝantoj. Ili provis kontraŭstari, sed pro la pli fortaj antaŭaj kompanioj, kiuj kunpuŝiĝis kun ili, ili ne povis sukcesi kaj estis kunpelataj en la fuĝantan aron. Dum intervaloj de kelkaj minutoj ili kriadis: „Ni ja ne estas timemaj pantalonfekuloj! Ni ne forkuru! Ek, ĵetiĝu sur la soldatojn! Ni bezonas iliajn karabenojn!“

Malbonŝance por la tuta sukceso de la plano, kunpuŝiĝis la fuĝanta aro kun la du lastaj kompanioj de la marŝtrupo, do al tiuj kompanioj, kiuj formis la fortan ariergardon. Estis tiuj kompanioj, en kiuj troviĝis Andreo kaj Kolonelo, kaj kelkaj pluaj el la pli inteligentaj *muchachos*.

Nek Generalo nek Profesoro nek la instruitaj *capitanes* havis la tempon kaj la okazon sciigi la planon al la

posteuloj, ĉar tuj kiam kunpuŝiĝis la unuaj grupoj de la fuĝantoj kun la ĵus alvenintaj kompanioj, tiuj jam sovaĝe ekhurlis: „He vi, fiaj ratoj, vi ja ne eble fuĝas eĉ pro *soldados* kaj *policias*, ĉu? Ni estas ribeluloj. *Tierra y libertad!* Ek, kontraŭ la soldosklavoj de la tiranoj! Ek, kaj buĉu ilin! Akireblos revolveroj kaj karabenoj de tiu flavbekaj pantalonfekuloj. Tiuj flavbekaj kanajloj. Antaŭen do!“

La *muchachos* kvazaŭ sovaĝiĝintaj taŭroj trarompis al si vojon en la fuĝanta amaso, kaj dum malpli ol dek minutoj ili estis jam en la frontlinio, apenaŭ kvindek metrojn for de la *rurales*.

La batalo komenciĝis pli ol dek minutojn tro frue.

La du flankgrupoj ankoraŭ ne povis esti alvenintaj komplete ĉe la rando de la senarbejo. La dekoj de la *muchachos*, kiuj ŝteliĝis flanken en la vepron, ankoraŭ ne tute kolektiĝis kaj ankoraŭ ne sufiĉe fortis por detranĉi la vojjon de la surĉevalaj *rurales* kaj por encirkligi ilin de kvar flankoj. Se la ariergardo estus almarŝinta nur je kvaronhoro pli malfrue, transvivus de la *rurales* eĉ ne unu viro.

Tiuj, kiuj estis de tiu momento la veraj konfuzitoj kaj ĉasatoj, estis la *rurales*.

La *muchachos* de la lastaj kompanioj ekkuris sen afliktiĝi pri pafoj, kun maĉetoj enmane, kriante kaj hurlante renkonte al la *rurales*. Eĉ la *muchachos*, kiuj posedis revolverojn aŭ pafilojn, ne prenis la tempon uzi tiujn armilojn. Tio daŭrus tro longe kaj estus tro komplike. Krome povas pafi per revolvero ĉiu flavbekulo. Tio tute ne estas kuraĝa. Multe pli bone kaj multe pli suke tio eblas

per maĉetoj. Tiom ekscititaj, tiom entuziasmaj kaj militkoleraj estis la *muchachos*, ke ili forĵetis ne nur siajn pakaĵojn, sed eĉ la pafilojn, se ili portis iujn. Ĉio ĉi estis malhelpema en aŭtentika batalo tia, kia ĝi estis komenciĝonta.

La *rurales*, dum ili alrajdis, apogis siajn pafpretajn karabenojn sur la dekstra femuro. Ili devis nur levi ilin por knale ekpafi. Tion ili efektive provis, sed la plimulto de la kugloj flugis fulmrapide trans la kronojn de la arboj. La kriado kaj hurlado de la alsturmanta amaso de koleraj *muchachos* liberigis la ĉevalojn el la bridopovo de ties rajdantoj. La atako okazis tro subite kaj tro neatendite. La ĉevaloj baŭmis, hufobatis, turniĝis tien kaj tien kaj provis preni la bridilojn antaŭ la dentojn kaj sovaĝe retrogalopi. Pli ol dek rajdistoj estis ĵetitaj el la seloj. La deĵetitaj rajdistoj leviĝis pene kaj komencis pafi per siaj karabenoj. Sed eĉ ne en unu kazo ili kapablis malplenigi tutan magazanon. Jen jam kroĉis sin tri aŭ kvar viroj al iliaj koloj, brustoj aŭ dorsoj. Kaj tri sekundojn poste la viro estis dishakita en pecojn.

Se la tero estus tre dura, la *rurales* verŝajne fuĝus kaj

eskapus grandnombre. Sed, eĉ, se nur unu el ili provis kvazaŭ perforte alidirekti la ĉevalon kaj draste sproni ĝin, jen tuj kvin viroj krocigis je la vosto de la ĉevalo kaj tri el ili je la bridilo, dum du aŭ tri aliaj ŝiris la viron de la selo.

La provo deseligi la mitralojn kaj surterigi ilin ne pli progresis ol ĝis la demeto de la rimenoj. Kaj tiam la mitralistoj jam estis dishakitaj.

La majoro kaj la leŭtenanto provis voki komandojn. Sed neniu atentis ilin. La kornblovisto kuŝis sen kapo en la koto. Ĉevaloj tretadis sur lia korpo.

„Savu sin tiu, kiu povas!“ kriis la majoro por povi senkulpigi sin kaj por havi rajton forrajdi. Lia leŭtenanto jam flugadis mil mejlojn super la tero kiel harpoludisto.

La majoro forrajdis kvindek metrojn kaj jam sentis sin savita. Sed jen subite elsaltis de la vepro, je kies ekstrema rando li rajdis, kvin el tiuj viroj, kiuj kaŝigis tie en la retromarŝo. Daŭris nur du sekundojn, tiom longe, kiom la flugo de la vojerarinta kuglo el la eleganta, per oro ornamita revolvero de la majoro, kaj jam kvin sekundojn



poste lia plej bona amiko ne plu povus identigi lin eĉ inter nur du kadavroj.

Kvar policianoj sukcesis eskapi. Ili devis danki tion al siaj ĉevaloj, kiuj estis tiom timemigitaj, ke ili forgesis la truojn en la tero kaj la ŝlimon kaj je morto kaj vivo rapidegis trans ilin.

La du flankgrupoj atingis la senarbejon je duono de minuto tro malfrue. Alikaze eĉ ne la plej kuraĝa ĉevalo sukcesus savi sian rajdiston. Almenaŭ eĉ tiu sukcesa fuĝo de la kvar *rurales* estis ne tuta perdo por la *muchachos*. La *rurales* forĵetis siajn karabenojn kaj sian municion por povi esti pli certaj pri sia sukcesa fuĝo.

Tiuj kvar fuĝantaj *rurales* trafis dum sia galopo al la bieno la du aliajn kamaradojn, kiuj jam antaŭe, antaŭ la enmarŝo en la senarbejon, renversiĝis kun siaj falintaj ĉevaloj. Tiuj ambaŭ retromarŝis piede al la bieno. Bonŝance al ili retrokuris ankaŭ kelkaj fuĝintaj ĉevaloj sen rajdistoj al la bieno. Estis ĉevaloj, kies rajdistoj en la batalo transmondiĝis. La kvar rajdistoj kapablis kapti du ĉevalojn kaj surseligi siajn du lame irintajn kamaradojn.

Tiel, ke tiuj ses ununuraj transvivintoj de tiu tiel elegante kaj verve elrajdinta polica trupo atingis la gardantajn murojn de la bieno humiligite kaj deprimate.

Ankaŭ por la deĵetitaj rurales ne postrestis armiloj. Ĉiu karabeno pendis plu je la elstaraĵo de la selo, kiam la ĉevaloj renversiĝis kaj svingoplene deĵetis la rajdistojn. Sed la ĉevaloj post kelkaj sekundoj denove surpiediĝis kaj spite al siaj vundiĝoj postkuris al la ĉefa trupo kaj kuntrotis en la senarbejon, kie ili kolapsis pli malfrue sekve de la sangoperdo. Kaj tial la muchachos povis havigi selojn kaj karabenojn al si.

Kiam oni nombris la predon, la ribeluloj konstatis, ke ili estas pli riĉaj je sesdek tute novaj karabenoj, je ok revolveroj kaj tri kampaj binokloj. Krome ili posedis du novajn mitralojn kun la kompleta municio. La magazenoj de la karabenoj kun tre malmultaj esceptoj estis elpafitaj, sed ĉiu policano de la rura surĉevala milico krome havis kvardek ĝis sesdek kartoĉojn en la zonoj kaj en la poŝoj.

En la predo troviĝis horloĝoj, ringoj, klaktranĉiloj kaj aliaj havaĵoj de la *rurales*. La havaĵoj apartenis de nun al

tiuj, kiuj venkis kaj buĉis la posedanton, kaj se tio ne tute precize decideblis, la *muchachos* ne kverelis pri tio. La plej multaj tute ne interesiĝis pri tio ricevi ion de la predo. Ĉiun trovitan monon ili transdonis al Profesoro por la militkaso. Estis ĉirkaŭ tricent kaj dudek pesoj, el kiuj aparternis pli ol ducent kvindek al la majoro, kaj al la leŭtenanto kvardek pesoj. La policanoj havis en kelkaj kazoj malpli ol peson en siaj poŝoj, kelkaj eĉ ne dek centavojn, ĉar estis jam antaŭ ses semajnoj, kiam ili entreprenis la lastajn domtraserĉojn en la loĝejoj de denunciataj civitanoj.

Lucio Ortiz, nomata Kolonelo, kiu alvenis kun la ariergardo, spertis pri mitraloj, ĉar oni instruis lin en ties bataliono pri tiu armilo. Ridis lia koro kaj liaj ripoj tremetis, kiam li vidis tiujn du belajn brilpoluritajn *ametralladoras*. Li brakumis kaj kisis ilin kiel fianĉinojn. „Vin mi ja delikate tiklos, *chamacas tan dulces*, dolĉegaj infanetoj. Vi ja petolu“, li diris, dorlotante kaj karesante ilin. „Vi ekŝprucu, ek, sur la favajn soldoservutulojn, ke Dio en la ĉielo ridu pro ĝojo. „Ili mankis al ni, *muchachos*“, li diris turniĝante al la aro de viroj, kiuj

urĝante interpuŝiĝis por povi rigardi la strangajn pafilojn. Eĉ ne unu el ili iam ajn aŭdis ion pri mitralo kaj tial ankaŭ ne sciis ion pri ties efiko.

„*Mi General*“, li vokis, „cetero, kiun vi nomumos komandanto de tiuj du lindaj ŝpruciloj? La spegule polurita latuno aspektas kiel brilanta oro. He, *mi General*, vi certe devos havi iun *comandante* por ili. Kion vi diras pri mia bonega propono?“

Generalo proksimiĝis kaj diris ridante al li: „Vi, Kolonelo, estos la *comandante* de la *ametralladoras*. Mi ne povas okupiĝi pri ĉio. Vi estas nomumita.“

„*Gracias, mi General*. Mi tuj formos kompanion de *ametralladoras* kaj instruos la *muchachos*. *Que chingan a todas las madres*, fikite je tio, kaj ĉiun patrinon, damne, nun ni estas trans la monto. Mi kuraĝas alfronti du kompaniojn de la kaciko. Espereble li sendos al ni du regimentojn. Aŭ prefere divizion. Ju pli da ili des pli bone. Ni bezonos ankaŭ du kampkanonojn. Kion pensas vi, Generalo? Ni devas mastrumadi nun tiel, ke la ekzekutisto sidanta sur sia aĝle pavumita seĝo, sendu al

ni du diviziojn. Eble eĉ kun ses kampaj kanonoj. Li devas nur sendi ilin, ni ja forprenos ilin de li. Poste ni marŝos al Tullum kaj vizitos la guberniestron.“

Li vidis stari Andreon kaj vokis bonhumure: „He, Andreĉjo, kion vi pensas? Ĉu vi ne pensas, ke vi sufiĉe bone povas skribi kaj legi por fariĝi la nova guberniestro? Ni bezonos guberniestron el niaj vicoj.“

Andreo ridis. Poste li okulumis laŭvice al Kolonelo, Generalo, Profesoro kaj Celso. Denove ridante li diris: „Ni parolu pri la stato de la ponto, se ni estos atingintaj la alian bordon. Estas ankoraŭ diable longa vojo al Tullum. Mi konas la vojon. Kaj krome de ĉi tie ĝis la *zocalo* de Tullum, kie troviĝas la registara palaco de la guberniestro, troviĝas tri infanteriaj batalionoj, kvar kavaleriaj regimentoj kaj certe dudek kompanioj de la surĉevala kampara polico.“

Generalo tordis sian vizaĝon, poste li oblikve rigardis de malsupre al la komandanto de la mitrala taĉmento. „Ĉu vi aŭdis tion, Kolonelo?“, li demandis. „Ĝis Tullum estos dudek kompanioj da *rurales*.“ Li ridetis ironie.

Kolonelo rigardis ĉirkaŭ si por rigardi, kiajn grimacojn montras la vizaĝoj de la *muchachos*. Sed tiuj restis enuaj. La *muchachos* ne okupiĝis pri sia estonta sorto post kvar semajnoj. Regimentoj kaj batalionoj povus esti survoje, aŭ eble ne. Oni ilin atakus, se oni renkontus ilin. Tiom longe, kiom oni ne renkontus ilin, estus la sama, ĉu estus ok regimentoj aŭ okcent, kiuj atendas je tio, ke la *muchachos* venkos ilin.

La batalo, kiom ajn rapide ĝi deruliĝis, kiom ajn sukcesa ĝi finiĝis por la *muchachos*, kompreneble kostis viktimojn. Se la plano de Generalo estus sukcesinta tute, tiukaze verŝajne estintus ebla subigi la *rurales* sen tio, ke eĉ nur dek pafoj antaŭe pafeblus.

Kvankam la plimulto de la pafoj, kiu estis pafitaj de la surprizita policaro, impete ĵetiĝis aeren sen kaŭzi damaĝon, sendepende de la disŝiritaj arbokronoj, tamen sufiĉe da policanoj, kiuj ĉiuj estis ekzercitaj soldatoj, havis la okazon, elpafi sian plenan magazenon en la densan aron de la *muchachos*, antaŭ ol tiuj ŝiris ilin teren. Se la mitraloj jam estus surtere kaj pafpretaj en la momento de la alsturmado fare de la ariergardo, tiukaze la malvenko de la *rurales* tamen neeviteblus, ĉar la *muchachos* sufiĉe multnombre okupis ambaŭ flankojn de la vepro kaj ĉar en la vepro la plej bona mitralo ne taŭgas. La viktimoj flanke de la ribeluloj tiukaze tamen atingus tian grandan kvanton, ke eble duono de la ribeluloj kuŝus morta sur la batalloko.

Serĉinte siajn mortintojn, la viroj trovis, ke dek naŭ viroj ne transvivis. Pli ol tridek aliaj estis vunditaj, plej ofte per pafoj, malofte per sabrobatoj aŭ per hufobatoj de timigitaj ĉevaloj. El la vunditoj mortis ankoraŭ antaŭ la vespero ok viroj, tiel, ke la kvanto de la mortintoj altiĝis ĝis dudek sep.

Oni enterigis ilin sen fari grandan ceremonion el tio. Kiam ĉiuj estis enfositaj kaj kiam kelkaj *muchachos* jam kvazaŭ preĝrade gurdis delonge kutimigitajn litaniojn, la mortintoj rapide estis forgesitaj. Kaj tute forgesitaj.

Profesoro diris al la *muchachos*, kiuj staris ĉirkaŭ la teraj montetoj, en kiujn estis pikitaj simplaj krucetoj: „Ni estas ribeluloj, ĉu ne, *muchachos*?“

„*Tierra y libertad!*“ ili vokis kiel respondon.

„Ĝuste, *camaradas*, *tierra libre para todos*. *Tierra sin capataces y sin amos*. Kaj ĉar ni estas ribeluloj, tial ni nun ne havos tempon plendaĉi pri niaj falintaj *hermanos*. Tiujn ni memoros, kiam la revolucio estos venkinta la malamikojn. Kaj tiam ni memoros niajn kamaradojn



honorige, solene kaj dankoplene. Ĉar ili falis por nia revolucio. Sed nun ni ne havos tempon por tio. Nun ni devas pensi pri la vivantoj kaj pri la venko. Kiu mortas batale, tiu ne povas festi venkon. La venkintoj festas. Sed sen falintaj batalantoj ne estos venko. Nur la vivantoj povos ĝui la sukcesojn de nia revolucio. La *muchachos*, niaj fidelaj kamaradoj, kiuj kuŝas ĉi tie nun enterigite, devis morti, por ke ni povu venki. Ili ne estis la unuaj, kiuj falis por tero kaj libero kaj kontraŭ la kaciko, kaj ili ne estos la lastaj, kiuj mortos batale. Sed unu aferon mi povas promesi al vi jam nun, *muchachos*, kaj tion, kion mi promesas, iutage estos vera. El ni ĉiuj, kiuj ĉi tie nun staras ĉe la tomboj de niaj mortaj fratoj, eĉ ne pli ol du dekoj estos plu vivantaj, se la revolucio finfine sukcesos. Sed tio ne damaĝas, fratoj. Ni ne estas la unuaj homoj surtere, kaj ni ne estos la lastaj. Post ni venos centoj, ja miloj de generacioj, kaj tiuj generacioj, kiuj venos post ni, vivos libere de tiranoj, de subigantoj kaj diktatoroj, tiuj scios danki al ni kaj scios honori nin, nin, tiujn, kiuj estos mortintaj por ilia libero. Ankaŭ tio havas valoron: ke oni honoros nin en estontaj generacioj. Sed tiuj, kiuj tie ĉirkaŭkuŝadas kiel pecoj kaj ŝiraĵoj, mortintaj kiel

soldosklavoj de la diktatoro por konservi lian potencon, por ke li povu nutri la popolon per mensogoj, tiuj estos iam pli forgesitaj ol tiu forrompita branĉo, kiu kuŝas tie transe. Ilin la estontecaj generacioj ne tenos en memoro kiel kiel batalantojn, ne kiel fidelajn soldatojn, sed kiel ekzekutistservistojn, kiel torturistojn, kiel uniformitajn sklavojn, kies tuta saĝo elĉerpiĝis en tio, esti obeemaj sklavoj kaj lakeoj de El Caŭdillo kaj de la aristokratoj kaj *cientificios*. Al la tiranoj kaj diktatoroj kaj la ĉikanuloj de la homoj apartenas ĉiam nur mallonga tempospaco en la historio de la homoj, kvankam tiu periodo estas ĉiam la plej terura kaj plej horora. Sed al ni, al la batatalantoj pri libero, pri la popolrajtoj kaj demokratio, al ni apartenas la tuta historio de la homaro. Ni estas la progresuloj, dum tiuj sklavoj estas la haltigantoj de la tempo kaj la malamikoj de trankvila progreso. Kaj per tio ni nun adiaŭu, *camaradas*, ni adiaŭu de niaj falintaj fratoj. Ni ĉiuj deprenu niajn ĉapelojn, honorigante tiel niajn mortintajn fratojn, kiuj mortis por nia revolucio. Ni ĉiuj prenu manplendon da tero, kaj tiam ni metu tiun teron sur la tombojn, en kiuj dormas niaj fratoj. Kaj dum tio ni voku: *Tierra y libertad! Viva la revolucion proletaria!*

*Viva la revolucion de los peones! Abajo los dictadores y los tiranos! Tierra y libertad!“*

Kiam *la muchachos* estis postvokintaj ĉiun vokon, kiun Profesoro antaŭvokis, estis dum sekundo kvieto, levis Profesoro manon kaj diris, sed ĉifoje nur kun ne laŭta voĉo: „*Adios, muchachos! Que duermen bien! Adios, muchachos! Dulce es morir para la revolucion de los pobres! Dormu bone, filoj miaj. Dolĉe estas morti por la revolucio de la povruloj. Dormu en paco!“*

Li surmetis sian ĉapelon kaj iris renkonte al Generalo. Per tute ŝanĝita voĉo li nun diris: Ek nun, al la bieno!“

General saltis surselen, por esti pli bone vidata, kaj vokis trans la aron „*A la finca, Muchachos! Adelante!“*

Kiam la lasta viro de la aro jam ĵetis sian pakaĵon surdorsen kaj ekmarŝis por sekvi al la antaŭirantaj *muchachos*, la dishakitaj pecoj de la *rurales* estis jam abunde okupitaj de ruĝaj formikoj.

Alte super la vepro, kie nun la nuboj komencis malaperi, flugis aro de vulturoj en cirkloj, kiuj fariĝis pli kaj pli

malvastaj, ĝis ili formis laste nur malgrandan cirklon super tiu parto de la senarbejo, kie okazis la batalo.

Antaŭe, marŝante je la pinto iris Generalo, kiu denove deseliĝis, Profesoro kaj Celso.

Generalo ĉirkaŭkole pendigis la rimenon de la kampa binoklo de la majoro. Li haltis kaj rigardis per la binoklo al la bieno, li turnadis la distancradojn de la tuboj, ree trarigardis la binoklon kaj lasis ĝin poste fali kunrimene.

Ankaŭ Profesoro havis binoklon, kaj Kolonelo, kiu denove gvidis la ariegardon, subtenata de la furiero Andreo.

„Ĝi estas superba aĵo, tia binoklo“, diris Profesoro, karese frapante la binoklon, kiun li kiel Generalo portis rimene surbruste.

„Povas esti“, respondis Generalo indiferece kaj evidente sen intereso. „Povas esti, ke tiu fatrasa aĵo estas superba. Sed tre valora ĝi ne estas. Se vi povas vidi tiujn hundecajn servistojn nur per tia aĵo, la distanco al ili estas ankoraŭ tro malproksima, por ke oni povu trakti per bastonoj ilin. Kaj se ili sufiĉe proksimas, tiel, ke oni povas prepari sin

laŭorde akcepti ilin, oni ne plu bezonas binoklon. Kaj, kiam ili fine tiom proksimos, ke oni povas pike puŝi maĉeton en ties ventrojn, la laŭseca aĵo nur petoladas ĝene en via vojo. Kion mi komencu per tia gapilaĉo? Eble ĝi taŭgas por hundeca sklavo, sed ne por ribelulo.“

Li malkroĉis la binoklon de sia kolo kaj donis ĝin al Celso. „Jen, prenu la binoklon. Vi estas kolonelo kaj bone povos uzi ĝin.“

„Merdo“, respondis Celso. „Kion mi komencu per tia gapilo? Mi ne bezonas binoklon. Mi povas sufiĉe bone rigardi per miaj propraj okuloj. Je distanco de kvincent paŝoj mi povas vidi birdeton sidantan sur branĉeto kaj povas diri al vi, kiu birdo ĝi estas.“

Generalo ridis: „Atentu, neniuj volas havi la aĵon de vi, eĉ ne donacite.“

„Bone, donu ĝin al mi. La binoklo, kiun mi havas, estas tiom malklara kaj tiom kovrita de veziketoj kaj polvograjnetoj, ke mi mi tre volonte akceptas vian. Al mi taŭgas bonkvalita binoklo. Miaj okuloj ne estas tiel bonaj,

kiel viaj. Donu ĝin al mi.“

„Kun ĝojo“, diris Generalo.

Profesoro de kroĉis sian binoklon, prenis la ofertitan, kroĉis ĝin ĉirkaŭ sian kolon, mantenis sian binoklon alte en la aero kaj vokis al la marŝantaj *muchachos*: „He, ĉu iu volas havi la binoklon?“

Neniu respondis.

Profesoro haltis dum momento kaj cirkaŭrigardis. Jen li vidis fervore marŝi la malgrandan Pedriton. La knabo, same kiel plenkreskuloj, portis sian pakaĵon sur la dorso. Kompreneble la pakaĵo estis laŭmezurita al lia forto.

Apud li marŝis lia juna onklino Modesta, simile portante sian pakon. Ŝi estis knabino de la tribo de la cociloj, deksepjara. Ĝi bonfartigis la okulojn de viro rigardi ŝin.

„*Oye, Chamaco*“, vokis lin Profesoro al si. „Jen mi donacas du kunnajlitajn tubetojn al vi. Se vi rigardos tra ili, tiukaze vi povos vidi la homojn sur Luno promenantaj per kanuoj sur la riveroj.“

La knabeto turniĝis al sia onklino: „Ĉu tio estas vera, *veridico*, *tia*, ke oni povas vidi veturi per tiaj etaj nigraj tvernobobenoj la homojn surlune en *canoas*?“

„Mi ne scias, *mĵito*,“ respondis Modesta, ridante al li.  
„Sed prenu ĝin, se Profesoro donacas ĝin al vi. Profesoro estas tre prudenta kaj erudita viro. Se tiu diras, ke vi povas vidi la homojn sur Luno per tiuj etaj *tubitos*, tiukaze certe estas vere.“

Profesoro kroĉis la binoklon ĉirkaŭ la kolon de la knabo.

La knabo havis senton, kvazaŭ instruisto honoris lin per ordeno. Kun ĝojego sur la vizaĝo li mansalute gestis al alia iom pli aĝa knabo kunmarŝanta en la grupo, ke li proksimiĝu kaj li montris al li sian novan ludilon. La pli aĝa knabo rigardis ĝin de ĉiuj flankoj kaj diris malŝate: „Per tio vi povas pafi eĉ ne leporon laman. Karabenon mi volas havi. Jen tio, kion mi havigos al mi en la sekva batalo. Jen rigardu kiel mi kaptos ĝin! Jen, per tiu ĉi klaktranĉilo mi havigos la karabenon. Mi jam dum la tuta marŝo preĝas frue matene kaj vespere al Plejsanktulino, ke ni nun baldaŭ denove renkontu iujn *rurales* kaj

*federales*. Tio, kion havas vi, estas nur ludilo por knabeto tia kia vi, ne por viro, tia kia estas mi. *Soy un rebelde*, kaj mi kaptos karabenon.“

La knabo havis dek jarojn, sed li portis pakaĵon, kiu certe pezis tridek kilogramojn.

Sed Pedrito ne lasis malŝatigi la donacon de Profesoro al si. Li puŝetis Modestan kaŝeme je brako.

„Ĉu Luno brilas hodiaŭ nokte, onklino?“

„*No, mi vidita*, mi pensas, ke ne. Li ree aperos nur en la sekvaj semajnoj. Tiom longe vi ja devos atendi, antaŭ ol vi vidos veturi la homojn sur Luno en *canoas*.“

„Onklinjo“, li diris post iom da silenta tempo, „sed eble mi povos vidi per la tubetoj la mortintojn, kiuj loĝas sur la steloj, ĉu?“

„Eble, filĉjo mia. Hodiaŭ vespere ni bone observu, ĉu la steloj aperos. Kaj ni serĉos la plej grandan al ni, ĉar sur tiu lumos la plej multaj lanternoj, kaj eble ni povos vidi tiam la homojn, kiuj formas tie la nubojn por ni kaj kiuj



bunte pripentras la florojn kaj birdojn.“

**Rimarko**

„*Camaradas, tierra libre para todos. Tierra sin capataces y sin amos.* = Kamaradoj! Liberu la lando por ĉiuj! Por tero sen submastoj kaj sen mastroj!

## Ĉapitro 04

01

La pluvo jam dum la mallonga batalo ĉesis iam post iam. Ĝi daŭris malpli longe ol la *muchachos* supozis. Sed ĝi estis bonvena al ili, kiam ili bezonis ĝin, kaj ĝi tute ĉesis, kiam ili entombigis siajn mortfalintajn kamaradojn.

Grandaj eroj de malhelaj nuboj rapidis trans ilin por kaŝiĝi. Kaj kiam la granda trupo nun marŝis trans la vastan prerion, al la granda bieno. Suno ridis alte, hele jubilante, sur la blua ĉielo.

La bieno estis fortikaĵsimila, ĉirkaŭata de granda muro. Ekstere, ĉirkaŭ cent kvindek metroj for de la muro, kaj rigardata de la bieno situanta norde, troviĝis la vilaĝo de la peonoj.

La trupo, rigardata de la bieno, almarŝis el orienta direkto. Generalo, Profesoro, Kolonelo, Andreo kaj dek pluaj *muchachos* serĉis al si ĉevalojn kaj nun surseliĝis. Estis ĉevaloj, kiuj estis forprenitaj de la *rurales*. La

granda plimulto el ĉiuj ĉevaloj, muloj kaj azenoj estis vundfrotitaj de la pakaĵoj pro la longa marŝo tra la marĉoj de la ĝangalo kaj trans rokajn altaĵojn, ili estis magriĝintaj kaj tute lacigitaj. Multaj el ili survoje renversiĝis. Oni devis malŝarĝi ilin, por ke ili almenaŭ marŝu plu. Multaj el ili sur la malvastaj rokopadoj perdiĝis pro la falo en abismojn. Aliaj firmgluiĝis en marĉoj, kaj pluaj dronis ĉe la travado de riverpasejo, ĉar ili estis tro lacaj por povi savi sin per naĝado el la kunŝirantaj rapidaj akvoj.

La *muchachos*, kiuj plej multe antaŭis la trupon kaj nun bone povis superrigardi la bienon, speciale tiuj, kiuj sidis sur ĉevaloj, trovis la konstruaĵojn de la bieno strange trankvilaj. Neniu ajn videblis.

„La bienulo fuĝis kun sia tuta fia idaro“, diris Generalo.  
„La di-damnitaj soldosklavoj, kiuj eskapis de ni, certe heroldis la sciigon al li, kio postrestis de la tuta fiera rajdistaro kaj, ke ilia granda *fiesta*, ilia festotago hodiaŭ ne povos okazi, kie ili intencis sunbani sin en la brilo de siaj uniformoj kiel tro ornamitaj simioj sur gurda orgeno. Sed mi diras, ke tio estas tute bona, ke la socio de la

bienuloj nun fine foje scias, ke ni agas serioze kaj, ke ni scias kapti la okazon kaj, ke nin interesas kiel stinkanta sterkejo, ĉu ni mortaĉos aŭ ĉu ni restos vivantaj.“

„Bone, Generalo“, diris Profesoro. „Tio estas tio, kion tiu pusohava hundidaro fine foje eksciis. Ili sciis, ke ili perdos en ĉiu kazo, tute egale, ĉu ni gajnos aŭ ĉu ni estos mortbatitaj kiel hundoj. Se ni ne gajnos, ili ne plu havos peonojn kaj ne sklavojn, kiujn ili povos subigi, skurĝi kaj peladi.“

Unu el la *muchachos*, kiu konkeris la signalkornon de la *rurales*, nomumita de Generalo signalkornisto de la trupo, kaj kiu tiam rajdis je la flanko de Generalo, diris: „Estas bone por ni, se la bieno estas forlasita. Tiukaze ĝi apartenos al ni dum nokto, kaj morgaŭ ni povos tute bone ripozi dum tago.“

„Ni ripozos dum du tagoj“, respondis Generalo. „Sed tiukaze alvenus *federales*“, diris alia el la viroj.

„Espereble.“ Generalo trovis tion tute normala. „Ĉu ni rekontos la batalionon, kiun oni nun sendas kontraŭ ni ĉi

tie en la bieno aŭ survoje al Hucutsin aŭ Aĥlumal, aŭ kie ajn, antaŭ ol ni venos ĝis Jovel aŭ Balun Canan, tio estas tute indiferenta. Ju pli frue ni renkontos ilin, des pli da armiloj ni ricevos, kaj des pli frue ni ricevos ilin. Tiom longe, kiom la diktatoro plu kaŭros sur sia fotelo kaj esperos, ke li povos dronigi la revolucion per mitraloj, tiom longe oni sendos iujn *federales* al ni. Ĉu ni estos tie ĉi aŭ ie aliloke, estos tute malgrave.“

„*Ay, caramba!*“, li interrompis sin subite. „*Caray, que chinguen a todas las madres, cabrones y mulas, je la infero, kio okazas tie?*“ Li rektiĝis sur sia selo, poste li vokis al ĉiuj muchachos sidantaj sur ĉevaloj „Ek, antaŭeniĝu, al la peonoj!“

Granda peongrupo de la bieno, viroj, inoj kaj infanoj, ĉirkaŭ kvindek homoj ĵetiĝis el siaj mizeraj argilaj kabanoj kaj la latbarilaj kavernoj kaj provis panike fuĝi okcidente, kie la vepro estis plej proksima. Iliaj hundoj bojis, kaj pluraj de la peonoj provis forpeli siajn kaprinojn, ŝafojn kaj porkojn. Kiam ili rimarkis, ke la brutaro retenis ilin, ili postlasis la bestojn al ties sorto kaj sekvis kurante al siaj antaŭe fuĝantaj familioj.

## **Rimarko**

cabrón = virkapro, eŭfemisme estas vira persono, kiu  
miskondutas, ĉar li tedas aŭ vundas aliajn. Do kanajlo ks.

*cabrones* = pluralo de *cabrón*

*Caray, que chinguen a todas las madres, cabrones y mulas...* =

Hehe! Oni fiku ĉiujn patrinojn, bastardojn, virkaprojn kaj  
mulojn..

La rajdantaj *muchachos* bezonis apenaŭ dek minutojn, kaj jam ili encirkulis ĉiujn familiojn kaj baris al ili la vojon al la rando de la vepro.

En la familioj leviĝis timema vekriado. Viroj, inoj kaj infanoj falis surgenuen, ili levis la manojn preĝante alten kaj almozpetegis la ribelulojn, ke ili lasu al ili la mizeran vivon, ĉar ili estas nur kompatindaj tre povraj peonoj, kiuj neniam suferigis iun kaj neniam perfidis ion ajn pri la monterioribeluloj al la patrono aŭ al la *rurales*.

„Ekstaru, vi ĉiuj!“ vokis Generalo. „Antaŭ neniu plu surgenuiĝu, sciu tion! Neniu plu estu supre kaj neniu malsupre.“

Ne konfidante tiun certigon, kiel ajn simpla kaj komprenebla ĝi ja estis, sed obeante nur la ordonon, ekstaris ĉiuj viroj kaj inoj. Humile la viroj tenis siajn ĉapelojn enmane, staris kliniĝinte kaj rigardis teren ĝis eble plaĉos al unu el la venkuloj alparoli iun el timigitaj peonoj kaj doni tiel al li la permeson levi la okulojn al la

mastro.

La inoj kaŝis sian kapon tute kaj palpebrumis per nur unu okulo tra faldfendo de sia malkara kaj trivita *rebozo* sen eĉ kuraĝi levi pli alte la rigardon ol ĝis la piedo de la ĉevaloj. Kelkaj inoj plorsingultis kaj blovpurigis la nazojn per la kaptuko, dum la infanoj kaŝiĝis plorĝemete kaj plorante post la dorsoj de la plenkreskuloj. Kelkaj beboj, eltimigite de sia dormo, ploris kaj provis elturni siajn kapeton el la firme kunŝnurita faskaĵeto sur la dorso de la patrino, ĉar ili timis, ke ili povus sufokiĝi. Aliaj kvazaŭ grakis esperplene kaj batis per siaj pugnetoj sur la nukon de sia patrino. La patrinoj, por ne montri malhumilan aspekton al la rajdistoj, provis retropremi per sia kapo la bebon en la tukon sur la dorso, kvazaŭ ili esperis per tio nei la ekziston de sia infano. La hundoj komencis lukti reciproke. Kaj kelkaj precipe kuraĝaj penis murde ataki la krurojn de la ĉevaloj. Tuj kiam la peonoj rimarkis la impertinenton de siaj hundoj, ili tiel forte piedbatis ilin, ke la hundoj estis forĵetitaj kelkajn metrojn.

Ke la *muchachos* sur la ĉevaloj estis eĉ pli ĉifonvestitaj, pli pedikohavaj kaj pli kotaj ol la peonoj, tion la timigitaj



peonoj ŝajne tute ne rimarkis. Simile ili ŝajne ne rimarkis, ke la *muchachos*, kiuj alvenis tie kiel venkintoj, estis indiĝenoj kiel ili mem kaj de ilia speco, ke ili tute evidente estis povraj kamparaj laboristoj kiel ili kaj kiel tiaj rigadis ĉiujn *patrones* kiel siajn tiranojn.

Sed la *muchachos* sidis sur fieraj ĉevaloj, kaj ili portis armilojn. Kiu alrajdis sur tiaj fieraj ĉevaloj, kiu portas revolerojn kaj karabenojn kaj batalis kontraŭ *rurales* kaj venkis ilin, estis nova mastro, verŝajne pli kruela, pli senpardonema kaj pli maljusta ol la antaŭa. Kiel okazis tie sur tiu bieno, tiel okazis poste en la tuta respubliko: La peonoj, kutimigintaj de jarcentoj je mastroj, tiranoj, subigantoj kaj diktatoroj, en vero ne estis liberigitaj de la revolucio, eĉ ne tie, kie la feŭdisma posedo estis dividita inter la peonaj familioj en bienetojn, en *ejidos*. Ili restis sklavo, kun la ununura diferenco, ke la mastroj ŝanĝiĝis, ke ruzaj revoluciaj gvidantoj fariĝis nun la riĉuloj kaj, ke la politikistoj misuzis nun la etposedantajn kaj ŝajne liberigitajn peonojn por nemezureble riĉigi sin je ili, por fortigi sian politikan influon kaj helpe de murdoj kaj de aliaj bestaĉaj agoj entrepreni nun ĉiun nur iel imageblan

malleĝan fiagon al la timigitaj kaj hororigitaj memstaraj peonoj por fariĝi *diputado* aŭ *gobernador*, kun neniu alia intenco krom pleniĝi siajn kestojn kaj trezorejojn.

Kiu havas la karabenon kaj la revolveron, tiu estas la mastro de tiuj, kiuj ne havas revolveron. La *muchachos* portis revolverojn kaj tial estis rigardataj la novaj mastroj kaj *patrones*. Ke ili estis ĉifonitaj indiĝenoj, estis nur hazardo. Morgaŭ ili ja certe vestus sin ĝuste, tiel, kiel la *ladinos*.

La peonoj havis sufiĉe da kaŭzoj fuĝi kaj esti terure timigitaj, kiam ili vidis alveni la ribelulojn. Ili konis sian landon, sian belan kompatindan kaj priplendindan landon. Ili naskiĝis en tiu lando kaj plenkreskiĝis tie. La revolveron oni tie ne portas por ornamo. Oni portas ĝin por pafi per ĝi, tuj kiam ofertiĝas okazo; kaj, kiel ĉe militoj, se ne ofertiĝas okazo per si mem, tiukaze oni kreas okazon. Jen okazis batalo de *rurales* kontraŭ ribeluloj. La venkintoj estis la ribeluloj; sed ili havis en la batalo certan kvanton da mortigitaj kamaradoj. La mortigitajn oni devis venĝi; kaj oni venĝis sin je tiuj, kiuj ne povis defendi sin. Ĉu ili havis iun praktikan rilaton al

tiu batalo, oni ne ekzamenis. Diktaturo diferenciĝas de aliaj registaraj formoj esence per senpacieneco kontraŭ aliaj homoj kaj per senpardona ekzekucio de venĝo al humiligitoj kaj malfortigitoj. La peonoj apartenis al la bieno, kie la *rurales* embuskis la ribelulojn, kie oni flegis la policanojn, kaj de kies mastroj ili ricevis ĉiun ajn eblan subtenon. La bienulo, tiel, kiel ties familo kaj la domservistaro, fuĝis. Je ili oni ne povis ekzerci venĝon. Sed la peonoj, kiuj ne fuĝis, ĉar ili rimarkis la fuĝon de sia mastro tro malfrue aŭ ne konsideris ĝin fuĝo, estis tie, kaj je ili la venkintoj same tiel bone povis venĝi kaj plezurigi sin, kiel je la kulpantoj. La kaptito estas ĉiam kulpa. Ĉar li estas kaptita, li ja povas defendi sin nur limigite. La peonoj sciis el la tridek jaroj de la diktaturo, ke ili estis ĉiam la perdantoj, ĉiam la punitoj, ĉiam la skurĝitoj kaj ĉiam la pendumitoj. La ribeluloj mortis en la batalo. La transvivintaj proletoj, kiuj eĉ ne kuraĝis moveti fingron por tiu ribelo, estis ĉiam tiuj, kiuj devis pagi ĉiun revolucion, per siaj ŝparitaj kaj enfositaj pesoj, per sia haŭto kaj per sia vivo.

## **Rimarkoj**

*rebozo* = granda tuko

*ejidos* = komunumojn

*diputado* = deputito, parlamentano

*gobernador* = guberniestro

„Kial vi forkuras, *muchachos*?“ demandis Profesoro. Li deseliĝis kaj iris al la plej proksimaj viroj. Li frapis sur iliajn ŝultrojn kaj dorsojn por montri al ili, ke li rigardas ilin kiel amikojn.

Ne pro sento de la koro, ĉar peonoj neniam ĉesas misfidi, sed nur pro ĝentileco kaj por ne kolerigi la venkintojn, ili rigardis nun supren kaj penis konduti tiel, kvazaŭ ili ekkonus la aŭtentikecon de la ofertita amikeco. Kelkaj el la inoj iris al la ribeluloj kaj kisis manon de Profesoro. Aliaj viroj, kaj la plimulto de la inoj, kuris al la ceteraj viroj, kiuj iom post iom deseliĝis de la ĉevaloj, kliniĝis profunde antaŭ ili kaj kisis ankaŭ iliajn manojn.

Profesoro demandis denove: „Kial vi do forkuris? Ni ne demordas la kapojn de kompatindaj peonoj.“

La viroj provis glui sur siajn lipojn peceton da malĝoja rideto. Sed ili ne vere sukcesis.

„Sed diru do, kial?“ Profesoro metis manon sur ŝultron de

unu el la viroj. „La patrono diris al vi, ke ni estas banditoj. Ĉu li tion ne diris, tiu kota putinido?“

Timeme la peonoj skuis la kapojn. Estis ĝuste tio, kion diris la bienulo al la peonoj, kiuj laboris en la momento de la fuĝo en la korto. Sed eĉ dum torturo la peonoj ne konsentus ion tian. Ĉar tiukaze, se ili ripetus, kion diris la patrono, tiukaze la ribeluloj komprenus tion tiel, kvazaŭ tio estus ilia propra opinio. Ĉe pridemandoj ĉe la bienuloj aŭ ĉe la polico estis ĉiam tiel. Se iu sciigis, kion li aŭdis, oni tuj diris, ke li mem asertis tion. Diktaturo instruas homon ne vidi ion, ne aŭskulti ion, nenion scii, nenion opinii kaj malfermi la buŝon nur tiukaze, se oni krii vivuon.

„De ni vi ja ne devas forkuri, *amigos*“, diris Andreo nun. „Ni estas viaj amikoj.“

„*Con su permiso, jefe*“, respondis viro, „ni ja ne forkuris. Ni scias bone, ke vi estas niaj amikoj. Ni intencis nur ĉiuj iri tie en la vepron.“

„Sed kial vi en tiu kazo kunprenis ĉiujn viajn potojn kaj

kaprojn kaj porkojn?“ demandis Kolonelo.

„Ni volis festi tie festeton, hodiaŭ vespere. Tute etan festeton, por *santo*, por *santito*, sanktulon de la *inditos*, kaj tion la patrono ne sciu, ke ni ankoraŭ nun, eĉ se nur ĉeokaze, preĝas al niaj propraj sanktuloj.“

Andreo vidis stari Celson kaj iris al li. „Ili ruzas“, li diris ridante. „Tian bonan pretekston mi en mia hejma bieno ne estus havinta. Se ili festas siajn proprajn *santitos*, ili ne povas fari tion proksime de la bieno, kie la patrono vidus tion kaj farus grandan spektaklon pri tio, ke ili estas de Dio forgesitaj paganoj. Tial ili iras en la vepron. Kaj ili faras tion kompreneble nur tiam, kiam la bienulo ne estas hejme, sed kun sia tuta familio en urbo aŭ kiam li vizitas iun ajn en alia bieno.“

„*Dónde está tu patron?* Kie estas via patrono?“ demandis Profesoro la viron.

„*Ay, patroncito*, pardonu al mi. Mi ne scias tion. Li ne diris al ni. Mi pensas, ke li rajdis kun sia tuta familio al nuptofesto. Li diris ion tian en la antaŭa semajno.“

„Kaj kie estas la nupto?“

„Mi ne scias tion tute precize. Sed mi supozas, ke ĝi okazos en Tumbala.“

Ĝis tien estis ses tagvojaĝoj.

**Rimarko**

*Viva!* = Vivu!



Nun la ariergardo antaŭ la bieno alvenis. Generalo vokis al ili, ke ili ĉiuj marŝu en la grandan korton de la bieno. La konstruaĵoj estis sufiĉe grandaj, tiom grandaj, ke ĉiuj *muchachos* post preskaŭ ses semajnoj la unuan fojon povis dormi sub tegmento, gardataj kontraŭ pluvo, fulmotondroj kaj ŝtormoj kaj kontraŭ ŝtelire vagantaj jaguaroj kaj rampantaj serpentoj.

„Vi ĉiuj“, turnis sin Profesoro al la peonoj, „nun venu kun ni en la grandan korton.“

La edzinoj de la peonoj komencis laŭte ploraĉi kaj krii, ili ĵetiĝis surgenuen kaj petegis pri indulgo. Ili estis certaj, ke ili ĉiuj nur tial estas vokataj en la korton, por observi kiel la edzoj estos murditaj. La viroj mem ne montris signon de timo. Ili marŝis kiel ordonite antaŭen en la korton. Ne utilas kvazaŭ hurleti. Ili ekmarŝis kiel obeemaj soldatoj, kiuj scias tre bone, ke tiukaze, se oni sendas ilin por esti murditaj, ili ne povas ŝanĝi ion pri tio, ĉu ili hurletas kaj ploras aŭ ĉu ili tre humile petas pri la vivo. La ununura, kio helpus al ili, estus simple kontraŭstari,

ne obei, kaj preni siajn armilojn kaj tiujn, kiuj komandas ilin, mortpafi. Sed tion ili ne faras, ĝuste tial ne, ĉar ili estas ja obeemaj soldatoj, kaj ĉar oni draŝis el ili la cerbon kaj la rezistopiriton en la unua semajno de ilia soldata ekzisto. Krome ili havas ja ankaŭ honoron; kaj pro tiu honoro ili devas permesi ĉiun fiagon al si. Ĉar nur la senhonorulo ribelas, kaj nur la forgesinto de Dio strabos al la landa flago, levos la ŝultrojn kaj diros: „Ĉu ruĝe, nigre, verde aŭ blanke, ĉie surtere kreskas floroj senmanke.“ La peonoj kompreneble ne sciis ion pri soldata honoro; sed, foje ricevevinte la ordonon, ili marŝis tiel obeeme kiel ankaŭ aliaj virŝafoj.

Post kelkaj minutoj brulis en la granda korto la bivakfajroj. Kiel formikoj svarmis la *muchachos* en ĉiuj lokoj de la konstruaĵoj. Ĉion, kion ili trovis kaj kio estis uzebla, ili konfiskis. Kovrilojn, selojn, vestojn, ŝuojn, kostumojn, kestojn kaj kofrojn. Skribmaŝino vaste arke flugis en la korton kaj disfalis en pecojn. Tri kudrilmaŝinoj sekvis fulmrapide. Tion, kio estis el ligno, oni dehakis. Same ĉiujn tablojn, seĝojn, litkadrojn kaj ŝrankojn laŭvice. Ligno por la bivakfajroj estis pli grava por la *muchachos* ol piano, kiun ili pecope ĵetis en la fajrojn. Poste la pordoj estis en la vico. La *muchachos* dum jaroj estis kutimigitaj ne havi tablojn kaj seĝojn, nek pordojn en siaj aĉaj dormkabanoj. Kaj neniam ili lernis, ke piano ĉeokaze povas signifi pli ol nur kesto kun dratoj. Kial ili respektu aĵojn, kiuj neniam estis faritaj por ili, kiuj havis por ili neniun alian signifon krom tiu esti la ekskluziva posedo de iliaj mastroj, kiun ili ne rajtas tuŝi, ne ĉar ĝi povas esti utila, sed kiu tial ne estu tuŝebla, ĉar ĝi estas la posedo de tiuj, kiuj instruate lernis ĝui tiujn aĵojn.

„Kiu li estas, la ulo sur la bildo kun la ordeno kaj la krucoj sur la brusto?“ demandis unu el la viroj, montrante al granda bildo sur vando.

„Jen la diodamnita kanajlo nomata kaciko, la diktatoro, la nobla ŝtatestro de la lando“, vokis Kolonelo kaj kraĉis profunde ensuĉitan nazmukon sur la mezon de la bildovizaĝo.

La nazmuko fluis trans la bele pentritajn krucojn kaj stelojn sur la brusto. Sed antaŭ ol ĝi atingis la larĝan ledozonon de la uniformo kaj malpurigis kaj aĉe kovris la belan oran aglon, eksaltis unu el la *muchachcos*, ŝiris la bildon de la vando, tretadis per la piedoj sur ĝin kaj diris: „Mi devus meti merdan monteton sur la mezon de lia nazo, kaj bone celitan. Sed tiel maldeca mi ne estas, ke mi faru tion ĉi tie en la plej bona loĝoĉambro, kie ni hodiaŭ foje bone dormos. Mi prefere kroĉos la bildon sur mian postaĵon, kurados kun ĝi kaj pafos tiajn fortajn furzojn sur ĝin ĝis ĝi krevos.“ Li deŝiris la bildon el la kadro, ŝovis la pentristan tolon supre je la rando malantaŭe sub sian zonon kaj lasis svingadi la restaĵon kiel tukon sur sia postaĵo.

Estis tie en la ĉambroj amaso da bildoj kaj pentraĵoj, bele pentritaj vizaĝoj de la patrono, de lia edzino, de ties patro kaj de kiu ajn plu. Jen bildoj kun epizodoj el operoj kaj grekaj tragedioj. Eĉ ne ununura bildo restis sen damaĝo. Ĉiuj flugis en la fajrojn. La ĉambroj baldaŭ havis tristan aspekton; sed ju pli malplenaj ili fariĝis, des pli sentis sin la *muchachos* kvazaŭ hejme. Eĉ ne unu el ili, ankaŭ ne Andreo aŭ Celso, escepte nur de Profesoro, iam ajn vidis meblojn en domo, en kiu vivis ili aŭ iliaj gepatroj. Kaj se ili entute konis bildojn, jen la postrestintaj flaviĝintaj kaj senkoloraj bildoj de malnovaj ne aktulaj varbokalendaroj de cigaretofabrikoj kaj de bierfarejoj kaj tie kaj tie eble sanktula bildo, sur kiu eĉ ne unu korpoparto anatomie ĝuste estis redonita.

En la anguloj sur la brikotegmentoj de ĉiuj ejoj kuŝis etenditaj matoj, faskaĵoj kaj pakaĵoj de la *muchachos*. Nur du ĉambroj de la tuta bieno havis lignan plankon. Estis certe la dormejoj de la gemastroj aŭ la pompaj ĉambroj por gastoj. En tiuj ĉambroj kampadis la inoj kaj infanoj de la trupo.

En la granda korto estis bruo, vigla vivo kaj gajeco. La mortaj amikoj kaj kamaradoj estis nun tute forgesitaj. Oni devis pensi pri pli gravaj aferoj. La ribeluloj volis vivi kaj devis vivi. Kiu volas vivi kaj devas vivi, tiu ne povas okupiĝi pri mortuloj. Ĉiu regno zorgu pri si mem.

La *muchachos* diboĉis en bona trinkakvo. En dudek lokoj oni banis sin kaj lavis vestaĵojn. Kraketante kaj jubilante brulis proksimume dek ĝis dekdu bivakfajroj en la korto. Tiom longe, kiom la *muchachos* povis retropensi, ili ne havis tiajn belajn fajrojn por si mem, kiel tiam. Ĉiam estis verda kaj malseka ligno, kiun ili devis vivteni, kaj kies fumo pikis en la okulojn. Sed la belaj mebloj kaj bildoj kaj la larĝaj orumitaj kadroj de la grandaj speguloj estis sekaj kiel maljunaj ostoj kaj rezultigis fajron, kiu ja foje fiodoris laŭ lako kaj farboj, sed kiu estis ĝoja kaj flamega kaj ne malĝoja pro dika, blindiga pikanta fumo.

Oni vigle kriaĉis, dancis, kantis, muzikis per buŝharmonikoj kaj gitaroj, oni fajfis, flirtumis kaj petolis. Ne estis tiel, kvazaŭ tie estus plenkreskintaj viroj, ja eĉ

militistoj kaj ribeluloj, sed kvazaŭ ili estus ĝoja  
nebridebla aro de gejunuloj troviĝantaj en feria vojaĝo.

La peonoj kun siaj edzinoj kaj infanoj staris en la mezo de la korto, timeme kunpremiĝinte kiel timidaj ĉasbestoj. Ili troviĝis proksime de la ŝtonaltaro, sur kiu nokte ĉiam brulis granda fajro, kiun oni vivtenis ĝis noktomezo por atingi, ke la korto kaj la multnombraj konstruaĵoj de la bieno aspektu malpli tristaj kaj malpli mornaj. Elektra lumo ekzistis eĉ ne en la plej riĉaj bienoj de tiuj malproksimaj regionoj. Petrollanterno estas jam tia eksterordinara lukso, ke, por almenaŭ foje povi vidi ĝin, la bienuloj kaj ties familioj de la najbaraj bienoj jam pretis libervole vojaĝi pene dum du aŭ tri tagoj. La gemastroj uzas nur kandelojn, plej ofte mem faritajn en la bieno. Eĉ petrollanternoj de la plej simpla speco estas nur malofte troveblaj en la bienoj; kaj tiu, kiu havas tian, estas rigardata kiel tre moderna. La peonoj havas neniun alian lumon en siaj kabanoj ol tiun, kiun donas al ili la fornofajro sur la tero, aŭ la fajro, kiu estas ekbruligita sur malalta forno el argilo. Se ne brulas forna fajro, servas kiel lumo por la kabano keno. Kandelojn ekbruligas la

peonoj en siaj kabanoj nur ĉe mortintogardado aŭ honore al sanktulo. Ĉio estis tiel, kiel jam antaŭ jaroj. Ĉio tiel ĉe la peonoj, kaj ĉio tiel ĉe la gemastroj, ĝis nun.

Estis ankoraŭ tro frue por ekbruligo de ŝtiparo sur la ŝtona altaro. Mankis ja ankoraŭ tri horoj ĝis sunsubiro.

Por sufiĉe longa tempo la tien ordonitaj peonoj estis translasitaj al si mem. Neniu el ili kuraĝis forkuri, kvankam tio facile sukcesus al ili, ĉar ili tre bone konis la konstruaĵojn kaj, ĉar la gardantaroj ĉe ambaŭ pordegoj estis tiel neglektemaj kiel gardantaroj povas esti kaj rajtas esti ĝuste nur en revoluciaj armeoj.

Sed nun venis Profesoro al la peonoj, sekvate de Generalo, Celso, Andreo, Santiago kaj de ĉirkaŭ dudek aliaj *muchachos*, kiuj havis pli da intereso pri la ribelo ol centoj de viroj, kiuj estis kontentaj, se ili rajtis batali, sed krome ne havis respondecon kaj ne estis devigitaj uzi sian kapon por okupiĝi pri ideoj, pri kiuj Profesoro tiom ofte parolis. Ili ĉiam estis pretaj lasi dishaki sian korpon kaj oferi sian vivon en la batalo kontraŭ la *rurales* kaj *federales*; pri la cetera ili volis, ke oni lasu ilin en paco,



krome ili nur volis partopreni plu ĉe la disdivido de la fruktoj de sukcesa revolucio. Ilia ideo pri la ribelo limigis sin je la simpla penso: „Surgenuiĝu la diktaturo!“

„Surgenuiĝu tiranoj kaj subigantoj!“ Ja tiom longe, kiom la diktaturo ne estos venkita, ne povos esti *tierra y libertad*. Tio estis memkomprenebla al ĉiuj. Ĉio, kio krome estis parolata de la pli inteligentaj viroj pri homrajtoj, pri profito, kapitalo, demokratio aŭ eĉ pri socialismo kaj kooperado, faris ilin dormemaj kaj stultaj en la kapoj. Tial tiom da ribeloj kaj insurekcioj de proletoj estas fuŝitaj, ĉar la laboristoj estas plenŝtopitaj per ideoj kaj problemoj, pri kiuj paroli oni havos pli ol sufiĉe da tempo, kiam la ribeluloj nekontesteble estos venkintoj jam dum kvin jaroj.

Profesoro saltis sur la ŝtonaltaron. Poste li vokis al la peonoj, ke ili pli proksimiĝu. Kiam li komencis paroli, proksimiĝis pli kaj pli da ribeluloj el la korto por aŭskulti lin. Sed ili ne ŝoviĝis antaŭen, kiam ili rimarkis, ke Profesoro turniĝas nur al la peonoj de la bieno.

„Venu trankvile ĉi tien, *hermanitos!*“ li diris al la peonoj. Li diris tion kun rido. Kaj la homoj fariĝis iom pli

konfidemaj, kaj pli proksimiĝis.

„Kiom granda estas la bieno ĉi tie?“ li demandis.

„Eble mil da *caballerias*“, unu el ili vokis.

„Ĉu vi eble estas ŝtipkapulo?“, interrompis lin ties najbaro „ĝi estas almenaŭ trifoje pli granda.“

„Certe“, kriis iu kuraĝe el la plej malantaŭa vico, „tute certe ĝi estas dekfoje pli granda.“

Unu el la pli aĝaj peonoj komencis trankvile kaj detale priksribi la limojn de la bieno. Profesoro kaj Generalo ekde la alto de la ŝtonmonteto bone povis taksi la limojn, des pli facile, ĉar la konstruaĵoj estis starigitaj sur monteto, kiu troviĝis en la mezo de la granda feŭdisma bieno.

„Tio do estas ĉirkaŭ dudek ĝis kvincent mil hektaroj“, diris Profesoro al Generalo.

„Ŝajnas tiel.“

„Kiom da familioj vi estas ĉi tie?“ demandis nun Profesoro.

„Proksimume naŭdek“, respondis tiu, kiu rigardis al Profesoro.

„Estas ne naŭdek, estas pli ol cent“, enmiksiĝis alia.

„Vi estas ambaŭ *burros*, azenoj vi estas,“, vokis tria. „Kiel ni estu do naŭdek? Se vi ne alkalkulus la *mayordomo*-n kaj la *carpintero*-n, la ĉarpentiston kaj la ŝnurfariston, ni estus eĉ tiukaze ne naŭdek. Sed ili ja ne estas peonoj kiel ni. Ili ĉiuj forkuris kun la patrono. Nin li translasis al nia mizero. Krome vi forgesis, ke kvin familioj de la patrono estis donacitaj al ties bofilo, kaj kvar familiojn li vendis al *don* Claŭdio por du el ties plej bonaj ĉevaloj, kiujn *don* Claŭdio donis por tio.“

„Kiu estas *don* Claudio?“ demandis Profesoro.

„Don Claudio estas la patrono de la bieno *Las Delicias*, ĝi estas ĉirkaŭ du *leguas*, du mejlojn for de ĉi tie.“

„Tiukaze vi estas, se oni kunnmombas ĉiujn, naŭdek

familioj, kiuj laboras por la patrono, ĉu?“ diris Profesoro.

„Tio eble pravas. Certa kvanto de familioj estas pli malproksime, por gardi la gregojn. Ili havas tie sian malgrandan *aldea* tute por si mem, kun *capataz*. Tien ni iras malofte. Kiel ni sciu, kiom da ili tie estas? Kaj alia paŝtistaro estas aldone ankoraŭ ĉe la *rio*, ĉe la *rivero*.“

„Bone, ni lasu la kvanton ĉe naŭdek familioj.“ Profesoro ekkomprenis, ke li ne atingus la celon, se li kvereladus pri la kvantoj de la hektaroj kaj peonfamilioj.

Li ŝanĝis nun la paroltonon. „Ĉu vi scias, kio ni estas kaj kial ni venis ĉi tien? Via patrono mensogis al vi. Ni ne estas banditoj. Ni estas viaj *amigos*, viaj amikoj. De nun ne estas plu peonoj. Vi estas nun *campesinos independientes*, liberaj kaj sendependaj kamparanoj, ĉu vi komprenas? Estas vere, ke ni venis ĉi tien por mortbati vian patronon, se li ne transdonos senkoste al vi ĉiun terposedon, kiun vi kultivis ĝis nun. Kiu kultivas la agron kaj por sia laboro ne estas honeste kaj humane pagata, tiu ankaŭ ĝuu la fruktojn de la agro. Ĉu vi komprenas?“

La kapoj de la peonoj ne povis labori tiel rapide, por kompreni tiun novan ordon. Sed ili ĉiuj diris: „*Si, mi jefe!*“

„Mi ne estas via *jefe*. Mi estas via *amigo*, via amiko kaj *camarada*. Ni ĉiuj estas *camaradas*. Ne plu estas *amos*, ne *patrones*, ne *mayordomos*, ne *capataces*. Vi mem estas nun la mastroj en tiu bieno. Tuj morgaŭ matene vi iru sur la kampojn kaj disdividu ilin inter viaj familioj, ĉiu familio ricevu dudek hektarojn. Vi ŝajne estas la *tate* ĉi tie“, turnis sin Profesoro al unu el la pli aĝaj peonoj.

„*No, mi jefe – perdoneme, mi jefe*, mi volis diri, *mi amigo*, kaj mi volis diri, ke mi ne estas *el tate* ĉi tie, *el tate* estas Braŭlio. Li estas la plej aĝa, kaj li estas la *compadre* de preskaŭ ĉiuj familioj ĉi tie.“

„Bone, Braŭlio, venu al mi!“

Laŭ la aspekto Braŭlio ŝajne ne estis la plej aĝa el inter la peonoj. Sed ĉiuj peonoj klarigis lin la plej aĝa kaj ili certe havis bonajn kaŭzojn, kial ili agnoskis lin kiel sian *tate*. La kaŭzoj eble estis el tempo, kiu jam pasis kvincent

jarojn. Profesoro ne cerbumis pri tio.

Braŭlio tute proksimiĝis. Ĉiuj peonoj urĝis nun antaŭen al Profesoro por kompreni ĉiun vorton. Evidente ili perdis sian timon. Iliaj edzinoj malmulte interesiĝantaj pri tio, kion intertraktis liaj edzoj kun la ribeluloj, komencis proksimiĝi al la edzinoj de la ribeluloj por interparoli kun ili.

La infanoj jam antaŭe forsaltis kaj amikiĝis kun knaboj, kiuj estis en la ribelula trupo. Ili rapidis firmigi tiun amikecon kaj ili faris tion per tio, ke ili kondukis la knabojn en ĉiujn eblajn kaŝitajn angulojn de la korto, kaj montris al ili tie sekretojn de tia speco, kia por ĉiuj knaboj, egale de kiu ajn raso, estas eksterordinaraj kaj hororigaj okazaĵoj.

Jen truoj, kies profundon neniu povis taksi, sed pri kiuj la knaboj tie loĝantaj asertis, ke ili estas la aertruoj de subtera irejo, kiu etendiĝas de volbaĵo en la bieno ĝis Hucutsin kaj tie en la kriptoj de la katedralo havas sian elirejon. Tie estis bufoj grandaj kiel bubokapo, pri kiuj la knaboj en la bieno asertis, ke ili ne estas veraj bufoj, sed

oldaj edzinoj de longe mortintaj peonoj, unu el ili laŭ ili estis la avino de la mortinta bienulo, kiujn la *brujo*, la ŝamano de la indiĝenoj, ĉiujn sorĉis en bufojn, kiuj en la nokto de *San Juan* dum tri horoj ree estas inoj. Kvar knaboj vidis elrampi en la lasta nokto la inojn el certa malnova ŝtonmonteto. Kaj poste knabo observis, kiel la inoj iris al la rivero, sed kion ili tie faris, tion la knabo ne sciis, ĉar li timis postkuri ilin.

Tiel la amikeco de la knaboj estis kvazaŭ sigelita; kaj la inoj de la ribeluloj lamentis kun la edzinoj de la peonoj pri tio, kiujn zorgojn ili havas pro la infanoj, kaj ke la patrino de la edzo eterne enmiksiĝas en aferojn, kiuj tute ne koncernas ŝin, kaj ke la bopatrino postlasas nenion krom ĉagreno kaj malpaco.

Intertempe ankaŭ la peonoj antaŭ la altaro komencis interparoli kun la proksime starantaj *muchachos* el la monterioj, ili interŝanĝis tabakon kaj invitis la ribelulojn vespere viziti ilin en la kabanoj, kie duonplena botelo estas enfosita, por ke la longjara edzino ne trovi ĝin.

Tial perdiĝis ĉe la peonoj, longe antaŭ ol Profesoro kun la

disdivido de la bieno atingis kvazaŭ la brilan kulminon de la festo, ankaŭ la lasta timemo kaj la lasta misfido. La ribeluloj estis tute societemaj kaj honestaj *muchachos*, asertis la peonoj inter si, dum la viroj el la monterioj siavice asertis, ke la peonoj neniel estas tiaj stultaj muloj, kiaj oni ĝis tiam supozis ilin. Ili tute bone povas malfermi sian buŝon kaj tute prudente paroli. Dum oni dum eterneco imagis al si, ke ili estas idiotoj, kaj ĉar ili estas idiotoj, tial la peonoj laŭdire estas pli stultaj ol ties kaprinoj.

Nun Braŭlio fariĝis parolema. Li ne grimpis sur la ŝtonaltaron, sed parolis de tie, kie li staris, tuj apud la piedoj de Profesoro, kiu staris alte, kaj al kiu li devis rigardi krute supren por povi rigardi ties vizaĝon. „Tio estas bonega afero, *amigo*, ke vi nun donacis la bienon al ni.“

„Jes, ĝi estas via propraĵo, de nun ĝiseterne. Vi kultivas ĝin, kaj ĉio, kion ĝi portos, apartenos al vi“, konfirmis Profesoro. „Ankaŭ la bruto, ĉu?“ vokis iu el la peonoj.

„Ankaŭ la bruto kaj ĉiuj konstruaĵoj ĉi tie.“



Braŭlio gratadis per ambaŭ manoj sian nigran krispan hararon, kiu jam montris kelkajn grizajn harfaskojn. Estis kvazaŭ la gesto de sendecida etkamparano, kiu nepre devas aĉeti junajn porkidojn, sed trovas la prezon tro alta kaj sur la foirplaco ne povas aĉeti aliajn porkidojn por malpli alta prezo.

„Tio estas tute bona, ke ni havas nun la bienon, *amigo*. Sed kion ni faru, se la patrono revenos?“

„Ke li ne revenos, por tio ni ja zorgos.“

„Kaj se la *federales* forkaptos vin, kio okazos tiukaze?“

„Tiuĵ ne kaptos nin. Nur ne afliktiĝu.“

„Vi ne restos ĉi tie en nia bieno, ĉu?“

„Kompreneble ne. Ni marŝos plu, por doni teron ankaŭ al aliaj peonoj.“

„Kiu gardos nin tiam kontraŭ la patrono, se vi estos formarŝintaj?“

„Vi tiukaze simple devos protekti vin mem. Vi estas nun la patronoj, kaj ĉio apartenas al vi.“

„Sed, se la patrono revenos kaj eĉ kunhavas *rurales*, kion ni faru tiukaze?“

„Kion ni faru kun la *rurales*? Mortbati ilin kiel malsanajn hundojn.“

„*Bueno. Muy bueno, camarada*“, diris Braŭlio. „Bone, tre, tre bone.“ Pripenseme li turniĝis dorsen kaj malaperis inter la peonoj.

„*Tierra y libertad!*“ vokis Profesoro de sur la ŝtonaltaro.

„*Tierra y libertad!*“ respondis la *muchachos* al li. Ĉifoje ankaŭ kelkaj peonoj aliĝis al la voko.

„*Viva la revolucion!*“ vokis Generalo.

„*Viva la revolucion de los indios y de los peones!*“ sonis el la vasta korto.

Je la dua tago poste, tre frue, kiam ankoraŭ densaj nebuloj ŝarĝis la prerion kaj la mateno grumble kaj dormeme komencis leviĝi, la trupo jam estis forlasinta la bienon.

Kaj estis je la oka, kiam Generalo sur monteto haltis kaj retroturniĝis por rigardi kiel la trupo alvenos. Cent metrojn pli antaŭe sur ilia vojo estis rivera transirejo. Je la transa bordo troviĝis du *cayucos* sur la sablo. Tiuj apartenis al la bieno. La rivero estis profunda, kaj ĝiaj akvoj estis urĝaj kaj rapidaj, pelataj de la pluvo, kiu plenigis la riveron en la supra parto. Kelkaj *muchachos* devis naĝi tra la kunŝiranta torento, por alveturigi la kanuojn. Estis la samaj kanuoj, kiujn la bienulo kaj lia familio uzis por fuĝi. Dum Generalo ankoraŭ elrigardis, li diris subite al Profesoro: „Tie malantaŭe okazas gajaj aferoj.“

Profesoro levis sian binoklon antaŭ la okulojn. „Vi pravas, Generalo, tio aspektas gaja. La tuta fatraso brulas. Eĉ ne unu konstruaĵo restos staranta. *Dios mio*, tion mi nomas

ĝojofajro. Nun brulas ankaŭ jam la kapelo. La diktaturo adiaŭas; la lando komencas plenigi sin per ruinoj. Per brulŝtuparoj ĝi komenciĝis, kaj per brulŝtuparoj kaj ruinoj ĝi finiĝos. Tute natura cirkulado.“

Generalo ne plu aŭskultis lin. Li rigardis malsupren al la larĝa rivero. „Tute natura cirkulado. Kaj ankoraŭfoje diomalbenite, kiel ni transigu ĉi tie nian armeon? Tion mi volonte scius. Kostos al ni certe du, eble eĉ tri diodamnitajn streĉajn tagojn. Sed transiĝi ni devas!“

## Ĉapitro 05

01

La armeo de la ribeluloj estis sur la vojo al Aĥlumal.

Dum longa tempo la stabo interkonsiliĝis pri tio, kiun gravan ĉeflokon oni unue vizitu, ĉu Aĥlumal-on ĉu Hucutsin-on? Ambaŭ lokoj estis urbetoj, kaj en ambaŭ urboj *Jefe Politico* havis sian lokon, ĉar tiuj urbetoj estis la ĉeflokoj de sia distrikto. Ambaŭ lokoj havis kaj unu kompanion de *rurales* kaj unu gravan militecan postenon de la federaciaj trupoj. Generalo denove agis laŭ la pensoj de siaj oficiraj kontraŭuloj, kiam li proponis marŝi anstataŭ al Hucutsin al Aĥlumal. Li supozis ĝuste, ke la *rurales* kaj *federales*, kiuj estas lokitaj en Hucutsin, devas havi la konvinkon, ke la trupo marŝos al Hucutsin, por proksimiĝi trans Teultepec, Oshchuc kaj Vitztán al Jovel. En Hucutsin kolektiĝis la plimulto de la regionaj bienuloj, ĉiuj armitaj, kaj ĉiuj akompanataj de siaj armitaj *mayordomos* kaj filoj kaj kuzoj, kaj de tiuj el siaj metiistoj, kiuj estis fidelaj al ili.

La sola memkomprenebla vojo por la *muchachos* estis tiu trans Hucutsin, ĉar ĝi kondukis al tiuj regionoj, el kiuj la plej multaj el ili venis kaj kie oni varbis ilin. Estis la vojo, kiun ili konis plej bone, sur kiu kaj je kies ambaŭ flankoj, ili ĉiam certis renkonti samtribanojn kaj samfamilianojn de sia propra nacio, kiuj iel povus helpi al ili, ĉu per spionado, ĉu per indikoj pri bonaj kaŝejoj aŭ pri la plej bonaj vojoj, sur kiuj la ribeluloj povus ataki la uniformitajn trupojn el ties dorsa flanko.

La militista interkonsiliĝo estis influata per la kaptado de multnombraj peonoj, kiuj migris de Hucutsin al la hejmaj bienoj. Tiuj unuopiĝintaj forirplacaj vizitintoj konfirmis la pensojn de Generalo pri tio, kion la soldatoj intencis fari kontraŭ la ribeluloj. Laŭ la raportoj de la kaptitaj peonoj troviĝis en Hucutsin efektive grandaj kvantoj de ŝtatpolicianoj kaj *rurales*, krome ankaŭ konsiderinde granda kvanto de bienuloj, tiom abunda ĉeestanta, ke la peonoj supozis, ke okazos *fiesta* aŭ *feria* en la loko. Pluraj el la peonoj, kiuj komencis konfidi al la ribeluloj, klarigis, ke tie ĉiu scias, ke la ribeluloj troviĝas en marŝo al Hucutsin, por encirkligi la lokon kaj ĉion, kaj por buĉi

ĉiun, kiu troviĝas en ĝi.

Kiam la raportoj en la stabo konatiĝis, la *capitanes* de la diversaj kompanioj apenaŭ plu reteneblis. Plej prefere ili ĵetiĝus tuj sur Hucutsinon. Estis denove la armiloj, kiuj logis ilin. Predo interesis ilin nur duavice, se ili entute pensis pri predo.

Generalo kontraŭe al tiu militkolero de la *muchachos* havis malfacilan pozicion. Povus okazi, ke la *muchachos* akuzus lin pri tro granda memgardemo kaj eĉ pri timo.

Sed li, same kiel Profesoro, Kolonelo, Celso, Santiago, Andreo kaj Pedro estis sufiĉe prudenta akcepti, ke sub la aktualaj cirkonstancoj la encirkligo plenumebus nur kun la perdo de duono de la armeo.

Generalo diris: „Ne faru stultaĵojn. Tiomaj azenoj la *rurales* kaj bienuloj ne estas, ke ili atendus nin en Hucutsin. En tiu kazo ni estus superaj al ili, ni kun nia lerteco, kun niaj tranĉiloj kaj maĉetoj. Tion ili scias. Ili retenos nin tri aŭ kvar mejlojn antaŭ la loko. Mi ankaŭ povas imagi, kie ili nin atendos. Jen rivero kunŝiranta, en

certa distanco de la loko. Tiun *rio* ni ne povas ĉirkaŭiri. Ni devas travadi ĝin. Tuj post la transirejo estas diodamnita ravino, kaj tie estas sufiĉe da vepro. Tie ili kaŭros kaj atendos nin. Kaj tiun plezuraĉon ni nun fuŝos al ili.“

Proksimiĝis peonoj survoje al Hucutsin, kiuj intencis iri al la foirplaco. Generalo vokis al si kelkajn el la *muchachos*, kiuj sekve de la komuna lingvo rapide amikiĝis kun la migrantaj peonoj. Tiuj *muchachos*, ne tiom bone sciante ĝin, kaj pri sia neprecizeco de Fidel eĉ speciale subtenataj, rakontis al tiuj peonoj kun furiozaj gestoj, ke la trupo atingos post tri tagoj la urbon Hucutsin, por tie ekbruligi fajron tian, ke eĉ ne staros plu la eksteraj ĉirkaŭaj muroj de la korto kaj, ke eĉ ne unu homo plu vivos, kiam Hucutsin denove estos forlasita, ĉar ĉiuj *muchachos* ankoraŭ devos glatigi la grandan finkalkuladon kun la tiea urbestro kaj kun la tiea polica ĉefo.

La peonoj, apenaŭ alvenintaj en Hucutsin, tre rapidis rakontadi en la tuta loko tion, kion ili eksciis; kaj ĉar ili timis, ke oni hazarde povus kunbuĉi ilin, ili ankoraŭ en la



sama vespero forlasis Hucutsinon, kio kompreneble pli profundigis ĉe ĉiuj homoj, inklude de la soldatoj kaj bienuloj la konvinkon, ke la ribeluloj efektive jam estis sur la marŝo al Hucutsin.

„Se ni atakus Hucutsinon“, klarigis Generalo, „ni havus en la dorso la garnizonon de Aĥlumal, kiu verŝajne jam ricevis la mesaĝon, ke ni marŝos al Hucutsin, kaj kiu certe havas la ordonon ataki nin el la dorsa flanko. Krome ankoraŭ truniĝos al ni la *federales* de la lokoj, kiuj troviĝas sur la vojo de Hucutsin al Jovel. Tio fariĝos grandega superforteco. Ili atentos nin sur la prerioj aŭ en ravinoj kaj ĵetiĝos per unu fojo sur nin.“

„Tio, kion, vi diras, estas ĝusta, Generalo“, interrompis lin Kolonelo.

„Kaj tial, ĉar ili en Hucutsin tiel sankte certas pri tio, ke ni marŝos tien, ni nun por la unua fojo iros al Aĥlumal kaj kaptos nin tie ties rurales kaj *federales*. Ĉe tio ni ricevos verŝajne kvindek ĝis cent pliajn karabenojn, eble eĉ pluan mitralon kaj tiom da municio, ke ni tute ne povos dispafi ĝin eĉ dum monato. Samtempe ni liberigos nian dorson.

Jen nun la celo de tiu ŝanĝo. Se ni estos konkerintaj Aĥlumalon, ni ne iros sur la mallonga vojo rekte al Hucutsin, sed marŝos trans San Miguel kaj San Jeronimo al Teultepec. Tie ni renkontos ne multajn *rurales*. En Teultepec – pri tio vi bone memoros pro via marŝo al la monterio – ni estos pli ol sescent metrojn super Hucutsin. Tie ni sidos kiel en roka fortikaĵo, kaj el tiuj altoj ni jetiĝos malsupren sur Hucutsinon kiel agloj sur kuniklojn. Tiam ni havos la altaĵojn, tiam ni havos la vepron kaj la ravinojn, kaj tiam ili foje provu proksimiĝi al ni. Eĉ ne laŭsoj, kiujn ili havas en siaj *bolsitas*, en siaj saketoj, restus vivantaj. Ni okupos sufiĉe frutempe la vojon al Sibacja. Se ni tiam atakos ilin, restos al ili nur unu libera vojo, al vojo reen, tien, de kie ni venis, reen en la ĝangalon. Kaj tie komenciĝos la ĝojofesto, tie ni havos ilin en la kaptilo, tie, kie ni volas havi ilin. Tiel ni faros, kaj neniel alie. Kiu voĉdonos por ĝi, levu la manon; tiu kiu estas kontraŭ tio ricevos de mi pugnon sur la vizaĝon, kaj suke, kaj poste li povos rakonti al mi pli bonan planon, kaj se ĝi estos pli bona, mi bonvoleme kunagos laŭ ĝi. Sed vi havos diodamnitajn malfacilaĵojn rakonti al mi pli bonan planon.“

Tial oni marŝis al Aĥlumal, dum amasiĝis en Hucutsin pli kaj pli da *rurales, federales* kaj grave kaj ĝisdente armitaj bienuloj por festi la estontan venkon.

La bienuloj jam ĉiutage festis la venkon, tiom longe, kiom ili jam atendis tie. Sur *cabildo* flirtis flagoj, kiuj anoncis la grandan venkon jam antaŭe. En la *cantinas* oni estas gaja kaj entuziasma.

„Al tiuj pedikohavaj kaj malbenitaj kanajloj nomataj ribelemaj indiĝenoj ni ja instruos, kiu estas la mastro en la ŝtato kaj kiu komandas en la distrikto Chiilum.“

„Pri tio ni ankoraŭfoje tostu.“

„Tiel parolas brava viro. *Salud, compadre!*“

„*Salud, compadre!*“

„Kompreneble ni ankoraŭ akceptu glaseton, *don Clementino.*“

„Kompreneble, *don Cezar!*“ „*Vivu El Caudillo!*“

„Vivu la granda stiristo de nia gloriĉa popolo!“

„*Salud, compadre!*“

„*Viva la patria!*“

### **Rimarkoj**

*cabildo* = komunejo, urbodomo ks.

*cantina* = kuntekste eŭfemisma vorto por trinkejo, kiu estas uzata kiel neoficiala bordelo, *cantina* en Meksiko. Kutime estas trinkejo, en kiun eniras nur viroj.

*feria* = foiro

*fiesta* = festo

La marŝo de la aktuala tago estis diable streĉa. La armea strato ne estis io alia krom mizera kaj kompatinda mulopado. Ili grimpis kaj malgrimpis sur rokaj aŭ ŝtonplenaj altaĵoj. Jen marĉoj, marĉeca tereno kaj ŝlimaj distancoj, kie homoj kaj bestoj ne plu marŝis kaj iris, sed nur plu rampis antaŭen kaj sin tiris per unu gambo el marĉa loko, nur por sinki ĉe la sekva paŝo denove en ŝlimon kaj koton.

Ĉirkaŭ tagmezo la voĵo fariĝis pli larĝa, post kiam ili vadis trans riveron. Denove komenciĝis prerio.

Hieraŭ ili vizitis alian bienon nomata *Santa Brigida*. La mastraro ankaŭ tie, kiel klarigis la postrestintaj peonoj, rajdis ien al nuptofesto. Ke la mastraro de bieno eventuale forvojaĝis pro timo pro indiĝenaj ribeluloj, koncedus bienulo aŭ ties edzino aŭ filino neniam, eĉ ne sur la mortolito. La bienulo perdis ĉiun reputacion ĉe siaj najbaroj kaj amikoj, eĉ des pli antaŭ siaj peonoj, se li supozigus al iu ajn mortema estaĵo, eĉ nur al sia ĉevalo aŭ al sia preferata hundo, ke li rajdis kun sia tuta familio al

nuptofesto, ĉar indiĝenaj ribeluloj marŝas al la bieno. Se nupto ne tiel rapide festebliĝis, ĉar la gefianĉoj ankoraŭ volis havi la decidan vorton pri la afero kaj ankoraŭ ne sufiĉe elprovis sin reciproke, tiukaze je dispono estis ĉiam sanktulo, kiu al unu el la najbaraj bienuloj aŭ al ties edzino aŭ al unu el ties filinoj aŭ filoj aŭ al lia patrino donis la okazon feste celebri la nomtagon kaj atendi ĉiujn bienulojn kaj ties familiojn por la festo.

En la bieno *Santa Brigida* same postrestis nur la peonoj, kaj kiel en la ceteraj bienoj vizititaj ĝis tiam de la ribeluloj, tiel donacis Profesoro ankaŭ tie al la peonoj la tutan terenon kaj deklaris ĉiujn ŝuldojn, kiujn ili havis ĉe la bienulo, forstrekitaj, nuligitaj kaj senvalidaj.

Ankaŭ tie okazis, ke konstruaĵoj de la bieno brulis, kiam la ribeluloj ĝuste nur du horojn malĉeestis. Ĉu tion faris la lastaj grupoj de la ribelula armeo, kiuj plezurigis sin pri tio lasi eklumi la konstruaĵojn, aŭ ĉu estis la unua memstara ago de la peonoj, neniam iu konstatis. Kaj neniu okupiĝis pri tio. En ĉiu kazo malaperis kun ĉiu plua brulo plua fortikaĵo.

Kiam la trupo nun forlasis la vepron kaj la altaĵojn kaj denove moviĝis sur preria tereno, la antaŭrajdantaj *muchachos* vidis el la altaĵoj trans distanco de dek kilometroj la grandan bienon *Santa Cecilia*. La bieno havis amplekson de kvardek kvin mil ĝis kvindek mil hektaroj da terposedoj. Estis plej ofte paŝtejoj por brutaroj, kiuj enspezigis pli por la detiritaj feloj ol por la viando, kaj tial ili estis bredataj unuavice pro la feloj kaj kornoj, kaj nur duavice pro la viando. Grava enspezfonto de la bieno estis ankaŭ la produktado de sukero, de alkoholo, *aguardiente* kaj sisalo. Krome vastaj areoj de la bieno estis kultivataj per maizo kaj faboj kaj fazeoloj, kaj pli malsupre situantaj kampoj per sukerkano kaj ananaso. Kompreneble la bieno havis ankaŭ konsiderindajn porkobredojn, ĉevalojn kaj mulojn. Se la bieno havus ĉarostratojn kun ligo al fervojstacio, ili kapablus produkti ĉiujare produktojn kun valoro de kvaronmiliono da pesoj. Sed tiel, kiel en ĉiuj ceteraj bienoj de la regiono, la bienaj transportvojoj al la plej proksimaj urboj ankaŭ tie estis nur la kutimaj aĉaj

mulopadoj, kiuj dum tri aŭ kvar monatoj ĉiujare estis preskaŭ ne traireblaj. Santa Cecilia sendube estis rigardata kiel la plej riĉa kaj plej bela bieno de la distrikto Chiilum.

Ankaŭ tiu bieno estis konstruita kiel granda fortikaĵo. La *patio*, la granda korto, estis ĉirkaŭata per fortaj altaj muroj, en kiuj troviĝis la gravaj konstruaĵoj. Dum la plimulto de ĉiuj aliaj bienuloj sentis sin riĉaj, se ili havis kapelon, la bienulo de Santa Cecilia povis pompe fanfaroni per ĝusta katedralo, kiu havis sonorilan turon videblan je distanco de multaj mejloj. La plimulto de la padoj en la regiono kondukis preter la bienon Santa Cecilia, kaj ĝi estis rigardata de ĉiuj karavanoj kiel grava *paraje*, kiel grava ripozejo, kie la anoj de ŝarĝmulaj karavanoj tranoktis kaj aĉetis novajn provizojn por la plua vojaĝo. Tio estis plia bona enspezfonto por la bieno.

La bieno certe posedis, se oni nombrus koncize, cent tridek familiojn de peonoj, kies loĝejoj formis sufiĉe grandan vilaĝon proksime de la bieno, ekstere de la kortomuroj.



„Ni hodiaŭ ankoraŭ tute bone povos atingi la bienon“, diris Kolonelo, dum li taksis la alton de Suno.

„Tion ni facile povus“, konsentis Generalo. „Sed la *muchachos* estas damne lacaj, kaj se ni marŝus ĝis la bieno, baldaŭ komenciĝus la sunsubiro. Tion mi ne volonte volus havi. Ni ne scias, kio tie estas, kaj facile ni povus gliti en kaptilon. En ĉiu kazo ni agos pli bone, se ni haltos ĉi tie dum la nokto kaj tre frue, ankoraŭ en la nokto, ekmarŝos; tiel, ke ni havos la plenan tagon antaŭ ni, kiam ni proksimiĝos al la bieno. Kion vi diras pri tio, *compañeros*?“

„Bone, ni restu ĉi tie. Ĉu ni hodiaŭ, morgaŭ aŭ postmorgaŭ alvenos en Santa Cecilia, ŝanĝos ne multon pri la ribelo“, diris Andreo, „mi pensas krome, ke tiu ribelo ne finiĝos post kvar semajnoj, kaj ke ni ĝoju pri tio, se ĝi daŭros nur kvar jarojn.“

„Tio estas ankaŭ mia opinio“, Profesoro kapjesis konsente. „Diktaturo, kiu daŭris pli longe ol tridek jarojn, dorlotis tro da profitantoj, kiuj ne defendas la diktaturon, sed siajn manĝotrogojn. Kaj tie, kie oni defendas la

manĝotrogon, la batalo estas pli obstina ol se nur ŝtatgvidanto sin mem transvivinta volas plu troni sur la fotelo.“

„Per aliaj vortoj“, interrompis Generalo la politikan parolon, „ni kampadejos ĉi tie.“ Li ordonis al la kornisto blovi la komandon ripozo. *El Corneta* faris tion tiel bone, kiel li kapablis tion. Sed la lacigita armeo komprenis la signalon tamen pli bone ol ĝi komprenus iun alian.

Montriĝis, ke vastaj distancoj ne taŭgis por kampadejo, ĉar forte pluvis kaj formiĝis grandaj flakoj, kiuj sekve de la trosatigita tero nur malrapide forfluis kaj sekiĝis.

„Tio estas bonvena“, diris Generalo. „Mi tute ne intencis lasi kampadi la tutan trupon kiel ununuran bulon. Tio estus danĝera.“

Li dividis la trupon en tri partojn. La unuan kaj plej bonan li lasis kampadi ĉe si, ĉar tie la tereno estis pli alta kaj tial rezultigis strategie pli bonan pozicion. La duan armeparton konsistantan el du kompanioj, li sendis du kaj duonon da kilometroj for en la sudokcidenta direkto,

por ke ili trovu tie sekan kampadejon. La trian parton li sendis en la nordokcidenta direkto, ĉirkaŭ tri kilometrojn for.

La bieno troviĝis okcidente, rigardate de la arma centro.

La plano estis bona. Generalo konsideris, ke la bieno povus esti okupata de *rurales*. Li decidis ekmarŝigi ambaŭ flanktrupojn jam longe antaŭ sunleviĝo, sed tiel, ke parto ataku la bienon sude kaj la alia parto norde, dum li kun la centra trupo nokte ankoraŭ kampadus oriente de la bieno. Ambaŭ flanktrupoj havis la komision ankoraŭ nokte marŝi vaste en linio antaŭen kun dudek el siaj plej bonaj piedirantoj kaj kelkaj rajdistoj, tiel, ke la eksteraj flankoj de la du flanktrupoj renkontu sin okcidente de la bieno kaj tiel tute encirkligu la bienon. Tiu okcidenta trupo formita el ĉirkaŭ po dudek viroj de ambaŭ flanktrupoj, estis kompreneble nur tre maldensa kaj tute ne sufiĉe forta por malhelpi okcidente elrompon de la *rurales*, tuj kiam ili rigardus la batalon perdita. Generalo sciis tre bone, ke tiuj postenoj okcidente de la bieno estos la plej danĝeraj, sed samtempe ili estis la plej sopirataj, kaj la *muchachos* kvazaŭ luktis aparteni al tiuj plej

danĝeraj postenoj. Ĉar la plej bona armilpredo atendeblis tie, kie la *rurales* kaj *federales* fuĝas konfuzite. Kun intenco Generalo lasis al ili tiun fuĝojon. Sufiĉe forte okupi la bienon de ĉiuj flankoj estus eraro, ĉar tia okupo estus ankoraŭ en la aktuala tago entreprenenda. Sed la armeo estis tro lacigita por ankoraŭ elteni longan batalon, se la *rurales* provus eviti tiun encirkligon. Alia eraro estus estinta, ke tiukaze, se Generalo estus forte encirkliginta la bienon de ĉiuj flankoj, la diversaj okupgrupoj estus tro malfortaj; ĉar ja nur kvinono de la *muchachos* estis armita kaj ja apenaŭ eblus por la militiste nespertaj *muchachos* malhelpi trarompojn kaj elrompojn, se ili okazus je pluraj lokoj samtempe kaj se ili tiujn frontojn, kie trarompoj kaj elrompoj atendeblis, ne povus okupi tiom, ke ili ĉiukaze havus pli grandan kvanton da viroj je tia loko.

La viroj de la danĝeraj postenoj en la okcidento havis en tiu kazo, se la *rurales* tie trarompus kaj fuĝus apenaŭ bonŝancon transvivi. Sed por neniu el la viroj senditaj al tiuj postenoj temis pri tio rajti transvivi, sed nur pri tio konkeri karabenojn kun la tuta municio kaj eble ankoraŭ

ĉevalojn kun belaj seloj. Konkeri karabenon estis la plej alta pago, kiun Generalo al tiuj, kiuj ne havis armilojn, povis oferti. Sed pli altan pagon atendis neniu. Kaj ricevi pli altan pagon dum la revolucio, esperis neniam iu el la ribebluloj.

Ĉu Santa Cecilia efektive estis okupita de soldatoj aŭ de kavaleria ŝtatpolico, sciis kompreneble neniu en la armeo. La *muchachos* ne renkontis iun peonon de la bieno. La kaŭzo estis, ke ili estis ankoraŭ en tro granda distanco al ĝi por ĉeokaze trovi iun el tiuj, kiuj eble laboras en la vepro; krome ili almarŝis sur pado, kiun uzis neniu el la peonoj, se ili iris al la foirplaco.

Sed Generalo matene havis strangan senton, kaj li pensis, ke estas ja strange, ke dum kelkaj tagoj ne montris sin patrolo de la *rurales*, kvankam verŝajne duono de bataliono estis sendita kontraŭe al la ribeluloj. Li supozis ĝuste, kiam li pensis, ke tiel bone kiel provis li logi la soldatojn en kaptilon aŭ kvazaŭ en tenajlon kun Pirhovenko, ankaŭ la *rurales* kaj *federales* ne estas pli stultaj tiurilate. Ĝi estis kun certo atendebla, ke ili havis samajn aŭ similajn planojn. Neniu batalestro povas elpensi planon, kiun alia ne povus havi simile bone; dependus nur de tio, kiu havus certan planon unue, kiu unue uzus kaj plej lerte uzus ĝin kaj tiel uzus ĝin, ke la kontraŭulo ne

divenus la planon tro frue. Estis tre verŝajne, ke trupo el *rurales* kaj *federales* el Hucutsin estis sendita suden por ataki la ribelulojn de la dorsa flanko, pri kiuj oni supozis en Hucustsin, ke ili marŝas al tiu urbo, por tiel bari al ili la vojon al Aĥlumal, se ili eventuale intencos iri tien. Santa Cecilia estis la ununura fortikaĵo, kie tiu trupo povus kaŝi sin kaj kapablus preni strategie fortan pozicion nerimarkatan de la almarŝantaj ribeluloj.

La gvidadon de la nordo-trupo tiom grava por la plano Generalo konfidis al sia plej ekzercita oficiro, al Kolonelo. Kolonelo prenis kun si mitralon por la trupo; dum la alia postrestis en la centra trupo.

La centra punkto de la tri trupoj laŭplane estis Santa Cecilia, tute egale, ĉu Santa Cecilia estas okupita aŭ ne.

La centra trupo kampadis post monteta ĉeno kaj de la bieno Santa Cecilia ne videblis.

La sudo-trupo ricevis de Generalo marŝdirekton tian, ke ĝi moviĝu dum sia tuta marŝo kaj en vepro kaj kovrata de montetoj. Ĝia kampadejo estis tiel fiksita, ke ĝi, post

arbuste prikreskataj montetoj kaj nevidata de bieno povas pasigi la tutan nokton por atendi la atakordonon je la frua mateno.

Generalo eksplicite ordonis, ke la bivakfajroj ne brulu dum la tago, ĉar la fumkolonoj perfidus la trupojn. Nokte la bivakfajroj brulu tiel, ke ili restu kaŝitaj post la montetoj aŭ simple brulu en freŝe fositaj fajrotranĉeoj. Ili ne ekflamiĝu por eviti ĉiun rebrilon sur la nubocielo.

La nordo-trupo sub la gvidado de Kolonelo devis plenumi la plej malfacilan taskon. Ĝi ne povis marŝi al sia asignita kampadejo laŭ iu vepro. Montetaj ĉenoj sur ĝia vojo same ne estis. Ili devis marŝi trans vastan prerion. Tiel la trupo observeblis de la bieno dum sia tuta marŝo ĝis la finfina kampadejo. La nordo-trupo ekmarŝis.

Profesoro sekvis ilin per sia binoklo por rigardi, ĉu oni atakas ilin. Sed okazis nenio. Ĝi fine alvenis sur la loko, kiun difinis Generalo kiel tranoktejon. Sed tie ĝi ne haltis. Profesoro klarigis tion per tio, ke la prerio tie situas tro malalte kaj verŝajne estas tro marĉigita por ebligi bonan kampadejon. La trupo marŝis plu, multe pli distance ol



eble estis bona, por povi protekti ĝin de tie, se ĝi irus en kaptilon. Ĝi marŝis fine tiom malproksimen, ke ĝi vaste ĉirkaŭiris la bienon kaj nun devis troviĝi precize en la okcidento de la bieno, tiel, ke la bieno nun estis inkludita de okcidento, sudo kaj oriento kaj estis malferma nur la vojo norde al Hucutsin.

„Malbenite!“ diris Generalo, kiam Profesoro tion raportis al li. „Kolonelo elcerbumis diable bonan planon. Komprenoble li ne faris tion, kion mi opiniis pli bona. Estis lia tasko restadi pli proksime al ni. Sed tio, kion li faras tie, estas bonega. En tiu kazo, se *federales* de Hucutsin marŝus al Santa Cecilia, tiam ili irus kvazaŭ en nian tenajlon.“

„Eble Kolonelo marŝis tial tiom vaste ĉirkaŭ la bienon, ĉar li vidis almarŝi soldatojn el la direkto de Hucutsin, kaj li, prudenta kiel li estas, ne volis retromarŝi ĉi tien por ne perfidi la pozicion de nia armeo kaj tiel li lasis veni la uniformitojn inter niajn trupojn, dum ili supozas, ke ili havas nur unu ribelulan trupon en sia okcidenta flanko.“ Estis Andreo, kiu sciigis tiun penson.

Generalo kaj Profesoro konsentis, ke tiu opinio certe estas ĝusta. Ŝanĝi ili povis nenion je tio, kion Kolonelo faris aŭ jam estis farinta, kaj ĉiuj diris rajtigite, ke Kolonelo certe scias, kion li faras, kaj ke, se li realigas la marŝplanon en alia maniero ol ordonite, li certe havas siajn bonajn kialojn por tio.

### **Rimarko**

*Pirho I (Pyrrhus I)* = kartaga reĝo, kiu post batalo kontraŭ la romanoj laŭaserte diris: „Ankoraŭ tia venko, kaj ni estos perditaj!“ (Li perdis preskaŭ ĉiujn elefantojn kaj amason da soldatoj.)

Kolonelo efektive havis la plej bonajn kialojn ŝanĝi la marŝplanon por sia trupo. Li agus stulte kaj senrespondece, se li ne ŝanĝus la planon, tuj kiam li vidis, ke la cirkonstancoj, kiuj estis la kaŭzo de tiu plano, samtempe ŝanĝiĝis. La ĉefplano de la atako pro tiu deflankiĝo de la ordonita marŝplano ne estis ŝanĝita; ĉar la decidita ĉefplano havis la celon jam frue matene encirkligi la bienon por povi ataki ĝin el ĉiuj flankoj samtempe. La nordo-trupo, kiel Profesoro ĝuste divenis, trovis tiom malsekan terenon, ke Kolonelo povis diri: „Se ni nun kampadus ĉi tie ekde posttagmezo ĝis matene, ni povus movi neniun gambon kaj neniun brakon antaŭ morgaŭ tagmeze.“

Tial la *muchachos* spite al sia laceco marŝis plu, por serĉi pli sekan lokon. Dum tiu marŝo rimarkis iu el la *muchachos*, ke survoje de Hucutsin al la bieno *Santa Cecilia* alrajdas patrolo *kun federales* .

La *muchachos* volis ataki la patrolon, sed Kolonelo malpermesis tion. Li diris, ke tiukaze, se la uniformitoj

pasigos la nokton en Santa Cecilia, ili ja morgaŭ tamen ĉiuj falos en la manojn de la *muchachos*, kaj, ke tio estus mallerta perfidi jam nun la ĉeeston de la trupoj, antaŭ ol la bieno estos encirkligita, tiel, kiel Generalo ordonis.

Li tuj ordonis al ĉiuj sterna kaj kaŝi sin en la prerioherboj, por ke la patrolo, kiu senzorgeme alrajdis, ne vidu ilin. La *muchachos*, kiuj sidis sur ĉevaloj, tiel, kiel ankaŭ Kolonelo, ne deseliĝis, sed rajdis oportune trotante en la malnova direkto sen okupiĝi pri la patrolo. La patrolo vidis tiujn rajdistojn, sed ili ŝajne estis tro malproksimaj por ekkoni ilin precize. Kaj ĉar ili trankvile kaj sen hasto rajdis plu, la homoj de la patrolo certe supozis, ke temas pri vakeroj de la bieno, kiuj serĉas perditajn bovojn. La patrolo perdiĝis el la viddistanco de la trupo, kaj la marŝo estis daŭrigata.

Post tridek marŝminutoj rimarkis Kolonelo en la tereno larĝan sulkon, en kiu kreskis dense kunstarantaj arboj kaj arbustoj, kiuj aspektis alie ol la alispecaj unuopaj arboj kaj arbustoj de la cetera paŝteja tereno.

„Tie malsupre en la profundo estas rivereto“, diris

Kolonelo al la du kapitanoj, kiuj rajdis apud li. „Jen loko por nia kampadejo. Tie ni havos bonan akvon, kaj se io okazos en la nokto, ni havos la arbustojn kiel kovraĵon.“

Sed la patrolo tute ne estis tiel neglektema dum la observado, kiel Kolonelo supozis. Ĝi certe vidis la trupon de Kolonelo pli frue ol la *muchachos* ekvidis la patrolon. Intence la patrolo kondukis tiel kvazaŭ ĝi ne rimarkis ion gravan en la tereno.

La patrolo atingis la bienon kaj raportis tie, ke ĝi malkovris la kampadejon de la pedikohavaj kotaj kanajloj.

Santa Cecilia estis, kiel Generalo laŭ sia instinkto bone divenis, sed ne certe sciis, forte okupata de ĉirkaŭ kvindek *rurales*, de sepdek federaciaj soldatoj kaj de ĉirkaŭ dudek bienuloj tie kolektiĝintaj, kiuj kun siaj filoj, bofiloj, *mayordomos* kaj *capataces* estis armita forto de pli ol cent viroj.

La defendantoj de la bieno eksciis de la bienaj peonoj, kiuj vagadante ĉasis aŭ laboris en la vepro, ke almarŝas ribelula armeo. Sed ili ne povis ricevi senduban sekuran sciigon pri tio, ĉu la ribeluloj marŝas al Hucutsin aŭ aŭ al

Aĥlumal, ĉar la peonoj, tuj kiam ili ekvidis malproksime alveni la ribelulojn, de timo pelataj, kuris kun sia sciigo al la bieno sen atendi ĝis ili ekkonos la precizan marŝdirekton de la armeo. Tio tiumomente vere tre malmulte interesis la timigitajn peonojn.

La soldatoj ne sentis urĝon elsendi spionojn, ĉar ili sciis, ke la *muchachos* en ĉiu kazo atakos la bienon *Santa Cecilia*; kaj ke ne ekzistas pli bona loko akcepti la armeon por neniige pripafadi ĝin el sekura pozicio ol la bieno.

La okupantoj de la bieno posedis, ĉion kunnombrate, du mitralojn, cent dek karabenojn, sesdek ĉasfusilojn de diversaj specoj, inter ili ĉirkaŭ dudek magazenfusilojn de granda kalibro kaj krome ĉirkaŭ cent kaj dudek revolverojn. Kontraŭe al tia armilforto estis nepenseble, ke la ribeluloj eĉ nur ĝis tricent metroj povus proksimiĝi al la muroj de la bieno sen perdi tri kvaronojn de sia tuto. Se ili proksimiĝus nur pliajn cent metrojn, tiukaze estus certe, ke eĉ ne unu viro transvivus tion. En tiaj cirkonstancoj la defenda stabo facile respondecis lasi marŝi la ribelulojn al la bieno kaj ne ataki ilin ekstere sur libera kampo.

Generalo estis multe pli granda batalestro ol supozus eĉ liaj proksimaj kamaradoj. Estus malfacile sufiĉe bone klarigi al ili, kiel lerte li komprenis gvidi. Li estis sen eĉ scii tion mem, naskita kun la naturdotoj kaj talentoj de granda generalo.

En tiu ĉi kazo li oferis la nordo-trupon por gajni la batalon. Sen tiu oferado, kiu supraĵe rigardate ŝajnis ne tre kamaradece, ĉe Santa Cecilia lia tuta armeo estus neniigita. Li sendis Kolonelon antaŭen kun la nordo-trupo, ĉar li sciis, ke Kolonelo posedis la plej bonajn kapablojn teni la kvanton de la viktimoj tiom malgranda, kiom tio nur iel eblas.

Generalo ne povis ricevi precizajn sciigojn. Sed li sciis de peonoj revenintaj de la foirplaco, ke en Hucutsin oni estis tute instruita pri la almarŝo de la ribelula armeo. La stranga trankvilo, kiu eliris de Santa Cecilia, certigis lin, ke oni preparis ion decidan en tiu bieno. Se li erarus, se neniuj soldatoj en Santa Cecilia aŭ proksime estus kaj embuskus, tiukaze estus perdita nenio. Jen la *muchachos*



transprenus la bienon, disdividus ĝin inter la peonoj, havigus al si novajn provizojn kaj marŝus plu. Pri unu afero Generalo tamen certis, nome, ke interne de la tri sekvaj tagoj devos okazi decida batalo, ĉar la *federales* kaj la *rurales* ne povis permesi, ke la ribeluloj konkeru tutan urbon. Kaj interne de tri tagoj la ribelula armeo atingos unu el la sekvaj urboj, kiuj gravas. La okupo de urbo, en kiu *jefe politico* havas sian sidejon, kaŭzus en la lando impreson tiel demoralizan, ke ĝenerala revolucio kun certo atendeblus. Ĉie ardetis kaj subbruletis. Tial Generalo ne dubis pri tio, ke grava batalo estis komenciĝonta. Estus multe gajnite, se sukcesus devigi al li en batalon la kontraŭ li senditajn *rurales* kaj *federales* tiam kaj tie, kiam tio estus favora al liaj planoj.

Tre lerte li komprenis teni sekreta la veran kvanton dela ribeluloj. Nur la pli inteligentaj *muchachos* apartenantaj al ties stabo, sciis la proksimuman kvanton. La ceteraj ne okupiĝis pri tio kaj posedis nur tre nedifinitan imagon pri la kvanto de la armeo.

Almenaŭ tridek peonoj kaj migrantaj indiĝenaj etkamparanoj eble vidis la armeon, kaj ili certe ĉeokaze

iam kaj tiam parolis pri siaj observoj. Sed kiu ajn vidis aŭ renkontis la ribelulojn, ne havis okazon vidi pli ol du kompaniojn kune. Viro, kiu renkontis trupon, renkontis malofte aŭ eble neniam duan truopon. Kaj se li renkontis duan, li ne estis certa, ĉu ne temas pri la sama trupo, kiun li vidis antaŭe.

Tial okazis ne nur pro la streĉa tereno, ke Generalo lastatempe lasis marŝi la armeon en tri aŭ kvar grandaj grupoj, sed ankaŭ tial por teni la veran kvanton de la ribeluloj nekonata.

Kiam ajn en la bienoj aŭ en Hucutsin aŭ Aĥlumal alvenis sciigo pri la ribeluloj, tiukaze oni parolis pri cent ĝis cent kvindek viroj. Eĉ tie, kie ili kampadis kune sur la sama loko, estis ne eble por peono, kiu ĉeokaze preteriris, konstati precize la kvanton; ĉar peonoj kaj migrantaj indiĝenoj ne vagadis en kampadejo. Ili sufiĉe timeme proksimiĝis ĝis la plej ekstera linio de la kampadantoj kaj ĝojis, se oni ne traktis ilin malbone kaj lasis ilin foriri sur ilia vojo. Krome por peonoj kaj indiĝenoj tiutempe estis malfacile ankoraŭ ĝuste taksi grandajn kvantojn da homoj aŭ brutaroj, kiuj havis pli altan kvanton ol okdek.

Tuj, se estis pli ol okdek, ilia takso fariĝis tre malpreciza, kaj ili tiukaze tre rapide komencis misparoli pri multaj miloj.

La nordo-trupo estis antaŭsendita de li tiel, ke ĝi en ĉiu kazo devos esti rigardata el la bieno kaj observebla per okuloj ĝis ĝi ekkampados. Ke survoje inter Hucutsin kaj Santa Cecilia estas patroloj, kiuj rastas la terenon kaj certe vidos la nordo-trupon, atendis Generalo.

La nordo-trupo havis la forton de du kompanioj kun ĉirkaŭ cent sesdek viroj.

Generalo povus formi la nordo-trupon el nur unu kompanio. Sed tio estus taktika eraro. Li devis vekigi ĉe la patroloj kaj ĉe la okupantaro de la bieno la konvinkon, ke tiu nordo-trupo formas la tutan ribelulan armeon. Per sesdek aŭ sepdek viroj li ne povus vekigi la impreson. Jen okazus, ke la *rurales* trankvile lasus marŝi kaj eĉ kampadi la malgrandan truopon. Ili atendus ĝis la ĉeftrupo alvenus kaj nur poste ili atakus, kaj tiel eskapus neniu homo.

Sed tiel Generalo riskis kvaronon de sia armeo kaj retenis

tri tute freŝajn kvaronojn pretaj por la batalo. Ĝis kiam li rigardus la tempon favora por ataki la soldatojn de la *rurales* kaj *federales*. Tiu momento venus, se la *uniformados* supozus, ke ili estas la nekontestebaj venkintoj de la tuta regiono kaj devos fari nenion alian plu krom atendi, ke komisaro de la diktatoro alvenos por kroĉi ordenojn al iliaj brustoj kaj range altigi la oficirojn je unu aŭ du ŝtupoj.

Estas ĉiam bone por la ribeluloj kaj ties ĉefoj, jam antaŭe precize scii, kio okazos al ili, se ili perdos la batalon. Ju malpli da pardono kaj indulgo ilin atendos, des pli malmulte ili havas ion por perdi; kaj ĉar ili havas nenion por perdi, tial ili ĉiam estas pli bonaj batalantoj ol la uniformitaj postaĵlekantoj de la diktatoro. Tiuj kretenoj havas la postenon kaj posteneton, kiu plej bone plaĉas al ilia lakea animo. Pli altajn ambiciojn ili ne posedas. Iliaj ideoj estas realigitaj. Kion povous oferti sukcesa batalo ankoraŭ? Nenion de tio, kion ili ne posedis jam antaŭe.

Sed almenaŭ oni vere bone batalis. Tri *federales*, kvar *rurales* kaj tri bienuloj perdis sian vivon kaj naŭ viroj estis vunditaj, kiam la okupantoj kondukis marŝante

dudek kaptitojn je lazo en triumfo tra la vaste malfermitaj pordegoj de la bieno. Ĉirkaŭ cent *muchachos* de la nordo-trupo morte kuŝis distrite sur la batalkampo.

La nokto jam tre progresis, kiam Kolonelo kun eta aro, kiu restis al li, alvenis en la kampadejo de la centra trupo kaj raportis al Generalo.

Li kaj la *muchachos*, kiujn li kondukis, sangis el multegaj vundoj. Al unu el ili mankis mano, al alia subbrako.

Neniu estis inter la *muchachos*, kiu povus montri malpli ol kvar pafvundojn aŭ sabrotrancaĵojn sur sia korpo. Ses el la *muchachos* estis portitaj tien surŝulte de ties kamaradoj. Kvin viroj mortis sur la vojo tien, ĉar ili estis vunditaj tiom grave, ke ili aŭ elsangis aŭ iliaj polmoj ĉesis labori. Ili ne plu havis ĉemizojn.

Iliaj blankaj kaj brunaj lanpantalonoj estis disŝiritaj. Ĉiun pecon da ŝtofo, kiun ili surhavis, oni uzis por bandaĝi siajn vundojn aŭ tiujn de la kamaradoj aŭ per kunŝnurado reteni sangon.

Helpopretaj *muchachos* ekokupiĝis pri la alvenintoj por freŝigi ilin per kafo kaj kafograjnoj, por lavi iliajn vundojn kaj por bandaĝi ilin.

„Tio estis ja ĉarma ĝojofesto“, diris Kolonelo, dum li peze spirante kaŭriĝis teren. „Mi estas kelkajn kilogramojn pli malpeza kaj mi havas senton kvazaŭ mi sinkus teren post dek minutoj. Tiom da vivsuko mi perdis. Mi ne supozis, ke mi povus ankoraŭ treniĝi ĝis ĉi tien. Ni sidadis tute ĝoje kaj plezure en nia kampadejo. Ĉiuj lacaj kiel hundoj post pumoĉasado. Ĉe la infero, mi sciis, ke io estas okazonta, ĉar mi vidis patrolon, sed mi, azeno, kiu mi vere estas, kredis, ke ili ne vidis nin.“

„Kiel soldato, kaj speciale kiel Kolonelo, neniam kredu ion, sed supozu ĉiam, ke via kontraŭulo estas simile ruza ol vi aŭ eĉ pli ruza“, Generalo objctis kun rido.

„Kaj ĉar mi divenis ion, kaj, ĉar mi vin, Generalo konas, kaj jam havis certan ideon, kial vi sendis min kun la trupo al tiu loko, mi atentis diable bone. Kvar gardantojn mi havis ekstere surpostene. Sed antaŭ ol ili povis sciigi ion, la malbenita bando jam sidis sur niaj nukoj. Kaj kiel! Domaĝe, ke vi ne vidis tion. Vi ĉiuj lernus iom el tio. Tie estis almenaŭ ducent kvindek soldatoj. Ĉiuj sur ripozintaj ĉevaloj. Du maŝinŝpruciloj surtere. Mi ne scias kiel ili povis fari tion tiom rapide. Ili certe jam havis tiujn

*ametralladores* inter la brakoj, kiam ili ankoraŭ ekrajdis. La malica estis, ke ili alkuregis, kiam ankoraŭ estis hela posttagmezo. Ke ni efektive ankoraŭ kapablis reveni ĉi tien kun tridek viroj, kiel tio povis okazi, tion mi mem ne scias. Kaj, ke ni efektive ankoraŭ buĉis dek aŭ dekdu aŭ kiom ajn da ili, mi ja ne scias, ĉu Sankta Petro sukcesus pri tio. Al neniu flanko oni povis fuĝi. Per unu fojo ili estis kiel cirklo ĉirkaŭe, densa kiel larĝa muro, tri viroj da ili unu post la alia en la muro. Kaj tiam ili atakis nin kvazaŭ ili estus viraproj. Kun sabroj kaj karabenoj, kaj kun la hufoj de la ĉevaloj ili furiozis inter ni. Kaj la *balazos!* La kugloj! Ho, Sankta Virgulino de Guadalupe, ili fajfadis kvazaŭ oni draŝis per bastono en abelujon. Kaj kiel ili poste ekkriis: „Jen ni havas vin finfine ĉekolume, damnitaj pedikohavaj kotfiuloj. Revolucion vi volas fari, ĉu? Kriaĉi tiun *tierra y libertad*, ĉu? Ni ja dolĉigos al vi vian revolucion kaj vian *tierra y libertad*?! *Hijos de putas, chingados por puercos*, vi ja ankoraŭ lernu, kion tio signifas, fari ribelon. Ni disŝiros vin en kvar pecojn, *cabrones*, kaj ni senhaŭtigos vin ĉe ĉevalvosto, dekfoje malbenitaj stinkantaj kaj pedikohavaj kotfriponoj! Kaj tiam tio iris kvazaŭ per si mem, huŝ-puŝ, pif-paf, bum-



pum maldekstren-dekstren, supren-malsupren, la *muchachos* falis kiel malsekaj sakoj, jen kranio ĝis la nazo frakasita per sabro, jen ŝultro malsuprenhakita tuj kun la tuta brako jen sabro per unu fojo fulme trapikita tiel, ke ĝi elvenis nur ĉe la postaĵo de la trapikito, kaj al ĉiuj ili ŝprucis krome ankoraŭ per un fojo tridek aŭ kvardek noĉitajn plumbajn prunkernojn inter la intestojn. Mi diras al vi, *hombres*, kiu ne vidis tion, tiu pensas, ke tio ne eblas. Kelkajn ŝprucaĵojn ja ankaŭ ni povis elkraĉi, kaj du aŭ tri dekoj da maĉetaĵoj ni ja ankoraŭ svingis al celo, kaj tie, kie ili trafis, tie ili ankoraŭ nun videblas, tion mi povas ĵuri al vi. Sed kion vi volas fari, se vi tie kun viaj kunuloj trankvile kaŭras sur via postaĵo kaj pensas, ke la tuta mondo estas bela kaj bona, kaj jen en la sama sekundo ĵetiĝas sur vin ducent kvindek rajdistoj kun ĉevaloj.“

„Nu, kaj kie vi havas vian mitralon, Kolonelo?“ demandis nun Generalo.

„Ne demandu min, *hombre*. Mi ĝojas, ke mi ankoraŭ havas mian kapon.“

„Ne estus granda damaĝo pro ĝi, ĉar multe ĝi ŝajne ne valoras, se vi tiom lasis danci la bastonojn sur vi.“

„Vi povas facile paroli tiel. Sed ĉu vi estus reveninta kun tridek viroj, tion mi ja vere volus vidi antaŭe.“

„Kaj kiom da karabenoj kaj revolveroj vi kunprenis?“

„Du karabenojn kaj revolveron, jen tiun ĉe mi, sed la kartoĉoj ĉiuj estas disŝprucigitaj.“

„Tiukaze ni almenaŭ havos laboron dum la sekvaj tagoj, *muchachos*“, diris Generalo kaj rikanis plezure. „La mitralon, la karabenojn kaj la revolverojn ni devos denove havigi al ni, alikaze nia amikeco fariĝus rompiĝema.“

„La mitralon kaj la karabenojn, ĉu?“ Ankaŭ Kolonelo ekrikonis. Sed la larĝa rikano eble estis la kaŭzo, ke la sango komencis flui malsupren de lia kranio kun du strioj laŭ la vangoj en la buŝon. Li elkraĉis ĝin, trinkis grandan gluton da kafo por forigi la guston kaj tiam li diris: „La karabenon kaj la mitralojn vi celas, *compañero*? Lasu ilin trankvile tie, kie ili estas. Ilin uzi vi ne plu povus. Sed mi

vidis du malbenite belajn novajn mitralojn kaj pli ol cent brile novajn karabenojn kun reŝarĝiloj, kaj kion mi krome ankoraŭ vidis, ĉu? Buboĵ miaj, ĉirkaŭ cent pezajn ŝtalbluecajn *colts* kaj *aŭtomáticos*, knaboj miaj, estas revolveroj. Du batojn mi ricevis nur, ĉar mi rigardis la armilĉojn tiel karese anstataŭ sufiĉe rapide detiri mian keglon. Kaj mi ĵuras al vi ĉi tie, se vi ne leviĝos por kunkolekti tiujn armilĉojn, nia tridekopo, kiu postrestis, ekiros sola. La mitralojn, karabenojn kaj revolverojn mi devos havi, kaj, se mi ne povos havi ilin, la aĉa vivo valorus eĉ ne favan hundomerdon plu por mi.“

„Nur ne ekscitiĝu, Kolonelo“, diris nun Celso. „Ni ja kaptos ilin. Ili kostis al ni cent kaj dudek el niaj fratoj, sed la festo estos repagita. Ni ne plu estas en la monterio, kie oni donis al ni certan *fiesta* kaj ni ne povis repagi ĝin. Nun disdonos ni la *fiesta*-batojn kaj ni ne plu ŝuldos iun ajn, kiun ni ricevos.“

„*Santos en el cielo!*“ vokis Matiaso. „Se mi nur pensas pri tio, kion ili tie havas por ni en la *tienda*, jen el mi fluas la nazmuko kaj tiu de la grimaco kiel pura akveca nudelsupo. Tiun feromagazenon ni havu, tiam ni povos

provizi per ĝi duonon de nia armeo, kaj tiam ni foje reordigos la ŝtaton kun *fiesta* kaj muziko. La vivo estas mirakle bela. Eĉ, se ĝi nur tiom longe daŭrus ĝis ni foje estos farinta faros sub la postajon de la tiranohundidoj tiom da fajro kaj tiom ekscitos ilin, ke ili ankoraŭ post cent jaroj ne retrankviliĝos.“

„Fermu vian klaĉtruon!“ vokis Fidel al li. „Ni devos nun fari militplanojn ĉi tie.“

„Mi ja ankoraŭ rajtas diri, kion mi pensas, ĉu?“ defendis sin Matiaso.

„Kompreneble, *muy cierto*“, diris Generalo. „Ĉi tie rajtas paroli ĉiu, sed unue ankoraŭ Kolonelo estas en la vico.“

Li turnis sin denove al Lucio.

„Kiun vojon vi reiris kun via sanganta grego, mi opinias, ĉi tien? Ne eble eĉ sur la rekta vojo, ĉu?“

„Ĉu vi opinias min tia *burro*, tia azeno? Tio estus ja ŝtipkapulaĵo, se ni perfidus, kie nia armeo kaŭras. Tiuj kondamnindaj *cabrones* eĉ ne scias, ke ankoraŭ tridek el

ni postrestis. Ili supozas, ke ni ĉiuj estas falĉitaj. Kaj, ke ĉiu el ni, kiu ankoraŭ vivas, nun estas kaptita kaj tie en la korto de la bieno enviciĝos, por ke la uniformitaj postajĵlekantoj povu fari plezuran vesperon al si.“

„*Los prisioneros, los pobres!* La kompatindaj kaptitoj!“  
diris Andreo kun profunda elspiro.

„Jes, la kompatindaj kaptitoj tie nun ĝojus, se ankaŭ ili kuŝus sur la batalkampoj, mortaj kaj dishakitaj“, opiniis Generalo. „Ili nun dancigos ilin. Malbenite! Tiu Danku nun al siaj sanktuloj tiu, kiu ne estis kaptita. Kaj ni povos fari tute nenion kontraŭ tio. Ni devos atendi ĝis ni estos pretaj kaj la *cabrones* elfurioziĝos. Kiel ajn diable malfacile tio estas, ni tamen ne povas pensi nun pri tio. Ek do, Kolonelo, kiel vi venis ĉi tien?“

„Ni, kiuj fitraktite kaj prihakite elbaraktiĝis glitante rampante, ne estis ĉiuj kune en unu bulo, kompreneble ne. Ankoraŭ marŝinte tien, mi jam diris al ĉiuj, ke tiukaze, se ni estos atakitaj kaj devos retiriĝi ĉi tien, neniuj kuru sure la rekta vojo al la ĉefkomandejo, por ne perfidi ĝin. Tion vere neniuj faris. Eĉ ne en la plej granda kazo de

bezono. Kiam ni vidis, ke ni sufiĉe batalis kaj nenion povus atingi plu, jen ĵetiĝis tiuj, kiuj estis enmeze kaj ne havis alian elirvojon, inter la mortbatitojn. Ili ĉiuj havis sufiĉe da sango sur siaj vestaĉoj, tiom da, ke ili aspektis dekfoje pli mortaj ol nur mortaj. Aliaj rampis pli okcidente en la densan arbustaĵon, sufiĉe malproksime de tiu ĉi kampadejo. La herboj sur la prerio estas nun altaj ĉi tie. Poste, sufiĉe for de la tumulto, por la *soldados* ĝi estis malfacila ekkoni, kie ni kaŝiĝas. Mi povas diri al vi, ke ni eĉ pli malalte forrampis kaj eĉ pli ŝtelire ol kapablus tion la plej bela serpento. Ili havis krome multe da laboro firmligi per lazoj tiujn, kiujn ili volis kapti vivantaj, kaj kiuj ne plu povis savi sin. Tiel fariĝis fine eble eltiri nin kiel vermetojn. Komence ni, tiuj, kiuj volis elturiniĝi sin, kompreneble estis multe pli ol trikdek. Kaj ĝuste la kaptitojn, kiujn ili povis havigi al si, ili prenis de tiuj, kiuj ankoraŭ vivis kaj intencis forrampi, sed ne sufiĉe rapide povis transformiĝi en vermojn, kiel tio sukcesis en nia kazo. Intertempe ja rapide noktiĝis. Pro tio mi dankas al Dio, ke li ankoraŭ nun ĉeokaze kaŭzas tenebron. Kaj tial, kiam la nokto disvastiĝis, la *cabrones*, hurlante pro plezuro, formarŝis kun siaj kaptitoj. Ni iris poste vastan

arkon, dufoje krucante la riveron, profunde en la nordo, kaj nun ni estas ĉi tie.“

„Jes, ĉi tie ni estas“, diris Generalo. „sed ĉi tie ni ne restos. Ni retiriĝos denove en la vepron.“ Li tuj ordonis fini la kampadon kaj retromarŝi tiom, ĝis oni estos almenaŭ du kilometrojn profunde en la vepro kaj tiom malproksime post la montetoj, ke neniu de la bieno povos skolti ilin. Li sendis mesaĝon al la sudo-trupo, ke ili same denove retiriĝu en la vepron, sed restu tiom sude, ke ili ankoraŭ povos regi la sudan flankon.

La venkintoj nun kolektiĝintaj en la bieno estis tute konvinkitaj, ke ili neniigis ĉiujn ribelulojn, kiuj venis el la ĝangalo. Eblas tamen, tiel ili rakontis reciproke, ke eventuale eskapis dek aŭ dekkvin da ili, sed tiuj laŭ ili ne estis plu danĝeraj kaj krome post kelkaj tagoj estos kaptitaj de patroloj kaj ekzekutitaj per mortpafado. Ĉiukaze la ribeluloj, almenaŭ en tiu federacia ŝtato kaj en tiu regiono, kie la potencaj bienmastroj regis laŭ reĝoj en malnovaj tempoj, estis tute venkitaj laŭ ili kaj certe por longa daŭro, se oni konsideras tiun amasbuĉadon de indianaj ribeluloj. Aliaj, speciale peonoj, ja nun eĉ ne pensos plu dum jardekoj pri ribelo aŭ pri striko aŭ pri impertinenta konduto. Kaj por tio, ke tio vere okazos, oni havis ja la grandan bonŝancon kapti sufiĉe el tiuj stinkantaj indianaj banditoj vivantaj por riveli en ĉeesto de la envicigitaj peonfamilioj, kio okazos al popolleviĝantoj kaj al tiuj, kiuj kuraĝos esti impertinentaj kontraŭ siaj mastroj.

La diktatoroj kaj la feŭdaj sinjoroj sidis denove firme en



la malnova selo.

„Oni devas nur firme kapti la okazon, *caballeros*“, diris la kolonelo, kiu komandis la federaciajn soldatojn.

Kvankam la *federales* unuigitaj kun la *rurales* estis nur cent dudek viroj laŭ kvanto, tamen kolonelo sperta pri insurekcioj estis enmetita kiel komandanto. Ĉar ĉiuj bienuloj de la regiono metiĝis kun siaj *mayordomos* kaj aliaj vasaloj sub la komandon de la kolonelo, la oficiro ne havis kaŭzon plendi rilate al la grando de la trupo gvidata de li.

„Firme kapti la okazon, tre ŝatataj sinjoroj miaj, tio estas la ununura efika rimedo dum popolleviĝoj, strikoj, insurekcioj kaj ĉiaj tiaj stultaĵoj“, daŭrigis la kolonelo siajn klarigojn al la bienuloj. „Mi promesas al vi, *caballeros*, tiom longe, kiom estas mi ĉi tie kaj ĉi tie havas la komandon, la ŝtato restos libera de iu ajn formo de leviĝo kontraŭ la *Caŭdillo* nia. Kvankam tie en la nordo kaj en la okcidento de la respubliko kaj nun ankaŭ eĉ en la sukeraj regionoj rimarkeblas insurekcioj, tio tute ne devos havi grandan signifon; tiom longe, kiom ni tenos tiun sudo-ŝtaton en niaj manoj por avanci de ĉi tie, se tio

estos necesas. Mi ja povas malkaŝi al vi, *caballeros*, ke momente la situacio ne estas bona ekstere en la respubliko. Tio estu dirita nur inter ni. Sed ni ja atingos la celon en gloro kaj perbote subigos tiun bandon kaj tiam ni montros al ili, kiuj estas la veraj mastroj en la lando. Jen bona olda tradicio, leĝa juro, ordo, trankvilo kaj deca moro, jen tio, kion ni defendas. *Salud, caballeros*, tiun ĉi glason ni levu je nia honorata ŝtatgvidanto, *El Caudillo*, la neantstataŭeblan gvidanton kaj reganton de nia gloriĉa respubliko. *Viva El Caudillo!*“

La bienuloj, la oficiroj de la *federales* kaj de la *rurales* sidis laŭ longa kruda tablo starigita en la koridoro de mastra domo. La koridoro limigita de kolonoj etendiĝis laŭ la tuta longo de la mastra domo kaj estis malfermita al la granda korto de la bieno. Tiu portiko estis, kiel en ĉiuj domoj de la usonaj tropikoj, la halo, en kiu oni pasigis la tagon, kie oni manĝis kaj pasigis la horojn en hamako kaj kie la inoj kaj knabinoj faris siajn manlaborojn kaj kudris.

La krudan longan tablon tie starigitan kovris buntaj malkaraj lantukoj. La tablo estis en tiu tago abunde

okupita de pelvoj plenaj de nigra-ruĝa meksika saŭco, de bakitaj meleagroj, de freŝaj salatoj, grandaj kvantoj de cepoj, skatoloj kun sardenoj kaj Alasko-salmo kaj kun grandaj korboj ĝisrande plenigitaj per ananasoj, bananoj, avokadoj, mangoj, ĉerimojoj (*cherimoyas*) kaj de aliaj tropikaj fruktoj de tiu regiono. Kvin boteloj da hispanaj vermut -kaj muskatvinoj staris kvazaŭ izolite sur la longaj tabuloj, kiuj fakte estis la tablo. Ne estis multe da vino. La bienulo senkulpigis sin pro la malgranda kvanto de la boteloj. Neniu enkaŭpe notis tion grumblante, ĉar ĉiu sciis, ke ne estas facile konservadi grandajn kvantojn da vino en tiaj de mondumo foraj regionoj. Kompreneble, la bienulo estis sufiĉe kultivita por scii, ke bona vino, kaj des pli grandaj kvantoj de vinoj, estas disipitaj je bienuloj, kiujn li devis tie gastigi kiel neinvititajn gastojn. Ili ne kapablis taksu bonan vinon. Kaj krome la bienulo estis sufiĉe prudenta konservi la pli grandajn kvantojn de la bona vino por si mem. Por povi aranĝi kun brilo kaj pompo ĝustajn festojn por siaj terposedantaj amikoj kaj ties familioj. Ili konis bonan vinon. Kontraŭ ili li ne povis montriĝi aĉulo, tiel malmulte kiel ili faris tion, se aranĝis ili iun feston.

Sed je unu finaĵo de la festtablo estis bareleto kun bona malnova komiteko, kaj sidis neniuj je la tablo, kiu ne preferis la komitekon, ĉar tiu komiteko de la posedanto de *Santa Cecilia* havis bonan famon en la federacia ŝtato. Oni destilis ĝin en la bieno kaj ne disdonis ĝin antaŭ ol ĝi maturiĝis almenaŭ kvin jarojn.

En la korto kaj laŭ la portiko sidis la soldatoj kaj policanoj, la *rurales* kaj *federales*, la *mayordomos* kaj *capataces* de la venkintaj bienuloj ĉe manĝo. Du porkojn kaj bovidon oni buĉis por regali la neatendite grandan kvanton da militistoj. Tiu kvanto de fervoraj manĝantoj voris konsiderindajn kvantojn dum manĝo; kaj la edzino de la bienulo, *doña* Guillerma pensis akfluktite, kion ŝi faru, se la militarmeo tie kvazaŭ ennestigus sin dum tuta semajno. Ne estis la viando aŭ la maizo, kies mankon ŝi timis. Estis la salo, la sukero, la kafo kaj la perdo de teleroj, taso, servtukoj, tranĉiloj, forkoj kaj kuleroj, kiu terurigis ŝin. La soldatoj kaj *mayordomos* manĝis kompreneble ĉiuj per la fingroj. Sed tamen kuleroj necesis. Kaj perdiĝis ne nur en la korto, sed ankaŭ ĉe la tabloj, kie oni regalis la oficirojn, post ĉiu manĝo certa

kvanto da manĝiloj, inklude de teleretoj kaj kafotasoj. Sed ne estis tiel, ke oni simple ŝtelis la manĝilaron. Ekzemple iu el la manĝantoj ĵetis al servoknabo tason al la kapo por vigligi lin, se li vokis lin kaj tiu ne venis tuj al li. Alia volis fortimigi la hundojn, kiuj iris inter la gambojn de la manĝantoj por preni la ostojn, kaj tial li ĵetis tranĉilojn kaj kulerojn sur ilin. Plua sentis sin instigita prezenti siajn artifikojn kiel ekvilibristo ĉe la tablo. Li ekvilibrigadis tasojn, telerojn kaj pelvojn tiom longe ĝis renversiĝis tuta piramido kaj neniu ero restis sen damaĝo. Pluaj sciis sorĉistajn artifikojn kun forkoj, kuleroj kaj tranĉiloj. La manĝilaroj ĉe tio tiom kurbiĝis kaj disrompiĝis, ke la sorĉisto povis malaperigi ilin en la buŝo aŭ post orelo. La sukceso estis grandioza, sed la tranĉiloj kaj kuleroj ne plu uzeblis. Almenaŭ triono de la manĝilaro perdiĝis je la kutima maniero, kaj *doña Guillerma* vidis tie kaj tie kuleretojn kaj tranĉiletojn, kiuj ekfulmis en poŝoj, el kiuj kelkaj apartenis al oficiraj uniformoj.

La *rurales* kaj *federales*, ties komandantaj oficiroj, metis la manĝojn sur la tagsalajrajn kalkulojn por la registaro.

La registaro efektive pagis ilin. La bienulo gastiganta la soldatojn kaj policianojn ricevis eĉ ne centavon por la provianto. Kompreneble ne. Li vivis ja dum la beno de diktaturo. Li ankaŭ ne kuraĝis demandi la oficirojn pri tio. Unuavice tio ne estus deca por *caballero* okupiĝi pri tiaj bagateloj; krome la komandanto estus dirinta: „*Querido amigo mio*, vi ja ĝoju pri tio, ke ni venkis la ribelulojn. Se ni ne estus venintaj, de via bieno starus eĉ ne plu la muroj, kaj ĉu vi ankoraŭ vivus, tio ne estas certa.“ Ĉar la bienulo sciis tute precize, ke li ricevus tiun respondon, lia fiero malpermesis al li provoki tian respondon.

La korto de la bieno estis plena de homoj. Tie estis ne nur la soldatoj, kiuj kaŭris surtere kaj plenŝtopis siajn ventrojn, tie estis ankaŭ la peonoj, edzinoj, filinoj kaj filoj servantaj tie aŭ vagantaj proksime, kiuj observis, kiel la soldatoj ĝojis pri manĝo tia, kian la peonoj ricevis neniam, kvankam ili produktis ĉion tion.

Ankaŭ la soldatoj, *mayordomos* kaj *capataces* plezurigis sin je komiteko. Al ili la bienulo metigis en la korton gigantan argilan kruĉon, kiu havis la kapaciton de

kvindek litroj. Tiu giganta kruĉo estis plenigita per komiteko je tri kvaronoj. Kompreneble ĝi ne estis la sama bona speco, kiu staris en la bareleto sur la festa tablo. Estis la postrikolto de la bona pura komiteko, tre juna kaj brose gorĝotikla kaj klara kiel akvo.

Sekve de la bona manĝo kaj de la multaj komitekoj, la etoso baldaŭ fariĝis tre gaja. Edzinoj kaj filinoj de la peonoj kaj la indiĝenaj servistinoj estis mankaptitaj, ili devis danci, ĉu plaĉis ĉu ne plaĉis al ili. Ne helpis, ke *doña* Guillerma vokis siajn inojn kaj la peonajn edzinojn for de la soldatoj por malhelpi malbonon. La soldatoj estis la mastroj kaj povis permesi al si impertinente ridi al la vizaĝo de la bienula edzino.

Ne pasis du horoj, kiam jam flugis ĉirkaŭ kvindek revolverkugloj tien kaj tien tra la aero dense saturita per la fumo de la grandaj ŝtiparoj brulantaj en la granda korto. Kelkaj peonoj trafitaj de pafoj retiriĝis ŝtelire al siaj kabanoj. Du soldatoj kaj *mayordomo* estis bone preparitaj por entombigo je la sekva mateno, kaj ĉirkaŭ ses soldatoj kaj *capataces* iris en la grandan seloĉambron, kie helpopretaj kamaradoj kuracadis ilin.

Poste regis ree paco kaj konkordo.

La kaptitoj troviĝis enfermitaj en *corral*, en latbarile ĉirkaŭata ejo por ĉevaloj kaj bovinoj. Neniu penis malligi ilin. Ili troviĝis tie tiel, kiel ili estis, do ligitaj kaj kun plenŝtopitaj buŝoj, dum oni trenis ilin post la ĉevaloj al la bieno. Kiel pakaĵoj ili kuŝis sen protekto sur la sterkoplana ŝlimo de la ĉevaloj kaj bovinoj en la *corral*.

Kvar soldatoj, kun karabenoj sur siaj genuoj, sidis sur la traboj de la ĉirkaŭa latbarilo por observi la kaptitojn. Ili ĉagreniĝis, ĉar ili devis gardi ilin tie, dum la kamaradoj rajtis plezurigi sin en la vasta korto. Pli poste oni alternigis ilin, por ke ili povu manĝi. La nova gardantaro cagreniĝis eĉ pli ol la antaŭa, ĉar ili devis forlasi la feston por tie gardi la pedikohavajn indianajn aĉulojn.

Peonoj de la bieno timide proksimiĝis kaj donis al la kaptitoj trinkakvon kaj kelkajn manplenojn da kuiritaj faboj. Ili ĉiam timis, ke la gardantaj soldatoj povus puŝi ilin stomaken, ĉar ili agis kareseme al la kaptitoj. Sed la soldatoj estis tiel fihumuraj, ke ili tute ne atentis, kion faras la peonoj, se ili ne provis eĉ liberigi la kaptitojn de la



lazoj, per kiuj oni ligis ilin.

Leŭtenanto de la *federales* leviĝis kaj iris en malhelan angulon de la korto, proksime al tiu *corral*, ĉar li sentis la premon de tro da varma akvo en si. Li iris proksimen al la ĉirkaŭa latbarilo kaj serĉis lokon tie, kie kelkaj el la kaptitoj apogis sin al la fostoj.

„Simple restu sidantaj, kotaj friponoj“, diris la leŭtenanto, kiam la *muchachos* provis forrampi de la varma akvostrio por eviti ĝin. La *muchachos* ne plu moviĝis, sed restadis.

„Pedikohavaj kotkanajloj, vi prefere sentu vin honorigitaj, ke federacia oficiro tiom neglektas sian rangon por pisi sur vin, ĉu komprenite? Respondu!“

„Si, *Jefecito!*“ diris la *muchachos* humile kaj tute ne plu moviĝis.

La leŭtenanto revenis al la tablo. Kiam li vidis, ke la edzino kaj la filinoj de la bienulo forestos dum certa tempo, kaj tial do ne plu proksimis por aŭskulti lin, li rakontis sian plej novan oficiran aventuron.

Sekvis tondranta ridado kaj ĉiuj oficiroj kaj bienuloj, pro la mankoj de pli bona muziko kaj de pli noblaj interparoladoj ĉe la tablo, leviĝis laŭvice, iris al la *corral*, vokis la kaptitajn *muchachos* al si al la barila rando kaj kvazaŭ unktis la porkulojn laŭ la propra diro:

„*Empapando a los cochinos.*“

Kaj dum la sekvaj horoj, se tiu aŭ tiu opiniis ĝin necesa, li iris akvumi la porkulojn.

La soldatoj, *mayordomos* kaj *capataces*, post kiam iu el ili ĉeokaze malkovris tiun preferatan lokon de la akva lasado, imitis la ŝercon de siaj oficiroj, tiom longe, ĝis kiam malpermesis tion kapitano de la *rurales*, sed ne pro vekiĝanta kompato kun la senhonorigitaj *muchachos*, sed, ĉar la simplaj soldatoj ne havu la rajton uzi la saman lokon por siaj bezonoj kiel preferas ĝin la moŝtaj oficiroj kaj la *caballeros*, ĉar tio facile povus konduki al „kunkaĉiga“ misatento de rangodiferencoj.

Je la sekva mateno, tuj post kiam la oficiroj kaj *caballeros* purviŝis per malsekaj fingroj la okulojn kaj la servistinoj ofertis kiel matenan trinkaĵon al ĉiu tason da varmega nigra kafo kuirita kun bruna kruda sukero, la majoro ordonis la enketadon de la kaptitaj ribeluloj.

La majoro estis la milittribunalo. Li estis samtempe la akuzanto, la juĝisto kaj la supera tribunalo kontraŭ verdikto de pli malsupera instanco. La ceteraj oficiroj kaj la bienuloj staris aŭ sidadis kiel asessoroj. Sed tie ilia agado limiĝis nur je tio proponi precipe impresajn punmetodojn, por kvazaŭ verki memorfolieton, kiu eĉ post cent jaroj ankoraŭ ne estos forgesita. Entrepreni ribelon rajtis nur oficiroj, bienuloj kaj industrimagnatoj, se la diktatoro ne agis laŭ ilia plaĉo. Ĉar ĉiu en la lando sciis – eĉ inteligenta lerneja infano – ke la diktatoro estas nur tiomtempe *El Cacique*, kiomtempe li faras tion, kion tiuj, kiuj ordonas al li, postulas, tiuj, kiuj rajtas teni fingron je la sonorilbutono, ĉar ili havas enmane la kuntordigan lignobastoneton por la monsakoj.

La enketoj okazis tre rapide kaj militece. La kaptitoj paŝis antaŭen, aŭ pli bone dirate, estis ĵetitaj de duraj pugnoj kaj botoj antaŭen, ili diris sian nomon kaj staris silente, kun surbruste krucitaj brakoj.

La majoro, kiu libervole transprenis la servon, demandis ĉiun kaptiton, ĉu li estis laboristo en monterio. Tion ĉiu el ili konfirmis. Eĉ ne unu el *muchachos* ĵetiĝis surgenuen kaj petegis pri kompato aŭ pri pardono. Eĉ ne vidalvide kun la hororo, kiu atendis ilin en la sekvaj horoj, ili montriĝis pli grandaj kaj kiel homoj pli valoraj ol ties ekzekutistoj, kiuj pli poste, kiam la diktaturo komencis kunrompiĝi, kondukis precize tiel, kiel oni atendas tion ĉie surtere de la lakeoj kaj kripaj kunmanĝuloj de diktaturo, kaj pri kio oni neniam estas seniluziigita, kiam ajn kaj kie ajn disfalis diktaturo.

La kolonelo ne okupiĝis pri la aferoj de la milittribunalo aŭ pri tio, kio okazos kun la kaptitoj. Li permesis al si longan kaj sanan dormon, poste li matenmanĝis sola, por ricevi pli bonan matenmanĝon, kaj lia supozo ne trompis lin, kiel li ĝoje konstatis. Poste li sidiĝis al eta tablo en la plej malproksima angulo de la koridoro, tie li fumis

kontemple fortan cigaron kaj diktis al la skribisto la batalraporton por la *jefe de las operaciones militares*, kiu havis sian sidejon en Jovel. Kun la aŭdado de la nomoj, kiujn neniu penis noti, la milittribunalo estis finita kaj la plej streĉa parto de la majora taglaboro nun estis plenumita je ĉies kontento.

Majoro, la ceteraj oficiroj kaj la bienuloj intertempe ekhavis akran malsaton de la tribunalpenoj. Ĉar ili vidis, kun ridantaj okuloj, ke la indiĝenaj servistinoj ornamis la longan tablon per vaporantaj junaj porketoj kaj grandegaj pecoj de ĝisbrune rostitaj femuroj kaj dorsoj de bovidetoj, necesis hasta rapido, por ke la edzino de la bienulo, kiu tiom penis regali siajn gastojn laŭorde, ne rigardu afliktite sur la malvarmiĝantajn pelvojn. Tial estis pli bone, ke la enhavo de tiuj pelvoj malaperu tiel rapide, kiel la makzeloj nur iel povas realigi tion.

„*Sargento Paniagua!*“ vokis la majoro..

„*A sus ordenes, mi comandante!*“ respondis la vokita serĝento kaj ekstaris per unu salto ĉe la balustrado de la koridoro, sur kiu sidis la majoro kun cigaredo inter la

lipoj.

„Konduku la kaptitojn eksteren de la bienmuroj kaj ekzekutu ilin. Sed antaŭe vi rajtas matenmanĝi.“

„*A sus ordenes, mi comandante!*“

Kun la pia konscio, ke li kiel soldato kaj protektanto de la diktaturo, kiu donis la panon al li, plenumis sian devon, la majoro glitis malsupren de la balustrado, iris al la lavpelo, lavis siajn manojn, mangestis al la ceteraj oficiroj kaj paŝis poste al la tablo. Ĉirkaŭ deko da oficiroj sidis jam antaŭ siaj teleroj kaj atendis nur, ke la kolonelo kiel la plej altranga persono tie same sidiĝu, por ke oni finfine tamen povu komenci kun la jam tro malfrua matenmanĝo.

„Sakre“, diris la majoro, sidiĝinte post la kolonelo, kun dentpurigilo elgratante siajn fingrungojn, „sakre mi devas diri, tio estas ja matenmanĝo tia bona, kia ĝi pro ĝojo lasas saltadi ĝiskolome la koron de sperta soldato kaj batalanto. Ek, al la kanonoj, *caballeros*, kaj kuraĝe ĵetu vin en la batalon.“

La *caballeros* je la tablo ankoraŭ ne estis je duono preta pri la batalo, kiam serĝento Paniagua al la majoro sciigis: „*Listo, mi comandante!*“

„*Muy bien!* Kiel vi traktu kaptitajn ribelulojn, tion ci scias, *sargento* Paniagua, ĉu?“

„Si, mi comandante!“

„Tiukaze ek do!“

„Momenton ankoraŭ, *señor* majoro!“ La posedanto de la bieno Santa Cecilia, kiu kiel gastiganto sidis ĉetabele en la mezo inter la kolonelo kaj la majoro, diris: „Mi proponas, *señoro* majoro, ke ni kunvoku ĉiujn peonojn de mia bieno, por ke ili estu atestantoj ĉe la punado de la *rebeldes*. Tio nin, ĉiujn bienulojn, bonfartigas, se la peonoj foje vidos tion. Tiukaze al ili fine foje estos elpelita la eterna kriado pri tiraneco kaj maljusteco, kaj espereble ĉiam.“

„*Bravo! Bravisimo!*“ vokis la ceteraj bienuloj ĉe la tablo.

„Tio estas bona penso de vi, *don Lerfino*. Domaĝe, ke ni ne sufiĉe rapide povus alpeli peonojn niajn, por ke ili ĉeestu la prezentadon. Tian bonegan instruon ili povas ricevi ne ĉiutage.“

La plimulto de la peonoj estis jam en la korto, kie ili priservis aŭ pro scivolo ĉirkaŭstaradis. Multe oni laboris malofte je tiuj tagoj, kiam okazis granda festo en la bieno, ĉar la *mayordomos* kaj *capataces* ne volis preterlasi ion de la bankedoj. Nur la plej gravaj laboroj estis faritaj.

Kaj tamen sendis la bienulo sian *mayordomo* transen en la vilaĝon de la peonoj, por komandi tien ĉiujn virojn, inojn kaj infanojn, por ke ili estu atestantoj de la ekzekutado je la ribeluloj.

### **Rimarkoj**

*listo* = preta

*muy bien* = tre bone



Havi je preskaŭ senlimigita dispono tian grandan kvanton da ĉifonitaj, pedikohavaj, timidaj, humiligitaj kaj tute sendefendaj kaptitoj, estus kvazaŭ festplezuro por seksdegeneraj kaj ŝlimanimaj uniformitaj haringoskeletuloj tiaj, kiajn histeria Mez-Eŭropo estigas ilin tiel malkare kaj en tiom grandaj amasoj. Diktatoroj, kiuj bonfartas kaj sanfartas nur tiukaze, se ili havas nenion krom sklavoj ĉirkaŭ si, jam kontentas, pro bone kompreneblaj kaŭzoj, se ili havas por la vivu-krioj kaj por la persona protekto servutulojn. Kun liberaj homoj, kiuj kapablas senti eĉ nur iom da indo en si, ili povus sidi eĉ ne dum unu semajno plu sur la trono. Ne en tempoj malnovaj, sed tute certe en novaj, estas la plej fiaj kaj plej kanajlaj torturistaj majstroj kaj policejaj parazitaj tiuj senmaturaj kaj nazmukaj fatrasuloj, kiuj, ĉar ili posedas nenian individuecon, nenian aludeton de personeco, sentas vivon nur tiukaze, se estas permesate al ili surmeti uniformĉapon. La uniformĉapo faras el homa nulo duonon de unu, kaj se tiu duono de unu ne surhavas uniformĉapon, oni tuj vidus, ke en vero temas pri idiote

kramfiĝinta oblikve naskita nulo. Serĝento Paniagua ricevinta de la majoro la komision transpreni la punadon kaj ekzekutadon de la ribeluloj, tiel kiel la ceteraj suboficiroj kaj policianoj, ne sentus iun ajn plezuron ekzerci siajn sadistajn animajn aberaciojn je sendefendaj kaptitoj per tio, ke ili dum tagoj au eĉ dum semajnoj delectiĝus pri tio skurĝi la kaptitojn kaj devigi ilin kraĉi sin reciproke vizaĝen aŭ reciproke vangofrapi sin. Tion ili trovas tiel stulta, ridinda kaj idiota, ke ili ekdubus pri sia propra sano.

Kutime oni pendumis kaptitajn ribelulojn je la plej proksima arbo. Tio iris tiel rapide, ke dek viroj dum kvin minutoj estis pendumitaj.

Serĝento Paniagua alvokis soldataron kaj komandis al ili, ke ili konduku la kaptitojn tricent metrojn for de la bieno kaj tie pendumu ilin laŭvice; antaŭe de ĉiu estu fortranĉitaj la oreloj.

Sed kiam ili jam estis ĉe la arboj, alvenis rajdante la *mayordomo* de bienulo, kiu ankoraŭ matenmanĝis, kaj li vokis, ke la serĝento pri la pendumado ankoraŭ atendu,

ĉar ankaŭ la bienuloj intencas ĉeesti.

La serĝento sendis suboficiron al la majoro por demandi, ĉu li atendu. La majoro permesis tion kaj ordonis atendi rilate la pendumadon ĝis la *caballeros* estos pretaj pri la matenmanĝo kaj poste ĉeestos mem.

Post duono de horo venis la bienuloj, la majoro kaj kelkaj enuigite aspektantaj oficiroj, kiuj proksimiĝis promene rapide.

„Tian feston ni ne havos ĉiutage“, diris *don* Crisostomo, la mastro de la bieno *Santa Julia*.

„Ĝuste.“ *Don* Abundio, la mastro de la bieno *La Nueva Granada* kapjesis konsente. „Sed nur pri tio ne temas. Estas pli bone, ke ni rigardu ĉi tie, ke ĉio okazu laŭorde kaj emfaze. Neniu kota porko, nomata pedikohava peono, estas impresita, se oni pendumas lin. Li eĉ faras ŝercojn pri tio, se la supo jam ŝprucas antaŭe el lia melonkapo.“

Tio instigis gajigan ridadon de la *caballeros*.

„Ĉu ĉiuj peonoj ĉeestas?“ demandis *don* Delfino.

„Si, Patron!“ respondis lia *mayordomo*.

„Kial ni staradu ĉi tie, compañeros?“ opiniis *don Faŭstino*, la mastro de la bieno *Finca Rio Verde*. Li vokis iun el la *mayordomos* al si kaj komandis surĉevaligi la selojn kaj poste alkonduki la ĉevalojn, por ke oni povu surseliĝi kaj ne devu stari sur siaj kompatindaj kurbaj rompiĝemaj gamboj.

„Oiga, Señor Mayor!“ *Don Eleŭterio*, la mastro de la bieno *La Providencia*, proksimiĝis al la majoro. „Mi pensas, ke tio povas esti indiferenta al vi, kiu okupiĝos pri la hundaj ribeluloj.“

„Es cierto“, konsentis la majoro. „Al mi estas egale. Mi raportu nur, ke la kaptitaj *rebeldes* estas mortaj. Ĉu mortpafitaj ĉu pendumitaj, tio ne koncernas min. Mi estas soldato. Kaj miaj kamaradoj estas soldatoj. Kaj ĉar ni estas soldatoj, ni hontus torturi kaj skurĝi sendefendajn kaptitojn. Ni aŭ pendumas aŭ mortpafas ilin ekzekute. Kion faras la polico, pri tio estas ni, la soldatoj, ne respondecaj.“

La majoro levis malŝate la ŝultrojn kaj turniĝis je duono flanken.

„Pripensu, *señor* majoro“, insiste parolis nun *don* Tirso, la mastro de la bieno *La Camelia*, al la majoro. „Vi formarŝos post kelkaj tagoj. Tiam ni ĉi tie estos denove lasataj solaj kaj tute senhelpaj. Mi scias sufiĉe bone, ke niaj peonoj ne plu estas tiaj, kiaj ili estis. Ili estas maltrankvilaj. Ili atendas nur la okazon. Kaj tiam ili ĵetiĝos sur nin. Oni buĉos nin kiel bovidojn. Ĉiuj dum unu nokto. Se ni ĉi tie kaj nun ne donos al ili sukan lekcion, tiel, ke la uloj ankaŭ post du aŭ tri jaroj ne forgesos tion, kiel ni traktas ribelulojn, ni ne havos sekurecon.“

„*Muy bien, caballeros!* Agu laŭ via bontrovo. Mi ekiros por trinki laŭordan gluton, mi svingiĝos sur la hamakon kaj pasigos belan kaj sunplenan antaŭtagmezon.  
*Sargento Paniagua!*“

„*A sus ordenes, mi comandante!*“

„Vi, la kaporaloj, kaj ĉiuj viaj soldatoj retroiru al la bieno.  
*Los prisioneros para los Caballeros!* La kaptitojn ni

translasu al la mastroj!“

*„A sus ordenes, mi comandante!“*

La komandanta oficiro de la polictropo vokis siajn policianojn. „Vi restos ĉi tie por gardado!“ Doninte la ordonon, li sekvis al la majoro kaj al la ceteraj oficiroj, kiuj retropromenis al la bieno.

*Don Delfino* kunvokis kelkajn el siaj peonoj. „Ek, alportu ŝpatojn kaj pikfosilojn el la *tienda!*“

Oni alportis la fosilojn kaj la bienulo komandis al la kaptitaj *muchachos*, ke ili fosu truojn, ĉiun ĝis profundo de kvar kaj duono da futoj .

Kiam la truoj estis fositaj, starigis sin la *muchachos* laŭvice rande de la truoj.

„Tio plaĉus al vi, ĉu? Pedikohavaj *cabrones!*“ vokis la bienulo. „Unu pafo kaj finita la far‘. Ne tiom rapide! Kaj nun iru en la truojn! Ĉiu en sian propran!“

La *muchachos* lasis fali sin en ilin. Sed la truoj fositaj tiel, kiel la bienulo ordonis, estis tiel fositaj, ke la viroj ne povis kuŝi laŭlonge. Ili staris oblikve surpiede kaj iliaj kapoj elstaris trans la randon.

La bienulo vokis kelkajn *capataces*. „Detranĉu la orelojn de la kanajloj!“

„He, vi, kie vi havas viajn fetorantajn orelojn?“ demandis la bienulo, proksimiĝante al unu el la *muchachos* en lia truo.

„*Patroncito mio*, tiujn oni fortranĉis de mi en la monterio!“

„Ĉu ankaŭ tie jam pro ribelemo?!“

„Kun via bonkora permeso, *patroncito*, ne pro ribelemo. Mia knabeto dronis en la rivero. Jen mi tiel malgajis kaj mi forveturis kun la fluo.“

„Vi do dizertis. Jen la sama.“ Per movo de sia kapo li vokis *capataz*-on proksime starantan al si. „Orelojn li ne plu havas por fortranĉo, la fripono. Do, fortranĉu lian nazon. He, vi, ne tiom baraktadu, se vango kunperdiĝos, des pli bone. Jen tiuj en la infero tuj scios, kiu vi estas, kiam vi venos tien.“

La peonoj, kiuj ĉeestis kiel atestantoj, diris nenion. Per neniuj gesto ili aludis, kio okazas en ties interno. Ili aspektis humile kaj obeeme kiel ĉiam. La bienuloj estis konvinkitaj, ke iliaj peonoj ne estas timindaj.



Nun la peonoj ricevis la ordonon, plenŝoveli la truojn.

Kiam tio jam okazis kaj nur la kapoj de la *muchachos* kovritaj de sango elstaris de la tero, vokis bienulo al la kapoj: „*Tierra y libertad*, tiujn vi volas havi? Ni nun donos al vi teron kaj liberon. Pli ol vi povos gluti.

Pedikohavaj kotbanditoj!“ Li puŝis la ripojn de *capataz* kaj diris al li: „Ĝstopu al ili la teron en la senhontajn grimacojn ĝis ĝi ree eliros de la postaĵo!“

Li mem prenis ŝovelilplenon da tero, ĵetis ĝin vizaĝen de la sekva kapo, iris al li kaj puŝis la teron helpe de siaj botoj en ties buŝon. „Jen vi havu viajn *tierra y libertad*. Ĉu vi nun estas kontenta? He, kaj ankaŭ vi, ni ja plenŝtopos ĉiun el vi tute per *tierra kaj libertad*. Alportu akvon, Jose“, li vokis al alia *capataz*. „Alportu ĉiuj akvon kaj verŝu ĝin en ties grimacojn, por ke ili ĉiuj voru tiom da *tierra* ĝis ili krevos. *Libertad*. Libero. Nun vi ja fine havas la tutan liberon, kiu estas tutmonde, kaj eĉ la inferon aldone.“

Li kunvokis ĉiujn *mayordomos* kaj *capataces* kaj ordonis al ili fari ĝin same kun la kapoj, kiel li montris al ili.

La *capataces*, laŭte incititaj de la bienuloj, puŝis per la botoj ĉiujn tergrajnetojn, kiuj malfirme estis surŝovelitaj ĉirkaŭ la truoj, en la buŝojn, ili postpuŝis per siaj pugnoj kaj, se la buŝoj, nazoj, okuloj kaj sangantaj oreltruoj estis tiom plenaj de tero, ke eĉ ne unu tera ereto lasis postŝtopi sin kaj eĉ la enfluigita akvo ne helpis plu por povi puŝi pli da tero en la kapojn, ili tretadis per siaj botoj sur la kapojn, pli kaj pli profunde stamfante ilin en la malfirman teron, ĝis kiam ĉiuj vizaĝoj plenaj de sango kaj priŝmiritaj de tero fariĝis malidentigeblaj kaj formis plu nur amason, ne tre fidinde kuntenatan de la fortika hararpelto sur la kranioj.

La *muchachos* komence de tiu terdisdonado ankoraŭ kraĉis, tuisis, ĝemegis kaj spiregis. Sed neniu el ili plendis. Neniu el ili parolis, eĉ ne unu vorton, kiu estus komprenebla kiel peto pri pardono aŭ kompatato. Tio longe, kiom ili ankoraŭ povis vidi ion, montris sin sur ilia vizaĝo nek timo nek plendo. Nur malamo, kaj nenio krom malamo ardis en la lasta eklumado de iliaj profunde brunaj aŭ nigraj okuloj. Estis la senlima malmo, kiu forgesigis al ili ĉiun doloron, kiu faris ilin senperceptaj,

tiel, kvazaŭ iliaj kapoj estus ŝtonoj. Estis la neestingebla malamo de la subigito, kiu kiel ajn subigita kaj kiom ajn torturita, konas nur ununuran animan eksciton, la malamon kontraŭ la subiganto. Estis la malamo de l' proleto, kiu neniam spertas justecon, sed nur komandojn kaj batojn. Malamo pli furioza kaj pli nepacigebla ol la malamo de Satano kontraŭ Dio estis la kaŭzo, kial ili eĉ ne per aludeto de sia animstato almozpetis pri lasta graca vivestinga piedtreto povanta vekti en ties tiranoj ĝojan senton pri tio, ke ili nun fine rompis la reziston de la peonoj.

Kvar *muchachos*, kiam ili sentis, ke ili post la sekva piedbato survizaĝen ne plu povos ĝemegi vorton, kriis laŭte kaj fortike, tiel, kiel la tero en ilia gorĝo ĝuste ankoraŭ permesis tion: „*Tierra y libertad! Viva la revolucion de los peones!*“ Tio ne bone kaj klare aŭskulteblis. Sed por ĉiuj tiuj *muchachos*, kiuj kun la lasta restaĵeto de sia vivo aŭdis la subigitajn kaj ŝtopbaritajn sonojn – kvankam ili ne aŭdis la vortojn unuope, sed sentis kun sia instinkto la plenan sencon – estis la gruntosonoj de siaj kamaradoj laŭdokanto tia,

kian ĉiuj ĉielaj armeoj ĉe la nasko de la Elaĉetonto ne povus kanti por la *muchachos*. Estis laŭdokanto, kiu ne anoncis elaĉetonton de la homaro. Estis laŭdokanto, kiu anoncis la alvenon de novaj homoj. Estis la laŭdokanto pri herooj, kiel nur diktaturo, aŭtokratio, povas naski ilin, ne por konservi la aŭtokration, sed por frakasi ĝin.

La bienuloj ne nur aŭdis la lastajn ekkriojn, la ununurajn kriojn, kiujn eligis la ekzekutataj *muchachos*, sed ankaŭ komprenis ilin.

Ili fariĝis tiel koleraj, ke ili tute forgesis sin. Ili nun ne plu translasis al siaj *capataces* stamfi la ribelulojn for de la tersurfaco, sed ili mem eksaltis post tiuj ekkrioj al la kapoj kaj tretadis kaj dancadis sur ili, kvazaŭ ili freneziĝis.

„Kie estas la ĉevaloj, diodamnita pigra grego nomata *mozos*“, vokis kelkaj bienuloj kaj traktis siajn *capataces* per pugnobatoj. La ĉevaloj ankoraŭ ne estis kaptitaj, ĉar ili paŝtis sin sur la vasta paŝtejo kaj tial oni unue devis serĉi kaj kunpeli ilin.

„La ĉevalojn ĉi tien! La ĉevalojn ĉi tien! Por ke ni povu forigi per galopado tiujn infere damnitajn kapojn de la kanajloj!“

Ne nur la bienuloj, sed ankaŭ la peonoj aŭdis la ekkriojn

de la kvar aŭ kvin *muchachos*. Kaj kvankam ili pli facile komprenis indiĝenan lingvon ol la hispanan, ili komprenis ĝuste tiujn ribelulkriojn sufiĉe bone. Kaj tute bone ili komprenis, nun je la unua fojo dum sia tuta vivo, kion tiuj ribelulokrioj signifis efektive.

La bienuloj faris la pej grandan eraron, kiun ili povis fari: inviti per ordono la peonojn al tiu prezentado, por terurigi ilin.

Sed la peonoj sentis sin je la unua fojo kiel homtavolo, kiu en si kaj inter si estas kunligita, ne tial, ĉar ili estas peonoj, sed, ĉar ili havas komunan malamikon, ĉar iliaj malamikoj estas la mastroj, kiuj montris sin al ili kiel bonvolemaj patroj. Ili nun komencis kompreni, je la unua fojo dum sia ekzisto, ke tiu laŭdira patro tuj ŝanĝiĝas en kruelan bopatron, tuj, se lia patra regado kaj aŭtoritato estas minacata.

La peonoj, kiuj ĉi tie estis invititaj kiel atestantoj, en tiu momento konsciigis, ke ilia propra subigita kaj skurĝata klaso kapablas estigi heroojn, kiuj rilate al heroa kuraĝo, sincera senco, karaktera forto, malamo kaj fiero neniel pli

malbonas ol tiuj, kiuj ĝis tiam rigardis tiujn homajn ecojn kiel nedisigeblan heredaĵon de sia propra klaso, de la feŭda mastroklaso, kaj kiuj ĉe ĉiu okazo kriis en la mondon, ke peonoj kaj proletoj estas ĝuste tial peonoj kaj proletoj, ĉar ili posedas nek fieron nek kuraĝon.

Sed fieron la peonoj nun sentis ekĝermi en si, kiam ili aŭdis la gargarajn venkokriojn de la mortantaj *muchachos*. Ilin nun plivastigis sian ĝis tiam tiel necertan kaj nekonturitan komprenon de siaj ebloj kiel personoj, kiam ili ekkonsciis, ke tiuj ribeluloj, kiuj eĉ plu kun teruraj doloroj povis elkrii iel sian malamon kontraŭ la lakeoj de la diktatoro, apartenis al ilia raso kaj klaso, kaj ne al la klaso de la mastroj. Neniu el ili vidis iam morti bienulon kun tia granda gesto, kiel kapablis tion la ribeluloj.

Timon kaj teruriĝon la bienuloj esperis estigi en la peonoj, kiam ili komandis, ke ili ĉeestu la ekzekutadon. Sed sen tio, ke la bienuloj tion eĉ nur divenis, ilia plano misfunkciis kaj rezultigis la malon. Sentante profundan kvazaŭ religian admiron en siaj koroj vidalvide kun la ribeluloj, la peonoj ŝteliris en siajn kabanon kaj rakontis

al siaj edzinoj kaj infanoj pri tio, kion ili vidis kaj travivis. Kaj ili rakontis tion kun tia sindonemo kaj respektego, kvazaŭ ili vidus en la vepro la adoratajn insignojn de sanktulo, kiu tie persone aperis al ili kaj postulis, ke ili konstruu tie kapelon.

La viroj kaj inoj surgenuiĝis antaŭ la fumkovrita polva bildeto de Sankta Virgulino sur la kesteto, kiu servis al ili kiel altaro, kaj preĝis por la animoj de la ekzekutitaj ribeluloj kun pasio tia, kvazaŭ ili estus ties mortintaj patroj. Kiam ili finis sian preĝon kaj la viroj denove elpaŝis de siaj mizeraj kabanaj por sekvi la *mayordomo*-n al siaj laborlokoj, ili ne plu estis la peonoj el la tago antaŭe.



## Ĉapitro 06

01

Generalo, retirinte sian ĉef-trupon kaj la okcident-trupon ĉirkaŭ kvin kilometrojn en la vepron, preparis decidan kontraŭatakon. La vepro kovris ne nur liajn du trupojn, sed ankaŭ liajn antaŭpreparojn. Li posedis nun vastan alkurokampon kaj havis sufiĉe da spaco por ataki sian kontraŭulon plej plaĉe el ĉiu flanko. Gvidate de sia bone funkcia indigena instinkto ne lasi surprizi sin, tiom longe, kiom li povas eviti tion, disdonis siajn eksterajn postenojn kaj eksterajn patrolojn tiel lerte, ke en la kazo de bezono eblis al li forkapti sufiĉe frutempe ĉiun peonon aŭ veprolaboriston aŭ ĉasantan bienulon tiel, ke ne eblis peri sciigojn al *Santa Cecilia*, kiuj povus detrui siajn planojn. Lia plano bazis sin ĉefe sur tio, ke li supozigis siajn kontraŭulojn, ke la armeo de la monteriaj ribeluloj en la murdoplena batalo, kiun li ofertis al la kontraŭulo, estis tute detruiĝinta, kaj, ke nur iom pli ol deko da vunditaj kaj disigitaj *muchachos* sencele vagadis pelataj de timo kaj despero en la vepro kaj en la prerio. La ununura

zorgo, kiun li havis, estis tiu, ke la *federales* kaj *rurales* kaj bienuloj kun siaj *mayordomos* kaj *capataces* povus forlasi la bienon Santa Cecilia je la tago post tiu batalo.

Je la frua mateno de la tago, kiam oni enfosis en *Santa Cecilia* la kaptitajn *muchachos* ankoraŭ vivantajn laŭ diktaturaj reguloj, laŭ kiuj oni kutime punis insurekcion de indiĝenaj kamparanoj en la diktaturo, li vokis al si du *muchachos*, pri kiuj li sciis, ke ili konas la regionon, ĉar ili naskiĝis kaj plenkreskis en bieno de tiu regiono kaj pli poste ŝakre estis senditaj de siaj mastroj al la monterioj.

„Vi ambaŭ, Pablo kaj Mario, ĉu vi komprenas la lingvon, kiun parolas la peonoj?“

„*Si, Generalo*, estas la celtala.“

„Bone do. Prenu viajn pakaĵretojn kaj tranĉu grandan amason da herboj tie transe en la preria vastaĵo. Tre tre multe da herboj, tiujn vi ŝtopu en viajn retojn, kaj ŝtopu ilin tiel dense kaj ĝisplene, ke ili formu gigantan bulon. Poste tuj iru al Santa Cecilia. Iru tie en la vilaĝon de la peonoj. Montru la plej stultan vizaĝon, kiun vi kapablos

montri kaj diru al la peonoj, ke vi estas survoje al Balun Canan, de kie vi intencos iru plu al la kafoplantejoj por tie labori kontrakte, kaj ke vi volas vendi la herbojn en Balun Canan por bona prezo por aĉeti tabakon por la vojo.“

„Tion ni bone povos fari kaj facile, ĉar mi jam iam laboris kafplanteje, en *San Geronimo*“, respondis Pablo.

„Tie vi restu ĉirkaŭ duonon de tago, kvazaŭ vi volus ripozi. Jen por ĉiu el vi tridek centavojn, tiom, ke vi povos aĉeti ion de la peonoj, tortiljojn por la vojo, fabojn, ruĝajn kapsikojn, kelkajn tabakfoliojn. Tiam vagadu tie proksime de la konstruaĵoj kaj penu ekscii ion. Vi komprenas sufiĉe de la hispana, por orelkapti, kion ilin kriadas kaj parolas tie. Se vi kapablas tion, nombru, kiom da viroj estas tie, ĉu ili ankoraŭ restos tagon aŭ du tagojn aŭ ĉu ili tuj formarsos. Bone observu, kie estas la pordegoj, ĉu ili estas fermataj en la nokto aŭ nur apogataj, kie la karabenoj estas aŭ starigataj aŭ pendigataj, kie staras la mitraloj, en kiuj ĉambroj tranoktas la oficiroj, ĉu ili multe drinkas. Ĉu vi povas memorteni tion?“

„Kompreneble, Generalo, ĉiu el ni havas ja kapon kaj ankaŭ sanan diafragmon por havi sufiĉe da menso.“

„Kaj tiam, kiam vi tie forlasos la vilaĝon, simple diru kvazaŭ preterire, ke vi observis survoje dek sovaĝiĝintajn kaj kotŝmiritajn *muchachos* kun karabenoj, kiuj havas vundojn surkape kaj korpe, kaj, ke la *muchachos* tre timas kaj ke ili tre haste ŝteliris ĉi tien en la vepron. Tuj kiam vi estos rakontintaj tion tute preterire, survojiĝu en la direkto al Balun Canan. Kompreneble vi ne proksimiĝu tro al la bieno, por ke oni ne povu diveni tie, ke vi de ĉi tie venis. Kaj se vi ekmarŝos, vi iru unue dum duono de leŭgo aŭ eĉ dum pli longa distanco en la direkto al Balun Canan, kaj poste vi devojiĝu kaj ŝteliru ĉi tien. Estas grave, ke neniu en la bieno – ankaŭ ne la peonoj – povu diveni, ke vi venis de ĉi tie kaj retromarŝos ĉi tien. Ĉu komprenite?“

„Ĉion, Generalo. Kaj ne afliktiĝu pri ni, ni ja elspionos ĉion, kion vi volas scii.“

„Jen ek do. Sed se demandos vin unu el la uniformitoj aŭ el la bienuloj, tiukaze diru, ke vi vidis forkuri en la vepron

du virojn kun karabenoj kaj, ke ili tiom timis, ke ili eĉ ne parolis kun vi. Sed plej bone estas tute ne renkontiĝi kun la *federales* kaj ĉiuj tiuj kaj eviti ilin survoje kaj nur bone malfermi la okulojn kaj interparoli kun la peonoj.“

Tiuj du spionoj nun jam revenis kaj raportis al Generalo. De ili eksciis la peonoj la sorton de la kaptitaj kamaradoj. Sed anstataŭ ektimi kaj embarasiĝi ĉe la perspektivo trasuferi similan aŭ eĉ pli teruran sorton, tio nur terure kolerigis ilin kaj estigis en ili malamon, kiu certe tuj provokus ilin ekmarŝi kaj ataki la bienon Santa Cecilia ankoraŭ dum la hela parto de la tago, sen pripensi la sekvojn, se Generalo, Coronelo; Profesoro, Andreo, Celso kaj ankoraŭ kelkaj pluaj *muchachos* ne estus tiel prudentaj kaj inteligentaj konvinki la kolerajn *muchachos*, ke ili sekvu prefere bone pripensitajn planojn.

Modesta, kiu kaŭris apud Celso, kaj kombis la hararon de sia nevo Pedrito, aŭskultis la raporton. En la monterio oni fortranĉis ambaŭ orelojn de Pedrito, same al lia patro. Tiun teruran punon oni kroĉis al la patro pro malsukcesa fuĝprovo, kaj la knabeto en la ĉeesto de la patro devis trasuferi la samon, por pligrandigi la punon de la patro, kaj por marki la knabeton dum ties tuta plua vivo kiel la

filon de dizertinto. Se oni preskaŭ ĝismorte skurĝas la patron, kiel okazis en similaj okazoj, li ne povus labori dum kelkaj tagoj, kaj la perdo de liaj tiom bezonataj laborfortoj dolorigus la posedanton de la monterio. La fortranĉado de oreloj ne malhelpis la patron tuj labori plu kaj la produktado pro tiu puno ne suferis.

Modesta, kiu ĝis tiam supozis, ke ŝia frato mortis dum la atako kontraŭ la nordo-trupo kaj tiel havis rapidan morton, paliĝis, kiam ŝi eksciis, ke la tre amata frato estis unu el la tiom kruele ekzekutitaj kaptitoj. Ŝi ĝuste divenis tion el la mencio pri la kaptito kun la mankantaj oreloj. Kaj ŝiaj okuloj sin plenigis per brulantaj larmoj. Sed ŝi ne lasis libere flui siajn larmojn. Ŝi nur rapide dure kunpremis siajn lipojn, tuj poste malfermis ilin, kvazaŭ senvole, kaj samtempe ĝemante elspiris. Poste ŝi tiris la malgrandan Pedriton proksime al si kaj kisis lin. „Via patro apartenas al la herooj de la batalantoj por „*Tierra y libertad*“, ŝi diris kaj kisis lin denove.

„Ĉu mia patro ne revenos, onjo?“

„Ne, knabo mia, li loĝas de nun kun ĉiuj indiĝenaj herooj

sur la stelo, kie loĝas ĉiuj tiuj grandaj viroj, kiuj neniam estos forgesitaj de la homoj pro ties bonegaj agoj.“

„Tiukaze mi certe povos vidi lin de tempo al tempo per mia binoklo, onjo, ĉu ne?“

„Tion mi pensas certe, knabo mia“, ŝi respondis kun melankolia rideto.

Intertempe la raporto estis finita. Ŝi ne plu atentis ĝin.

Sed tiam, kiam en ŝia proksimo ĉiuj silentis pro la impreso de tiu raporto, ŝi rigardis dum longa tempo al Celso, kiu tenis klinite sian kapon kaj fikse rigardis la tersurfacon.

Ŝi softe tuŝis lin kaj diris mallaŭte al li: „Vi estas la komandanto de la dua mitralo, Celso, ĉu ne?“

„Tion vi ja scias, Modesta, tiu mi estas. Kaj krome mi estas nun, ĉar Coronel tiel mizere perdis sian maŝinŝprucilon, la ununura mitralosoldato en la tuta armeo. Kaj ke mi fieras esti la *comandante* de tia tiel bone ŝprucanta maŝinpafilo, mi certe ne devas rakonti al



vi.“

„Certe ne, Celso. Vi tute pravas fieri pri tio.“

Ŝi silentis dum certa tempo kaj desegnadis per unu el siaj piedaj dikfingroj sur la teron antaŭ si.

Subite ŝi diris: „Vi ja tre ŝatas min, Celso, ĉu?“

„Ha-a-a-a?“ li diris kun longe etendita mirigita voĉo. „Ja kompreneble mi tre ŝatas vin. Ja kial ne? Vi estas lindulino kaj ankaŭ kapablas kuiru. Kial mi tiukaze ne tre ŝatu vin? Efektive, knabino, mi ja eĉ tre ŝatas vin, ja treege ŝatas vin. Mi pensis, ke mi ne devas diri tion al vi. Tion sentas ja ĉiu prudenta juna ino per si mem.“

„Kaj se vi nun volas, ke mi ŝatu vin sufiĉe bone, ja tute bone, tiukaze vi devos fari ion certan por mi, Celso.“

„Ĉion, Modesta, ĉion, kion vi deziras. Vi devas nur diri tion, kaj jam ĝi estas farita. Kun unu escepto, kompreneble, tion mi devas diri tuj. La mitralon, se vi eventuale volus havi tiun, tiun mi ne povus doni al vi. Almenaŭ ne tiom longe, ĝis nia revolucio venkos. Poste

mi faros por vi el ĝi kudrilmaŝinon.“

„No, Celso, vian mitralon mi ne volus havi. Kion vi faru por mi, estas nur, ke vi instruu min pafi per mitralo tiel bone, ke mi trafos kaj faligos mangon je distanco de ducent paŝoj de branĉo.“

„Kial ĝuste mango, knabino?“

„Por ke mi povu frakasi la kruelajn korojn de ĉiuj tiuj, kiuj ne estas je nia flanko, kiuj ne krias kun ni nian *tierra y libertad*, tiuj, kiuj disstamfis la kalpojn de niaj *hermanitos*, de niaj fratoj, inter ili ankaŭ de frato mia. Por la oreloj de nia Pedrito oni pagis. Multekoste pagis. Sed nun ili devos pagi ankoraŭ por la disstamfita kapo de lia patro. Ka tio fariĝu multekosta, tre multekosta, Celso.“

„Bone parolite, Modesta. Mi instruos vin pafi per la mitralo pli bone ol Kolonelo instruis min. Nu, cetere, kion scias Kolonelo ĝenerale pri mitralo? Li nur knaligadas ĝin sen interrompo. Sen rigardi al la celo, por vidi, ĉu li trafas ĉu ne, ĉar la knalado ĝojigas lin. Mi ne ĝojas pri la knalado, sed pri la trafado, kaj se mi povus trafi celon sen

devi kaŭzi knaladon, mi ŝatus tion centfoje pli.“

„Kiam vi komencos instrui al mi la uzon de mitralo, Celso?“ ŝi diris nun pli insiste.

„Ne morgaŭ, Modesta, sed tuj nun, en tiu ĉi momento.“

„Kompreneble sen knalado kaj sen pafado“, objëtis tiumomente voĉo de viro. Estis Generalo, kiu aŭdis la lastajn vortojn.

Celso laŭte ekridis: „La pafado estas la plej simpla, kio lernendas. La surmetado, la ŝarĝado, la alĝustigo kaj celado estas la pli malfacilaj aferoj, kiuj lernendas antaŭe, kaj ankoraŭ pli malfacila estas, kie oni devas serĉi la kvalitmankojn kaj kiel forigi ilin, se la mitralo subite haltas. Vi devas lerni amason da aferoj, Modesta, antaŭ ol vi rajtos pafi unuafoje. Kaj tio estos nek hodiaŭ nek morgaŭ, nek dum la sekvaj dek tagoj. Tial, Generalo, ne afliktiĝu, ke ni eble eĉ ekpafados kun knalado kaj tiel perfidos nian situon.“

Generalo kaŭriĝis, ekbruligis krude rulumitan cigaron ĉe la bivakfajro kaj diris al Modesta: „Do, ankaŭ vi volas

fariĝi maŝinpafila soldato, *muchacha*?”

„Jes, Generalo, tion mi intencas, kaj tio mi estos.“

„Bone“, respondis Generalo. „*Muchachas* tiaj kiaj vi plaĉas al mi. Domaĝe, ke vi jam elserĉis taŭgan viron.“ Li kvazaŭ strabis al Celso, kiu fariĝis brune ruĝa kaj klinis sian kapon tiom, ke nur la tufa kaj faska nigra hararo de lia nekombita hararpelto videblis de la kapo.

„Mi kun ino tia, kia vi estas, certe kontentus, *muchacha*. Sed mi havas lindan junan freŝan firmgamban vidvinon, al kiu mi certe devos sekigi la plorojn. Kaj ŝi certe estos bona edzino por mi. Kompreneble, ŝi ne estas tiom avida pri mitralo kiom vi, *muchacha*. Ŝi preferas kuiri ion bonan por mi kaj grati la laŭsojn el mia pelta malpura hararo. Ĉeokaze tia ino por soldato estas pli bona ol iu, kiu volas kunbatali. Kion pensas vi, Celso?”

„Mi ne estas generalo kaj havas malpli da zorgojn ol vi“, respondis Celso, nun levante sian kapon kaj rigardante Generalon kun rido. „Kaj ĉar mi devas zorgi nur pri mia mitralo kaj la *muchachos*, kiuj helpas ĉe tio al mi, estas

por mi ino, kiu interesiĝas pri mitraloj, laŭsence verdire pli agrabla. “

„Tion vi povos glatigi inter vi mem, kio por ĉiu el vi pli bone taŭgos por esti ĝoja kaj por ataki kun eĉ pli da kolero tiujn *uniformados.*“, diris Generalo, forte suĉante je sia ĵus ekbruligita cigaro kaj ekstarante dum tio.

Li iris nun renkonte al Modesta, kiu same ekstaris, frapis ŝin surŝultren, ekkaptis ŝian mentonon, levis ĝin iomete kaj diris: „*Oiga, Muchacha*, aŭskultu, knabino, se vi povos trafi per mitralo mangon je distanco de ducent paŝoj, mi faros el vi la unuan inan leŭtenanton en la revolucia armeo, kaj *soldadera* vi estas ekde tiu ĉi momento. *Tierra y libertad!*“

Modesta, alte rektigante sian korpon salutis tiel, kiel ŝi ĵus vidis tion de Generalo, kaj ŝi diris: „*Estoy a sus ordenes, mi General. Tierra y libertad!*“

„Kio estas tio en viaj pakaĵoj?“ demandis Generalo kaj montris per fingro al la pakaĵretoj de ambaŭ revenintaj spionoj.

La retoj estis ankoraŭ ĝiskreve plenŝtopitaj per preriaj herboj.

„Ĉe la diablo, kio tie ruliĝas tien kaj tien, kion vi havas tie? Ĉu porkojn, bovidojn, kaprinojn aŭ kion ajn?“

„Militpredon, Generalo“, respondis Pablo.

Ambaŭ, Pablo kaj Mario, malfermŝnuris siajn retojn, fortiris la herbojn de supre kaj de la flankoj, kaj en ĉiu reto ekaperis kapo.

„Kvazaŭ preterire mi kaptis favan *capataz* kaj surŝarĝis lin“, diris Pablo, krude eltirante sian kaptiton, kiun li kunŝnuris per nodo, kaj kiu havis buŝon tiom plenŝtopitan per herboj, ke li ne povis eligi sonon.

„Kaj mi kaptis *mayordomo*-n.“ Mario puŝis en la ripojn

de sia kaptito tiel, ke li ruliĝis el la reto.

„Ambaŭ havis tiajn brilpoluritajn kaj briltremantajn revolverojn“, klarigis Pablo, „ke ni dum eterneco ne povus pardoni al ni ne forpreni la belaĵojn. Kaj ĉar tio okazis preterire, ni pensis, ke ni tuj kunportu tiujn knabojn ĉi tien, por ke vi mem povu eldemandi ilin, Generalo. Tiuj scias pli ol la povraj peonoj, kiuj ne kuraĝis malfermi la buŝon, pro timo, ke la bienuloj ankaŭ ilin enfosos ĝis la koksoj kaj poste rajdodos sur ili per ĉevaloj. Ili eĉ ne vendis tortiljojn al ni, pro timo, ke la bienulo povus vidi tion kaj kulpigi ilin, ke ili amikiĝis kun la nekonataj kamparanoj, kiuj eble scias ion pri la ribeluloj.“

La peonoj, pri kiuj parolis ambaŭ spionoj, en tiuj tagoj certe vivis en nepriskribeble granda timo. Sed, ĉu ili sentis pli da timo ol la du kaptitoj, kiuj nun staris antaŭ Generalo kvazaŭ parte kunfaldiĝinte, tio rajtigite pridubeblas.

Esti portata kiel firme kunŝnurita pakaĵo kaj tre dense kunnodigita surdorse fare de indiĝenoj, tute enpakita en herboj, kun plenŝtopita buŝo kaj transportata sub tropika suno en la tagmezaj horoj, ne estas plezuro eĉ tiukaze, se tio okazas pro amikeco. Sed scii, ke ili sendefende estas kuntenataj per retnodoj kaj portataj de indiĝenaj ribeluloj, kies kamaradojn oni nur kelkajn horojn antaŭe senkomplete torturis ĝismorte, tio povas elsekigi eĉ la plej kuraĝan soldatokoron en malnovan boton kaj enfrostigiti ties sanecon en glacistriojn.

Antaŭ Generalo staris du ekzemploj, kiuj pruvis pli ol vortoj, en kiom granda grado diktaturo povas neniigi la kutiman karakteron de homo. La mizera sinteno de ambaŭ, kiuj sentis sin je la mateno de la sama tago



ankoraŭ tiel nesupereble sekuraj kaj tial ne volis ellasi ion je krueleco kontraŭ la sendefendaj kaptitoj, facile kapablis vekti en ĉiu inteligenta homo la konvinkon, ke la diktaturo atingis tiun staton, kiam eblas terenbati ĝin per malseka viŝĉifono. Ambaŭ kaptitoj falis surgenuen, petis pri kompato, kaj antaŭ ol oni demandis ilin, ili jam rakontis ĉion, kion ili sciis pri la planoj kaj intencoj de la oficiroj kaj bienuloj.

„Vi ambaŭ helpis hodiaŭ enfosi niajn kamaradojn, viaj pugnoj hajlis sur ilin kiel draŝiloj, kaj vi pisis sur ilin“, diris Generalo.

„*Por Madre Santisima, mi Jefe*, ni eĉ ne tuŝis iun el la povraj *muchachos*.“

Generalo kaj Kolonelo alvokis ankoraŭ kelkajn aliajn *muchachos*. Ili kondukis ambaŭ kaptitojn flanken.

Post tridek minutoj ili revenis.

„Tio estis do ĉio, kion ili sciis, ĉu?“ demandis Generalo.

„Estas sufiĉe, nun ni povos prepari la marŝon.“

Kolonelo demandis: „Kio okazu al ambaŭ? Ĉu ni mortpafu ilin?“

„Tiel vi intencas disipi nian municion!“ diris Generalo.

„Cetere, *hermano*, vi havis la taskon esti precipe ŝparema. Kie do estas via mitralo?“

„Tion vi ja scias, Generalo.“

„Dio mia, kia kolonelo kaj *komandante* vi estas, lasas forpreni la mitralon de vi.“

„Tiel vi parolas al mi, frato, ĉu? Bone, mi lasis ĝin forpreni de mi. Sed hodiaŭ mi reprenos ĝin. Kaj mi prenos duan ankoraŭ aldone. Krom nia mitralo ili havas tie en *Santa Cecilia* ankoraŭ du tute novajn.“

„Permesu, ke ankaŭ la aliaj faru ion. Ne ĉion volu fari mem. Kunvoku kelkajn *muchachos* kaj diru al ili, ke ili ĵetu ŝtonojn sur ambaŭ *cabrones* ĝis ili tute ne plu pepos. Ĉu kuglojn pafi sur tiajn? Aŭ malpurigi honestan maĉeton per ties fetoranta suko, ĉu? Eĉ ŝtonoj fakte estas tro honestaj.“

*Muchacho* alkuris. „Ili venas! Ili venas!“ li vokis antaŭ ol li estis proksima.

„Kiu venas, *burro*?“ demandis Generalo.

„La *federales*.“

„Tion mi ne povas imagi“, diris Generalo kaj saltis antaŭen al arbo kaj grimpis sur ĝin.

„Kvin viroj“, li vokis post iom da tempo malsupren de la arbo. „Estas bienuloj, kiuj persekutas la timigitajn *muchachos*, kiuj, kiel ni sciigis al ili, ŝtelire kaŝiĝis en la vepro. Kolonelo prenu al vi dek *muchachos* kaj kaptu la putinfilojn. Ili estas jam en la vepro. Ne pafu. Kaptu ilin per lazoj. Mi bezonas iliajn informojn. Nur tiukaze, se ili proksimiĝos tro, pafu. Nu, vi ja kaptos ilin, sen pafo. Sed, se ili ĉi tie vidos nian armeon kaj retiriĝos en la bienon por raporti, mi diras al vi, Kolonelo, kiel ajn amikoj bonaj ni estas, en tiu kazo mi detranĉigos vian kapon, aŭ mi mem detranĉos ĝin. Tute certe.“

„Tiujn mi kaptos per du fingroj, se unu el ili estas eĉ disartikigita.“

„Vian keglon, Kolonelo, aŭ la *cabrones*. Tion vi nun scias.“ Generalo ridis. „Mi opinias tion tute serioze, kvankam mi ridas. Mi faris vin kolonelo, kaj mi scias tre bone, pro kio. Sed ĝuste tial, ĉar vi estas kolonelo, mi postulas de vi dudekfoje pli ol de kutima *muchacho*.“

„Tute ne havu ventrodolorojn pro tio, Generalo. Kaj mian mitralon mi havigos al mi hodiaŭ nokte. Tute sola. Nur per mia maĉeto kaj kun *muchacho*, kiu helpos porti al mi. Eĉ pistolon mi ne kunprenos.“

„Kion vi faros hodiaŭ en la nokto, tion komandos mi, ne vi. Mi estas ĉi tie la generalo kaj vi faros tion, kion via generalo komandos.“

Kolonelo turniĝis surloke kaj serĉis siajn kunagantojn.

„Ĉu vi volas kunveni?“ li demandis Celson, kiu en tiu momento proksimiĝis.

„Estas ofendo, min demandi tion. Kompreneble mi ĉeestos. Mi povas kapti bovinojn kaj je duono sovaĝiĝintajn ĉevalojn; tiukaze mi ja povos kapti ankaŭ ses putinfilojn.“

Du horojn poste troviĝis la bienuloj firmligite en la kampadejo. Oni kaptis krome ankoraŭ triopon el *mayordomos*. Tiuj tri uloj antaŭe ne videblis de la tri eksteraj postenuloj, ĉar ili apud la bienuloj turniĝis flanken por serĉi en la vepro spurojn de la laŭdire fuĝintaj *muchachos*.

Generalo pridemandis la kaptitojn.

Ĉe tiu pridemandado multnombraj viroj ŝteliradis proksime. Tuj kiam iu el la bienuloj provis mensogi, kaj unu el viroj, kiuj konis la regionon bone, aŭdis la mensogon, li kriis tuj vigle: „*Mentira!* Stinkanta mensogo!“

Jen la bienulo ricevis baton sur la grimacon de tiu, kiu staris plej proksime. La bienulo, kiu pro la vangofrapo de pedikohava indiĝeno rigardis sin senhonorogita, aŭ diris nenion plu spite al la postuloj per maĉeto aŭ pugnoj aŭ diris nur kelkajn bagatelajn frazojn.

La *mayordomos* estis multe pli bonvolemaj ĉion elbabili, kion ajn ili sciis. Kaj la bienuloj en la lastaj horoj de sia vivo ankoraŭ konatiĝis al tio, kian specon de viroj ili honorigis per sia konfido. Eĉ sen esti demanditaj pri tio, la *mayordomos* perfidis, kie iliaj mastroj enfosis sian monon kaj aliajn trezorojn, kaj en kiuj anguloj de la konstruaĵoj ili kaŝis kaj enmasonis ilin.

Fine Generalo laciĝis pro la demandado kaj pro la

mensogateco. Li vokis ses virojn al si kaj diris: „Hodiaŭ matene tiuj *caballeros* kaj ties ekzekutistaj helpantoj torturis ĝismorte niajn *camaradas*. Kion faru ni kun ili? Vi ĵuĝu mem.“

„Ĝuste la saman. *Lo mismo*.“ Ĉiuj buŝoj kriis tion.

„*No*, ne la saman!“ respondis Generalo. „Pendumu ilin tie transe ĉiujn je tiu arbo. Ĉiujn je la sama arbo. Kaj lasu pendu ilin ĝis ili aŭ forputros aŭ la vulturoj prironĝos ilin ĝisoste. Sed, se mi diras pendumi, tiukaze mi ne pensas pri la pendumado laŭ la monterioj, tiel, kiel oni pendumis nin. Pendumi ilin rapide kaj efike per ties propraj lazoj ĉe iliaj seloj.“

Unu el la *muchachos* vokis: „Kaj kiu ricevos la revolverojn kaj la fusilojn?“

„Tiuj *muchachos*, kiuj kaptis ilin.“

„Kaj, se iu el tiuj jam havas pistolon aŭ karabenon? Kiu estas en tiu kazo en la vico?“

„Tiu, kiu plej rapide pendumis ilin.“

La bienuloj diris eĉ ne vorton. Ili krucosignis sin kaj murmuris avemariojn.

Sed la tri *mayordomos* por tio ne prenis tempon. Ili falis surgenuen, krociĝis al la ledogamaŝoj, kiujn Generalo konkeris en la batalo kun la *rurales* kaj ili plendegis: „Kompatu nin, ni petas pri graco, *mi General, mi Jefe*, kompatu nin kaj niajn infanojn kaj edzinojn, havu kompaton, ne pro ni, sed pro niaj infanoj.“

Generalo tiris siajn gambojn el la botobrakumo kaj tretis per la botoj tiom krude sur la vizaĝojn de la plorsingultantaj friponoj, ke la viroj formis ŝanceliĝeman bulon. „Kiu el viaj diodamnitaj putinfiloj nomataj *mayordomos* kaj *capataces* havis kiam ajn kompaton pri unu el la *muchachos*? He, kiu do? Ek do, ek, kiu el vi? Tiu, kiu el vi nur unufoje havis kompaton pri kota peono, ne estu pendumita, sed nur pafmortigita. Hodiaŭ matene vi kvazaŭ volupte diboĉis surnuke de la peonoj, kiel servistoj en la sunobriilo de la diodamnitaj ekzekutistoj kaj skurĝistoj. Kaj nun vi hurletas ĉi tie kiel hundetoj.“

„Ni faris ĉiam nur tion, kion komandis niaj *patroncitos*“,



iom leviĝante, malklinante, plorsingultante plendaĉis unu el ili.

„Ĝuste tial. Tio pravas, ĝuste tial ĉiu el via triopo ĉi tie ne estos pendumita, sed unue senŝeligita kaj nur poste pendumita.“

Li iris kelkajn paŝojn al la bienuloj , kiuj staris rekte kaj denove krucoŝignis sin, kiam li proksimiĝis al ili. „Vin, *caballeros*, mi same unue devus senŝeligi, antaŭ ol oni pendumos vin. Malicaj ratoj, mizeraj stinkantaj ratoj en viaj animoj kaj koroj vi ja tamen estas, kvankam vi ĉi tie prezentas tiom fierajn mienojn, ĉar vi hontas antaŭ la chamulanoj kaj baĥajontekoj. Mi scias ion pli bonan por vi, kio akompanu vin sur via marŝvojo al la *infierno*. Tio dolorigos vin pli ol trifoja „senfeligo“. De viaj hunde malicaj servistoj tio glitas kiel pizo de la muro. Nur la senhaŭtigo tute ne glitas de ili. Sed vin tio afliktigos, se mi diros al vi, ke hodiaŭ kaj morgaŭ kaj en la sekvaj tagoj ni larĝe disigos la gambojn de viaj edzinaĉoj, filinoj, nevinoj, nepinoj kaj patrinoj, ni, la pedikohavaj kotŝmiritaj kaj skurĝitaj chamulanoj, kaj ni, la stinkantaj kotporkuloj kaj favaj hundidoj, kaj tuj kvin kaj ses el ni sur paro da grasaj

gamboj, ĝis ili krevos, tiel, kiel vi faris tion kun niaj edzinoj, niaj kunulinoj kaj niaj filinoj, dum kvarcent jaroj. Ne pro plezuro, *caballeros*. Ni havas dekfoje pli da plezuro kun niaj propraj edzinoj kaj kunulinoj, eĉ, se ili estas pedikohavaj, pedikohavaj pro vi, kaj malpurigitaj pro vi. Niaj inoj havas fajron en la gamboj kaj postaĵoj, kontraŭe al viaj, kiuj havas nur varmetan akvon de lavitaĵoj en ili. Ne pro plezuro ni fikos viajn inojn, sed pro justeco. Kaj por tio, ke ĉi tie en la ŝtato foje ekestu justeco, tial mi estas generalo kaj tiu ĉi kolonelo kaj tiu majoro, eĉ, kvankam li ne povas legi kaj skribi. Sed unu aferon ni povas plenumi ĉiuj. Vin ĉiujn buĉi kaj tiri kun perforto la kazikon en la *Palacio Nacional* de la fotelo, por ke ni fine foje povu malfermi la buŝon kaj diri tion, kio plaĉas al ni, kaj ne nur ĉiam kiel papagoj kvazaŭ regurdi tion, kion oni regurdas al ni ĉiutage. Kaj nun, *caballeros, adios y buen viaje al infierno*, bonan vojaĝon al la *infierno*. Ek, *muchachos*, laŭorde traktu ilin“, li vokis al la viroj, kiujn li elektis por la lasta „unktado“.

„*Viva General! Tierra y libertad!*“ kriis pli ol cent *muchachos*, kiuj, dum Generalo parolis, pli kaj pli

proksimiĝis por aŭskulti, kion li diras. „*Tierra y libertad. Que muere la dictadura! Abajo los caciques. Abajo los patronos y capataces! Viva la revolucion! Libertad para los indios!*“

**Rimarko**

*infierno* = infero

En la kuro de la posttagmezo de la eksteraj postenoj ankoraŭ kvar pluaj bienuloj de la eksteraj postenoj estis transportitaj al la kampadejo. Estis bienuloj, kiuj kun siaj *mayordomos* intencis rajdi hejmen, post kiam en Santa Cecilia ili festis sian venkon kontraŭ la ribeluloj kaj de la oficiroj ricevis la certigon, ke la regiono estas libera de kiuj ajn distritaj bandoj de venkitaj ribeluloj.

La bienuloj, kiam ili venis en la kampadejon, kaj trovis, ke la ribeluloj disponas pri tia giganta armeo, estis tiom mirigitaj, ektimigitaj kaj konfuzitaj, ke ili ŝajne forgesis sian propran sorton dum kvarono de horo tute. Ili ekkonis, kio okazos al la garnizono en Santa Cecilia, kaj ili pretus libervole oferi dek jarojn de sia eterna beateco por la eblo povi informi la bienon Santa Cecilia pri la almarŝo de tiu armeo.

Duopo el la *caballeros*, *don* Fernando kaj *don* Anselmo, posedis sufiĉe da nigra humuro kaj fratecan amon por diri reciproke, kiam la maŝoj de lazo estis ĵetitaj ĉirkaŭ ilian kapon, ke „estas ne agrable kaj ne tre laŭkristane sen

la subteno de la *cura* tiel hontige devi pendoladi ĉi tie sub branĉo, sed, ke „tio, kio okazos al niaj bonaj najbaroj, kiuj ĝuste tiom ebriigas sin en Santa Cecilia, estos neniel pli bone, kiel diris *don* Fernando, kiu demandis *don* Anselmon, kion li pensas pri tio?

Kaj *don* Anselmo, movante sian kapon en la maŝo, respondis, ke *don* Fernando „kiel ĉiam diris tion tre bone kaj ke ankaŭ al li „estas pli agrable tiel senbrue kaj kun tiom malmulte da ekscitiĝo adiaŭi sin de ĉi tie de tiu, se oni bone pripensas tion, tiom trista mondo ol kuntravivi la surprizon kaj konfuziĝon, kiu „bonfartigos tiujn tie en Santa Cecilia, antaŭ ol ili tiel bele kiel ni ĉi tie – “

*Don* Anselmo ne tute povis fini sian filozofian parolon. La mondo neniam ekscios, kiun saĝon li volis peri en sia lasta momento. Liaj vortoj „kiel ni ĉi tie“ transiris en sufokitan gargaron, ĉar du fortikaj *muchachos* en la sama momento tiris lin alten. Kontraŭ tia tiel decidita kaj sendubebla ago finiĝas ĉia homa saĝo. Ankaŭ tiu de la plej granda filozofo.

## Ĉapitro 07

01

Mankis ankoraŭ tri horoj ĝis la sunsubiro.

Generalo sciigis, ke ĉiu marŝpretu interne de dudek minutoj, se tio estos komandita.

La stabo kunkaŭris, sed eĉ ne unu el ili parolis pri atakoplanoj. La *muchachos* parolis pri ĉiutagaj aferoj. Generalo kaŭris kaj gratis per bastoneto herboradikojn el la tero. Tuj kiam li elgratis du aŭ tri da ili, li gratis per la sama bastoneto en alia loko, ne tre malproksime, novan trueton, kaj enplantis la radiketojn. Estis facile videble, ke li faris tion, ĉar li lasis migri siajn pensojn malproksimen de tie.

Sed subite li fariĝis vigla. Tre rapide li skrapis zorgemeteron sur la laste enplantitajn radiketojn, saltis sur siajn piedojn, hastis preskaŭ kurante ĉirkaŭ la rondonde la *muchachos* kaŭrantaj ĉe li pro la militkonsiliĝo kaj vokis multajn fojojn ripetante: „Mian brakon maldekstran mi

fordonus, se mi nur scius, ĉu nokte aŭ dum la unua matena krepusko – Mian brakon maldekstran mi fordonus, se mi nur scius – “

„Dio damnu ĝin, Generalo“, vokis Matiaso, „ĝoju, ke vi havas vian maldekstran brakon kaj ne ŝtopu plu niajn orelojn per via vekriado. Tion ja neniu olda inaĉo plu povus elteni, tiun eternan hurladon pri via maldekstra brako. *Muy bien*, se ĝi ĝenas vin, jen venu al mi, mi tranĉos ĝin malsupren per unu bato, tiel, kiel ni forraspis la gambon de la *muchacho*, kiun mordis *cascabel*.“

„Ek do, Generalo, kio nun jam denove malsukcesis? Diru do. Maldekstraj brakoj estas multekostaj. Matiaso pravas. Ni bezonas ĉiun brakon, kaj viaj ne estas pli malbonaj ol niaj.“ Celso parolis trankvile kaj kun paciga tono.

„Bone, se ne mian maldekstran brakon, tiukaze do mian maldekstran plej malgrandan piedfingreton, se mi scius, kiun el la du planoj miaj, mi preferu!“ Li restis staranta kaj skrapadis en sia densa hararo.

„Se ambaŭ estas bonaj, ne faras diferencon, kiun vi

preferas“, diris Andreo.

„Tiel simpla tio ne estas. Ĉiu havas avantaĝon, kaj ĉiu havas malavantaĝon.“

„Tiukaze elektu tiun, kiu havas la plej malgrandan malavantaĝon“, konsilis Andreo.

„La komplika afero estas simple scii aŭ ĝuste diveni, kiu el ambaŭ malavantaĝoj estas la pli malgranda.“

Kolonelo ŝiris lin per unu el ties ĉifonitaj ĉemizomanikoj al si, kiam tiu staris dum sekundo apud li. „Sidiĝu unue por trankviliĝi kaj ne saltadu ĉiam en la ĉirkaŭejo kiel flavbeka printempa koketo. Ĉe la kurado vi tute ne povas pensi.“

„Mi provis ankaŭ sidante, sed estas same tiom komplike.“ Li ekkaŭris tamen kaj prenis cigaron el sia ĉemiza poŝo. „La ideon pri la plano mi ekhavis matene, kiam mi sidis dum certa tempo supre en la arbo kaj observis kiel la bienuloj kvazaŭ rampadis tie por ĉasi vunditajn *muchachos* disigitajn en grupetojn. Mi pensas, ke oni entute ekhavas multe pli bonajn pensojn, se oni sidiĝas



de tempo al tempo supre en arbon kaj la mondon de supre rigardas kaj ne ĉiam nur de malsupre. Kion scias la formikoj pri nia estado? Por la formikoj ni estas nur nuboj aŭ migrantaj montoj. Unu el la planoj estas okupi *Santa Cecilia*-n, hodiaŭ nokte, la alia estas ataki la bienon antaŭ sunleviĝo. Ni devas rapide ataki ilin. Se ni elegante almarŝus, la mitraloj falĉus nin kiel koton. Ni devas ataki ilin tiel, ke ili ne havos tempon meti eĉ unu piedon planken kaj preni eĉ nur karabenon de la starigita piramido.“

„Bone do, kial ne antaŭ sunleviĝo?“ demandis Celso.

„Tie estas amaso da uloj, kiuj leviĝas frue. Bienuloj, kiuj rajdos hejmen kaj havos longan rajdon antaŭ si kaj volas eluzi la fridgetan matenon. Tiuj, jam leviĝinte, ne dormos plu kaj povus aŭskulti nin antaŭ ol ni estus sufiĉe proksimaj. Povas ankaŭ esti, ke la *federales* kaj *rurales* formarŝos je la dua matene. Ĝuste tion mi ne povis eltrovi de la silentemuloj, kiuj kuris en nian maŝon. Sed, ĉe l' diablo, la uniformuloj tute ne formarŝu de ni sen antaŭa malŝarĝo de iliaj karabenoj. Ni bezonas la pafŝprucilojn kaj ĉiun kartoĉon, kiujn havas tiuj diodamnitaj *cabrones*.

Kaj Kolonelo volas rehavi sian perditan mitralon, sian *Emma-n*, kiel li diras, alikaze li neniam plu montros beatan vizaĝon. Se ni kaptos tiujn malbenitajn putinfilojn tie en Santa Cecilia, ni ne devos postkuri ilin kaj ne forkuros la haŭton de niaj piedoj.“

„Ek do, sur la kanajlojn!“ vokis Celso.

„Sur ilin, sur ilin. Vi povas paroli laŭplaĉe. Sed mi havas la respondecon, se mi perdos tro da viroj. Nun foje ĉiuj ĉi tie bone aŭskultu kaj streĉu la orelojn! Se ni atakus ilin matene je la dua aŭ tria, jen ili eble jam ĉiuj vekiĝus, la bienuloj por rajdi hejmen, la uniformvestitoj por marŝi al Hucustin aŭ al Balun Canan, reen al siaj garnizonoj. Kaj antaŭ ol ni estus tute transe de la muro, ili jam havus ĉion preta en la antaŭkorto por akceptu nin. Sed la avantaĝo estus, ke ni proksimiĝus al la tago kaj heliĝus, tiel ke ni povus vidi al kiu ni trantranĉas la kolon. Nokte estus multe pli bone en ĉiu rilato. Jen ili ĉiuj estos preskaŭ tute ebriaj kaj kuŝados ronkante en la komenca dormo. Sed, se ĉio estus ankoraŭ en tenebro, duono el ili povus fuĝi kaj poste de ekstere ataki nin.“

„Nu, azeno, nomata Generalo, kial vi ne kunprenos iujn *linternas*, kiel ni faris tion ĉe la ĉaroj, kaj ĉe la fortrenado de la trunkoj, se Luno ne lumis“, diris Matiaso rikane.

„Matiaso pravas“, opinis Andreo. „Kial ni ne uzu *linternas*? Kompreneble ne niajn ĉar-lanternojn aŭ tiujn de la monterioj; sed ni povus ekbruligi niajn proprajn lanternojn kaj ŝparus eĉ petrolon.“

„Tion mi ne komprenas – kvankam mi estas generalo – kion vi opinias kaj kiel vi opinias tion“, diris Generalo, demandante kun rigardo al Andreo.

„La penso ne estas vere de mi, sed fakte de la peonoj vizititaj de ni en la bienoj dum nia marŝo, kaj al kiuj ni donacis tutajn bienojn, ĉu ili volis ĉu ne. Kion mi celas, tio estas tute simpla. Tuj, kiam ni ĉirkaŭe estos okupintaj la muron, parte ankoraŭ sidante sur la muro kaj parte jam transirinte ĝin, la bienulo de *Santa Cecilia* liveros al ni petrolon. Kaj se vi ankoraŭ nun ne komprenas tion, tiukaze mi aldonu, ke mi opinias, ke ni ekbruligos ĉiujn palmtegmentojn kaj ĉiujn remizojn, kiuj estas el ligno. Kaj kun la noktovento ili ekflamiĝos tuj post du minutoj.

Tiam ni havos sufiĉe da lumo. Kompreneble, ni devos eniri kiel fulmo en la bienon, kaj ĉe ĉiuj pordoj de la ejoj samtempe devos stari *muchachos*, tiel, ke neniu povos fuĝi.“

„Eble mi tamen iutage ankoraŭ faros el vi brigadan generalon, se mi iam estos divizia generalo, Andreĉjo. Vi estas damne prudenta, kvankam vi eĉ ne estis ie soldato. Se nur ne estus la damnitaj hundoj, kiuj tie kiel freneziginte ekbojados, tuj, kiam ni proksimiĝos kaj suriros la muron.“

„Pri la hundoj okupiĝos mi, Generalo“, diris Emilio, kiu kaŭris proksime. „Mi scias bonan trukon, kiel facile logi la hundojn je duono de leŭgo for de la bieno kaj de la vilaĝo. Se ili aŭdos en la bieno, ke la hundoj bojas, sed komencas kuri al la vepro, apenaŭ iu plu atentis tion, ĉar ili supozos, ke sovaga porko aŭ pumo ŝteliris al la *corral*. Sed mi nun devos ekĉasi. Mi ja zorgos pri la trankvilo de la hundoj, Generalo. Mi kunprenos tri *muchachos*.“

„Bone“, konfirmis Generalo, „kun vi mi parolos pli poste, se la hundoj fuŝos la planon al mi kaj vi en tiu kazo

ankoraŭ vivos kaj ankaŭ mi.“

„Pafmortigu min, Generalo, se mi ne forlogos la hundojn. Kompreneble, estas ĉiam kelkaj, kiuj tro pigras aŭ estas tro oldaj kaj nokte timas ankaŭ malproksimiĝi tro. Sed tiuj malmultaj laŭplaĉe boju. Tio al la *cabrones* interne de la bieno donos pli da sekureco ol se bojus tute neniuj hundoj, ĉar tiuj bojas ĉeokaze ja en la tuta nokto, eĉ se ili vidas kurantan raton aŭ kato iras al nuptofesto.“

**Rimarko**

*corral* = gregejo

La komandanto de la trupoj, kiuj prenis sian bazon en la bieno *Santa Cecilia*, sciigis la komandon, ke la ekmarŝo okazu je la sekva mateno je la oka. La certo, ke la bieno je la sekva mateno estos liberigita de la multekostaj gastoj, instigis aranĝi adiaŭan bankedon al la bienulo, ĉar ĝi estos ja la lasta fojo, ke oni kunsidos. Tial oni ne ŝparis ĉe tiu bankedo junajn porkidetojn, meleagrojn kaj bovidojn, des pli ne brandon, bonan malnovan kaj brunigitan por la oficiroj kaj bienuloj, kaj ankaŭ klaran, sed tial des pli altprocentan por la subrangaj policianoj.

Tiaj grandaj vesperaj festmanĝoj en la bienoj en tiuj regionoj for de la civilizitaj neniam etendiĝas profunde en la nokton. Parte pro la manko de bona lumo, kiu ne faras tre agrabla longan sidadon eĉ ĉe riĉe kovrata bankedotablo. Kandeloj kurbiĝas pro la granda varmeĝo kaj la nefermitaj *linternas* terure fulgas kaj ĉiu venteto pelas kontraŭ la gastoj densajn nubojn de nigriga fulganta fumo survizaĝen kaj sur la blankajn ĉemizojn. Petrollanternoj centfoje estingiĝas kaj oni devas

centunfoje denove ekbruligi ilin. Pro tio aldone ankoraŭ ekzistas la danĝero kaŭzita de la malbonkvalita petrolo, ke ili eksplodas. La granda fajro sur la ŝtona altaro en la korto ĵetas vastan lumon, sed ankaŭ ĝi pelas fulgantan fumon kontraŭ la manĝantojn.

Je la oka aŭ je la naŭa vespere, ofte jam dum la malheliĝo, komencas viviĝi miriadoj de moskitoj, de malariaj moskitoj kaj de aliaj malagrablaj insektoj. Kompreneble ili moviĝas al la lumigataj tabloj kaj vizaĝoj. En tiu aktuala jarsezono la insektoj estas precipe multnombraj kaj des pli sangavidaj. Krom la molestado pro la pikoj, ili faladas aldone eĉ en tutaj svarmoj en la supojn aŭ buljonojn de la manĝantoj kaj naĝas en ĉiuj vin-kaj akvoglasoj. Tiel fariĝas la longa sidado en bankedo eĉ por la plej aŭdaca drinkulo ofte pli turmento ol plezuro.

Ankoraŭ plua kialo tiajn bankedojn ne lasas daŭri ĝis profunde nokte en la bienoj en tiuj foraj regionoj. Je la naŭa matene la tropika ardo komencas ŝarĝi la homojn, bestojn, tigojn kaj teron. Tio devigas la homojn tre frue forlasi la dormejon, kaj por eluzi la lumon de Suno kaj

por meti la laboron, kiu necesas, de kiu ajn speco, en la fridetajn matenajn horojn. La enspeziga kaj valorplena labortago finiĝas por tiu, kiu ne estas peono aŭ laboristo je la dekunua matene, kaj estos daŭrigata, se ne fareblis ĉio necesa, post la kvara posttagmeze dum du horoj. Tiel okazas, ke ĉiuj homoj, inklude de la soldatoj, je la oka vespere estas tiom hunde lacaj, ke ili ekdormas ĉe la tablo. Sekvas el ĉio ĉi cirkonstancoj, ke bankedoj komenciĝas je la kvina posttagmeze kaj finiĝas kun oscedado kaj ronkado kutime je la oka, sed certe vespere je la naŭa.

Tiajn kutimojn armeestro kompreneble devas scii por povi uzi ilin ĉe siaj strategiaj planoj. Ke estos aranĝita pompa bankedo, Generalo eksciis ne nur de la elsenditaj spionoj, sed li ricevis la certigon ankaŭ pere de la pridemandadoj de la kaptitaj *mayordomos* kaj bienuloj. La bienuloj, kvankam ili estis tre tre memgardemaj pri ĉio, kion ili diris, trovis la demandon pri la bankedo ne suspektiga kaj respondis ĝin ĝuste.



Generalo ordonis la atakon je la dekunua nokte. Li bezonis la tempon por povi konduki sian armeon sen observateco ĝis proksime al la bieno. Dum la taglumo li marŝis nur ĝis la rando de la vepro. Kaj tuj kiam estis jam malhele, li ordonis la marŝon antaŭen.

Ĉiuj pakaĵoj, ĉiuj karabenoj, ĉevaloj, muloj, azenoj kaj hundoj postrestis en la vepro, gardate de la inoj kaj de kelkaj *muchachos*, kiuj estis tro grave vunditaj en la lasta batalo por povi partopreni la sekvan.

Nur al la *muchachos*, kiuj posedis revolverojn, estis permesate kunpreni siajn armilojn. Sed kelkaj el ili eĉ postlasis siajn revolverojn. Sed ĉiu, ĉu li havis revolveron ĉu ne, kunhavis sian maĉeton, kaj tiuj, kiuj ne havis maĉeton, kunportis sian tranĉilon je la lanozono, aŭ enmetita en tranĉaĵon de la pantalono.

Generalo kunvokis la virojn al rondo. „Tiuj, kiuj ne havas revolveron aŭ ne posedas karabenojn ĝis nun, havas la antaŭrajton pri la armiloj. Mitraloj estu serĉataj kaj tuj aŭ

portataj tra la pordego aŭ en angulon de la konstruaĵoj.“  
Li alvokis dekdu virojn, al kiuj li konfidis la serĉadon de la mitraloj, la forportortadon kaj la gardadon tiel, ke ili nek uzebli nek savebli de la soldatoj. „Vi, Celso, kiel *comandante* de mitralo, respondecos kun Matiaso, ke ili ne uzu ilin kontraŭ ni, kaj ke ili, jam foje ekster la korto, estu gardataj. Vi, Kolonelo, rekonkeru vian ‚Emma‘, kaj se vi havos ĝin, transportu ĝin kun Fidel al la aliaj kaj partoprenu ĉe la batalo.“

Poste Generalo elektis dudek virojn por konkeri ĉiujn karabenojn starigitajn kiel piramidon aŭ pendigitajn je fostoj, krome ili havis la taskon sekurigi kaj gardi ilin. Poste li kunmetis la kvar ĉeftrupojn por la kvar muroj, krome du taĉmentojn por ambaŭ pordegoj, kiujn ili ne malfermu, sed gardu, por malhelpi eskapojn.

Lastfine li kunserĉis lertajn *muchachos*, al kiuj li komisiis la iluminadon de la batalkampo.

Ambaŭ liaj spionoj, bonegaj observantoj, sciigis al li precizan planon rilate al la situo de la konstruaĵoj kaj kiel kaj kien oni disdividis la soldatojn, policanojn kaj la

bienulojn kaj ties subulojn. La spionoj raportis ankaŭ, ke antaŭ la ĉefpordego troviĝas posteno kun gardistoj kaj kun suboficiro, sed ke la posteno servas pli al dekoraciaj celoj ol al efektiva gardado. La dekoracio havis la celon doni al la komandanto pli grandan reputacion antaŭ la inoj de la bieno, se li paŝis tra la pordego kaj la deĵoranta gardisto rekte devis stari kaj surŝultrigi la fusilon. La deĵoranta gardisto nokte dormis, ĉar ankaŭ al li oni donis abunde manĝon de la giganta adiaŭa bankedo kaj speciale trinkaĵojn. Se tio ne estus la kazo, li tamen dormus, ĉar li estis laca, neniu venis por kontroli lian gardatentemon, kaj krome ja laŭŝajne ĉiuj ribeluloj estis neniigitaj.

Sed Generalo ne permesis iun hazardludon al si. Li elektis triopon el la *muchachos* avanci antaŭ la ĉeftrupo kaj unufoje por ĉiam malhelpi gardi la gardistaron konsistantan el kvar viroj.

„Kaj nun pri la tempmomento por la atako kaj pri la signalo“, diris Generalo. „Okazos nek pafo nek fajfsignalo, nek komando. Ĉiujn ordonojn mi donas ĉi tie kaj nun. Neniu el vi malfermu la buŝaĉon ĝis ĉio finiĝos. Lasu

malfermŝiri al la aliaj la buŝon, se ili vidos la tranĉilon antaŭ si. Kiel pumoj en la nokto, kiuj grimpas ŝtelire trans la baraĵon de *corral*, tiel vi laboru, *muchachos*. Ju malpli da brueto, des pli bone. La tuta damna afero ne daŭru pli longe ol kvin minutojn. Jen la garantiaĵo por nia sukceso. Tuj, kiam la unua tegmento ekflamigos kaj iluminos la korton, vi jam tuj estu sur la muro kaj unusalte transen. Ĉiu grupo laboru sur tiu loko, kiun mi asignis por ĉiu grupo. Po unu grupo en ĉiu ejo kaj kvar grupoj por la vasta korto, po unu je ĉiu flanko. Kvar grupetoj ĉe la kvar muroj ekstere, por la kazo, ke iu tamen provos eskapi trans muron. Neniu rajtas forlasi la bienon. La fajrogrupo al mi!“

„Jen ni jam ĉeestas, Generalo.“ La viroj de la vokita grupo paŝis antaŭen.

„Vi avancu. Ŝtelire alproksimiĝu, pli mallaŭte kaj pli ruze ol maljuna kojoto. Kiam vi estos alvenintaj ĉe la bieno, serĉu kelkajn bulojn da seka maizpajlo kaj dismetu tiujn bulojn al ĉiuj flankoj, kie estas remizoj kaj konstruaĵoj el palmplektaĵo kaj ligno. Ne forgesu kunpreni sufiĉe da keno kaj sufiĉe da fajriloj. Tuj kiam ni ĉiuj estos

kolektiĝintaj, mi sendos al vi de ĉi tie Eladion, kiu heroldu al vi la precizan signalon, kiam vi komencu la prilumadon. Atentu, ke ĝi ne brulu tro frue, ĉar tio povus fuŝi nian planon. Tiam, kiam ĝi, sekvante al la signalo, ekbrulos bone, ke ĝi ne flamadu aŭ eble eĉ estingiĝu antaŭ ol ni havos la tutan bandon sub nia kontrolo. Ve al vi, viroj, se vi fuŝos ion ajn. Jen vi konatiĝus al mia kolera flanko. Vi estas la plej grava grupo, por ke la plano sukcesu. Ĉu komprenite? “

„Nur ne afliktiĝu pro ni, Generalo. Ni kreos iluminadon, kiu eĉ en la infero estos videbla.“ La viroj ridis kaj ĉiuj kunserĉis kenojn en la kampadejo. Ĉiu el ili provizis sin per tri fajriloj kaj krome ĉiuj kunprenis, por esti tute sekuraj, grandan monterian lanternon tute plenigitan per petrolo. Tiel ekipiĝinte ili eksurvojiĝis. Kun ili iris la *muchachos*, kiuj havis la komision viziti la pordegan gardanton por zorgi pri ties bonfarto. Ĉar ankoraŭ ne tute estis nokto, rampis la *muchachos* kun atentemo tra la prerierboj, por ke oni eble eĉ ne povu ekvidi ilin de la bieno. Ke iu penos ĝuste rasti en tiu momento per binoklo la prerion por eventuale trovi antilopon, dum la adiaŭa

bankedo en la bieno atingos sian kulminan punkton, kompreneble ne atendeblis. Tamen Generalo konsideris ĉiun eblon.

Profesoro, kiu aŭskultis ĉiujn instrukciojn de Generalo, ĉar li estis en la lastaj tridek minutoj ĉiam ĉe lia flanko, diris: „Laŭ mia opinio kaj laŭ tio, kion mi aŭskultis kaj vidis, ni agis tute bone, ke ni nomumis vin generalo. Pli bonan ni apenaŭ povus trovi.“

„Ho, merdo“, rikane diris Generalo, „mi estas ne tiom grava, kiom vi supozas, Profesoro. Morgaŭ aŭ postmorgaŭ mi povos esti pafmortigita aŭ pendumita, aŭ ĝis la kolo vivante enfosita kaj kun ĉevaloj galopantaj trans min, aŭ priŝmirita per sukera suko en la vepro ligita al arbo. Ĉu tio ion ŝanĝos? La revolucio tiukaze estos daŭrigata, kaj oni devos daŭrigi ĝin. Generaloj falas kaj novaj generaloj venos, multe pli bonaj ol mi estas. Ĉar ju pli longe la revolucio daŭros, des pli da ekzerciĝo ricevos la revoluciuloj pri la militagado, kaj post malmultaj monatoj iu ajn el vi, kiuj staras ĉi tie, povos fari tion multe pli bone ol mi hodiaŭ, ĉar li tiam havos pli da ekzerciĝoj kaj spertoj ol mi havas ĝis nun.“

„Tion ĉi vi, Generalo, parolis tiel bele“, diris Andreo, „ke efektive estas domaĝe, ke vi ne povas surskribi tion, por ke ĉiuj revoluciuloj, kiuj ne povas aŭskulti tion de vi mem, almenaŭ povu legi viajn vortojn.“

General ekridegis kvazaŭ gruntante. „Mi skribi, mi surskribi miajn vortojn, ĉu? Jen mi efektive devas diri al vi, Andreĉjo, ke ĝi ĉiam kostis al mi tutan semajnon da kapdoloroj pro la penoj, kiam mi volis skribi al mia patrino leteron, kiam mi estis ankoraŭ serĝento. Paĝon mi ja povis plenigi iel. Sed, se mi tiam alvenis sur dua paĝo supren, jen la malfacilaĵoj komenciĝis, tiumomente mi tiam ne plu havis vortojn, kaj kiel oni skribu ilin, se mi havus vortojn, mi ankaŭ ne sciis. Tiu tempo pasis nun dum sufiĉe longa tempo, kiam mi estis serĝento. Kaj nun mi verŝajne tute nenion plu povus skribi krom ĝuste nur mian nomon. Kaj mi pensas ke tio sufiĉas por generalo. Nu, kaj vi, kion pensas vi pri tio, *muchachos*?“

„Por kio generalo kapablu skribi pli ol sian nomon? Tion mi volus scii“, diris Celso kun demandema rigardo al ĉiuj ĉirkaŭstarantaj *muchachos*. „Rigardu al mi, mi eĉ ne povas skribi mian nomon, nur ĝuste tute ŝanceliĝeman

kaj tre oblikvan C mi povas skribi kun peno, kaj tamen mi estas kolonelo, kaj kio estas multe pli: mitralo-komandanto. Ĉu oni povas skribi ĉu ne, tio mitralon ne afliktas. Ĝin afliktas nur tio, ke ĝi estu bone lubrikita, kaj ke oni, tenante ĝin, celu al tio, kion oni volas trafi.“

Profesoro rikanis kun rigardo al Generalo. „Tio min ja efektive interesas, Generalo, kio legeblis sur la unua paĝo de la leteroj, kiujn vi skribis al via patrino?“

„Tio estas tre simpla kaj ankaŭ tre klara. Jen mi skribis: Mia tre amata, nobla kaj honorinda patrino, kaj tiam mi metis punkton.“

„Kaj kio legeblis krome sur la unua paĝo?“

„Tie ne povis esti legebla iu aldono, ĉar la paĝo jam estis plena kaj neniu loko postrestis por ankoraŭ povi aldoni pluan vorton.“

„Kaj poste sur la dua paĝo, ĉu? Kio legeblis tie?“  
Profesoro volis scii tion, dum li seninterrompe rikanis.

„Tio estas same tiel facila kaj same klara“, diris Generalo,



kvazaŭ temus pri la plej kutima afero sur la mondo. „Kion mi skribu pli ol nur ĝuste tion: ‚Mi estas sana, via dankema filo, kiu kisas viajn piedojn kaj manojn, Juan Mendez.‘ Kaj per tio la kvar paĝoj jam plenigis sin. Mi ŝovis la leteron en koverton, aĉetis poŝtmarkon, lekis ĝin postaĵe, surgluis ĝin kaj ŝovis la leteron en keston en la poŝtejo.“

„Kaj kion skribis poste via patrino?“

„Nenion. Ŝi ja ne povis skribi, sed legi miajn leterojn ŝi povis tute bone. Kaj kion postuli pli de letero ol tion, ke, tiu al kiun vi ĝin sendas, povu legi ĝin. Sed pri tio ni nun ne plu pensu. Ni devos nun fari alion. Kaj mi ankaŭ pensas, ke mia patrino estas morta. Estas multe pli bone por ŝi, se ŝi estas morta. Ŝia vivo estis nur eterna laboro, eterna mizero, plena de amo, kaj ĉiam la zorgoj pri la manĝo, kaj nur unufoje mi vidis ŝin ridanta.“ Generalo kunpinĉis la okulojn kaj montris ege komikan mienon. La *muchachos*, kiuj ĉirkaŭsidadis, rigardis al li kaj volis ĝuste elkrevi pro ridego. Sed li saltis surpieden kaj vokis: „Ja kie estas miaj iluminadaj inspektoroj?“

„Tiuĵ estas jam dum duono de horo survoje, Generalo“, respondis unu el la viroj.

„Kaj la ensorĉantoj de la pordegogardisto?“

„Ankaŭ jam delonge for.“

„Pretigu vin ekmarŝi. Ek do, svarmu! Kaj skuu la ostojn, malbenite! Pigra pedikohava societo, vi sidadas ĉi tie kiel babilantaj oldulinoj anstataŭ trejni la celadon kaj lubriki fusilojn kaj akriĝi maĉetojn kaj tranĉilojn. Kiaj soldatoj vi estas?! Kurbigita nelavita kanajlaro vi estas, ne indaj fari revolucion! Ek do, kaj iom pli rapide ol kutime. Ĉion pretigu por la ekmarŝo. En tiu momento, kiam Suno malaperos post la monta dorsoflanko, ni ekmarŝu. Kaj mi frakasos al ĉiu el vi persone la kranion en pecetojn ĝis ĝi estos kaĉo, se iu okupos alian lokon ol tiun, kiun mi asignis por ĉiu grupo. Mi damne atente observos, eĉ, se mi mem havos ĉiujn miajn manojn en la plej granda laboro. Tion mi povas promesi al vi, vi fartos triste, se mi trovos iun el vi ĉe gorĝo, kiu ne apartenas al lia loko aŭ en angulo, en kiu devos troviĝi alia.“

Li de kroĉis sian revolverujon, ĵetis ĝin al ino, kiu kaŭris proksime, kaj diris: „Por tiu laboro mi ne bezonas revolveron. He, vi, *muchacho*“, li vokis al viro: „Portu vian maĉeton al mi kaj serĉu alian por vi. Vin oni hieraŭ jam sufiĉe pritrancis en sangantajn ŝiraĵojn, tiel, ke vi nun nepre restadu ĉi tie kaj povos gardi ankaŭ per rustigita maĉeto la kampadejon.“

Li palpis la akran eĝon de la maĉeto donita al li, kaj diris: „Tre akra ĝi ja ne estas. Sed des pli bone. Tiukaze la diodamnitaj *cabrones* almenaŭ sentos ĝin, se mi kvazaŭ trasegos ilin kaj ili havos ankoraŭ du mizerajn sekundojn da tempo mediti pri tio, kiel rapida veturo en la inferon povas esti, eĉ sen falo el la fenestro.“

Ĉirkaŭ la sama tempo, horon antaŭ sunsubiro, la bankedo en Santa Cecilia jam komenciĝis. Kiel ĉe ĉiuj festoj, je kiuj oni festas decidan venkon kaj ĉiuj bravaj militistoj oportune diboĉas en la memcertiga konscio, ke la malamiko estas ne nur venkita, sed je daŭro ekstermita, oni laŭte gajis.

Kial la kapĉjo kaj ties tri soldatoj, kiuj estis la asignitaj honorgardistoj ĉe la ĉefpordego por la nokto, estu ekskluditaj de la venkofesto? Ili brave batalis en la bataleto, dum kiu oni neniigis la fi-ribelularon, kaj ili rigardis ĝin sia tute laŭmerita rajto ĉeesti persone dum la venkofesto, tiel, kiel ĉiuj aliaj. Ili certe ne estis punkaptitoj, kaj des pli ne dizertuloj, kiuj provis forŝteliĝi, kiam la batalo fariĝis dum kelkaj minutoj ŝajne tre streĉiga, kiam ĉio, kion la ribeluloj havis ĉemane, komencis ekknaladi. Kaj cetere, ĉar ne ekzistis kaŭzo, ke ĝuste tiam oficiro povus proksimiĝi al la pordego, tio estus ja azeneca, eĉ ne akceptebla por suboficiro de la federacia armeo, kun enuo kaŭri sur la nuda tero ĉe la

pordego kaj de malproksime rigardi kiel la soldatoj, policianoj, *capataces* kaj suboficiroj mankaptas ĉe la mamoj la timidigitajn indiĝenajn knabinojn, kiuj alportas la manĝon, kaj ĉeokaze per manplato klaksonigas iliajn femurojn de malantaŭe por esplore palpi, ĉu pli malfrue vespere ankoraŭ pli intima manmanipulado eblos sen gratado sur la vizaĝo.

La oficiroj sidis ĉe la longa festotablo sur seĝoj, kiuj, kvankam tre krudaj, tamen estis seĝoj. Kontraŭe al la soldatoj kaj suboficiroj, manĝis la oficiroj kun tranĉiloj kaj forkoj, tial ili rigardus tion granda malĝentileco al sia gastigantino, se ili ekstarus, vokus la kaporalon kaj en ĉeesto de la gastigantoj ŝarĝus terure humiligan fulmotondron sur lin, ĉar li forlasis sian postenon. Tio ankoraŭ matene postfareblus kaj krome emfaze subteneblus per kelkaj vangofrapoj sur la vizaĝon de la suboficiro kaj per kelkaj bone lanĉitaj rajdovipaj batoj trans la ŝultrojn de la fia malbenita soldato. La kolonelo estis ja ne nur oficiro, sed ankaŭ *caballero*. Tion li rajtis forgesi neniam, des malpli, ĉar ja ankaŭ la edzino de la bienulo, tri el ties plenkreskintaj filinoj, du plenkreskintaj

nevinoj kaj la edzinoj kaj filinoj de du najbaraj bienuloj sidis ĉe la sama festotablo.

Krome la ĉefpordego estis ja neniel grava, ĉar en la korto troviĝis tri mitraloj. Ili estis, estas vere, jam enpakitaj pro la ekmarŝo kaj neniel pafpretis, sed estis tamen mitraloj, kiuj ankaŭ tiukaze plenumos la sencon de terura minaco, se ili bone kunpakite kaj firme kunŝnurite kuŝas en iu angulo. Kie ĉiu unuopa soldato havis sian karabenon, sciis neniu el ili plu, post kiam la bankedo daŭris jam ĉirkaŭ dum horo kaj tridek minutoj. Se oni ne rajtas esti de tempo al tempo homo kaj ne povas transdoni sin al homaj ĝuoj, la tuta soldata ludado ne havas plu ion allogan. La uniformo sole nur je la hela tago taŭgas, nokte la butonoj ne trembrilas, kaj la ruĝaj kaj verdaj pasamentoj kaj oraj kaj arĝentaj galonoj aspektas kiel ĉiu alia kutima fadenego.

Dum la interparolado ĉe la tablo temis ankaŭ pri la diskurintaj ribeluloj eskapintaj. Oni cerbumadis, kiom da ili eble estis, kiuj eskapis. La plej malgranda kvanto prezentita de du bienuloj estis: tri viroj nekaptitaj. La plej grandan kvanton menciis leŭtenanto, kiu asertis, ke estis

malpli ol dekunu, kiuj kapablis fuĝi, sed li estis konvinkita, ke ili ĉiuj tiom grave estis vunditaj, ke ili certe ne povis tre malproksimiĝi, kaj ĉar ili ne povas ricevi helpon, ili certe kaŝiĝas en la vepro, kaj tie mizere mortaĉos, ĉar ili certe tiom timas, ke ili ne kuraĝus elveni, ke ili do kun certo ankoraŭ kaŝiĝas en la vepro.

„Strange estas“, rimarkis la kapitano de la *rurales*, „ke la *caballeros*, kiuj elrajdis kun siaj *mayordomos* por kapti la diskurintajn banditojn, ne revenis. Espereble nenio okazis al ili.“

„Ne afliktiĝu, kapitano“, trankviligis lin la bienulo de Santa Cecilia, „ne estis la intenco de miaj najbaroj reveni ĉi tien. Ili ja ĉiukaze devis uzi la vojon laŭ la vepro al siaj bienoj. Kaj ĉar ili havis la tutan longan tagon antaŭ si, estis ilia ideo sekvi la spuron de la *muchachos* por trovi ilin kaj tiam pendumi ilin en la vepro. Tion ili certe faris, kaj poste ili rajdis plu, ĉiu al sia bieno. Ili tranoktos en Santa Rosita. Tie ili nun estas kaj eble ĉagreniĝas, ke ili ne restadis ankoraŭ pluan tagon ĉi tie por partopreni ĉe la bankedo. Sed ili venis de Jovel, kie ili havis iujn negocojn, kaj, ĉar ili ne estis hejme dum tri semajnoj, ili sopiris

rapide veni hejmen. Nenio estas stranga pri tio, *Capitan.*“

La manĝo fine estis sukcese manĝita, kaj komenciĝis nun la posta malsekigado, por ke la *frijoles* ne firmpinĉiĝu en la gorĝo, kaj ankaŭ por malsuprenlavi la verdan kapsikon de palato kaj de lango, por ke la okuloj ĉesu sian larmadon.

La gramofono estis rustkovrita, sed ĝi ankoraŭ sufiĉe rapide klaktorniĝadis, por ke la sondiskoj, kiuj komencis ŝimi en la pluvsezono, povu gratsonigi pli ol dudek knarantajn dancmelodiojn. En la bieno estis du usonaj akordeonoj, kelkaj gitaroj kaj du same ŝimaj violonoj. Ses soldatoj povis iom ludi sur ili, tiel, ke eĉ se ne ekestis certa melodio, la rezulto sufiĉis por imagi, ke oni dancas, se oni saltadas dekstren-maldekstren laŭ tiuj muzikistaj streĉoj kaj ŝanceliĝas serpente movante sin tien kaj tien por tiel trovi la okazon premi siajn femurojn kontraŭ tiuj de la *señoras* kaj *señoritas* ĝis tiu limo, kiam ne plu bone eblos paroli pri dancado, sed kiam oni malkaŝe devos konsenti, ke nun komenciĝis la pura neŝminkita obsceneco, kiun publike delectiĝi estas permesite ja al soldatoj, sed ne al *caballeros*, ĉu ili do estas oficiroj ĉu



bienuloj.

Sed post tridek minutoj da dancado sur la grincanta dura brikoplanko, dum kiuj la peza revolvero, kiun ili portis petole moviĝate postaĵe, baldaŭ komencis tani la haŭton kaj ekminacis trafroti la belan uniformpantalonon, la oficiroj kaj bienuloj ekopiniis, ke estas pli oportune kaj pli agrable dekroĉi la revolverojn kaj pendigi ilin kun la rimenoj supre sur transversan trabon.

Inoj ne ŝatas, se la *caballeros* dancas kun siaj tielnomataj kanonoj kroĉitaj je la zono, kaj trovas tion neĝentila, des pli ĉar ĉe tiuj serpentaj flankmovoĵ de ĝuavida dancisto ĉeokaze ankaŭ la gamboj de la damoj markiĝas kun bluaj makuloj kaj per tro kruda realeco detruas senkompatajn dolĉajn revojn, kiujn ili povus ekhavi ĉe la dancado.

La kolonelo plej longe rezistis cedi la deziron, ke li pro pli granda oportuneco dekroĉu sian haŭbizon, por ne devi rigardi kiel lia reputacio detruigĝas. Sed kiam la *señorita*, kun kiu li dancis, subite diris: „*Perdoneme, Señor Coronel*, sed via pistolo ja vere tro klakpikadas kontraŭ miaj ripoj, mi prefere iom ripozos.“ Kion la sinjoro

kolonelo do faru? Esti *caballero* ne eblas sen plenumi devojn.

Tial pendis je la oka vespere ĉiuj revolveroj je transversaj traboj, aŭ je najloj de fosto aŭ ili kuŝis pace en revolveringoj sur la seloj en la korto aŭ sub la kunfaldeblaj litokadroj, sur kiuj dormis la gastoj.

**Rimarko**

*kapĉjo* = dorlotnomo por kaporalo (armea slango)

Revoluciuloj, kiuj serioze traktas siajn aferojn, ne fidu pri bonŝanco aŭ afablaj hazardoj, ankaŭ ne pri la kreskanta kompreno aŭ la vekiga konscio pri justeco flanke de la kontraŭuloj. Oficialaj soldatoj pro mi despli fidu pri la stultecoj de la malamiko kaj imagu, ke Fortuno ĉiam estas favora al la bravaj soldatoj. Sed revoluciuloj neniam revu kaj neniam akceptu sciigon por kiu ekzistas neniu alia pruvo krom tiu, ke ili deziras, ke la sciigo efektive estu vera.

Kiam la *muchachos* interkonsilis la atakplanon, diris Gabino: „Eble ili ĉiuj estas tiom ebriaj, ke ili dormos kiel ĉaslacigitaj hundoj.“

Pri tio Generalo respondis: „Eble! Sed tiu „eble“ tute ne helpas al ni. Fidu pri nenio, tion mi konsilas al vi ĉiuj. Supozu kun certo, ke tute neniu dormas, ke neniu ebrias, ke ĉiu havas sian revolveron aŭ sian karabenon ĉepugne, ke ĉiuj tute ne dormemas kaj embuskas, ke nia plano iel estas perfidita. Ne fidu pri via bonŝanco. Neniukaze. Ĉiam pensu, ke la alia pli kapablas, pli scias, pli fortas ol

vi ĉiuj, ke li pli bone gardostaras ol vi supozas, ke li eksciis ĉiujn viajn planojn aŭ divenis ilin. Ĉar tion, kion povas elpensi ni ĉi tie, povas elpensi same bone ankaŭ aliaj. La ununura efektiva avantaĝo estas tiu, ke ili ne scias, ke ni kaŭras ĉi tie en la vepro kun la fortoj de kvarcent viroj. Kaj eĉ tion ili iel povus ekscii. Se mi ekirus bonafide je Fortuno kaj konsiderus ilian ebriecon, ni tute ne bezonus planon, neniun asignadon de grupoj. Sed ĉar mi bonafide ne esperas pri bonŝancaj cirkonstancoj, tial restas nur tio, kio povus fuŝigi nian atakon, kaj tio estas, ke troviĝas tuta regimento proksime de Santa Cecilia, ne malkovrita de ni. Kaj ke ĝi kaptas nin nuke ĉie el la dorsaj flankoj, tuj tiam, kiam ni venos al la muroj. Sed por tio ni havas ja niajn iluminadajn inspektorojn. Se nenio lumos, io estos suspekta, kaj se la iluminado ekfunkcios, ni estos superaj, egale, kio kaj kiu atakos nin eldorse.“

Generalo, akompanata de Celso, ŝteliris ĝis proksime de la bieno, dum la armeo kaŝis sin nur kilometron malproksime de li inter la preriaj herboj. La bieno estis jam tute encirklita, tiel, ke ĉiu el la kvar ataktrupoj troviĝis proksimume en la sama distanco de la muro, al kiu ĝi ekmarŝos. La ununuran fendon, kiu en tiu encirklado ankoraŭ malfermis, formis la vilaĝo de la peonoj. La plano de ambaŭ trupoj, kiuj formis tie la angulon, estis tiu, ke ĉe la atako la vilaĝo estu disigita de la bieno, sed malgranda grupo estis asignita gardi la vilaĝon tiel, ke la peonoj kapablu kuri nur al la bieno, tiukaze, se ili, pelate de timo, provus eskapi.

Kompreneble ne eblis por la *muchachos*, al kiuj estis konfidataj la tasko, forlogi ĉiujn hundojn de la bieno kaj de la vilaĝo. Tie kaj tie ankoraŭ bojadis kelkaj el ili. Sed la hundoj ĉiam rapide estis silentigitaj de tiuj viroj, al kiuj ili tro proksimiĝis, aŭ almenaŭ bremsitaj al mizera vea hurletado per tio, ke fulmrapida ŝtono batiĝis al ties kranioj. La hundoj baldaŭ lernis ekkompreni, ke en tiu

kazo oni seriozas, ili do trotis reen en la gardantajn murojn de la bieno, kie ili trovis abunde da freŝaj ostoj, tiom da ili, ke ili baldaŭ forgesis, ke tie ekstere en la ĉirkaŭo kuŝas saltopreta jaguaro, al kiu oni prefere ne malamikiĝu.

En la plej morna angulo de la vasta korto, kien lumis eĉ ne la plej eta aluda radio de la brulanta bivakfajro en la korto, Generalo grimpis sur la muron. Rimarkinte, kiom multe ĉiuj viroj okupiĝas aŭ pri trinkado aŭ pri dancado, kaj ke eĉ ne unu el ili havas sian revolveron pendanta je la zono, li pensis dum momento pri tio komandi al siaj iluminadaj inspektoroj, kiujn li vizitis nur kelkajn minutojn antaŭe en ties postenejoj, la ekbruligadon kaj tiel la signalon por la atako.

Ankaŭ Celso grimpis sur la muron por superrigardi la batalejon. Kiam ili ambaŭ ree estis sur la tero, diris Generalo: „Ne estus tiel stulte, tuj nun eksturmi. Sed mi pensas, ke tio estus ne tre honesta ataki la ulojn ĝuste nun en tiu momento, kiam ili dancas kaj ridas.“

„Povas esti“, flustris Celso, „sed estas eble same tiel

malhoneste kaj malĝentile, balai la kampon, se ili ĝuste enhavas sian kacon, ja nur ne pensu, ke hodiaŭ nokte post tiu bona manĝaĉo, drinkado, dancado kaj femurpremado eventuale iu preĝos. La filinoj kaj nevinoj kaj onklinoj, kiuj tie saltadas, estas tiel voluptaj, ke vi povas vidi tion eĉ de ĉi tie, kiel la sango en ili bolas.“

„Bone dirite. Kaj tio, kion vi diras, instigas min tiom pli, ne doni la signalon antaŭtempe kaj ne ŝanĝi la planon, sed eksturmi nur ĉirkaŭ horon post kiam estos estingita la lasta kandelo, tiel kiel planite. Tiam la atako deruliĝos pli rapide, kaj eble eĉ okazos, ke ni perdos eĉ ne unu viron.“

Generalo kaj Celso vizitis nun pluan fojon la iluministojn, kiuj kuŝadis plate surtere ĉirkaŭ kvindek metrojn malproksime de la tegmentoj kaj maizaj pajlostakoj, kiujn ili ekbruligu, eĉ ne permesante al si la plezuron fumi cigaredon.

„Se mi kvarfoje hurlos kiel kojoto, vi ekbruligu ĉion“, li komandis al ĉiu ekbruliga grupo. Poste reiris ambaŭ, Celso kaj Generalo, al siaj specialaj armeaj trupoj.

Aŭdeblis neniŭ alia brueto krom la ĉeokaza plurfoja bojado de hundo forŝtelinta tuj poste al la konstruaĵoj de la bieno, kiu povus perfidi la proksimecon de la armeo. Griloj, cikadoj kaj akridoj ĉirpis trans la prerion per milionoj de etaj voĉoj kaj sufokigis eĉ la subigitan tusadon aŭ ternadon de tiu aŭ tiu el la *muchachos*, kiuj kuŝis tiom kaŝite inter la herboj, ke ili eĉ per la plej fortaj lumĵetiloj, se tiuj ekzistus en la bieno, ne malkovreblus. Eĉ bienulo povus trarajdi rekte inter la plate etendiĝintaj *muchachos* kaj tamen li ekkonus nur per tio, ke la ĉevalo ekbaŭmetas, sed poste flarante homon, tamen senzorge plu trotas, ke tie estis io, kio ne estas tute tiel, kiel li rajdante kutimas tion. Sed li supozus, ke ĝi estis de la ĉevalo ekvidita ĉasbesto, kiu en la tenebro de la nokto certe estis rimarkita de la ĉevalo, sed ne de ties rajdisto. Kaj se li efektive vidus unu aŭ du aŭ tri el la preskaŭ nudaj korpoj, li ne trovus la renkontiĝon grava, ĉar li estus certa, ke ili estas ebriaj peonoj de la bieno, kiuj pro sia ebrieco ŝanceliĝis tien eksteren kaj lasis fali sin, ĉar iliaj gamboj ne plu portis ilin.



Sed neniŭ bienulo rajdis hejmen antaŭ la matena krepusko, neniŭ soldato forlasis en la nokto la protektantajn murojn, kaj la peonoj de la bieno, tuj kiam ili estis liberigitaj de sia servado, rapidis atingi siajn kabanojn kaj ekdormi; ĉar je la kvara matene eksonorilos la *campanilla*, la sonorila tureto de la bieno kaj ŝiros ilin for de iliaj petatoj por enviciĝi por la laboro.

Rimarkinte, ke la granda bivakfajro sur la fajroŝtono en la korto dum tridek minutoj ne plu estis refreŝigita kaj nur tie kaj tie la trembrilo de kandelo fariĝis videbla en unu el la ĉambroj de la bieno, Generalo ekaŭdis la vekrian plendadon de pavo, kiu sidanta sur sia branĉo estas atakata *de gato de monte*, kaj la kvar trupoj komencis rampi surtere antaŭen, ĉiu kiel serpento.

Kvankam ili ne estigis bruon, tamen ekbojis denove la hundoj de la bieno, kiuj ne forlogeblis, kaj pli ol deko da hundoj de la peonoj sentis sin devigitaj aliĝi al la bojado. En la korto de la bieno aŭdigis sin kelkaj sakroj de la tie ripozantaj soldatoj, kiuj estis ĝenataj en la dormo. Kaj tuj poste ekaŭdeblis la vee plenda hurlado de kelkaj hundoj, al kies kruroj oni ĵetis bastonon. En malgrandaj lokoj, en la vilaĝoj de la indiĝenoj kaj en bienoj malproksimaj de la civilizo neniu homo iel atentis la bojadon de hundoj, ne dum la hela tago kaj des pli malofte nokte. Hundoj bojas, se bovino, kiu malfruiĝis sur la paŝtejo, revenas korten, se kverelas du porkoj, se azeno provas eltiri ĉe la argila

muro de maiza remizo kelkajn spadikojn de maizo, se Luno ĵetas fantomecajn ombrojn, kaj speciale se hundo sen kaŭzo komencas boji aŭ se la bojado de hundoj el malproksimaj bienoj aŭ de indiĝenaj setlejoj sonore transiĝas, nerimarkate de homoj. Plej ofte la hundoj bojas nur boji entute, por tiel mallongigi la longajn nokthorojn kaj konvinkiĝi, ke ili ankoraŭ vivas.

Kompreneble, se ĉiuj hundoj de la bieno estus kolektiĝintaj, ilia bruo tamen estus tiel difinita kaj tiel nekutime ekscitita, ke la viroj de la bieno eble ekkomprenus, ke tiu bojado efektive anoncas seriozan danĝeron.

Tial, ĉar la kvanto de la hundoj estis malpliigita pli ol je duono kaj ĉar forŝteliĝis de la postrestanta aro konsiderinda parto ektimigita per ŝtonĵetoj aŭ maĉetbatoj kaj tial kaŝiĝis kaj ne plu partoprenis ĉe la hurlado de la malmultaj ceteraj hundoj, vekigis la bojado kaj jelpado de ili ĉe neniuj en la bieno la suspekton, ke proksime antaŭprepariĝas nekutima afero.

Nun la plej antaŭaj grupoj estis nur ankoraŭ kvindek

paŝojn malproksime de la muroj kaj pordegoj. Ili kuŝis jam ĉe la kunliga vojo inter la vilaĝo kaj la bieno, tiel, ke la vojo al la vilaĝo estis kvazaŭ detranĉita de la peonoj kaj de la homoj en la bieno.

Ĉiuj viroj, sen atendi iun plian vokon, ekkaptis kun firmaj manoj siajn maĉetojn aŭ siajn tranĉilojn kaj rektigis siajn suprajn partojn de la korpo kvazaŭ ili volus salti ĉe la unua fojo tuj kvin metrojn.

Kun longe etenditaj vekkrioj hurlis kojoto kvarfoje. Trembriloj de lumo fariĝis videblaj je la du flankoj de la bieno, kie estis remizoj kaj kie troviĝis la simplaj konstruaĵoj de la *mayordomos* kaj *capataces*, kies tegmentoj estis sekaj palmfolioj.

Tuj poste sible eklumis zigzage flavruĝa flamo kiel timigita *ardilla* laŭ la rando de la kornice elstaranta tegmento. Nur du sekundojn daŭris ĝis alia angulo akre eklumis kun kraketado.

Estis strange, ke nenio moviĝis, nek en la korto nek en la konstruaĵoj de la bieno, nenio, almenaŭ dum dekkvin

sekundoj. Nur la hundoj, kiuj ĝis tiam jelpis, transiris al mizera hurlado.

La *muchachos* estis nun jam trans la muro. Same al ektimigitaj katoj ili hastegis en grupoj renkonte al la ĉambroj de la kompaktaĵoj, kiuj ĉiuj troviĝis sur ebena tero kaj kies pordoj pro la varmego estis nur apogitaj kaj de interne ne fermitaj aŭ baritaj. Sed ĉar Generalo supozis, ke ĉiuj pordoj estos fermitaj, li komisiis grupojn surgrimpi la tegmenton, deŝiri la tegolojn kaj iri tra la tegmentoj en la ĉambrojn, ĉar pro la lerteco de la *muchachos* tio okazis multe pli rapide kaj estis pro la surprizo multe pli sukcespromesa ol trarompi la pordojn, ĉar malantaŭ la pordoj staris la oficiroj kaj bienuloj kun revolveroj ĉemane. Sed tiel la atako okazis samtempe kaj de la tegmento kaj de la pordoj.

Antaŭ ol la grupoj asignitaj por la ĉambroj eĉ nur venis al la pordoj, jam ne plu vivis iu ajn el tiuj, kiuj dormis ekstere en la korto, jen la soldatoj, la policianoj, la *mayordomos* kaj *capataces*. La grupoj por la kortoj tratanĉis iliajn gorĝojn jam, kiam la tegmentaj grupoj ankoraŭ kaŭris sur la konstruaĵoj kaj dehakis la

skvamaranĝajn tegolojn. La klakadanta malsuprenfalado kaj disrompiĝado de la tegoloj estis la unua konkreta bruoj, kiu aŭdeblis. Ĉio, kio okazis ĝis tiam, inklude la neniigo de pli ol cent dudek viroj, kiuj dormis en la korto, kaŭzis nenion alian krom rapide sufokitan ĝemon; rapide sufokitan stertoradon; intencitan krion forvelkintan antaŭ ol ĝi povis evolui en ĝustan gargaradon; grincadon de maĉetoj, se ties pintoj kunpuŝiĝis kun sablo aŭ pavumŝtonoj en la korto; neklarigeble pum-sonsimila palpado, kiu ekestis, se rapide kaptantaj manoj kunpuŝiĝis kun homa korpo; kaj ĉeokaza obtuza falado kvazaŭ lignobloko sur ŝtona planko estus renversita.

Kaj nun, post ĉirkaŭ dekvin minutoj, eksonis en la korto la unua homa voĉo. Ĝi elvenis de la domo, en kiu vivis la *mayordomo* kun sia familio. „*Fuego! Fajro!*“ vokis la voĉo dufoje. Tiam ĝi silentiĝis.

En la kompaktaj konstruaĵoj de la bieno eksonis nun tie kaj tie la hela vipoklakado de revolveraj pafoj interne de subtegmentaj ejoj. Sed kie ajn unu, du aŭ tri pafoj aŭdeblis, oni povis aŭdi je la sono de la pafoj, ke ili venis ĉiufoje el la sama armilo kaj nur maksimume dufoje estis

ripetitaj, kaj ke la sekva pafado venis el aliaj ejoj aŭ el aliaj anguloj.

Strange estis, ke ankaŭ en la konstruaĵoj oni nek vokis nek kriis nek plendis. Certe ne estis kuraĝo, kiu malhelpis krii la kuraĝajn oficirojn de la *federales* kaj de la *rurales* kaj la same militemajn bienulojn. La surprizo lasis elseki iliajn voĉojn. Kaj antaŭ ol ili trovus tempon elpuŝi avertkriojn, iliaj gorgoj jam estis tro vaste malfermitaj por ankoraŭ povi voki per ties helpo.

Nur la unufoja ekkriĉado de tri inaj voĉoj, kiu tamen baldaŭ elsonis kiel laŭta gargarado, estis vaste aŭdebla.

Akre prilumate de la hela brilo de la kraketantaj palmfolioj, oni vidis kaŭri Profesoron supre sur la kornico de la ĉefkonstruaĵo.

Li estis la unua, kiu tie parolis kaj sufiĉe laŭte, ke ĝi aŭdeblis trans la vastan korton, kaj trans ties murojn certe estis komprenata eĉ en la vilaĝo de la peonoj. Skuante la pugnojn, sin alte rektigante kaj tiel donante la tutan forton al sia voĉo, al kiu ĝi kapablis, li kriis: „Kun

teroro kaj hororo la diktaturo naskiĝis! Per teruro, hororo kaj skurĝobatoj ĝi konservis sian potencon! Kun hororo, teruro kaj la buĉado de milionoj de homoj ĝi estos eksigita! En torentoj de sango la ora erao de l' mensogeco estas dronigata. *Viva la revolucion del proletariado! Tierra y libertad!*“

La *muchachos*, subite vekigante kvazaŭ el hipnozo, svingadis siajn tranĉilojn kaj maĉetojn supren kaj kriis kiel respondo: „*Viva la revolucion! Abajos los tiranos! Tierra y libertad para todos, sin amos y sin capataces! Viva nuestra rebelion! Viva la rebelion de los indios!*“

Kaj tiel okazis en la kuro de la revolucio, ke tia atako kiel tiu sur la bienon Santa Cecilia ripetiĝis ne nur unufoje, ne dekfoje, sed multmilfoje en la tuta lando, ĝis fine pri la ora erao neniu plu memoris krom la ruinoj de florintaj bienegoj kaj la dismartelitaj kaj rustiĝantaj maŝinoj de centoj de fabrikoj kaj malpliigo de la popolkvanto je preskaŭ tri milionoj. La ora erao de la diktaturo ebligis neimageblan pliigon de la produktado. Sed ĉe tio ĝi forgesis la homon kaj la individuon, ke ĉio kaj ĉiu aĵo povas fariĝi produkto, kun ununura escepto, kaj tio estas



la cerboj kaj la animoj de la homoj.

**Rimarkoj**

*ardilla* = sciuro

*gato de monte* = sovaĝa kato

Kiam la hela tago komenciĝis kaj la venkintoj komencis rasti la bienon, ili venis al tiu tereno, kie la ekzekutitaj kamaradoj kun siaj kaĉigitaj kapoj elstaris de la distamfita tero.

„Ni elfosu ilin, niajn kompatindajn *compañeros*“, diris Andreo, „kaj ni enterigu ilin en la tombejo de la peonoj.“

„Tio estus hontiga por ili“, respondis Generalo.

„Generalo pravas“, diris Profesoro. „Neniun pli grandan honorigon ni povus montri al ili krom lasi ilin tie, kie ni trovis ilin. Tie ili elsangis. Tie ili gargaris sian lastan revolucion krion al la uniformitaj bestaĉoj vizaĝen. Tie ili restu. Ni ĵetu nur termontetojn sur iliajn kapojn kaj poste konstruu ŝtonbarilon ĉirkaŭ ilian lastan ejon. Kaj se Dio je l' Lasta Juĝo pretervenos ĉi tien por voki ilin, li trovu ilin tiel, kiel la tiranoj enfosis ilin. Tiukaze Dio scios, kion li pensu pri la plendoj de la *caballeros* tie de la vulturoj senkarnigataj, kaj kiu pravas koncerne la kverelon inter regantoj kaj regatoj.“

„Ni ĉiam pravas!“ vokis Celso. „Ni ĉiam pravas, ĉar ni estas ribeluloj. Ribeluloj ĉiam pravas. Ĉar neniu, ĉu indiĝeno ĉu ladino, havas la rajton malpermesi al alia uzi sian buŝaĉon, ĉar ni havas la buŝon ne nur por manĝaĉi kiel porkoj kaj kaproj, sed por paroli per ĝi tion, kion ni volas, ĉu plaĉas al *cientificos* kaj *aristocrates* ĉu ne.“

„Celso“, diris Andreo mallaŭte al li, kiam li jam ĉesis la parolon, „tion diris hieraŭ Modesta al vi. Tion vi ne elpensis mem.“

„Kaj kial ŝi ne diru tion al mi? Ŝi estas same tiel prudenta kaj instruita kiel vi. Ŝi povas legi sufiĉe bone kaj ankaŭ skribi ŝi povas. Sed vi ne devas rakonti tion al kiu ajn en la mondo, ke Modesta diris tion al mi. Mi estas nun *comandante* de mitralo kaj tial ne evidentigu tion, ke mi estas same tiel stulta kiel antaŭe. Cetere, tion mi diros al vi, tian hastan mitralon mi scias pli bone manipuli ol krajonon.“

„Tio nun pli valoras, Celso; ke ni ĉiam tiel rapide kaj facile venkos kiel en tiu ĉi nokto, tion mi ne supozas.“

„Ankaŭ mi ne“, diris Generalo, kiu alvenis kaj komisiis Andreon skribi liston de ĉiuj ĉeestantaj armiloj, de ĉiu municio kaj de la tuta provianto.

„Profesoro trarigardis ĉiujn ordonojn, telegramojn kaj sciigojn, kiujn la kolonelo de la *federales* kaj la kapitano de la *rurales* havis ĉe si“, daŭrigis Generalo. „Eblas, ke jam tuta regimento marŝante survojas inter Balun Canan kaj Aĥlumal por fortigi la garnizonojn en la norda distrikto. Tiuj alvenos sur nia vojo. Kaj ni ne evitos ilin survoje. Antaŭen ni marŝos!“

Dum semajno restadis la armeo ankoraŭ en tiu riĉa, iam tiom bela, majesta bieno.

Je la tago antaŭ la ekmarŝo Profesoro disdividis la terenon de la bieno inter la peonoj, kiuj sterkis la kampojn, kiel jam iliaj antaŭuloj de la bieno, per siaj ŝvito, sango kaj ploroj.

Kiam la armeo troviĝis survoje al Aĥlumal, kaj malproksimiĝis ĝuste nur kvin kilometrojn de la bieno, brulis ĉiuj ĉi ceteraj konstruaĵoj, kiuj dum la atako ne suferis damaĝon. La peonoj restis loĝi en siaj kabanoj kiel ĝis tiam. Ili ne havis sopiron vivi kiel mastroj.

## Ĉapitro 08

01

La foirplaca loko Aĥlumal estis okupita de nur dudek federaciaj soldatoj, ĉar la pli granda parto de la garnizono, kutime konsistanta el sesdek soldatoj, estis sendita kiel fortigo al la trupoj en *Santa Cecilia*, kiujn nun manĝis la vulturoj.

Sed la loko krome ankoraŭ fanfaronis per loka polico, komisaro kaj ses policianoj, kiuj iris nudapiede kaj kiel armilojn havis maĉeton kaj pafilon, kiu ŝarĝendis buŝe de la tubo.

Krome tie ankoraŭ estis la *Presidente Municipal* aŭ urbestro, kiu havis revolveron, la impostkasisto, la civila juĝisto, la poŝtestro kaj la urba skribisto, kiuj same posedis revolverojn, kiel signon de sia indeco kaj por havigi respekton al si. Sen revolvero ĉe la kokso ili aspektus kiel kutimaj civitanoj kaj neniu scius laŭaspekte, ke ili havas tie iun potencon. Ankaŭ la plimulto de la magazeno posedantoj kaj de la memstaraj metiistoj havis

revolveron; kvankam ili parte estis forte rustiĝintaj kaj la municio ne ĉiam estis la ĝusta, ili tamen estigis la impreson de mortigaj armiloj. Tio estas abunda por meti la kunhomojn en timon kaj teruriĝon, eĉ se oni aspektas krome kiel sekcia estro en varodomo aŭ kiel filmklaŭno kun nigra dentobroso sub la nazo, kiu pro kataro kvazaŭ dronas en muko.

Generalo povus ataki kaj okupi Aĥlumalon je la precize sama maniero kiel en Santa Cecilia. Sed intence li provis alian manieron de la atako.

Li sendis tridek *muchachos*, ĉiujn armitajn per maĉeto al la foirplaco de Aĥlumal, kvazaŭ ili estus indiĝenaj etkampanoj plenumantaj aĉetojn. Ĉiu indiĝeno portas ĉie sian maĉeton ĉe si. Tial tio frapegus la atenton, se iu iam venus sen maĉeto. La federaciaj soldatoj sub la komando de leŭtenanto rezidis en la urbodomo, en ĉambro, kiu servis al ili kiel policejo kaj kiu, kiel ĉiuj ceteraj ĉambroj de la unuetaĝa konstruaĵo troviĝis sur la ebena tero, kaj ĝia pordo kondukis eksteren al la portiko. Kiel ĉiuj ceteraj ĉambroj en la *cabildo*, ankaŭ tiu ne havis duan pordon malantaŭen eksteren, kaj ankaŭ ne

fenestrojn. En la portiko kaŭradis kiel kutime granda kvanto da indiĝenoj, parte por sidi en la ombro, parte ĉar ili devis plenumi iujn negocojn en la urbodomo aŭ en unu el la oficejoj havantaj sian rezidejon en tiu ĉi konstruaĵo. Nokte en la portiko de la *cabildo* dormis vojaĝantaj komercistoj kaj migrantaj indiĝenoj.

Soldato kun surŝultra fusilo antaŭ la pordo de la policejo marŝadis tien kaj reen, ĉar soldato devas fari ja almenaŭ ion, por ke la impostpagistoj vidu, ke ilia mono ne estas disipita sen utilo. La kaporalo sidis sen sia tuniko kun suprenfalditaj manikoj ĉe eta tablo en la policejo antaŭ notfolietoj kaj dokumentetoj kaj enue maĉis krajonon. La leŭtenanto ne ĉeestis. Verŝajne li estis en kantino sur la foirplaco por ebriigi sin aŭ li serĉis litkunulinon por la nokto. Du soldatoj kuŝis en la policejo sur mato kaj ronkis. Ĉar la kaporalo ne povis eterne maĉi sian krajonon, por ne fariĝi ŝtipkapulo, li aldonis pluan okupon al siaj taskoj. Kiam unu el la soldatoj ronkis tro laŭte, li ekstaris kaj tretadis lian postaĵon tiom longe ĝis tiu turniĝis al la alia flanko kaj pro tio forgesis sian ronkadon. Poste la kaporalo ree iris al sia eta tablo kaj



maĉis plu sian krajonon.

La ceteraj soldatoj en la portiko sidis kun siaj uniformojakoj, kiujn ili malbutonumis de supre ĝis malsupre. Kelkaj el ili ludis kartojn. Unu e ili ili pikumadis per purigilo la dentojn. Alia legis abocolibron, kiu tiom cerbumigis lin, ke li seninterrompe gratis sian kapon kaj poste senpense lekadis la fingrajn ungojn.

Estis tiel kviete, ke oni povis aŭdi zumadi la muŝojn. Jen el tiu jen el tiu domo aŭdeblis la plorsingulta plorado de bebo, kio ankoraŭ pliprofundigis la impreson de agrabla civitana paco. La civitanoj de la urbeto ripozis de siaj streĉoj kaj balancis sin en siaj hamakoj aŭ turniĝadis sur siaj duraj litoj. De tempo al tempo kuris knabino aŭ hasta ino en butikon por rapide aĉeti tion, kion ŝi bezonis hejme en la domo. Kaj la vendistino eliris anase paŝante pigre de sia dormeta angulo, ankoraŭ iom dormema kaj iom ĉagrenita, kaj serĉis en la tirkesto de la vendotablo kelkajn unuopajn centavojn, por povi redoni ŝanĝmonon al la klientino, kiu aĉetis por tri centavoj salon aŭ por ses centavoj *canela*. Estis arde varmege je tiuj horoj kaj ĉiu honorinda civitano rigardis tion kiel pekon kontraŭ Dio

kaj kiel transpaŝon de moroj kaj moralo labori tiutempe kaj agi kaj kuradi tiam sur la stratoj.

La *muchachos* enirinte en la policejon, laboris tiel rapide kaj tiel lerte, ke la kaporalo havis ĝuste nur la tempon rigardi supren kaj miri dum kvarono de sekundo pri la impertinento de indiĝenaj uloj, kiuj kuris en la policejon sen antaŭe anonci sin ĉe la gardisto. Sed kaj la gardisto kaj la ceteraj soldatoj, kiuj kaŭris en la portiko, en la sama momento estis kvazaŭ trenitaj internen laŭ tia maniero, ke tiukaze, se iu rigardus tien ekde la placo, tiu supozus, ke la soldatoj kaptis tiujn *muchachos* kaj puŝis ilin antaŭen por pridemandado ĉe la suboficiro. Sed la soldatoj jam ne plu vivis. Antaŭ ol la kaporalo ekkomprenis tion, li estis jam envicigita en la saman batalionon de formarsintoj. La soldatoj kuŝante dormante surplanke, per unu fojo ĉesis ronki. Ili aŭdigis brueton, kiu similis al tiu de la lasta akvo, kiu eskapas tra la senŝtopila truo de bankuvo.

En la sekva momento la soldatoj estis senvestigitaj, la *muchachos* vestis sin per la uniformoj, kaj trankvile marŝadis gardisto kun surŝultra fusilo antaŭ la policejo

tien kaj reen, kiam la leŭtenanto zigzage trotante proksimiĝis por aŭdi de la kaporalo, ĉu io okazis, dum li taksadis kun bonaj pagivolemaj civitanoj en la *cantina* la valorojn de diversaj specoj de malnovaj komitekoj dum horoj.

Iom ŝanceliĝante li proksimiĝis al la gardanto kaj diris: „Vi neniam lernos en via tuta plua vivo, kiel oni ĝuste surŝultre portu tian ŝprucilon.“ Ĉe tio li vangofrapis lin kaj diris, balbuteme kripligante la vortojn: „Mi interparolos kun la kaporalo pri vi. Li foje suke tradraŝu vin kaj al vi tiom longe batu vian kanonon tenatan de vi kiel balailo, sur viajn ŝultrojn ĝis kiam ili ŝvelos supren ĝis via mentono. Tiam vi certe fine lernos, kiel soldato tenu la bastonon. Malbenite, ke mi ĉi tie en tia pedikohava kaj kotigita garnizono, kie oni tretas ĉe ĉiu paŝo, kiun oni iras, dufoje en merdon, devas ĉagreniĝadi pri pedikohavaj kaj stinkantaj indianoj, kiuj asertas, ke ili estas soldatoj.“

Li iris renkonte al la malfermita pordo de la policejo kaj vokis: „He, Kapĉjo, elvenu de tie kaj rigardu al vi foje la kotulon kaj leku lian koton el la oreloj, por ke ili estontece

estu lavitaj.“ Li iris ankoraŭ duonon de paŝo plu kaj apogis sin kun etendita brako kontraŭ la pordofosto. Poste, kvazaŭ li turnus sin ĉirkaŭ si mem ĉe la fosto por iri en la policejon, li malaperis en la ĉambro, sen delasi de la fosto. Ĉio, kio aŭdeblis, similis al la pumpuma falado de peza sako kaj al la fortrenado de la sako trans brikojn de pavumita planko. La ledaj kalkanumoj de liaj ŝuoj kaŭzis pro tiu fortrenado trans la brikoj kviksimilan sonon.

**Rimarko**

*canela*= cinamo

Kelkajn minutojn poste svarme atakis la *muchachos* de ĉiuj flankoj Aĥlumalon. Leviĝis en la urbeto timkriado tia, ke ĝi ŝiris ankaŭ la plej pigran dormanton el ties lito aŭ el lia hamako.

Poste komenciĝis sovaĝa pelmela kurado en la malmultaj stratoj kaj sur la foirplaco. Inoj kriis, infanoj ploris, viroj sakris, hundoj bojis. En la *cabildo* oni pafadis. Ĉiuj oficistoj kaj dungitoj de la urbestro kaj de la federaciaj agentejoj, kiuj portis revolverojn, pagis tiun honoron nun multekoste, sen povi adiaŭi sin kun la bela konscio, ke ili invitis sukcese kelkajn ribelulojn akompani ilin dum sia flugo alten, ĉar la *muchachos* por la dormemaj uloj estis tro rapidaj kaj tro lertaj.

Ĉio, kion ili trovis en la urbodomo, katastroj, dokumentoj, listoj, libroj, notfolioj kaj dekretoj, estis suramasigitaj kaj forbruligitaj. La karcero troviĝanta en la interna korto de la *cabildo* estis jam rompmalfermita. En ĝi, kiel en ĉiuj prizonoj de la ŝtato, kaŭris nur indiĝenaj peonoj kaj indiĝenaj etkampanoj, ĉiu el ili preskaŭ

malsatmortigita. La prizonuloj ne havante simpation al iu ajn, kiu asertis prezenti la leĝon, komprenis nur unu aferon: Ili devis nun finfine delikti la krimon, pro kiu ili estis metitaj en la *calabozo*-n, en prizonĉelon kaj tie enestis dum semajnoj aŭ monatoj. En multaj kazoj ilia krimo estis impertinento kontraŭ aŭtoritatoj kaj bienuloj, kaj krome ribelo, rifuzo de laboro, kiel oni nomis tiun impertinenton. Multe pli rapide ol tio sukcesus al la *muchachos* ne konantaj la lokon, sciis la liberigitoj trovi ĉiujn tiujn, kun kiuj ili devis ankoraŭ glatigi finbilancon, kun oficistoj, civitanoj kaj denunciintoj. Ili estis tiuj, kiuj faris nun tion, kion intencis nek Generalo nek kiu ajn el la *muchachos*. Ilia kolero kaj ilia deziro pri venĝo ne konis limojn. Tie, kie ili enrompis domon, nek la edzo nek la edzino nek infano restis viva. Kvankam ili nek ŝtelis nek serĉis monon, sed nur kovrilon, maĉeton aŭ ĉasfusilon, ili forlasis la domon nur tiam, kiam ĉio kaj ĉiu en la domo estis tute detruita, disrompita, dishakita kaj distranĉita. Poste ili starigis kandelojn, kiujn ili trovis en la domo kaj poste ebruligiis, en la surmontetigitajn rompitaĵojn de mebloj, kontraŭ lignaj vandoj, kontraŭ pordoj kaj en kestojn.

Ne daŭris longe kaj la urbeto, la plej grava foirplaca loko de la regiono, brulis en pli ol dek diversaj lokoj. Neniu penis estingi la fajron. La ribeluloj estis la mastroj de la urbo. Sed, ĉar ili ne intencis resti la mastroj tie, sed vidis antaŭ si pli grandajn taskojn, tio glitis de ili kiel pizo de la muro, ĉu bonfartas ĉu ne urbo, kiu al neniu el ili iam faris aŭ donis ion bonan. Kie ajn ili renkontis urbon, kiu havis urbodomon kaj prizonon, ili sciis, ke estas burgo de la diktatoro, en kiu ili ne trovis homojn, sed nur homsimile aspektantajn fi-estaĵojn, kiuj havis la rajton ordoni al ili, kaj kiujn ili devis obei kvazaŭ blinduloj. Eĉ la lernejoj ekzistis nur por la infanoj de la ladinoj. Kaj se estis lasitaj en lernejon la infanoj de indiĝenaj loĝantoj de urbo, la proletaro vivanta en argilaj kabanjoj ĉe la randoj de la urboj, ili estis la infanoj, je kiuj la instruisto ekzercadis siajn voluptojn pri batado; ĉar la patroj de ladinaj infanoj kun revolvero irus en la lernejon, kie ili havis interparoladon kun la instruisto, se li tiom forgesus sin, doni eĉ nur frapeton sur manon de iu el iliaj infanoj. Proletoj permesas, ke iliaj infanoj estu tradraŝataj en la lernejo, tial oni batas ne nur la infanojn, sed ankaŭ ties patrojn, se ili falas en la ungegojn de policejaj bestaĉoj.

Sur la placo, jen la *zocalo*, troviĝis en ĉiu domo butikoj; tial la loko estis ja foirplaca loko, kie la tuta loĝantaro vivis de la komerco, de la interŝanĝo de varoj kun la indiĝenoj en la regiono. Eĉ la multaj etmetiistoj de la loko posedis krom sia negocejo kiel ĉarpentistoj, masonistoj aŭ forĝistoj samtempe magazeneton, kiu sekurigis al ili regulan enspezadon, eĉ se nur etan, kaj plej ofte eĉ ties metion entute. La plimulto de la butikoj kompreneble estis tiel eta, ke estus malfacile trovi varojn en ili, kiuj estas pli valoraj ol dek pesojn. Kiam la *muchachos* invadis la lokon kaj la civitanoj ekkomprenis pri kio temas, ili fermigis tuj siajn butikojn. Pli ĝuste dirate, provis fermigi siajn butikojn. Sed la plimulto ne havis sufiĉe da tempo por tio kaj preferis forkuri aŭ kaŝiĝi.

Eĉ la butikoj malfermitaj disrompiĝis ĉe la unuaj piedtrotetoj aŭ puŝoj per karabenfustoj. Ĉar tiukaze, se magazeneteto ne pli grandas ol povi enteni varojn kun valoro da cent pesoj, oni ne vere povas atendi de la posedanto, ke tiu pli sekurigas masivajn pordojn per fero kaj per la plej bonaj seruroj, kio kostus al li du- aŭ trimil pesojn. La sekureco estis proporcia al la valoro de la varoj



en ili. Nekonataj homoj, kiuj venis tien, ĉiam estis suspektaj kaj ne povis fari paŝon sen esti observataj. Ŝtelistoj venis en la lokon nur tiam, kiam okazis la *feria*, la granda sanktulofesto. Kaj tial, ĉar ŝtelado en kutimaj ĉiutagaj rilatoj estis malofta, ne estis kaŭzo por devi fari grandajn elspezojn por protekti la mizeran varan inventaron.

Oni enrompiĝis en ĉiujn magazenojn. Sed la *muchachos* prenis nur tion, kion ili bezonis por sia sia plumarŝo. Ili ne tial ne kaptis pli grandajn predojn, ĉar ili ne volis esti ŝtelistoj, sed ĉar ili devus porti ĉion sur siaj dorsoj. Neniu portis pli ol li bezonis por sia vivtenado. Ĉu oni nomis ilin ŝtelistoj, elrabistoj, *salvajes* aŭ *vandalos*, tio ne afliktis ilin. Tiudirekte ili ne havis honoron. Ilia honoro estis venki ribelante kaj sentronigi la diktaturon. Se tio estus okazinta, eblus pensi denove ankaŭ pri aliaj honorigoj.

Kvankam ĉiu prenis nur tion, kion li bezonis, fine la rezulto tamen estis tiu, ke la civitanoj pravis, se ili asertis pli poste, ke Aĥlumal estis tiom elrabita, ke eĉ ne grajneto da salo troveblis plu kaj neniu briko restis sur la alia kaj neniu kovrilo sur litaĵo.

Ribeluloj devas vivi, se ili volas gajni ribelon, kaj se ili ne gajnas industriajn baronojn kaj bankdirektorojn, kiuj pruntedonas al ili la monon por ribelo, tiukaze ili devas mem pagi la revolucion. Tiel aŭ tiel. Sed ribeloj devas esti por ke la mondo antaŭeniĝu. Lago, kiu ne havas fluantan akvon aŭ de tempo al tempo ne estas skuata de ŝtormoj, komencas stinki kaj fine fariĝos marĉo.

**Rimarko**

*salvajes* = sovaĝuloj

Generalo ordonis blovi la signalon por la plumarŝo. Mankis ankoraŭ tri horoj ĝis sunsubiro.

„Ni tute bone povas pasigi ĉi tie la nokton“, opiniis Kolonelo.

„Ni povus“, rediris Generalo, „sed ni ne faros tion. Mi havas tion ree foje en mia stomako aŭ en la diafragmo, ke kontraŭ ni almarŝas bataliono aŭ eble eĉ divizio. Kiel facile oni povas okupi tutan urbon, tion vi ĉiuj vidis hodiaŭ. Se ni restus ĉi tie en la loko sen neceso, ni sidus tute mizere kaj kvazaŭ forlasitaj en kaptilo. Mi preferas la prerion aŭ la vepron, tie ni havos pli da loko. Kaj cetere, ĉi tie ni parolu nenion plu. Mi diras al vi, ni ekmarŝu kaj ekmarŝu ĉiu, kiu havas gambojn. Surŝarĝu ĉion!“ li vokis per resona voko trans la placon.

Horon post kiam la *muchachos* forlasis Aĥlumalon, la loko lante revigliĝis. La loĝantaro rampis el la kaŝaj anguloj en la kortoj kaj la malantaŭaj ĝardenoj de siaj domoj. Konsiderinda kvanto el ili kaŝiĝis malantaŭ la

altaroj en la katedraloj. Ial neniu el la *muchachos* iris en la katedralon por rigardi, kiel aspektas interne. Ne estis timemo aŭ superstiĉo, estis nur tial, ĉar neniu el ili supozis, ke en la katedralo troveblas io, kio uzeblas por ilia plumarŝo. Tio, kio estis plej grava por ili, estis armiloj, kaj ke la *cura* povus kaŝi armilojn, tion ili ne supozis. Ĉiujn armilojn, kiuj espereblis en la loko, ili konkeris.

Nur tial, por ankoraŭ alpropriigi eĉ la lastajn rustigitajn pafilojn kaj pistolojn, la ribeluloj entute haste persekutadis la civitanojn. Tuj kiam ili proksimiĝis al tia civitano kaj la persekutato posedis revolveron, tiu rapidis forĵeti ĝin al ili. Ĉiu civitano sentis, ke la neposedo de armilo gardas ties vivon.

Kvankam la civitanoj sufiĉe meritis, ke la *muchachos* glatigu malnovajn kalkulojn kun ili, la perdo estis, kiel konstatis la loĝantoj per nombrado, ne pli granda ol ĝi kutime estas, se la nigra variolo venis en la lokon.

Kompreneble, ĉiuj soldatoj kaj la oficistoj en la urbodomo plejparte mortis por la honoro de l' *Caŭdillo*, kiel oni poste povis legi en la gazetoj.

La honorindaj civitaninoj iris en siajn domojn; kaj el la postrestintaj potoj kaj restaĵoj de rizo, maizo kaj seka viando ili komencis pretigi la manĝon por la nokto.

Dum la inoj okupiĝis pri tio, iliaj edzoj staradis sur la foirplaco kaj rakontis reciproke, kiel kuraĝa ĉiu el ili estis kontraŭ la ribeluloj. Kaj kiel li pruvis al ili per tio, kiom pli valora estas ladino kompare al kota indiano.

Sed la pli prudentaj inter la civitanoj ne disipis tempon per tiaj fanfaraĵoj, kiuj enspezigas nenion. Ili rapidis disdividi la terure malordajn kaj tute malzorgitajn oficistajn postenojn de la urbo inter si, antaŭ ol la ceteraj homoj denove gajnis tempon refortiĝi post siaj aventuroj kaj kunparoli ĉe la nova okupo de la oficoj aŭ eĉ galimatii pri balotoj pro bezono. Fine diris iu el la viroj, kiuj sur la placo kunstaris grupope kaj kvazaŭ parole verkis herookantojn: „*Caramba, Vecinos*, ni ja devas pensi nun eĉ pri nova instanco; mi supozas, *compañeros*, mi ĉiam pruvis, ke mi havas honorindan karakteron, kaj ke mi ne estas malinklina en tiu ĉi malfacila tempo ŝarĝi sur miajn ŝultrojn la penojn de la posteno de l' urbestro de Aĥlumal.“

„Tion ni nun tuj priparolu, *don Aŭrelío*“, respondis *don Jesus Maria*, „mi estas konvinkita, ke vi apenaŭ serioze povus kontesti, ke mi posedas la honestan sintenon, la ĝustan senton por justeco por plenumi la taskojn de la posteno kiel tribunala juĝisto.“

„Kompreneble, kompreneble, *don Chucho*“, diris rapide obeeme *don Aurelio*, tuj komprenante, ke ĉiukaze li trovis je *don Jesus Maria* influriĉan civitanon, kiu estas je lia flanko.

„*Caballeros!*“ diris *don Pablo*, kun ses aliaj civitanoj proksimiĝante al la interparolantaj grupoj: „Ĉu mi rajtas prezenti al vi nian novan urban instancon kaj nian novan federacian administraron? Mi transprenis, fine sekvinte la insistan persvadon de la tre honorindaj civitanoj, la malfacilan oficon de la *Presidente Municipal*. Ni estas konvinkitaj, *caballeros*, ke vi sub la aktualaj cirkonstancoj ne kontraŭparolos; ĉar ni fidis pri via patriotismo kaj pri via bonvolema subteno kiel bonaj civitanoj.“

„Certe, certe, *don Pablo*“, vinagre diris *don Aŭrelío*, „ni,

mia amiko *don* Jesus Maria kaj mi, ni ne havas kaŭzon kontraŭparoli. Mi pensis, ke mi eble – “

„Ni pensis ankaŭ pri vi, *don* Aŭrelio“, interrompis lin *don* Pablo tre rapide, „tiel, kiel ankaŭ pri *don* Jesus Maria. Sed ni ekakceptis, ke vi pro viaj tabakaĉetoj kaj *don* Jesus pro ties aĉetoj de porkoj estas momente tro okupitaj kaj ni ne rajtas atendi, ke vi forlasu viajn bonajn negocojn por servi al la civitanaro kaj al la lando.“

„Kia malico de la viro kompari mian mizeran kaj ridindan negocon kun la grasaj enspezoj de urbestro“, pensis *don* Aŭrelio ĉagrenite. Sed laŭte li diris: „Mi estas konvinkita, *don* Pablo, ke nia urbo ne povus trovi pli bonan prezidanton ol vin.“

„*Muchas gracias, don* Aŭrelio, multan multan dankon pro via bona opinio“, respondis *don* Pablo. Li iris renkonte al *don* Aŭrelio kaj brakumis lin. „Mi dezirus, ke mi havus pli da amikoj tiel sinceraj kiel vi, *don* Aurelio. Venu do hodiaŭ vespere kun *don* Chucho por horo transen al mia domo. Mi havas tie ankoraŭ kelkajn botelojn da bona maljuna komiteko en la fono, kiuj ne

estis trovitaj de la pedikohavaj kotkanaĵoj.“

„Ĉu vi ne pensas, ke tiuj rabistoj kaj banditoj ankoraŭfoje venos ĉi tien?“ demandis *don* Emilio la novan urbestron.

„Estu sen zorgoj, *ciudadano*, ĉi tien ne plu venos ribeluloj, almenaŭ ne dum mi estas ĉi tie la Presidente Municipal. Tion mi povas garantii. Mi jam sendis du *muchachos* al Balun Canan kaj du aliajn al Jovel, al la militistaj *jefes* kaj priskribis al ili la vojon, kiun marŝas tiuj favaj friponoj. Jen okazos dum la sekvaj tagoj detala reordigado. Oni jam sufoku tiun damnitan ribelon enĝerme. Ni ĉiam nur tro favore traktis ĉiujn ĉi ulojn ĉi tie. Mi estas jam eterne por tio, ke impertinentaj peonoj kaj kriantaj *campesinos* ne estu ĵetitaj en prizanon, sed tuj pendumendaj, tuj, kiam ili nur ekmalfermas sian stinkantan buŝegon kaj parolas pri tio, ke ili ne havas justecon ĉi ti.“



## Ĉapitro 09

01

Sur prerio, inter Aĥlumal kaj Balun Canan trankvile kampadis la armeo de la ribeluloj. Multaj kaŭzoj instigis Generalon hezitigi la marŝon al Balun Canan.

Balun Canan ne estis foirloketo kiel Aĥlumal, ankaŭ ne urbeto kiel Hucutsin. La loko kun siaj pli ol dek mil loĝantoj apartenis al la plej gravaj en la federacia ŝtato. Tiu havis nur ses urbojn kun pli ol kvin mil loĝantoj.

Fortaj trupoj troviĝis tie en la garnizono.

Simple ataki la urbon, kiel faris tion la *muchachos* en Aĥlumal, ne estis entreprenebla; aŭ, se oni estus provus tion, ĝifiniĝus kun la kompleta neniigo de la ribelula armeo. Pri tio dubis neniu el la *muchachos*.

Generalo pripensadis zorgeme planojn, kiel li povus venki kaj neniigi tiujn trupojn sen devi sturmi la urbon, tiom longe, kiom ĝi estis okupata de la trupoj. Por povi ataki la

ĉefurbon de la ŝtato, necesis malhavigi la trupojn de Balu Canan endorse, des pli, ĉar la trupoj, kiujn li renkontus en la registara urbo, estus multe pli multnombraj kaj pli bone armitaj ol tiuj, kiuj restadis tiam en Balun Canan.

„Ĉu mi povas helpi iel al vi?“ demandis Modesta, kiu renkonte iris al Celso. Celso havis sian mitralon antaŭ si, purigis kaj lubrikis ĝin kaj rastis kun senfina pacienco pro malfirmiĝintaj ŝraŭboj kaj pri sablo.

„Kompreneble vi povas helpi al mi, *muchacha*“, respondis Celso. „Iru foje al tiu bivakfajro kaj eligu per rostado porkograson, por ke mi povu bone lubriki kaj olei ĉi tie. Damnite, kiam ni estis en Aĥlumal, mi estus kunportinta el *tienda* kruĉeton kun olivoleo. Sciu, Modesta, olivoleo, hispana olivoleo estas la plej bone uzebla, se oni devas olei mitralon, tiom longe, kiom oni ne havas la ĝustan maŝinoleon ĉemane.“

Modesta alportis pufan viŝĉifonan bulon, kiun ŝi metis surteren. „Jen la plej bona por poluri tian belegan kampkanonon“, ŝi diris ridante.

„De kie vi havas tiun ĉifonon, Modesta? Ĝi aspektas ja kiel silko.“

„Tio ja estas silko, Celso. Jen mia silka robo, kiun vi donis al mi en la *tienda* de la monterio. Sed por kio mi bezonu silkan robon, se ni estas en milito? Estas nun multe pli bone uzi tiun molan silkon por la purigado de la *ametralladora*.“ Dum ŝi diris tion, ŝi jam komencis poluri la latunajn partojn, kiuj kvazaŭ brilis tiel, ke oni povis respeguli sin per ili.

„Unue alportu la porkograson, poste vi povos plu purigi ĉi tie“, diris Celso.

„Tion povos alporti ja mi“, objetis Pedrito, kiu venis kun Modesta.

„Ĝuste, *chamaquito*“, rikanis Celso bonhumure. „Tion vi povos alporti same tiel bone kiel Modesta. Kaj tiam mi ankoraŭ montros al vi, kiel oni ĝuste laŭinstrukcie purigu mitralon. Ĉar tiukaze, se ni foje jam troviĝos en batalo, ne plu estos tempo olei kaj purigi ion, kaj se la kartoĉotransporto ekhaltus ĝuste en la malĝusta momento, tiukaze la uniformitoj ĵetus sin sur nin, kaj tiam adiaŭ, bela mitralo mia. Se vi volas fariĝi iam bona soldato, tiukaze bone memortenu, ke la plej grava afero

estas ĉiam preta jam tagon antaŭ la kontraŭulo kaj ĉiam esti du horojn pli frue sur la batalejo ol tiam, kiam avanco la soldosklavoj.“

„Tion mi memortenos bone, *mi comandante!*“ respondis Pedrito kaj militiste salutis. Poste li forkuris por serĉi ujon, per kiu li povos alporti la varmegan porkograson.

Modesta iom mediteme disfrotis en siaj manoj la silkajn ŝiraĵojn por fari ilin ankoraŭ iom pli molaj ol ili jam estis. Atente ŝi observis ĉiun manmovon de Celso, kiu firmturnis loziĝantajn ŝraŭbojn, gratadis per bastoneto sablon kaj polvon el la tuboj kaj fendetoj, turnadis la krankojn, alĝustigis turnigante la vizieron jen tiel jen ĉi tiel kaj palpebrume trarigardis ĝin, rapide turnis la tubon dekstren-maldekstren kaj rigardis tiam ree en la buŝon de la tubo por ĝojigi sin pri la poluritaj kaneloj.

Observinte lin jam dum certa tempo, Modesta ekĝemis elprofunde kaj diris poste mallaŭte kaj ektimigite: „Celso, ĉu vi scias, kion mi plej prefere volus esti en la mondo?“

„Kio do, *muchacha?*“ li demandis sen rigardi supren de la

celanta viziero.

„Mi volas, ke vi instruu min, kiel funkcias kanono tia, kia tiu ĉi, kaj kiel oni ekŝprucu la uniformitajn sklavojn kaj orelodetranĉistojn.“

Celso ekstaris kaj rigardis ŝin. „Mi pensas efektive, Modesta, ke vi povas fariĝi tre fervora kaj tre taŭga soldato ĉe mia mitralo, se vi bone memortenos tion, kion mi diros al vi. Sciu, knabino, dum ĉiuj ĉi noktoj mi vere ne bone dormis. Ĉiam mi devis pensi pri tio, kio efektive okazos, se min kaptos kuglo. Kiu poste transprenu mian mitralon? Tion mi volonte volus scii. Ĉiu alia viro havas mem sian postenon kaj sian laboron. Sed Ambrozio kaj Eŭlodio, ambaŭ miaj helpsoldatoj, eĉ ne taŭgas tiom, kiom malnova trivita salsako. Tion mi ja devas cedi al vi. Tiuj ne forkuros. Tiuj forkuros neniam, kiu ajn marŝos rekonte al ili. Sed, se la kanono ĉi tie ne ekpafos, ĉar io je la maŝino ne laŭordas, tiukaze ili ne scios kion fari, prenos siajn maĉetojn, jen la ununura ilo, per kiu ili diable bone scias bategi. Kaj tiu bela mitralo estos ekster servo, ĝuste kiam ni eble bezonos ĝin pli necese ol la puran aeron por spiri. Centfoje mi montris al ili. Sed la

*burros*, la azenoj, ne lernas ĝin. Eĉ celi ili ne povas. Ili tenas la mitralon antaŭen kaj pensas, ke la kakaokugloj flugos per si mem, kaj tien, kien ili deziras kaj rapidas kiel fulmoj al la *rurales*. Generalo sentas la saman kiel mi, ni tre affliktiĝas, ĉar neniuj scias kiel trakti la ŝprucilojn, kiujn li konkeras. Sed, vi, Modesta, povas lerni tion, tion mi scias tre bone. Vi estas prudenta. Al vi mi povos translasi la mitralon, kiam ni nepre bezonos ĝin en batalo, kaj mi jam estos ricevinta aĉan atakon al miaj intestoj. Ja kial ne? Vi povas esti same tia bona soldato kia mi mem. Mi instruos al vi ĉion, kion mi scias. Kaj mi estas certa, ke vi fariĝos unu el la plej bonaj mitralaj soldatoj ĉi tie ĉe la ribeluloj.“

Modesta rigardis lin kaj diris mallaŭte: „Vi estas karulo, Celso. Kaj mi pensas, ke mi devas ĉirkaŭbraki vin, ĉar vi estas tia bona *muchacho*, tioma bonkorulo, vere Celso, tio vi estas. Tion mi jam delonge volis diri al vi. Kaj nun rajtas diri tion, ĉar mi havas la permeson labori kun vi ĉe via bela pafilo.“

Modesta apenaŭ denove komencis poluri la mitralon kaj ĝisdetale, kiam Kolonelo stumble ŝanceliĝante alvenis.

„Kiaj mitralistoj sur la batalkampoj, kaj tio antaŭ la malamiko! Dio damnu ĝin, kion mi plenkreskigis ĉi tie?!“

“Ambaŭ, Celso kaj Modesta, rigardis timigite supren.

„Ne timemu, leporetoj.“

Kolonelo ridis. „Ĝis nun ne okazis io malbona. Bona soldato ĉiam tenu sian fusilon en bona ordo kaj tiel ĝisbrile polurita, ke li ne bezonas spegulon. Tio estas en garnizono kaj en paco. Sed ni troviĝas en milito. Ŝmiru kiam ajn koton sur la poluritan latunon kaj lasu krustiĝi la koton, tion mi devas diri al vi ambaŭ. Poste volvu branĉojn kun multaj folioj ĉirkaŭ la mitralon, tuj kiam vi scios pri la uniformitoj proksime. Kompreneble ne permesu, ke la koto penetru en la tubon kaj en la kulason kaj en la kartoĉotransportilon, por ke la maŝino ne misfunkciu. Se ĝi tiel brilos kiel nun, ĉe la diablo, tiukaze oni vidos ĝin je distanco de cent mejloj kaj eĉ ne bezonos teleskopon. Farbon vi surŝmiru aŭ grason, kaj ŝutadu cindron sur tion. Jen la ĝusta en la milito. Kiam la diodamnitaj kanajloj almarŝos, la mitralo devos ŝpruci kiel el bovokaco, sed ili ne vidu, de kie la ŝprucado venas.



Ĉu vi nun komprenas la tuberon en la afero, Celso?“

„Vi pravas, Kolonelo. Tion mi ne pripensis.“

„Tion vi ja ne povis. Neniu antaŭe diris tion al vi. Sed de nun vi scias tion. Ĝi estas ordono de prudento.“

„Nun vi pripentas vian belan silkan robon, ĉu?“ demandis Celso, kiam Kolonelo jam forstumblis.

„Eĉ ne je centavo“, respondis Modesta. „En ĉiu kazo ĝi ĉiam ĝenis min. Mi hontis, ke mi havas ĝin. Ĝi aspektis tute tiel kiel la roboj de la riĉaj ladininoj. Por kio mi bezonu silkan robon, se ni ja estas ribeluloj?“

„Kie vi restis kun la varmega porkograso?“ laŭte vokis Celso, kiam li vidis sagi al si Pedriton, kiu atenteme mantenis kruĉeton.

„Jen ĝi, Celso, oni devis unue buĉi la porketon“, kriegis Pedrito tiel forte kiel li povis. Sed la respondo kaŭzis, ke li ne povis atenti la ŝtonecan grundon. Li falis laŭlonge, la kruĉeto disrompiĝis, kaj la graso elverŝiĝis vaste sur la tero.

„Kaj jen Pedro kuŝas en la kaĉo enkote,“, vokis ridante Celso kaj iris renkonte al la knabo. „Saltadu tuj denove transen al unu el al bivakfajroj kaj alportu ankoraŭfoje grason.“

„Ĉeestas neniom plu“, diris la knabo kaj komencis plori.

„Kial neniom?“ demandis Celso. „Porketo havas ja pli da graso ol ĝuste nur plenan kruĉeton.“

„Jes“, plorsingulte diris la knabo, „sed kiam mi diris por kio vi bezonas la grason, ĉiuj viroj kun siaj fusiloj kaj revolveroj alvenis kaj volis lubriki kaj olei, kaj jen tuj la tuta graso foriĝis.“

Celso kliniĝis al la kruĉetaj pecetoj kaj kun la helpo de Modesta komencis forskrapi atente la supran grason, kiu ankoraŭ ne tuŝis la sablon kaj metis ĝin sur alian peceton.

Fariĝis nokto. Generalo atingis iun el la eksteraj bivak-fajroj, kiuj havis la taskon funkcii kiel gardocentralo por la pli distance elsenditaj gardopostenistoj. Ĉe la fajro kuŝis du *muchachos*, kiuj kriaĉis kaj kantis.

„Ekstaru!“ komandis Generalo.

„Vi ne rajtas komandi ion al ni, ĉu komprenite?“ diris unu el ili, dum la alia pezpaŝe penis ekstari.

„Kial vi ekstaras, restu kuŝanta“, vokis la alia.

Kelkaj el la *muchachos*, kiuj akompanis Generalon, alsaltis kaj levis per fortikaj krudaj manoj la du ebriajn *muchachos* surpieden.

„Kiel vi nomiĝas?“ demandis Generalo la unuan.

„Tio koncernas vin tiel, kiel bulo da fekaĵo“, estis la respondo.

„Jen bona nomo por vi, elfekito“, diris Generalo. „Precize

tiel vi aspektas, kiel elfekita monteto.“

„Kaj vi?“ Generalo demandis la duan.

„Davila, Angelo Davila.“

„De kie vi havas la brandon, kiun vi drinkis?“

„De tie transe, de la *ranchito*. Ankaŭ li estas povra peono, ĝuste tiel, kiel ni“, diris Angelo Davila.

„Mi ordonis vin kaj ankoraŭ kvar pliajn kiel gardistojn ĉi tien, ĉar vi havas karabenojn.“

„Ili estis armiloj niaj“, diris unu el ili kriante, „tiujn konkeris ni, kaj per ili ni povas fari, kio plaĉas al ni.“

„Kie vi do havas ilin, la karabenojn?“ demandis Generalo trankvile.

„Generalo“, diris nun Angelo konfideme, „Generalo, ne pensu, ke la peono en la *ranchito* povas donaci al ni brandon. Li estas same tiel povra kiel ni.“

„Ne tute tiom povra, kiom vi ambaŭ“, korektis lin

Generalo. Poste li turnis sin al la *muchachos*, kiuj tenis ilin surpiede. „Delasu ilin, ili estas kadavroj.“

La *muchachos* retropaŝis kaj la ebruloj ambaŭ ŝanceliĝis tien kaj tien, sed sen fali teren. Generalo pafis dufoje.

„Ĵetu ilin en la fajron“, li diris al la *muchachos*. „Puŝu ilin per piedbatoj sur ĝin kaj estingu la fajron per surŝutado.“

Poste li elpoŝiĝis peson kaj komandis al kvar *muchachos*, ke ili iru al tiu *ranchito* kaj donu la peson al la peono tie kaj reportu la karabenojn.

Poste li iris al la kvar lokoj ankoraŭ pli distance ekstere, kie la eksteraj postenuloj devis gardi. Li iris sola. La kvar *muchachos*, kiuj tie devis restadi ĉe bivakfajro por plenumi tion, kion Generalo ordonis al ili, aŭdis kvar pafojn.

„Tiujn ekstere“, diris Generalo, kiam li revenis, „ni translasos al la kojotoj kaj vulturoj. Kaj krome“, li aldonis kaj rigardis al la *muchachos*, „se iu supozas, ke ni ĉi tie vagadas kaj marŝadas pro nia plezuro, jen tiu eraras. Tion finfine ja ĉiu ekkomprenu. Aŭ ni faras ribelon aŭ ni

promenas. Sed, se ni konvinkiĝis, ke ni faras ribelon, jen estas do ribelo kaj ne feria ekskurso. Ĉu ĝuste ĉu ne ĝuste?“

„Ĝuste, Generalo,“, respondis Profesoro, „ĝuste pensite kaj ĝuste farite. Tiu, kiu ne komprenas tion, ĉi tie ĉe ni ne serĉu kaj ankaŭ ne trovu ion. Ni ne bezonas lin kaj pli bone statas sen lia kunhelpo. La vivu-kriado ne gajnas revolucion. Pri la vivu-bruado ni tute bone povus rezigni, sed ne pri ribeluloj, kiuj scias, kial ili estas ribeluloj.“

Generalo elektis kelkajn *muchachos* por la denova okupado de la eksteraj postenoj.

Malfrue posttagmeze alvenis kvar peonoj en la kampadejo. Gardisto de posteno kondukis ilin al Profesoro, por ke li aŭskultu, kion ili celas.

„Do kio kondukas vin ĉi tien?“ li demandis. Kaj li demandis laŭ maniero kaj mieno, kvazaŭ tiaj vizitoj okazus ĉiutage dekfoje.

Efektive peonoj aŭ aliaj indiĝenoj ne venis en la kampadejon, escepte de tio, ke ili tute hazarde sur sia vojo renkontis la kampadejon. Eĉ en tiaj kazoj ĉiu el tiuj homoj rapidis forlasi la kampadejon, tuj, kiam li nur ekvidis la unuan postengardiston. La indiĝenoj fariĝis dum kvarcent jaroj da senrajteco tiom misfidemaj, ke ili per siaj lipoj diris JES al ĉio, sed per sia menso fidis al nenio kaj al neniu kaj ili konfidis plej malmulte al tiuj, kiuj venis al ili kun la aserto, ke ili estas iliaj amikoj aŭ intencas fariĝi tio.

Do estis kompreneble, kial Profesoro atente rigardis la kvar peonojn, sed kompreneble sen montri tion al ili.

Unu el la peonoj respondis: „Oni multe parolas en la bienoj pri vi, pri la viroj de la monterioj, ke vi volas liberigi ĉiujn kaj intencas doni al ĉiu teron kaj agron, liberon kaj sendependecon, se vi venkos. Se tio estas ĝusta, ni venis ĉi tien por paroli kun via *jefe*, ke li venu ankaŭ al nia bieno kaj liberigu ankaŭ nin, ĉar ni estas tre servutitaj.“

La maniero, kiel parolis la viro, fortigis la supekton de Profesoro, ke io ne estas en ordo pri ili. Li rimarkis, ke la parolanto penis pri erara hispana, tiel, kiel senkonscie faras la peonoj, ĉar ili pli kutimas sian propran indiĝenan lingvon ol la hispanan. Speciale la parolturno „ĉar ni estas tre servutigitaj“ frapis Profesoron strange fremde. La peonoj, kiel ĉiuj indiĝenoj, ne esprimas sian malican ekonomian staton kaj sian malgajigan socian situacion per tiaj vortoj. De ilia infaneco oni kutimigis ilin al laboro, tiom longe, kiom estas ankoraŭ sparko da forto en ili. Kontantan salajron ili ricevas neniam, kaj ili ne parolas pri tio, ke ili estas sklavigitaj aŭ subigitaj, sed ekstremokaze eble nur pri tio, ke ili estas tro povraj por povi pagi siajn ŝuldojn ĉe la patrono por rajtigite forlasi la



bienon kaj setli sur iu neloĝata loketo da tero por vivi kiel sendependaj etkampanoj.

„Nia *jefe* nun ne ĉeestas, *muchachos*,“, respondis Profesoro kun enua voĉo. „Li ekzercas kun la viroj tie transe sur la prerio, de kie vi aŭdas la knaladon. Ankaŭ mitralojn ni havas.“

La parolanto de la vizitantaj peonoj mirigite mienis. Sed kiam li konsciiĝis pri tio, ĉar Profesoro fikse rigardas lin, li tuj reŝanĝis sian vizaĝon al la ŝtipkapula subula kaj humila aspekto, kiun li prezentis ĝis tiu momento. Tiu transformiĝo en la vizaĝesprimo Profesoron nur des pli certigis, ke io ne estas en ordo pri tiuj vizitantoj. Sed li ne povis imagi, kion la viroj celas.

Nun proksimiĝis Kolonelo, kiu same ekzercigis virojn kaj intencis kunvoki novajn grupojn. Li rigardis la kvar virojn, rulumis cigaredon por si, sed diris nenion.

„De kiu bieno vi estas?“ demandis Profesoro.

„De *Las Margaritas*.“

„Kiu estas via patrono?“

„Nia patrono, ĉu?“

„Jes, via patrono.“

„Nia patrono estas, jes, tio estas, nia patrono estas *don* Fernando, jes ja, tio estas nia patrono.“

„Kia estas ties familia nomo?“

„Sosa, *don* Fernando Sosa.“

„Jen vi do venis ĉi tien por konduki nin al via bieno, por tie disdividi la bienon inter vi, peonoj?“

„Tiel estas, *jefecito*, ĉefĉjo. Tial ni venis ĉi tien. Kaj tion ni volus preparoli kun via *jefe*.“

„Eksidu tuj ĉi tien al la bivakfajro“, diris nun Profesoro kun rikano, kiu je duono similis tiun de dommastrino, kiu neatendite estas vizitata de iu, kiu volas restadi ankoraŭ ĉe la vespermanĝo, kaj kiu havas nur varmigitan restaĵon de lavotaga tagmanĝo en la domo, kaj je la alia parto la

rikano similis al tiu de Satano, kiu staras ĉe la pordego, kiam la nova ĉarpleno alvenas kaj rimarkis inter la frajto ses metodistajn predikantojn kaj ses elsekigitajn fratinojn el eklezio. „Jes, sidiĝu ĉi tie ĉe la bivakfajreto. Vi kompreneble estas malsataj de la longa vojo, la *muchachos* donos al vi *frijoles*, tortiljojn kaj kafon. Tiajn bonkvalitajn aŭ malbonkvalitajn, kiajn ni havas.

Profesoro leĝere promenis transen al la grupo de viroj, kiujn Andreo instruis legi kaj skribi. „Andreĉjo“, li diris tute ne atentofrape, „venu foje al la bivakfaro de la stabo, mi supozas, ke ni havas *chinch*es, cimojn, kiuj venis en la kampadejon.“

„Kiel vi opinias tion, Profesoro, *chinch*es, ĉu?“

„Ĉu eble vi scias, kie estas la bieno Las Margaritas?“

„Proksimume. Kiam mi ankoraŭ estis ĉaristo, ni havis ofte frajton por *don* Susano en Las Margaritas.“

„Do, sekve *don* Susano estas la bienulo de Las Margaritas. Mi pensis, ke li nomiĝas *don* Fernando Sosa.“

„Kial li nomu sin *don* Fernando, se li nomiĝas *don* Susano?“

„Tion mi jam pensis. Ĉu vi konas la bienon Las Margaritas?“

„Mi estis neniam tie. Ni transportis la frajtojn por Las Margaritas ĉiam nur ĝis Balun Canan, ĉar la vojo al Las Margaritas estas malvasta kaj aĉa kaj neniuj ĉaroj tie veturigeblas. La bienulo sendis *arrieros* al Balun Canan, por tie transpreni la frajton kaj poste transporti ĝin per muloj ĝis la bieno. Estas eble ses ĝis ok leŭgoj ĝis Balun Canan.“

„Nu, kaj kiun lingvon parolas la peonoj en Las Margaritas?“

„Ili parolas tojolabale kaj hispane. Kompreneble, en la kabanoj inter si ili parolas nur la tojolabalan.“

„Ĉu vi estas konvinkita, ke ĉiuj peonoj vivantaj en Las Margaritas, eĉ, se ili scias kompreni kaj paroli la hispanan, tamen regas ankaŭ la tojolabalan?“

„Ĉiuj, sen ecepto. Eĉ *don* Susano sufiĉe bone parolas ĝin, kaj la *mayordomo* kaj la *capataces* parolas ĝin tiel bone kiel la peonoj. Ili ja ĉiuj estas el tiu regiono, tie naskitaj kaj tie plenkreskintaj. La *mayordomo* estas aŭtentika filo de *don* Susano, kiun tiu faris kun Tojobal-knabino. Ŝi

havas ankoraŭ pli da infanoj de li, de *don* Susano, pri kiu mi parolas. Kaj kvankam li estas jam pli ol dudek jarojn la edzo de *doña* Paulina el Balun Canan, kiel civilulo kaj kiel ekleziano, kaj havas kun ŝi naŭ aŭ dek infanojn, li tamen estas ĉiun duan tagon posttagmeze ĉe sia bona *Soledad*, por kiu li konstruigis belan *jacal*, kaj li donis parcelon al ŝi, kaj dudek kvar porketojn li donadas al ŝi je ĉiu Epifanio kiel donacon. Ankaŭ monon li donas al ŝi.“

„He, ĉi ĉion mi ne volas scii.“

„Nur por ke vi komprenu, ke eĉ ne unu ulo vagadas en Las Margaritas, kiu ne komprenas la tojolabalan.“

„Jen tio, kion mi volas scii. Alvenis kvar strangaj birdetoj. Mi nur ne scias ankoraŭ, kiu sendis ilin, ĉu la guberniestro ĉu la bienulo ĉu la *rurales* ĉu la *federales*? Venu foje transen kaj rigardu ilin kaj parolu tojolabale kun ili“.

„Multe da tojolabala mi ne regas, mi estas celtalo; sed mi scias ĝin sufiĉe bone por eltrovi, ĉu la peonoj estas de Las Margaritas.“

Profesoro kaj Andreo iris senhaste al la bivakfajro, kie sidis la kvar viroj kaj manĝis sindoneme, dum dekdu *muchachos* ĉirkaŭsidadis kaj parte babilis, parte fumis kaj parolis inter si.

En la armeo estis pli ol tridek aŭ kvardek tojolabal-indiĝenoj, eble eĉ *muchachos* venditaj de la patrono de l' bieno Las Margaritas en monterion aŭ ili fuĝis de tiu bieno. Sed serĉi ilin ne estus facila afero, kaj krome ili eble ne bone komprenus, kion Profesoro celas de ili. Andreo en ĉiu kazo estis la plej taŭga por orelumi la kvar vizitantojn.

Li proksimiĝis kvazaŭ hazarde al la bivakfajro kaj rulumis cigaron por si. Poste li kliniĝis ĉe la fajro kaj eltiris ardetantan branĉon. Sen rigardi iun el la kvar uloj, li diris laŭte tojolabale: „Vi fuĝis de via bieno, ĉu ne?“

La kvar viroj manĝis trankvile plu kaj parolis de tempo al tempo al la *muchachos*, kiuj interparolis hispane kun ili.

Nun turnis sin Andreo, dum li leviĝis kaj suĉis je sia cigaro, senpere al unu el la kvaropo, kiu plej proksimis de

li. Denove li parolis tojlabale: „Ĉu vi ankoraŭ nun havas en la bieno la maljunan mulpeliston, kiu ĉiam ebriigis sin en Balun Canan, se li transprenis frajton?“

La parolanto de la grupo nun ekkomprenis, ke li mem estas celata kaj respondu. Li embarasiĝis kaj sulkigis la vizaĝon kvazaŭ li devus pripensi. Poste li rigardis timeme de malsupre supren al Profesoro, ĉu tiu aŭskultas ilin. Profesoro staris flanke kaj interparolis kun *muchacho* sed ne preteratentis eĉ unu vorton aŭ geston de la parolanto.

Fine ekparolis la parolanto de la kvar vizitantoj. Li diris kun oblikva ridado: „Ni havis tre longan vojon, *amigos*, tio estas ĝusta.“ Li diris tion hispane kaj provis formi la sonojn profunde el la gorĝo, kiel faras tion plej ofte la indiĝenoj kutimigintaj al sia propra lingvo.

„Jes, tion mi jam pensis“, respondis Andreo, kaj ĉifoje en bona hispana, „tion mi bone imagis, tial mi ja demandis. Estas tre longa vojo.“

Andreo kliniĝis pluan fojon kaj denove ekbruligis sian cigaron. Ĝi brulis bone, sed li volis ankoraŭ pli detale



observi, kion li rimarkis ĉe la parolinto. Li suĉis forte je sia cigaro kaj senhaste iris renkonte al Profesoro.

„Ĉu vi parolas tojlabale?“demandis Profesoro.

„Diru foje: Ĉu vi kiam ajn vidis povran peonon en via tuta vivo, kiu havas enbuŝe riparitan dentojn orumitajn?“

„Ĉu li havas orumitajn dentojn? Tion mi ne rimarkis.“

„Sed mi. Kaj krome ili komprenas eĉ ne ununuran vorton el la tojlabala.“

Profesoro ordonis al tri *muchachos* gardi la kvar vizitantojn, sed tiel, ke ili ne rimarku tion, kaj se ili ekstarus, ili rajtu fari tion, sed la gardistoj ne lasu ilin el viddistanco kaj nepre malhelpu, ke la kvaropo eble eĉ forlasu la kampadejon.

### **Rimarko**

*Epifanio* = Evangelia epizodo kaj la granda kristana festo al ĝi dediĉita, festata je la 6a de januaro, kiu por la plimulto de la kristanaj eklezioj estas la 12a tago post Kristnasko.

Nun estis nokto. Ĉiuj bivakfajroj kampadeje flamis.

Generalo alvenis ĉe la staba bivakfajro, sin kvazaŭ treniĝante kaj lace. Dum la tuta longa tago li instruis al la viroj kun la subteno de Kolonelo, Matiaso, Celso, Fidel kaj aliaj pli inteligentaj *muchachos* celekzercojn kaj pafatrejnadon, li ĉirkaŭkuradis kun la *muchachos* kiel rekruto; supren-malsupren kaj supren li ekzercadis kun ili, tiom longe, ĝis li apenaŭ plu povis leviĝi mem. Poste li instruis ilin kiel antaŭenpaŝi en vastaj pafistolinioj, kiel serĉi bonan kamuflon ĉe la terenjetigo; li instruis ilin ne lasi eniri sablon en la tubojn aŭ en la kulason de la karabenoj, kiam ili kuŝis surtere aŭ rampis; li instruis ilin pafi genuante kaj kuŝante kaj li montris al ili, kiel oni rapide fosu en mola tero platajn fossejojn por sterni sin en ili kaj doni nur malmultajn celpunktojn. Ĉio, pri kio li iel povis memori, ke li mem lernis tion aŭ tion instruis kiel serĝento, li instruis nun al la *muchachos*. La hommaterialo, kiun li havis je dispono, estis dudekfoje pli harhirtiga ol ĉio, kion li ricevis kutime en la formo de

novaj rekrutoj en sia bataliono. Se la *muchachos* ne estus tre bonvolemaj kaj gajegaj pro entuziasmo pri la sekva batalo, li certe devus malesperiĝi vidalvide kun la tro malkontentigaj rezultoj, kiujn estigis lia ekzercado.

Tial oni ne miris, ke li venis al la fajro kiel viŝĉifono kunfaldiĝanta.

„Kaj tio estas via *jefe*, via generalo, ĉu?“, diris unu el la kvar vizitantoj mallaŭte al sia najbaro, kiam ili konkludis el la salutado kaj alparolado de la *muchachos*, ke tiu laca, senforta, ŝanceliĝanta, kota kaj nekombita bruna ulo, kiu venis el la fajro, estis la ĉefo de la ribeluloj.

„Tiu ni batos grimacen kaj tiam li falos laŭlonge sur la koton“, frustrante diris la plej proksima najbaro, „tium pedikohavan kaj pispantalonan fatrasistaron ni kunpelos per bastonoj. Mi ne scias, kial nia ĉefĉjo en tiu kazo tiom spektaklas kaj volas sendi eĉ tri batalionojn. Mi kunpelus ilin per kompanio, tiujn kanajlojn.“

„Ĉe la diablo“, diris mallaŭte alia, apenaŭ malfermante siajn lipojn kaj premante la vortojn inter la dentoj

eksteren, „damnite, fermtenu viajn babililojn inaĉajn, ĉu vi ne vidas, kiu tie rigardas transen al ni kaj observas nin?“ Estis Profesoro, kiu ĉiam denove devis rigardi al la kvaropo por elpensi, kiu ili eble estas, kaj kiun celon ili havas.

Kolonelo diris, turnante sin al la *muchachos*, kiuj apartenis al la stabo: „Ni iru transen al la bivakfajro, ĉe kiu sidas Celso kaj lia *muchacha*, kiu kuiras. Ili havas porkon ĉenuke. Aspektas malsatige ĉi tie.“

„De kie vi havas la porkon?“ demandis Profesoro Celson, kiu leĝere promenis apud li.

„Mi ne scias, kiu diris ion pri porko, ne estas porko, estas antilopo. Mi estis kun Modesta en la vepro kaj ordonis al ŝi klakadi proksimume dek pafojn de la mitralo, por ke ŝi lernu la celpafadon. Kaj jen la antilopo subite kuris en la celkampon. Modesta tratiris, kaj jen la antilopo sternis sin ĉe la dua pafo. Ambaŭ pafoj trafis.“

„Pro tio mi range altigos ŝin morgaŭ al suboficiro“, diris Generalo kun laca ridado en la voĉo. „Kaj vi, Kolonelo“,

diris Celso ridante, „povas lerni tion de la *muchacha*. Vi elpafis brue kvazaŭ dudek grenadojn sur la arbon, kiel mi vidis tion hodiaŭ posttagmeze kaj boris tamen nur ununuran en la vastan trunkon.“

„Vi devas konsideri la distancon“, respondis Kolonelo.  
„La antilopon oni povis kapti je la vosto, tiel proksime ĝi estis.“

„Pri tio vi miros, Kolonelo, diris Celso ridante. „Ĉu kapti permane? Jen mi ja vere tuj volus ekkrii. Kapti permane. Kaj eĉ voste. Ĝi malproksimis almenaŭ ducent paŝojn.“

„Ĉu vi mezuris la ducent paŝojn per irado?“ demandis Kolonelo.

„Mi ne devas promeni la distancon. Mi ja ankoraŭ scias, kiom estas ducent paŝoj.“

Kiam ili kaŭris jam ĉe la bivakfajro de Modesta kaj manĝis rostitan antilopon kun neniuj aliaj aldonaĵoj krom tortiljo kaj freŝaj herboj plukitaj ĉe la rando de la vepero, diris Profesoro post certa tempo: „Ni povus manĝi ankaŭ ĉe nia bivakfajro. Sed tiukaze devus forsendi ilin por povi interparoladi. Sed mi volis lasi ilin tie, por ke ili ne rimarku, ke ni scias, kia speco de peonoj ili estas.“

Generalo diris nenion pri tio. Sed dum li manĝis kaj penis ne ekdormi, alvenis plurfoje *muchachos* en la vepron, kiuj flustris mallaŭte sciigojn en liajn orelojn, kaj al kiuj li parolis same tiel mallaŭte ordonojn.

Liaj oficiroj ne tre interesiĝis pri tio, kion li ordonis, kaj kiamaniere li preparis siajn planojn. Iam kaj tiam li metis demandon al Kolonelo, poste al Profesoro aŭ al Andreo aŭ Matiaso; kaj la respondojn, kiujn li ricevis, li ŝajne enplektis en siajn ordonojn, kun kiuj li forsendis la virojn.

Poste li petis Matiason, ke li rulumu cigaron por li kaj poste ekbruligis ĝin. Kiam li enspiris jam kelkajn fojojn la

fumon de la cigaro, lia laceco ŝajne malpliiĝis. Li aspektis tiel kvazaŭ li dormus neprofunde kaj ripozus dum li manĝis. Li kaj la plimulto de ties konsilantoj ne kaŭris apud la bivakfajro, kiel okazis kutime, sed sidis sur mallongaj arbotrunkoj, kiuj tie kuŝadis kaj poste estis uzotaj por pli grandaj bivakfajroj, por doni al la kampadejo pli gajigan aspekton kaj por teni ĉiujn *muchachos* en bona humuro.

Je la staba fajro ekflamis nun granda stako da ligno, kiu samtempe estis la signalo, bruligi ĉiujn aliajn grandajn stakojn kaj por fini la tagon per kantado, muziko, danco kaj ĝenerala gajeco.

Denove alvenis *muchacho* kaj transdonis mallaŭte sciigon. Generalo ekstaris kaj mansignis al ĉiuj, ke ili sekvu lin.

Ili iris transen al la staba fajro, kie ili sidiĝis sur la trunkojn.

„Jen vi, vermoj, ja ankoraŭ nun estas“, li diris al la vizitantoj, kiuj ŝajne fartis bone ĉe la granda fajro aŭ almenaŭ provis ŝajnigi tiun impreson.

„Jes, *jefecito*, ni estas ankoraŭ ĉi tie“, respondis la viro kun la riparitaj orumitaj dentoj. „Sed kun via permeso ni nun volus ekiri hejmen, ni havas ankoraŭ longan vojon antaŭ ni.“

„Kiom oni pagis al vi por la vojo, *hombres*?“ demandis Generalo seke.

Ĉiu el la kvaropo iom paliĝis post tio. Sed la parolanto rapide retranskiviligis kaj diris: „Nin neniuj pagis, *jefecito*. Ni estas povraj peonoj kaj volas nur scii, kiam vi venos al nia bieno, por liberigi nin el la servuteco.“

Kiam la vortoj „eliberigi nin el la servuteco“ estis parolitaj, rikanis Profesoro kaj rigardis al la vizaĝo de



Generalo por ekscii, kiel li akceptos la esprimon.

„Povraj peonoj de *Las Margaritas* vi estas, ĉu?“  
demandis Generalo, eble eĉ iom pli seke ol antaŭe.

„Jes ja, *jefecito, a sus muy amables ordenes!*“

„Vi“, diris Generalo, tute ŝanĝante sian voĉon kaj sen aspekti eĉ iomete plu laca survizaĝe: „vi, leŭtenanto Ruben Bailleres, estas la komandanta oficiro de la tria kompanibataliono sesdek sep, garnizono Yalanchen. Kiu estas la tri aliaj, mi ankoraŭ ne scias, sed morgaŭ vespere mi scios ankaŭ tion.“

La kvar viroj provis malsekigi siajn lipojn per lekado, kio ŝajne ne sukcesis al ili, ĉar ili ekmovis la makzelojn, ĉar la salivo subite perdiĝis.

Profesoro vaste malfermis la okulojn kaj gapis senhelpe al Generalo. La ceteraj *muchachos* ne miris malpli ol la kvar vizitantoj, sed ili havis malpli da penoj estigi novan salivon en la buŝo.

Daŭris certe tri aŭ kvar minutojn antaŭ ol la leŭtenanto

ekparolis.

Fine li diris tiel, kvazaŭ la sonoj en la gorgo sufokiĝus:

„Tio estas eraro, *jefecito*. Ni estas peonoj de *Las Margaritas*, kaj tio estas vere kaj efektive vera.“

„Ankaŭ ĉe Plejsankta Virgulino?“

„Jes, *jefecito*, por la Madre Santisima!“

„Vi ne estas invititaj ĉi tien.“

„Tio estas ĝusta, sed ni volis ekscii la veron.“

„Kiun veron?“

„Ke vi al ni, al la peonoj, volas doni teron kaj liberon.“

„Al la peonoj certe. Sed al la *oficiales* de la *federales* kaj de la *rurales* kaj al ĉiuj uniformitaj sklavoĵoj kaj postajaj lekuloj ni donos alian. Ĉu vi nun eventuale volas ankaŭ vidi niajn arsenalojn?“

„Ne, *jefecito*, ni volas nun iri hejmen al niaj *jacalitos*.“

„Ni ĉiuj, do ĉiuj *muchachos*, volas jam de jaroj iri hejmen al niaj kabanoj kaj al niaj familoj kaj ne povas fari tion. Tial ankaŭ vi ankoraŭ devos atendi horon.“

Generalo alvokis per mansigno kvin *muchachos* kaj parolis mallaŭte kun ili. La viroj, kiuj sidis ĉe la fajro, aŭdis nur la lastan frazon, kiun li postvokis al la *muchachos*.

„Serĉu al vi firman sakon kaj poste revenu ĉi tien.“

La kvar vizitantoj ekstaris kaj intencis foriri.

Sed en tiu ĉi momento la *muchachos* alkuris kaj svingadis malplenan sakon.

„Sekvu tiujn *muchachos* kaj rigardu unue nian arsenalon antaŭ ol vi reriros al *Las Margaritas*“, diris Generalo al la kvar viroj. Li kvazaŭ substrekis la vortojn *Las Margaritas* per ironia rikano.

Kiam la kvar vizitantoj jam iris proksimume dek paŝojn kaj komencis foriĝi en la malhelo, vokis Generalo: „Ne, vi, *teniente*, ankoraŭ restos momenton ĉi tie. Viaj tri

*compañeros* vidos pli ol sufiĉe.“

De nun nek li nek la aliaj ĉe la bivakfajro okupiĝis plu pri la leŭtenanto, kiu seninterrompe kaj kun abruptaj kaj eksaltemaj gestoj rigardis en la nokton tien, kien foriris la *muchachos* kun la tri aliaj. Troviĝis tie kelkaj grandaj bivakfajroj, sed li ŝajne tamen ne vidis tion, kion li intencis vidi.

Pasis certe nur dek minutoj, kiam la *muchachos* revenis sen la tri vizitantoj. Ili ĵetis sakon antaŭ si sur la teron. La sako estis kunligita per bastŝnuroj. Ĝi estis tute kota kaj malseka kvazaŭ ĝi estus trenita tra ŝlima tero.

Generalo mansignis al du *muchachos*. Per unu salto ili ĵetiĝis sur la leŭtenanton. Kaj kiam ili ree desaltis de li, fluis la sango trans ties vizaĝo kaj laŭ liaj flankoj malsupren. Li ne aŭdebligis sonon, sed nur provis defendi sin. Ili detranĉis lian nazon ĝis la komenco de la ostaro kaj ambaŭ orelojn laŭlonge enmeze.

„La *muchachos* pro viaj fiaj mensogoj aldone devus tranĉi en viajn lipojn, per kiuj vi alvokis eĉ Sanktan Virgulinon

por povi mensogi pli konvinke. Sed viajn lipojn mi bezonas ankoraŭ, *teniente* Primero Ruben Bailleres. Vi devos heroldi mian sciigon al via *jefe divisionario don* Petronio Bringas. Kaj por ke mi rekonu vin, kiam mi eble denove vin trafos kaj demandos vin, ĉu vi ankaŭ ĉion tiel sciigis al via generalo, kiel mi sciigis tion al vi, tial mi devis mallongigi vian nazon. Estontece oni nomos vin nur *chato*, platnazo. Ankaŭ tio estas bela nomo, ĉu ne?“

La leŭtenanto diris nenion. Per sia ĉemiza maniko li forviŝis la sangon, kiu fluis en lian buŝon kaj laŭ la kolo malsupren. Li ne aŭdigis dolorsonon. Sed Generalo sciis aŭ facile povis imagi, ke la leŭtenanto en tiu momento forgesis ĉiujn dolorojn kaj pensis nur pri la horo, kiam li havos Generalon kiel kaptiton antaŭ si, tiel, kiel li kaŭris nun antaŭ li. Kvankam ne estis certe, ĉu li iam kaptos Generalon, la pensado pri tio tamen treege bonfartigis lin.

„Mi povus pendumi vin, *teniente*“, parolis Generalo plu „sed mi havas gravajn sciigojn al *don* Petronio. Kaj vi estas la plej bona herolda rajdisto, kiun mi povus trovi. Viaj ĉevaloj staras en la ranĉeto *La Primavera*. Morgaŭ

frue je la oka aŭ naŭa vi jam povos esti ĉe via bataliono. Tial mi kunprenigos ĉi tiun sakon al vi. En la sako estas la matenmanĝo, kiun mi sendas al via *jefe*, kiel agnoskon, ke li pensis pri mi kaj sendis al mi tri oficirojn kaj serĝenton, por ke ili demandu pri mia bonfarto. Aŭ ĉu ankaŭ la kvara el vi estas eĉ leŭtenanto? Sed tiukaze la tri aliaj ja ne havus serviston por la ĉevaloj.“

Generalo tiris kruĉon kun kafo el la bivakfajro kaj plenverŝis trinkujeton, kiun li ĉirkaŭtenis per ambaŭ manoj, kvazaŭ li volus varmigi sin per ĝi. Kelkajn fojojn li kirlis la kafon. Tiam, kiam ĝi iomete malpli varmegis, li trinkis plurfoje.

Pli kaj pli da *muchachos* venis al la staba fajro. Ili urĝis por veni tute proksimen, por ke ili aŭdu ĉiun vorton el tio, kion Generalo intencas sciigi al la *divisionario* de la federacia armeo.

„*Don* Petronio staras kun du batalionoj da infanterio kaj mitraltaĉmento proksime malantaŭ *La Peña Alta*, kie li kaŝiĝas kaj atendas, ke mi trotu kun mia armeo en ties malvasta vojon. Diru al li, ke mi ne povos plezurigi lin

per tio, ĉar mi ne iros en kaptilon, kiu estas metita tiel stulte.“

La leŭtenanto gapis fikse al Generalo, kvazaŭ li vidus ekaperi fantomon malantaŭ li.

„Li volonte volus logi min al *Las Margaritas* por ataki min eĉ de la flanko. Sed tion mi vere ne povas akcepti. Mi atendas lin ĉi tie, ĉar vi ja nun konatiĝis al la loko. La olda virkapra putinamiko, kiu fikas sian propran patrinon de antaŭe kaj malantaŭe kaj eĉ fikis sian avinon, tiel kiel ankaŭ vi, hundido, ja eble eĉ ne timas pedikohavajn kotajn stinkantajn fiulojn, kiel estas ni, ĉu? Ja kia malgaja fetora filo de pusohava hundino estas via *divisionario*, se li kuraĝas ataki nin nur tiukaze, se ni firmpinĉiĝis en marĉa interroka pado? Se li estas granda soldato tia, kia havas siajn kacajn ovojn ĝuste pendante, kaj se li volas havi rajton je siaj ordenoj, jen venu la putinfilo ĉi tien kaj vergu nian pugon. Kaj ja tute ne forgesu diri al li, kion mi pri li pensas, kaj ke ties patrino estas olda soldatoputino, tiel, kiel ankaŭ via patrino, kaj ke ambaŭ vi estas virkaproj trovitaj inter hundoj, alikaze vi ja neniam naskiĝus.“

La leŭtenanto pro la senmezure troigitaj ofendoj koleriĝinte tiom, ke li tute forgesis, kie li troviĝas, eksaltis kaj per unu salto li tuj proksimis de la Generalo.

Generalo samtempe eksaltis. Neniu el la *muchachos* enmiksiĝis. Eble tial, ĉar ĝi okazis tiel surprize aŭ tial, ĉar ili pensis, ke tio apartenas al la programo.

La leŭtenanto eksvingigis pugnon. Sed antaŭ ol li povis bati Generalon sur la vizaĝon, li havis jam ties pugnon per ĉiuj fortoj elpafitan sur la mentono. La leŭtenanto ŝanceliĝis malantaŭen kaj falis preskaŭ precize tien, kie li antaŭe kaŭris.

„Domaĝe, ke vi ne havas vian revolveron ĉe vi, ĉu? Tion vi ja nun pensas, ĉu ne?“ demandis Generalo. „Vi ne estas la unua oficiro, kiun mi boksis sur la grimacon. Tial mi estas nun ankaŭ la generalo de la *muchachos*, kiuj ne estas tiel mizeraj sklavoservistoj kiel tiuj, kiujn vi rajtas bati sur la vizaĝon, kaj kiuj ne povas defendi sin. Kion mi pensas pri via *jefe* kaj pri vi kaj viaj patrinoj, tion vi scias nun. Kaj se via diviziestro ne estos ĉi tie post kvar tagoj kaj ne lasos buĉi sin de ni, de la pedikohavaj kaj kotaj indiĝenaj



banditoj, tiukaze li ne plu renkontos min ĉi tie. Tiukaze mi marŝos en granda duoncirklo ĉirkaŭ Balun Canan kaj marŝos al Shimojoloj por ataki ĝin. Ankaŭ ĝi estas bela riĉa urbeto, kie ni havos multe da diversaj ĝojoj. Kaj poste plu al Huninquibal, post tio mi prenos tiun Yalanchen kaj poste Tsobtajalon, poste Acayan-on, poste Nihihon kaj lastfine Socton-on. Kaj post tio sekvos la atako al Tullum, kie ni vizitos la guberniestron, se li ne estos jam forvojaĝinta pro nuptofesto. Eble ni ankoraŭ ŝanĝos niajn planojn. Sed tion mi diras al vi nur por ke vi sciu, ke mi ne devos iri al *La Peña Alta*, kie estas metita la kaptilo. Tio estas ĉio, kion vi devos sciigi al via *jefe*. Kaj se vi forgesos vorton kaj ni kaptos vin denove, jen ankaŭ la du aliaj duonoj de viaj oreloj malsupreniĝos. Kaj ne forgesu sciigi al la diviziestro tion, kion mi rakontis pri lia putinpatrino.“

Generalo eltrinkis sian trinkujon kaj elverŝis la kaforekrementon.

„Kiu havas por mi dikan cigaron pretan?“ li demandis ĉirkaŭrigardante.

„Por ke vi ne eraru pri la vojo, mi kunsendos al vi du el niaj *muchachos* ĝis vi estos proksime de la ranĉeto, kie atendas viaj ĉevaloj.“

La leŭtenanto ekstaris. „Ki estas miaj *compañeros*?“ li demandis.

„Ili ankoraŭ inspektas niajn arsenalojn. Unue ili rigardis al si la trezorojn de supre, nun ili rigardas la belojn de malsupre. Tial ili provizore ankoraŭ restados ĉi tie. Verŝajne ili restos ĉiam ĉi tie. Neniu el ni invitis ilin. Morgaŭ, dum la matenmanĝo via diviziestro ja diros al vi, ĉu li volas kunpreni ilin de ĉi tie kun sia bataliono aŭ ĉu li lasos fari al ni la ĉirkaŭvojon. Kaj antaŭ ol vi foriros, ne forgesu diri „*Muchas Gracias!*“ por la *frijoles*, la tortiljojn kaj la kafon. Vi ĉi tie estis bone prizorgataj. Ĉu ne?“

Sen respondi vorton la leŭtenanto turnis sin kaj sekvis al ambaŭ *muchachos*, kiuj survojjigu lin.

Apenaŭ la tri viroj foriĝis nokten, la *muchachos* jam komencis ekscitiĝi ĉe la bivakfajro. „Sed, *hombre*, Generalo, de kie vi scias ĉion tion? Ĉu estas vere, ke la *federales* atendas nin post la rokoj? Kial vi sciis, kiuj estas tiuj kvar?“

„Tio estas tute facila“, respondis Generalo, ekbruligante sian cigaron, kaj ankoraŭfoje plenigante sian trinkujon per varmega kafo. „Eble pli facile ol vi povas imagi tion, mi faris tute nenion. La informoj iris kvazaŭ per si mem en miajn brakojn. Venis aŭtentikaj peonoj en la kampadejon. Tri el ili. Ne de *Las Margaritas*. De alia bieno. Sed ili estis peonoj ĝustaj kaj ne spionoj. Jam post minuto mi sciis, ke ili estas aŭtentikaj *muchachos*. Tial vi ankaŭ ne vidis ilin. En la kampadejon, ĉi tien enmezen, venis neniuj el ili. Ili kuŝis ekstere en la vepro, tre malproksime de niaj eksteraj patroloj. Tri aŭ kvar horojn ili kuŝis tie kaŝite en la vepro, antaŭ ol ili certis, ke mi estas tiu, kiun ili serĉas. Mi estis tie ĉe la ekzercado kaj trejnado en la vepro. Kiam mi estis sola dum momento

kaj la *muchachos* saltante moviĝis antaŭen, mi aŭdis mallaŭtan vokadon: „Hehe, aŭskultu foje, frateto, ni volas paroli kun vi!“ Mi lasis plu salti la virojn tie ekstere kaj ekzerci celi kaj iris kun la peonoj profunde en la ĝangalon. Ili venis por averti min pri la almarŝo de la trupoj kaj rakontis al mi pri la malvasta interroka vojo, en kiun ni trotu por la plezuro de la *federales*. Ili havis ankaŭ sciojn pri la kvar maskitaj oficiroj.“

Kolonelo laŭte ekridis. „Tiukaze kompreneble ĉiu povas plani, se li havas tiajn bonajn spionojn.“

„Al vi ili eble ne venus, Kolonelo“, opiniis Generalo, rikane rigardante lin de flanko.

„Kial ne same tiel bone al mi?“

„Vi ne aspektas tiom konfidige, kiom mi. Kio plej multe ekscitis min, tio ne estis la bona mesaĝo, kiun ili heroldis al mi. Kio ĝojigis mian koron, tio estas antaŭ ĉio la fakto, ke je la unua fojo dum nia ribelo peonoj libervole venis al ni kaj helpis nin neatendite, sed des pli bonvenigate. Tio estas bona signo pri tio, ke la revolucio nun iom post iom

komencas vagi fantome eĉ en la kapoj de tiuj timigitaj kaj timemaj peonoj. Se iam venos la centmiloj de peonoj al ni, kaj se ili iam komencos tute per si mem ribeli en la hejmaj bienoj, tiam la venko de la revolucio estos certigita, ankaŭ se la batalo ankoraŭ daŭros du aŭ tri jarojn.“

„Tion mi ne povus diri eĉ je joto pli bone ol vi, Generalo“, diris Profesoro kun longe daŭranta oscedo. Li ekstaris, serĉis sian maton kaj sian lanokovrilon kaj rampis malantaŭ arbuston por tie pasigi la nokton.

„Mi ne komprenas multe pri la militarto“, opiniis finfine Matiaso, kiam ŝajne neniu plu parolemis, „sed mi pensas, Generalo, ke vi faris azenaĵon.“

„Kiun azenaĵon vi do opiniis?“, demandis Generalo, kiu jam parte endormiĝis, tamen restis kaŭranta ĉe la bivakfajro kaj suĉadis sian cigaron. Li demandis tiel, kvazaŭ li ne atendus respondon, kvazaŭ la demando tute aŭtomate glitis el li.

„Vi ne devis diri al la leŭtenanto, kion vi celas.“

„Azenaĵo, ĉu? Mi faris azenaĵon, ĉu? Nu do, kial ne ankaŭ mi foje rajtu permesi al mi azenaĵon, se jam tiom da azenaĵoj estas faritaj de ni kaj eĉ pli fare de la malbenitaj *cabrones* kaŭrantaj malantaŭ *La Peña Alta* ĉe la interroka pado. Azenaĵoj, he. Mi devis rakonti ion al li, por ke li nun tute ne plu trovu la fadenon pri tio, kion ni faros. Se mi ne estus dirinta ion pri liaj planoj, kiujn mi konas, li ne zorgus sin kaj ekmarŝus al ni. Sed nun li ne plu certas, kion li faru. Kaj kion faros la olda graso suĉfrandulo de dikfingroj? Li galopigos batalionon ien kaj alian aliloken, ĉar li ne scias precize, kie ni ekaperos. Kaj la kompatindajn peonojn, kiuj aŭdace venis ĉi tien por diri al mi ĉion tion, oni certe enfosos ĝis la nuko kaj poste disstamfados, se ili ne precize povos klarigi, kie ili estis dum la tuta tago. Espereble ili ankoraŭ havos sufiĉe da sprito en la kapo, por ke ili sciu, kion rakonti. Ili povus ja diri, ke ili postkuris forkurintan bovinon. Ĉe la diablo, *muchachos*, mi ja nun lacegas.“

Tuj poste la *muchachos* aŭdis lin ronki. Fidel ekstaris, serĉis kovrilon, per kiu li kovris lin kaj poste li ŝovis selon sub ties kapon. Generalo etendis bonfarte la gambojn.

Kelkaj piedfingroj elstaris; ĉar la botoj iam apartenintaj al kapitano estis tro malvastaj, kaj li devis entranĉi ilin ĉe la flankoj kaj ankoraŭ eltranĉi kelkajn truojn, por ke la piedfingroj havu spacon.

La *muchachos* rapide translokigis la bivakfajron pli malantaŭen, ĉar Generalo puŝis siajn botojn amplekse krustigitajn per seka ŝlimo en la fajron, kie la ledo komenciĝis ekbruleti.

**Rimarko**

*divisionario* = diviziestro de arma parto

*jacalitos* = simplaj kabanetoj

## Ĉapitro 10

01

*Don* Petronio Bringas, divizia generalo kaj aktuala komandanto, de la armeo elsendita fare de la registaro por neniigi la ribelulojn, sidis ĉe la matenmanĝo. Estis matenmanĝo inda al diviziestro, kvankam ĝi estis antaŭmetita en la mastra domo de eta ranĉo, en kiu la generalo aranĝis sian komandojn. Ju pli longe la komandejo troviĝis en la ranĉo, des pli magra kaj pli sulkigita fariĝis survizaĝe la kompatinda viro, al kiu apartenis la ranĉo. Kompreneble, la generalo ja ne estis *jefe* de banditoj. Li estis aŭtentika generalo de la federaciaj trupoj. Li pagis por ĉiu manĝo duonon de peso. Jen la sama, kion devis pagi ankaŭ ĉiu alia vojaĝanto kaj ĉiu komercisto, kiu vojaĝis sur la vojo kaj petis en tiu ranĉo tranoktejon kaj ricevis ĝin. Hoteloj ĉe tiuj longaj solecaj padoj ne ekzistas; la vojaĝanto tranoktas en la ranĉo, kiun li renkontas survoje malfrue posttagmeze kaj kie li ekscias, ke li ne povos atingi la sekvan ranĉon dum tri horoj, ĉar estos tenebro post unu horo.



Ĉiu vojaĝanto estas kontenta pri tio, kion antaŭmetas la ranĉa mastrino, la edzino de la mastro. Kaj ĉiu estas dankema por ĉiu speciala aldonajo, eĉ por ŝanceliĝema litokadro. Sed tiel ranĉisto kompreneble ne povas trakti divizian generalon. Tio, kion li antaŭmetas al la generalo, kostas por ĉiu manĝo minimume kvar pesojn, sed la generalo pagas nur duonon de peso. La ranĉisto ne kuraĝas postuli pli ol la kutiman prezon, por ne eksciti la koleron kaj la malvolemon de la generalo kaj por ke li ne estu trafita de l' malbeno de ĉiuj ĉi malgrandaj diktatoroj, kiuj decidas lian sorton. Se la generalo estus sola, tio estus ja ankoraŭ eltenebla kaj la ranĉero dirus al si, ke oni devu fari ion ankaŭ por la bonfarto de la patrio. Sed al la generalo kroĉiĝis longa vosto el oficiroj, servoknaboj kaj servosoldatoj, kiuj ĉiuj kunhelpis kvazaŭ kiel akridoj senmanĝigi la kompatindan ranĉon, ĉiuj po duono de peso ĉiumanĝe. Kaj al ĉiuj antaŭmetendis tiom, kiom ŝajne bezonas manĝi kutime generaloj, majoroj kaj leŭtenantoj laŭ la supozo de kompatinda kamparano.

La generalo kaj la ceteraj oficiroj enuis, ĉar la damnitaj ribeluloj ne volis iri en la interrokan padon, kiu estis

elserĉita por buĉi ilin. Kaj tial vizitis ilin ĉiutage inoj, kiujn la generalo kaj la oficiroj mendis tien el la urbo, en kiu troviĝis la garnizono. La ranĉisto kaj ties familo firmopinĉite pasigis la noktojn en angulo de portiko por ke la loĝigatoj povu havi la bonajn ĉambrojn kaj ĉion alian. La dudek aŭ tridek servistoj, kiuj ĉiuj kunkroĉiĝis al la vosto, ne povis pagi duonon de peso, ili pagis nur dekkvin centavojn. Sed neniu el ili ekstaru malsata. Ĉio ĉi, kiom doloriga ĝi estis, ne apartenis al la plej grandaj zorgoj de la ranĉisto, al kiu Fortuno etendis manon, por ke li akiru riĉaĵojn pere de la loĝigatoj, kiel oni rakontis ĉiutage kvindekfoje al li. Foriĝis kokinoj, porkoj, bovidoj, tutaj sakoj da maizo, kaj la knabinoj ĉirkaŭkuradis kun grize flavaj makuloj sur la vizaĝoj kaj rakontis al la mastrino, ke ili certas pri sia gravediĝo.

Tial oni komprenas tute bone, kial la ranĉisto ĉiutage dekkvarfoje preĝis por si mem: Ho, kara Dio, supre en la ĉielo, finfine igu almarŝi la ribelulojn, por ke ili estu buĉitaj, kaj por ke poste la terura sensencaĵo ĉi tie estu finita kaj mi rehavu mian ranĉon, eĉ se nur estus plu ruinoj.“

La diviziestro ĉimomente ne emis rapidi ataki la ribelulojn. Li ricevos militsalajron tiom longe, kiom li estos en la milito. Se la ribeluloj iam ĉiuj estos mortbatitaj, li devos reiri en la garnizonon kaj la milita salajro kaj la riĉaj manĝoj por duono de peso ĉiutage ĉesiĝos.

Estis je la deka matene, kiam li oportune kaj bonhumore, peze kaj fortike lasis fali sin sur la krudan seĝon, kiun la ranĉisto ofertis al li kun „*Ya listo, mi general!*“ por tiel samtempe alludi, ke ĉio estas preta kaj la knabinoj jam estas survoje almarŝi kun la pelvoj. La diviziestro frotadis la tranĉilon kontraŭ la forko, dum li ŝmacis kun dikaj lipoj kaj tiam diris: „He, *don Rosendo*, kion bongustan ni havas hodiaŭ kiel matenmanĝon? Espereble frandaĵon. Malbenite, ĉi tie en la kamparo, jen mi havas eterne malsaton kaj povas restadi la tutan tagon kaj duonon de nokto nur ĉe la manĝo.“

La ranĉisto entiris dolorplenan fajfantan spiron kaj diris: „Kokinan buljonon, *mi general*, rostitan rizon kun ruĝa akra papriko kaj tomatoj, ovojn laŭ la mastrino, rostitan kokon, porkidon, kradrostaĵon kun ebria saŭco, mi kompreneble volas diri *barbacoa con salsa borracha*, krome fazeolan kaĉon, papajon kaj kafon.“

„Jen jam ĉio, *don Rosendo*?“ demandis la diviziestro kun seniluziigita gesto. „Ĉu neniun *mole poblano de*

*guajolote* hodiaŭ?“

„*Siento muchisimo*, mi tre tre bedaŭras, *mi general*“, respondis la plagata viro kun ŝultrolevo. „La meleagroj, kiuj ankoraŭ restas al mi, estas tro junaj por buĉado. Pli ol tridek bonaj kaj grasaj, kiujn mi havis, nu, Generalo, vi ja scias kien ili iris.“

„Sed, mia kara *don Rosendo*, sur ranĉo tia bela, kian havas vi, kreskas ja tiuj birdoj sovaĝe kaj kvazaŭ senpripense multe. Jen necesas elkovi pli da ovoj. Kiu faru tion, ĉu mi?“

„Ĉu vi eble pensas, ke mi faros ankaŭ tion por vi, *don Rosendo*? Sed tion vi ne bone povas postuli de mi, eĉ ne kun mia plej granda bonvolemo.“ La diviziestro estis tiom ĝojigita pri sia ŝerco, ke elkrevis de li bruega ridado, kaj li ridis eĉ plu tiam, kiam venis iom post iom la ceteraj oficiroj en la ĉambron por sidiĝi tiel kiel li ĉe la tablo.

„*Caballeros*“, li vokis al ili, dum li denove provis kvazaŭ krevi pro ridado. „*Caballeros*, ne, vi certe pensos, ke tio ne estas ebla, sed *don Rosendo* postulis de mi, ke mi

elkovu ovojn por li. Kion vi diras pri tio?“ Per ambaŭ pugnoj, en unu el ili tenante la tranĉilon, kaj en la alia la forkon, li tamburis la tablon por doni al sia bruega ridado pli da muzika forto.

„Kiajn ovojn vi kovu, *mi general?*“ demandis kapitano Segu kun senkulpa mieno. Nur lia mieno estis senkulpa, sed ne lia demando. Li volis eĉ pli altigi la plezuron de sia ĉefo.

La diviziestro plej volonte volus kisi sian kapitanon por tio, ke li donis al li la okazon renovigi la ridadon kaj eĉ pli fortigi.

„Ĉu vi ĉion tion aŭdis, *caballeros*, kion ĵus kapitano Segu min demandis? Ĉu vi aŭdis tion, *caballeros?*“ Li apenaŭ povis ĝuste formi la vortojn, tiom li kriegis ridante.

„Nekredeble, ke kapitano Segu min eĉ demandis, kiajn ovojn mi kovu.“

La kapitano kvazaŭ ŝtonigis sian vizaĝon, eĉ ne per okulumo li alludis, ke li komprenis la ŝercon. Tio ekscitis nur des pli la ridegon de la diviziestro vidi la kapitanon

tiel senkulpe rigardanta. Per la forko li montris nun al li kaj turnis sin ĉiuflanke al la ridantaj oficiroj por instigi ilin sekvi laŭ la direkto de la forko. „Jen demandas min, kapitano Segu, kiajn ovojn mi elkovu. *Caballeros, caballeros*, kiaj ovojn mi demetu?“

La kapitano ŝanĝis ankoraŭfoje sian mienon. Li kaptis sian seĝon ĉe la apogilo kaj tiris ĝin proksimen al si por sidiĝi ĉe la tablo. Ĉe tio li rigardis mirigite kaj demandeme ĉirkaŭ si, kvazaŭ li povus kompreni neniel, kial oni ridegas tie tiom, kaj kial estu demetataj ĉiuj specoj de ovo, sur kiuj povas sidi divizigeneralo. Li sidiĝis lante kaj diris kun ĉagrena voĉo: „Malbenite, *caballeros*, tio estas ja tute ne ridinda, ke mi demandis, kiajn ovojn li elkovu; estas ja kiuj ajn specoj de ovo, sur kiuj povas sidi divizia generalo.“ Ne tiom lia respondo, sed des pli la ofendita kaj ĉagrenita tono, per kiu li sciis diri tion kaj per kio li nun kronis sian ŝajnan naivecon pri la nekomprendo de ridinda ŝerco, estis tio, kial la diviziestro misglutis la buljonon pro ridego. Kiam li ree ekkapablis paroli, li montris per la manĝokulero al la kapitano, dum li ridante preskaŭ sufokiĝis kaj li kriegis:

„Kapitano Segu, vi estus devinta fariĝi sepulta entreprenisto, sed ne oficiro, kun tia mieno, kian vi montras, dum ĉiuj aliaj ĉirkaŭe ĝojas kaj gajas.“

„Mi petas pri pardono, *mi jefe*, sed mi estas ja sepulta entreprenisto“, diris la kapitano netuŝite.

„He?“ demandis la diviziestro koncize, „vi havas sepultan entreprenon? Kie do? Mi neniam aŭdis pri tio.“

„Sed, *caballeros*, ĉu tio estas tiom malfacile komprenebla?“ demandis la kapitano. Li restis surprizaĝe tute sen emocio, kiam li seke aldonis: „Ni estas ja ĉiuj entombigantoj de mortintoj ĉi tie. Aŭ por kio do vi pensas, sinjoroj miaj, ni havas revolverojn ĉe la flanko kaj la viroj ekstere karabenojn kaj mitralojn?“

„Aŭ per aliaj vortoj, ĉu vi volas diri per tio, ke mi estas sepulta entreprenisto, kiu elkovas ovojn?“ Denove la diviziestro kriegis sian bruantan ridadon. Ĉiuj ceteraj oficistoj komencis kunridi, kelkaj malmultaj pro ĝentileco, sed la plej multaj, ĉar ili same al sia generalo pensis, ke la interparolado estas la plej sprita kaj plej



humurplena, kiun ili havis dum longe.

Kiam la ridado fariĝis pli mallaŭta, trovis la kapitano la okazon respondi: „Tio ne estas vortoj miaj, *mi general*, tio estas viaj, mi petas plurfoje pri senkulpigo.“ *Hombre*“, diris nun la diviziestro: „Vi estas efektive la plej senhumura, plej sensprita kaj plej senŝerca viro, kiun mi, kiam ajn en mia vivo, renkontis. Eĉ ne pinĉprenon da humuro havas tiu viro en si. Viro, vi ja elsekiĝas. Sed ĉio tio ne malhelpu nin ekzameni kun zorgemo kaj ĝuego la bongustecon de la bela suĉporketo, kiun la simile belaj knabinetoj ĉi tien enportas kaj antaŭmetas per ne tute tiom belaj pelvoj. Hola, leŭtenanto Cosio, ŝovu la ĉarman botelon kun komiteko al mi, mi devas saturigi la kraketantan grasan lardohaŭton per bona alkoholgutaĵo por liberigi ĝin de mikroboj kaj baciloj. Kaj ĉe tiu okazo, kapitano Segu, kion vi pensas pri mikroboj?“

„Dependas de tio, kian specon de mikroboj vi celas, *mi general*.“ La kapitano ĵus surpikis pecon da viando sur forkon kaj turnadis ĝin pripenseme kelkajn fojojn, ĝin fikse rigardante, antaŭ ol li ŝovis ĝin en la buŝon. Kiam li fine estis glutinta ĝin kaj la diviziestro certe tute ne plu

pensis pri la demando, diris la kapitano: „Pri kiaj specoj de mikroboj temas, *mi jefe?* Dependas de tio, kiu metas la demandon. Eble ni ĉiuj, kiuj sidas ĉi tie kaj manĝas porkon, estas neneio krom mikroboj, kaj verŝajne la porkoj pensas, ke ni estas ties mikroboj. Ni foje demandu ilin, kiel formiĝas ilia mondokoncepto el ilia vidpunkto. Ĉiu parazito pensas pri si, ke ĝi estas la plej grava estaĵo en la universo, dum samtempe la vivestaĵo, al kiu li dankas sian vivon, estas kreita laŭ ĝi nur al la celo servi kiel nutraĵo al ĝi.“

Tiel profunde la diviziestro ne kapablis sekvi, tute okupita kun sia granda peco da rostaĵo. Li ne pli longe sekvis ol ĝis la fino de la unua frazo. Ankoraŭ havante la lastan mordaĵon enbuŝe, li eltrumpetis denove sian larĝan ridadon. „Unue mi elkovas ovojn por *don Rosendo*. Kaj vi demandas min, kian specon de ovojn mi do demetas. Poste vi faras el mi sepultan entrepreniston, kiu kovas ovojn. Kaj nun eĉ mikrobon. Kaj tion vi ŝarĝas sur vian komandantan generalon, kapitano, ĉu? Mi detale devos priparoli tion poste kun leŭtenanto Ochoa, ĉu la mikrobo eble eĉ estas kazo por la mililtribunalo, pri kiu ĝi pli

detale okupiĝu. Sed unue, kapitano Segu, lasu nin pluan fojon alkoholizi per bona granda glaso da komiteko la miliardojn de mikroboj, kiujn ni glutis en la lastaj dek minutoj. Mi scias pro longjara sperto, miaj mikroboj kapablas diferencigi sentaŭgan venenigitan meskalon de tia eleganta komiteko *añejo*, kiel ni havas ĝin antaŭ ni. Kaj miaj mikroboj en tiu rilato neniam eraras. Kaj jen ja la *barbacoa* almarŝas, salutata per jubilo kaj militkriado. Aŭskultu, *don* Rosendo, la saŭco povus esti pli ebria, mankas freŝa verda kapsiko. Ĝi ne sufiĉe mordemas. Transdonu foje la telere-ton kun la virgaj guŝoj al mi. *Muchas gracias!*“

### **Rimarko**

*barbacoa con salsa* = kradrostaĵo kun saŭco

*borrachos* = kirlitaj ovoj kun ruĝa vino

La diviziestro rigardis supren.

En la malfermita pordo staris homa figuro, kiun li ne povis ekkoni precize. La ĉambro, en kiu sidis la oficiroj, ne havis fenestron. La tuta lumo brilis internen tra la pordo, kiu tial ĉiam estis malfermita.

La diviziestro sidis kun la vizaĝo al la pordo. La akra lumo penetris en liajn okulojn. Tial li ja povis vidi, ke iu staras en la pordo, sed la vizaĝon li ne tuj povis ekkoni. Li rimarkis nur, ke la viro havas kutiman ruĝan poŝtukon volvitan ĉirkaŭkape, tiel, kvazaŭ li havus dentodolorojn. Malantaŭ la viro ekaperis indiĝena servoknabo, kiu pene portis kotan sakon sur la dorso kaj tiun sakon nun faligis en la portiko kun obtuza bruo.

„Pri kio temas, *hombre?*“ demandis la diviziestro.

„*Teniente Primero Ruhen Bailleres a sus ordenes, mi general,* revenante de esplorraĵdo kaj noktpatrolo.“

„*Adelante, Teniente Bailleres,* envenu, ni ĵus

matenmanĝis. Hola, *don* Rosendo, ordonu alporti seĝon por leŭtenanto Bailleres.“

La leŭtenanto eniris nun tute.

„Viro, ja kiel vi aspektas? Ĉu forpafite, la nazo? Ĉe la diablo.“ La diviziestro trovis tion komika kaj ridis. „Sen nazo oni povas ksisi pli bone, leŭtenanto. Ĝi estis entute tro longa.“ Kun tiuj vortoj li denove krie ridadis. „Kion vi diras, *caballeros*, ni ĉiuj ja pensis, ke la nazo de nia kamarado Bailleres estis tro longa por povi kisi laŭ tradicia kaj bone elprovita soldatmaniero?“

La oficiroj ne ridis, sed nur oblikve rikanis pro ĝentileco.

La ridado de ties komandanta generalo tre kolerigis la leŭtenanton, sed en tiu momento li ankoraŭ ne rimarkigis tion kaj konservis sian sintenon.

Intertempe indiĝena knabo alportis seĝon kaj la leŭtenanto sidiĝis. Knabino metis manĝilaron antaŭ lin kaj por li surtabligis telerojn.

En la eta ranĉo, kie la leŭtenanto kaj ties akompanantoj

postlasis siajn ĉevalojn, oni kunvoĵigis al ili du junulojn, por ke ili alkonduku la ĉevalojn kaj alportu la sakon, kiun ili transdonu al la generalo je matenmanĝo.

Unu el ambaŭ indiĝenaj junuloj, ĝuste tiu, kiu alportis la sakon, kaŭris en la portiko kaj atendis, ke oni voku lin. La alia junulo deseligis en la korto la ĉevalojn kaj transdonis ilin al la soldatoj.

„Aŭskultu, *teniente*“, alparolis la diviziestro la leŭtenanton: „Ja ne plu estas tiom fride je tiu ĉi horo, ke vi devas iradi en tiu kazo kun tiu aĉa mukotuko volvita ĉirkaŭ la kapo tiel, kiel oldaĉulino. Aŭ ĉu vi havas eĉ dentdolorojn? Viro, parolu! Pri kio temas?“

La leŭtenanto survoje tien forlavis en roĵo la sangon kaj la krustigitan koton. La stumpo de lia nazo ne plu sangis. En la ranĉeto li purigis la stumpon per *aguardiente*, kaj la vundo estis nun seka, kvankam sufiĉe malbela.

La oficiro hezitis kelkajn sekundojn, poste li komencis malligi la submentonan nodon de la ruĝe florornamita tuko. Li intencis forŝiri ĝin per unu rapida mangesto

desub la mentono, kiel respondo al la diviziestro, kies alparolon li trovis ridinda kaj stultega. Sed la tuko gluis firme ĉe ambaŭ oreloj, kaj kiam la leŭtenanto ŝiradis ĝin, la tuko lin dolorigis.

„Bonvolu, *compañeros*“, li diris, „donu la botelon al mi.“

Oficiro, kiu staris apud li, diris: „Vi bezonas gluton, kamarado. Sufiĉe pala vi aspektas.“ Li plenverŝis lian akvoglason.

La leŭtenanto verŝis ĝin kun kvar grandaj glutoj malsupren. Poste li prenis la botelon kaj verŝis la enhavon sur sian kranion.

„He, he, vi tie!“ vokis la diviziestro. „Mi pensis, ke vi delonge estas baptita. Kaj nun eĉ per tiu tre multekosta *añejo*. Tio laŭ mi ja vere estas eksterordinara lukso ĉi tie, kie oni povas havigi la drinkaĵon nur tiom malfacile kaj kie oni – ja, *hombre*, homo, kio tio estas?“

Eksentinte, ke la brando sufiĉe moligis kaj solvis la tukon ĉe la oreloj, la leŭtenanto ŝiris kun kuraĝa gesto la tukon malsupren. Tuj la sango rekomencis malsuprenflui laŭ la

kolo. Etendante la kapon al la diviziestro, li vokis: „Tial, *mi general*, mi havis la tukon ĉirkaŭ la kolo. Kiel tio plaĉas al vi?“

„Ankaŭ forpafite, ĉu?“

„Ne forpafite, ĉio ĉi detranĉite de la sovaĝuloj, de la bestaĉoj.“

„Leŭtenanto Bailleres, vi ja nun ne intencas rakonti al mi, ke mi sendis vin tien kiel orelumanton, ĉu? Certe ne. Vi mem proponis tion. Kaj mi permesis vian foriron. Kie estas la du subleŭtenantoj kaj la suboficiro, kiujn vi prenis kun vi?“

„La sovaĝuloj retenis ilin tie.“

„Ĉu kiel ostaĝojn?“

„Tion mi mi ne scias, *mi general*. Pri tio oni diris nenion al mi. Oni kondukis min el la kampadejo por sciigi al vi la mesaĝon, kiun la kotfiulo, kiu nomiĝas Generalo, deziras sendi al vi.“



„Kiel la krimulo do aspektas? Ĉu chamulano?“

„Ne, *mi general*. Chamulano li ne estas, sed *indigena*. Kiel li povas esti ilia generalo, mi ne komprenas. Li renversiĝemas kiel lama hundo. Li apenaŭ povas stari. Mi eĉ ne povas imagi, kiel li kaptu fuston de fusilo. Neniu respektas lin. Ili ĉiuj cidiras al li. Kiel la tuta bando li manĝaĉas perfingre. Li dormas sur petato kiel ĉiuj ĉi kanajloj. Tiun pedikohavan kanajlaron ni transmondigos dum tri horoj. Ili ĉiuj estas fatraso.“

„Tio ne estas novaĵo por ni, leŭtenanto, mi atendis pli ol tion.“ La diviziestro komencis glugle ridi. „Via beleco, leŭtenanto, pasis. Kaj estis ja tiaj belaj oreletoj. Ŝajnas tamen al mi, ke tiu pedikohava generalo, pri kiu vi diras, ke li renversiĝemas kiel lama hundo, ĉiukaze ne respektis vin. Eble li eĉ ne estas tute tiom stulta, kiom vi supozis lin, kiam vi proponis vin maski kiel peonoj por ekscii ties pozicion, forton, armitecon kaj planojn. Li vidas tra viaj maskoj. Jes, kaj se vi nun la sekvan fojon partoprenos en karnavalo, vi jam devos komplete ĉirkaŭvolvi vian kapon, masko antaŭ la vizaĝo en via kazo ne plu sufiĉus. Ja kiel oni povas esti azeno tia, kia lasas detranĉi siajn orelojn de

tiuj rabistoj?”

Kompaton la leŭtenanto ja ne atendis, nek de la komandanta generalo nek de liaj kamaradoj. Li eĉ estus protestinta laŭte, se oni kompatus lin kaj asertus, ke soldato oferu sin, ke tial li ja estas soldato. Sed, ke neniu festis lin kiel heroon, ja eĉ ne kiel kuraĝan oficiron, kiu aŭdacis eĉ miksi sin inter la malamikojn, trasuferinta dolorojn kaj senhonorigon por havigi al si renomon en sia bataliono, tio ĉagrenis lin. Estas ĝuste, ke la komandanta diviziestro ne komandis al li spioni. Li libervole proponis sin, sed pli por fanfaroni antaŭ siaj kamaradoj ol por plenumi necesan taskon. La generalo tute ne aŭ nur tre malmulte interesiĝis pri iuj spionadoj koncerne al la ribeluloj. Li militece ne serioze akceptis la ribelulojn kaj rigardis ĝin multrilate ne inda al siaj persono kaj rango, ke oni lin, la dian diviziestron, elsendis por batali kontraŭ bando da pedikohavaj peonoj. Tion laŭ lia opinio sukcese povus plenumi majoro kun duono de bataliono. Sed iu en la militministerio ordonis tion, ke li ekmarŝu kun tiom kaj tiom da trupoj kontraŭ la ribeluloj, kaj tiun ordonon li devis obei. Se tiuj tri junaj oficiroj sopiris aventuron, ĉar

fariĝis tro enua por ili stamfadi ĉi tie en la koto kaj atendi la alvenon de la ribeluloj, tiukaze tio estis afero ilia. Li donis la permeson, ĉar ili petis lin pri tio. Ke la aventuro fariĝis fiasko por ili, ne afliktis lin. Kial li ne permesu al si la plezuron mistifiki la leŭtenanton, plezuriĝi je ties malgaja aspekto. Tiel, kiel li plezuriĝus, se leŭtenanto en amaventuro renversiĝus kun eskalo. Leŭtenanto Bailleres kompreneble pensis alie pri tio. Li sentis sin heroo. Kaj tial, ĉar oni rifuzis tiun rekonon al li, li pensis nun, ke li samtempe havu plezuron, sed koste de la diviziestro, kiu ŝmacante kaj kun multe da bruoj kaj klakado enstomakigis sian larĝan matenmanĝon kaj pli atentis la ĝustan aldonon de salo, pipro, akra kapsiko kaj tomatosaŭco ol la suferojn kaj la humiligitan fieron de lia leŭtenanto.

„La laŭsa generalo transdonis al mi mesaĝon, kiun mi heroldu al vi, *mi general*“, diris la leŭtenanto, kiam li ĵus finmanĝis la supon.

„Tiu mesaĝo fariĝos certe sufiĉe gaja, *caballeros*, kaj idiota krome. Al mi mesaĝo de pedikohavaj peonoj, ĉu? Nu, ekprezentu ĝin, *teniente*.“ La diviziestro ridis larĝe,

misglutis kaj tuisis.

„La mesaĝo ne estas vere respektema, *mi general.*“

„Tion mi ne demandis vin, *teniente* Bailleres. „Sed mi esperas, ke ĝi almenaŭ estos gaja.“ La diviziestro rigardis al la ofciroj kaj rikanis. „Sinjoroj miaj, nun ni ekhavos distron.“

„Tute certe, *mi general.* Sed ne donu la kulpon al mi. Mi nur sciigas, kion oni komisiis al mi. Via patrino estas maljuna putino.“

„Kion vi diras? Kio venas en vian kapon, *teniente* Bailleres?“

„Vi volis aŭskulti, kion la generalo de la pedikohavaj friponoj sciigis al vi.“

„Tio estas alia afero. En ordo, ekparolu do.“

„Kaj vi fikis vian patrinon kaj ambaŭ viajn avinojn. Kaj li sciigas al vi, ke li frakasos vin kaj viajn militistajn arojn kaj, ke li faros personan plezuron el tio elŝiri vin el via

stabo por detranĉi viajn orelojn, la nazon kaj kelkajn aliajn pendaĵojn, ke li ne faros la plaĉon al vi lasi buĉi sin en la interroka pado de *La Peña Alta*, ke li preteriros vin en vasta arko kaj ekbruligos ĉiujn grandajn bienojn kaj lokojn, kiujn vi havas endorse, ke li pendumigos ĉiujn enloĝantojn en la plej proksimaj arboj kaj tie lasos swingopendi ilin, por ke vi estu humilige subrangigita de la militministerio pro pigremo, ĉar viaj pantalonoj tro plenas por kuraĝi ataki ilin. Kaj, se vi havas eĉ nur fajron da kuraĝo kaj volas esti ĝusta viro kaj soldato, jen vi venu tien, kie li atendas vin. Sed laŭ li vi estas nur olda renversiĝema fikulo de prostituitinoj, kiu ne kuraĝas elpaŝi kontraŭ pedikohavaj ribeluloj kaj ke vi nur pensas pri via manĝaĉo kaj pri via militsalajro. Li diras, ke vi estas centfoje pli pediko- kaj laŭsohava ol la plej kota kaj plej idiota el liaj *muchachos*, kiuj laŭ li havas sufiĉe da suko en siaj kacoj, por vin, viajn tutajn militistajn arojn kaj ĉiun, ataki per vermboritaj bastonegoj ĉiun, kiu portas uniformon kaj promenas kun revolveroj, karabenoj kaj mitraloj, ke ili eĉ ne prenos disrompitan maĉeton kiel helpilon, por ĵeti ĉiujn ĉi kune antaŭ pusoplenajn hundojn kaj maljunajn porkojn, por ke ili

voru ilin. Ili ja ne taŭgas por io alia krom fiki sian propran patrinon kaj seksperforti siajn avinojn, kaj soldatoj ili estas laŭ li nur tial, ĉar tiukaze, se ili ne povus surmeti uniformojn, neniu el ili povus perlabori honeste eĉ nur paneron aŭ ŝiman tortiljon. Kaj vi, *mi ĝeneral*, estas laŭ li la plej granda, plej stulta, plej pigra, plej vorema kaj plej pusoplenta fikulo de via propra patrino, kiu surtere ekzistas; en via kapo vi havas laŭ li nur vezikon kun varmeta akvo, kaj se oni tretos sur tibion de vi, ĝi rompiĝos kiel vermborita bastono, ĉar vi malsanas je putra difektiĝo de la ostaro laŭli, kaj li diras krome, ke via patrino prostituas sin en Tapañula por dek centavoj kun kutimaj soldatoj sub arboj. Laŭ li vi tute ne estus generalo, sed nur tial estas tio, ĉar via edzino kaj ĉiuj viaj filinoj kuŝis en la litoj de ĉiuj, kiuj havas aŭoritaton, kaj nur tial vi estas nun diviziestro laŭ li. Kaj se via edzino ne ĉie seksmatracus, kaj ŝiaj filinoj ne helpus al ŝi ĉe tio, tiukaze vi estus nun eĉ ne serĝento, sed mulopelisto. *Perdoneme, mi ĝeneral*, senkulpigu min, generalo, sed vi volis aŭdi la mesaĝon. Kaj mi, kiel via subula oficiro devas sekvi vian ordonon, *mi ĝeneral*, kaj kiel ĉiam mi estas je via servo kaj kun ĉiu respekto mia. Kaj nun mi

ankoraŭ devos transdoni al vi tion, kion sendas al vi la laŭsogeneralo por la matenmanĝo.“

Nek la generalo nek unu el la ceteraj oficiroj sidantaj ĉe la tablo aŭ envenintaj kaj ĉirkaŭstarantaj, interrompis la leŭtenanton. Ili lasis paroli lin, kvazaŭ li estus frenezulo, kiu por tio, kion li diras, ne respondecas. Sed kiam li ĵus finis la parolon, komprenis ĉiuj, speciale la diviziestro, ke la leŭtenanto ne parolis por si mem, sed ke li efektive nur sciigis tion, kion la generalo de la ribeluloj komisiis al li. Ununura el tiuj parolturnoj metus la leŭtenanton antaŭ milittribunalon, kaj la tuta parolo certe kostus al li ducent kvindek jarojn da kaptiteco en militprizono Santiago. Sendepende de tio la parolturnoj estis de tia maniero, ke oficiro ne vere povus mem eltrovi ilin, eĉ se li penus kiom ajn. Ĉio tio estis kaŭzoj, kial kaj la diviziestro kaj ankaŭ la ceteraj oficiroj eĉ ne per vorto interrompis la leŭtenanton .

La diviziestro, tiel kiel ankaŭ la oficiroj ĉesis manĝi, kiam falis la unuaj signifoplenaj vortoj. Unue la diviziestro fariĝis profunde ruĝa sur la vizaĝo, poste pala, tiam denove ruĝa. La oficiroj, precipe la junaj, fariĝis palaj kaj

restis palaj. Ĉiu en la ĉambro atendis, ke la generalo eltiros revolveron kaj mortpafos la leŭtenanton. Sed tiel, kiel la leŭtenanto ne estis interrompita, eĉ ne unu el la oficiroj faris geston, ke li mortpafos lin aŭ batos vizaĝen. Sen halti la leŭtenanto prezentis sian parolon. Lia ĉagreniteco donis al li la kuraĝon raporti sen hezito aŭ ĉeokaze senkulpigi sin per „pardono“. Tion li retenis por la fino. En la anima stato, en kiu li troviĝis, lacigita de la longa nokta rajdo tra la nokto, humiligita de la kruda perforto, indiferenta kaj preskaŭ senforta sekve de la sangoperdo kaj pro la doloroj, estis egale al li, ĉu la divizionario mortpafinta lin ĉu ne. Li estus rigardinta tion favoraĵo.



Post la parolado sekvis silento dum kelkaj sekundoj, kiujn ĉiuj perceptis tiel, kvazaŭ estus minutoj. Neniu sciis diri ion aŭ fari por solvi la ŝarĝantan streĉitecon. Sed tiam la kvieto estis krude interrompita de la laŭta voko de leŭtenanto Bailleres. „He, *chamaco*, enportu la sakon, kiun vi portis sur la ĝibo de la selo“. La knabo estis kaŭrinta en la portiko kaj atendis, ke li ricevos de iu ion por manĝi. La sakon li tuj ĉe la alveno dekroĉis de la selo kaj demetis ĝin apud si en la portiko. Nun li relevis la sakon kaj portis ĝin en la grandan ĉambron, kie la oficiroj sidis ĉiuj kune.

„Jen, *mi general*“, diris leŭtenanto Bailleres, „tio estas la donaco, kiun sendis al vi la fava hundido, la banditokapitano.“

„Al mi donaco, ĉu? De tiu pedikohava fripono, ĉu?“ La diviziestro ankoraŭ ne tute revekiĝis el la torento de senhontaj ofendoj, kiuj kvazaŭ inundis lin. „Ĵetu la donacon sur la sterkejon. Ja kion tia stinkanta mefito, tia senrespekta kaj sendia indianokanajlo povus donaĉi al

mi? Eble ŝtelitan ŝinkon, kiun li venenigis. Ĵetu la sakon sur la sterkejon, *chamaco!*“

La knabo de la ranĉo ree levis la sakon. Kiam li transiris la sojlon de la pordo kaj poste jam denove staris en la portiko, la diviziestro ekscivolis pri tio, kio estas en la sako. Samtempe li pensis, ke la enhavo de la sako eble povus doni al li klarigon pri la planoj, kiujn havis la ribelula kapitano. „Leŭtenanto Bailleres, ĉu vi scias, kio estas en la sako?“

„*No, mi general.* Mi, por diri la veron, pensis dum la aĉa rajdado pri aliaj aferoj ol rigardi, kio estas en la sako. Krome, *mi jefe*, mi ne sentas min rajtigita malfermi kunŝnuritan sakon kun enhavo, kiu apartenas al vi aŭ estas sendita al vi.“

„Tio estas ĝusta, leŭtenanto Bailleres, dankon!“

Per mangesto li venigis pli junan el la oficiroj al si. „Voku al mi la knabon kun la sako!“

La knabo revenis kaj faligis la sakon sur la firmstamfitan argilan plankon de la ĉambro. Ĉiuj ĉeestantoj rigardis sur

la sakon, kvazaŭ ili volus diveni, kio enestas. Eble efektive enestas venenigitaj ŝinkoj aŭ kokosnuksoj aŭ kukurboj. Eble, kaj tiun ĉi penson havis ĉiuj samtempe, estas bomboj, kiuj eksplodas en la sama momento, kiam ili ruliĝas el la sako.

Kapitano tiun penson esprimis: „*Mi general*, ni estu atentemaj, ŝajne estas bomboj.“

„Ne parolu tiel malprudente ĉi tie, kapitano. Se tio estus bomboj, la knabo kun la sako tute ne estus ĉi tie.“

La oficiroj ridis, kaj la kapitano ne distordis la vizaĝon.

„Do finfine malfermu la sakon, „*chamaco*“, ordonis la diviziestro al la knabo. Ĉar ĝi estis ligita tiom firme, li kaŭris sin apud la sako kaj prenis la nodon inter la dentojn por solvi ĝin. Tio daŭris al leŭtenanto Ochoa tro longe. Li prenis tranĉilon de la tablo, kaj per unu movo li tratranĉis la la bastŝnuron.

„Elŝutu la sakon, „*chamaco*“, diris la diviziestro, leviĝante de la seĝo, por povi rigardi pli bone trans la tablon.

La knabo kaptis la sakon ĉe la malsupraj finaĵoj kaj levis ĝin, jen elruliĝis la detranĉitaj kapoj de la tri akompanantoj de leŭtenanto Bailleres.

„Tion ili ja dure punpagu, tiuj sovaĝuloj, tiuj barbaraj ekzekutistoj!“ kriis la diviziestro, kiam li jam retrankviliĝis post sia teruriĝo. „Kaj elkraĉi mian sanktan patrinon, *mi santa madre*, mian patrinon tra lia kota buŝaĉo kaj priŝmiri ŝin per koto! La felon mi tiros de li, lante, dum tagoj, malantaŭ azeno. Tiuj bestaĉoj, tiuj senbredaj sovaĝintaj tigroj. Kion mi diris jam ĉiam kaj proponis, sinjoroj miaj? Mi ripetas tion kaj ripetos tion tiom longe, ĝis ĝi fine foje estos aŭdata ĉe la registaro: Ĉiuj indianoj estu ekstermitaj, senkompate estu neniigitaj kiel la plej venena besto, kiun ni havas ĉi tie en la lando. Kaj antaŭ ol ni ne estos forigintaj de la tersurfaco ĉion ĉi, kio estas indiano, tiu bela lando ne havos trankvilon kaj pacon. Kraĉi koton sur mian al mi tiom sanktan patrinon, tiu nano, tiu pedikohava viŝĉifonulo nomata stinkanta indiano. Kaj jen nia kamarado, leŭtenanto Bailleres, por la tuta vivo insultita, kaj tri de niaj kamaradoj buĉitaj plej bestaĉe. Kion la fava hundulo lasis diri al mi? Ke mi ne

venos por tradraŝi lin tie, kie li atendas min, ĉu? Li min atendi, ĉu? Li, tia kota kanajlo nomata pedikohava ribelulo, min atendas, ĉu? Tia viŝcifonulo, tia ŝprucaĵo de hunda koto diras al mi, ke mi kaŝas min antaŭ li kaj ne elvenas el la truo por detiri lian felon, ĉu? *Caballeros*, kun ununura bataliono mi kaptos la kotmontetan ulon ĉe la kolumo. Kaj malbenite, *caballeros*, vi ĉiuj kraĉu al mi sur la vizaĝon, se mi ne estos frakasinta la tutan fibandon dum tri tagoj ĝis la lasta grajneto. Nur la hundulon nomatan stinkanta indiano, mi ne gracos per tio, ke mi mortbatigos lin per bastono, tiel, kiel la tutan ceteran fiularon. Tiun mi altrenigos per olda lama azeno, post kunŝnurigo de lia sponga ostaro. Kolonelo Viaña, vi transprenu la ĉefkomandadon de la ĉi tie postrestonta trupo dum mia malĉeesto.“

## Ĉapitro 11

01

La diviziestro ne prenis al si tempon tute fini la matenmanĝon. Li komandis, ke tiu punbataliono je la kvara matene estu marŝpreta.

Donante la ordonojn, li interrompis sin dum ĉiuj tri minutoj dufoje per la kvazaŭa gurdado de sia frazo: „Mian al mi tiom sanktan patrinon priŝmiri per koto, la nano, la viŝcifonulo, tiu ŝprucaĵo de hunda muko, priŝmiri per koto mian sanktan patrinon.“

Post disdono de ĉiuj ordonoj, kaj kiam la trupo estis marŝpreta, kolonelo Viaña trovis konsilinda ventumi al la diviziestro iom da malvarmiga aero. „Kun via permeso, *mi general*, se mi rajtus permesi al mi, mi volus konsili al vi kunpreni almenaŭ du batalionojn kaj mitralan taĉmenton. Ni ne scias, kiom fortaj la ribeluloj eventuale estas.“

„Kara kolonelo“, respondis la diviziestro, „bonvolu, ne

ridindigu vin. Origine mi volis forsendi tute nur duonon de bataliono kontraŭ la ribelema fibando. Tio estus tute sufiĉa. Sed la komandanta ĉefo ordonis preskaŭ tutan brigadon, la diablo sciu, kial, eble tio enpoŝigas al li kvinmil pesojn, aŭ kion ajn, kion mi ne scias, kaj kiel subrangulo mi devas obei kaj devas konduki la brigadon al la bataalkampo. Mi hontus ĝis mia vivofino kaj ne plu povus rigardi vizaĝen al honesta oficiro, se mi formaruŝus kontraŭ bulo da pedikohava indiana fatrasularo kun brigado. Bone, mi kondukis la brigadon ĉi tien, obeante al pli altrangaj ordonoj, kiel protektantan barajon kontraŭ Balun Canan. Sed tio ne signifas, ke mi devas preni la tutan brigadon por tani la felon de tiu pedikohava hundidaro.“

„Vi estas mia komandanta generalo, sinjoro mia, kaj mi devas obei. Sed tamen mi proponus, ke vi kunprenu almenaŭ duonon de regimento da *caballeria*.

„Nur por trankviligi vin, kolonelo, timleporulo, en ordo, mi kunprenos kavalerianojn, sepdek virojn. Ordonu la laŭan al kapitano Ampudia. Li estas la plej drinkema. Tio iom vigligos lin.“

„*A sus ordenes, mi general.*“

La kolonelo salutis kaj retirigis.

La diviziestro ordonis leŭtenanton Bailleres al si. „Kiel vi sentas vin, *teniente*, ĉu marŝkapabla?“

„Laca, *mi general*. Sed mi petas vin pri la permeso povi partopreni la ekspedicion.“

„Tion vi faru, *teniente*. Vi devos ankoraŭ kvitigi personan fakturon kun la sovaĝuloj. Kaj tiun kvitigon mi ne volas fuŝi al vi. Vi tre valoras por mi. Vi konas la terenon tie kaj proksimume la batalpoziciojn. Vi gvidos la Unuan Kompanion, *teniente!*“

„Dankon, *mi general!*“

„Ni tranoktos survoje. Tiam vi povos satdormi. Ĉu ni, laŭ via juĝo, povos esti morgaŭ ĉirkaŭ posttagmezo sur ties dancejo?“

„Tion ni povos tute certe, *mi general*. Kaj ĝi ŝajnas al mi la plej favora tempo por atako, ĉar dum tiu horo neniu tie



atendos atakon. Ĉirkaŭ tiu tempo ili ĉasados, kaj tiuj, kiuj ne ĉasados aŭ ekzercados, dormos. Kion mi povis ekscii, estas, ke ili tie tute ne atendas atakon, sed pli proksime al ĉi tie, pli proksime al la rokoj, kie ni atendas ilin. Se de ni efektive atendeblis atako, tiukaze laŭ ilia konvinko nur frue matene aŭ mallonge post la komenco de la nokto, ĉar ili supozas, ke ni certas, ke ili tiam ĉiuj estas lacaj, kaŭras ĉe siaj bivakfajroj, dancas, dormas, manĝas kaj kuŝas ĉe la inoj. Ĉion ĉi mi povis ekscii el iliaj interparoladoj, *mi general.*“

„Ni ja laŭorde detale senhaŭtigos ilin. Mian sanktan patrinon tiom priŝmiri kun koto per tia kota kaj stinkanta buŝaĉo de mizera ĉifonulo nomata pedikohava indiano. Mian sanktan patrinon tiom per koto pri –“

Je la tria posttagmeze la diviziestro pensis la tempon veninta ree sin okupiĝi pri sia fortikiga manĝo. Dum li manĝis, li plendis pri la tiom duraj devoj de komandanta generalo, kiuj antaŭtagmeze malhelpis al li fini sian matenmanĝon trankvile kaj kun la kutima plezuro. La manĝo, ĉifoje, alie ol antaŭtagmeze, ne estis plibeligita per la spritaj ŝercparoloj de la diviziestro. Regis pli serioza etoso. Ne eventuale eĉ pro tio, ke la diviziestro kaj la oficiroj, kiuj kunsidis ĉe la tablo kun li, estus ĝenantaj la digeston per tiuokaza interkonsiliĝo de militplanoj. Ne, la seriozeco de la estonta tradraŝo, kiun li intencis ŝarĝi sur la ribelulojn, esprimiĝis per tio, ke li komencis paroli ŝmacante kaj glutante ĉiun duan frazon tiel: „Tiujn pedikohavajn banditojn mi ja instruos per hajloj de batoj ne plu priŝmiri per koto mian sanktan patrinon per iliaj stinkantaj buŝaĉoj, unue ni ĉiujn encirkligu, poste traktu ilin per bastonoj kaj tiam enfosu ilin ĝiskole kaj poste ek sur ilin per ĉiuj kuradantaj kompanioj, kaj poste la *caballeria*. Tre bone de vi, kolonelo Viaña, ke vi konsilis al mi kunpreni iom da kavalerio. Alie tiu mankus, se ni

stamfos la kapojn de la kanajloj teren.“ Tiam li ekhavis alian penson: „Verdire kaj tute honeste dirite, *caballeros*, mi hontas marŝi kontraŭ tiaj kotuloj. Povus fari tion serĝento. Ĉu mi ne pravas, sinjoroj miaj?

„En ĉiu rilato, *mi general!*“

Mallonge post la kvara ekmarŝis la puntrupo. Antaŭ la sepa ĝi atingis ranĉon, kie la diviziestro komandis, ke oni tie tranoktu trankvile, por sekvatage daŭrigi la marŝon kun plenaj fortoj. Ne estis konsilinde nokte marŝi plu, ĉar povus esti, ke la ribeluloj ŝtele preteriros la trupon sur ĉirkaŭvojo.

Leŭtenanto Bailleres kompreneble asertis, ke li ne supozas, ke la ribeluloj rekte marŝas en la direkto al Balun Canan, ĉar ili scias, ke ili tiel kurus en la brakojn de la *federales*, laŭ li ili havis tiom malmulte da kaŭzo lasi tiri sin en noktan batalon, kiom la trupo.

La diviziestro oblikve tordis la buŝon kun la intenco make rikani, aŭ al la oficiroj, kiujn li kunprenis por partoprenigi ilin je plezuro, peri la impreson, ke la afero

tute ne gravas . Temis nur pri plezuro, ĉar per la buĉado de ribelulaj friponoj neniu serioza oficiro povus akiri laŭrokronojn aŭ ordenojn. Kaj per tiu tordita buŝo li diris: „Batalo. Mi aŭdas ĉiam nur batalo, leŭtenanto Bailleres. Batalo. Vi ja eble eĉ ne parolas pri batalo kun tiuj pedikohavaj banditoj, ĉu? Kun obeorifuzantoj, ribeluloj kaj strikantoj oni ne havas batalon kaj ne entreprenas batalon, sed oni tradraŝas ilin, poste oni ilin pendumas aŭ oni enfosas ilin por ŝpari la ŝnuregon kaj la laboron de la pendumado. Batalo. Se mi aŭdas ion tian de oficiro, mi sentas min tuj tiel malbonega, ke mi povus vomi. Sed ni nun permesu al ni laŭordan gluton antaŭ la aĉa vespermanĝo antaŭmetota al ni ĉi tie. Pedikohava ranĉo. Ni manĝaĉas ĉi tie nenion alian krom faboj, tortiljoj kaj akra kapsiko. Kafon ili ne konas kaj kuiras iun legomon, kiun ili plukaĉas de la arboj kaj nomas tiun kuirajon teo. Kaj jen ranĉo, ĉi tie. La diablo sciu kial, sed la maljuna veterano tie sur sia troneto pensas eĉ ne unufoje dum momento pri tio, kiom tie en tiu diodamnita dezerto devas suferi pro puloj diviziestro, kiu estas sendita kontraŭ pedikohavaj indianoj, kiu havas neniun molan kusenon sub la postaĵo kaj frue matene oni leviĝas

kun vundfrotitaj ostoj. Dios mio, post tiu pugnokverelo ni tuj reiros al la garnizono, kie oni havos pacon kaj ĝustan liton. Ĉu mi pravas , *caballeros*?“

„Tute ĝuste, mi general“, respondis kapitano Ampudia en la nomo de la pli junaj oficiroj, kiuj laŭdeve kapjesis.

La trupo kampadis en la interna korto de la ranĉo. La oficioj en ĉambro de la mastra domo. Tiu mastra domo estis aĉa argila kabano, kiu jam komencis fariĝi oblikva kaj tiutempe ĝi havis nur du ĉambrojn. La kuirejo troviĝis en la korto, en kabano sur stangetoj kun palmtegmento sur tio.

La ĉirkaŭbaraĵo de la interna korto estis muro el loze surmetitaj krudaj ŝtonoj.

Ĉirkaŭ kvindek paŝojn malproksime de tiu muro troviĝis kelkaj aĉaj palmkabanoj, en kiuj loĝis tri indiĝenaj familioj kaj laboris kiel peonoj en la ranĉo. La ĉevaloj de la trupo estis sur paŝtejo, kie ili devis serĉi sian manĝon kun kunligitaj antaŭaj piedoj. La ranĉistoj ricevis por ĉiu ĉevalo kvin centavojn da paŝtmono, tiel, kiel li ricevis ĉiutage dudek centavojn por la manĝo de ĉiu viro. Laŭ ordono kaj laŭ la kvitanco, kiun li devis subskribi. Kiom li efektive ricevis kiel kontantan monon, tio dependis de tio, kiom da mono mankis al la trezoristo en la kaso. Sed la ranĉero konis sian patrujon kaj konis la kutimojn de ĉiuj

ĉi malgrandaj diktatoroj, kiujn la granda diktatoro devis prizorgi ĉe la granda manĝotrogo por ne fali mem. Tial la ranĉisto ne okupiĝis pri tio, kiom da viroj kaj kiom da ĉevaloj li devis grasigi sur sia magra ranĉo. Okupiĝi pri tio aŭ eĉ skribi tion en etan notlibron kaŭzus nur kapdolorojn al li, sen pliriĉi lin eĉ je ununura peso. La loĝigan folieton rigardis neniu, kiu ricevis ĝin. Oni pendigis ĝin al rustigita najlo, kie ĝi restis tiom longe pendigita ĝis ĝi trarustiĝis aŭ la papero disfalis aŭ la *cucarachas*, do la blatoj, voris ĝin. Nur sesjara knabo prenis la folieton kaj portus ĝin al la trezoristo en la garnizono por tie elkasigi la sumon. Ĉiu, kiu estis pli aĝa ol ses jarojn, sciis, ke oni tiom longe diskutus pri la ĝusteco de la folieto, ĝis la ranĉisto intertempe jam estus tiom kolera, ke li disŝirus la folieton antaŭ la okuloj de la trezoristo kaj ĵetus ĝin antaŭ ties piedojn. Ja por kio estus diktaturo bona, se oni ne povus enspezi ion dum ĝi?

La pordego en la ŝtonmuro, kiu ĉirkaŭis la korton, konsistis el ses fortikaj palisoj, kiuj tranverse estis premitaj sur enbatitajn trunkojn, kaj kiujn la knabo, vespere kondukante la bovinojn kaj kaprojn hejmen, elŝiris, por ke la bestoj dum la nokto restadu en la interna korto, pro la pli bona protekto kontraŭ jaguaroj.

Nun staris antaŭ tiu pordego gardisto kun surmetita karabeno, kiu iris dekstren kaj maldekstren, kaj, se li vidis proksimiĝi iun, li prenis la fusilon per ambaŭ manoj kaj vokis: „*Quien vive?*“ Se la alvokito respondis: „*Amigo!*“, li rajtis pasi. Sed, se li estus respondinta: „*Enemigo, malamiko!*“ la gardisto, kiel kuraĝa soldato, tuj estus pafmortiginta la malican malamikon.

Starigi iujn aliajn gardistojn ne necesis. Kontraŭ ribelulojn oni ne starigu gardistojn. Per tio oni ja rekonus ilin kiel soldatojn. Ribeluloj, rifuzantoj de obo kaj strikantoj estas malamikoj de la ŝtata ordo, estas krimuloj kaj eksprizonuloj, kiujn oni honoras, se oficiro rilate al ili uzas la kutimajn militecajn regulojn pri atentemo, kiuj



nur decas kontraŭ la landa mal-amiko, ĉar tiu kapblas vekaj kaj vigligi dormeman municiiindustriion. Kaj tio meritas militecajn honorojn.

Estis en ĉiu kazo superflua lacigi soldatarojn kaj malkapabligi ilin por la dura marŝo de la sekva tago per tio, ke oni senigas ilin de ilia nokta dormo nur por gardado kaj patrolado. La soldataroj de la infanterio dormis en la subĉiela interna korto. Ekstere de la korto ĉe la kabanjoj de la peonoj loĝis la kavalerianoj. La soldataroj kampadis sub la ĉielo, tute vestitaj, proksime de iliaj fusiloj, kunstarigitaj laŭ la formo de piramidoj.

La diviziestro vespere elsendis laŭ tri direktoj spionajn patrolojn, kiuj revenis kun la sciigo, ke ili renkontis eĉ ne laman azenon, kaj des malpli viron. Indiĝenaj kamparanoj, survoje migrantaj kaj retenitaj por enketi ilin pri novaĵoj, koncedis, ke ili ne vidis ribelulojn, sed ke ili certe aŭdis, ke malproksime malantaŭe sur la perio restadas gregoj el banditoj, kiuj tie rabadas, perforte prenas havaĵojn kaj ŝtelas ĉiujn brutarojn.

„Tio ne lasas dubon, sinjoroj miaj, ke tiuj stinkuloj

ankoraŭ pigrumas tie, kie *teniente* Bailleres vizitis ilin. Fakte domaĝe, ke ili ne pli proksimiĝas al ni kaj la longan marŝon ne ŝparigas al ni almenaŭ je duono. Tio estas ĉirkaŭ sep aŭ ok horoj marŝlongo, kiujn ni havos morgaŭ antaŭ ni, antaŭ ol ni povos kapti la fian bandon je la oreloj.“ La diviziestro oscedis, verŝis ampleksan pepkantan gluton en la gorĝon, plenverŝis ankoraŭ duan glason kaj ŝovis la botelon al la aliaj.

Oni alportis tri pliajn botelojn.

La diviziestro ludis kun tri oficiroj domenon. De kiam la ranĉisto portis la domenon al li, li pensis pli bone pri la viro kaj rigardis lin kiel civilizitan homon; ĉar homoj sen kulturo kaj sen inteligento ne havas komprenemon pri la mensaj streĉoj, kiujn domenludanto devas mobilizi por elcerbumi, kiuj lignobloketoj ankoraŭ ne estas luditaj kaj kiu el la kunludantoj starigis ilin antaŭ si. Estas ludo inda nur al grandaj strategoj kaj al similaj spiritaj herojoj. Duonidiotoj penas lerni ŝakon. Sed kio estas ŝako? Ludante ĝin, oni ne devas diveni ion, ne ruzi, ĉar oni havas ja ĉiujn figurojn starigitajn antaŭ si, oni vidas, kion posedas la kontraŭulo, oni observas precize, kion li faras.

Tio estas ludo por malgrandaj lernejaj knaboj, kaj por mensmalfortuloj. Sed male al tio la domeno! La diviziestro sciis tre bone, kial li rigardis domenon la plej inteligenta ludo, kion homoj kiam ajn eltrovis. Kiam unu el la oficiroj preferis esti la kvara viro ĉe kartoludo, la diviziestro invitis sian gastiganton, la ranĉiston, partopreni la domenludon.

„Senkulpigu min, *don* Facundo, ke mi eraris pri vi“, li diris, amikece ridante al li, kiam la ranĉistio sidiĝis aliflanke de la tablo antaŭ li, „mi supozis vin nur ĝuste kiel certan el la kutimaj stultaj etbienuloj, de kiuj ni havas en tiu ĉi federacia ŝtato grandegan kvanton. Uloj, kiuj pensas nur pri siaj bovoj kaj pri nenio krome. Ĝojigas min vidi je vi agrablan escepton, viron kun inteligento kaj dotiteco. *Salud*. Je via sano, *don* Facundo. Do, ni nun foje rigardu, kion mi havas ĉi tie.“ Per potenca bato de siaj ungegoj la diviziestro brue metis sian ludbloketon sur la tablon kaj ŝovis tiel la flankon kun la kvin blankaj punktoj al la jam surmetita kvino, kvazaŭ neniu en la mondo krom li mem povus meti kvinon al alia kvino. Kiam li estis preta pri tiu giganta ago, li klake kunmetis siajn du

manplataĵojn, ege frotis ilin, dum li rigardis kun avidaj okuloj al la surmetitaj bloketoj por vidi, kiun bloketon la sekva ludanto aldonas al la vico. Tuj kiam la bloketo estis envicigita kaj li ekvidis, ke ambaŭflanke de la vico seso atendas laŭan konekton, li sentis sin pravigita kiel rekompenco verŝi gorĝen pluan glashavon kvazaŭ rekompenco.

Estis je la dekunua vespere, kiam li decidis, ke nun fine estas la tempo sterni sin kaj per tio doni al la oficiroj la okazon adiaŭi sin per noktsaluto.

Noktomeze tremadis la tereno, sur kiu troviĝis la ranĉo, pro la ronkado de ĉiuj, kiuj kapablis ronki. Tiom da saniga ronkado ĉirkaŭ si la gardisto ĉe la pordego ne povis elteni longtempe. Li apoge starigis sin oportune al fosto kaj lasis gliti la karabenon kun la surmetita bajoneto inter la gambojn. La soldato pensis, ke en la kazo, ke li iom ekdormos kaj la kaporalo venos kun la nova gardisto kaj trovos lin en dormo, li ricevos pugnobatojn sur la grimacon kaj devos stari dum du pliaj horoj. Kaj li pensis, ke kelkaj pluaj batoj sur la vizaĝon, ja tamen ne faros serĝenton kun pli bona salajro el li, kvankam li milfoje ne

dormis dum la gardado, kaj tamen eĉ ne fariĝis „kapĉjo“, do kiun sencon havu, li pensis, stari tie kaj stulte mieni, se la tuta tero dormas kaj li, kompatinda soldato, sola gardu tie. Li ekrevis pri tio, kiajn belajn, grasajn dikajn surojn Gambina havas! Ke estos en ĉiu kazo ankoraŭ minimume ses tagoj, antaŭ ol li ree estos hejme kaj povos kuntrenadi ŝin ĉe la dancado. Kaj bonan muzikon tiu *don* Teodulo havas, se estas danco ĉe li, kaj diable bonan komitekon li ofertas. Damne, miaj okuloj brulas, kvazaŭ maljuna mulo pisis en ilin. Jes ja, la muziko ĉe *don* Teodulo, kontraŭ tiu oni povas diri nenion. Tiu estas bona. Kaj Gabina... grasajn lardajn dikajn surojn. Kaj morgaŭ denove kuradi la tutan tagon, kiel freneziĝinte. *Dios mio*, se nur la soldatovivo sur la tuta tero de Dio havus iam finon kaj oni trankvile povus dormi sur sia petato tiam, kiam oni volas, kaj neniu rajtus bati al iu sur la buŝaĉon sen tio, ke oni tuj trifoje rebatus al tiu ulo sur la oblikvan grimacon. Laca mi estas kiel maljuna porko, tion Dio en la ĉielo scias.

Ĉe tiuj vortoj li ankoraŭ pli bonfartige etendiĝadis, skrapante sian dorson per la fosto, kaj por senti iom pli

da varmo li malsuprenigis sian kapon tiel, ke ĝi tuŝis la ŝultrojn.

## Ĉapitro 12

01

Neniu, nek iu el la soldatoj nek iu el la oficiroj sciis diri kun certo, ĉu li ĵus dormis nur kvaronon de horo aŭ kvar horojn. Ŝajne neniu sciis precize indiki, ĉu estas la unua nokte aŭ la kvara matene. Sed estis fride kaj vente, kaj el tio konkludis ĉiu, kiu konas la landon, ke devas esti pli proksime al la kvara ol al la unua. Kaj pro stranga kaŭzo ŝajne pensis neniu pri tio, eĉ ne la oficiroj, simple rigardi al sia horloĝo, por ekscii, kioma horo estas. Ĉiu timis ekflamigi alumeton aŭ funkciigi elektran poŝlampon. Ĉar ĉiu sentis, ke en tiu kazo, se li malkaŝus sian pozicion eĉ nur per sparketo, tio povus kosti la vivon. La atentemo de ĉiu estis tre katenita per aliaj aferoj; tial tio aspektus ridinde scii, kiu horo en la nokto estas. Ĉar tiam, kiam ne povus esti hela mateno interne de la dudek sekvaj minutoj, estus ja tute egale, ĉu estas je la unua nokte aŭ je la kvara matene.

La stranga afero okazis. Ĉio kaj ĉiuj, kio kamapadis en la

ranĉo, vekigis. Preskaŭ ĉiuj je la sama sekundo, ĉiuj kvazaŭ vokitaj de unu voĉo, kiun ili ne aŭdis, sed supozis aŭdi.

La unua certa sono, kiun ili ĉiuj aŭdis, estis la subita bojado de la hundoj, kiu plifortigis. La hundoj, kiel kutime, bojis dum la tuta nokto sen interrompo. Ili bojadis pro la multnombraj ĉevaloj kaj muloj, kiuj tie hopadis; ili bojadis pro la granda nombro da dormantaj soldatoj, kaj ili bojadis unu al la aliaj, la hundoj de la ranĉo kaj tiuj de la peonoj sur unu flanko, kaj tiuj de la hundoj kurantaj post la trupo kaj de la trupo tolerataj, sur la alia flanko.

Tial neniu atentis la bojadon de la hundoj. Nur kiam la bojado fariĝis pli laŭta kaj kolektiĝis en unu forta, kolera tono, sciis ĉiu en la ranĉo, ke ĉi tie io okazas, kio devas esti nekutima.

Sed ĉiu, aŭ viroj aŭ oficiroj, restis sur sia kuŝejo, dormeme ili nur iom rektiĝis kaj rimarkis en la tenebra nokto, ke amaso da ĉevaloj sen permeso eniĝis la korton kaj tie timeme kaj maltrankvile stamfadis. Inter ili la viroj



rimarkis la ombrojn de iuj homfiguroj, kiuj kuradis tien kaj tien, evidente kunpelante kaj pelante el la korto la ĉevalojn. La figuroj proksimiĝis ĝis la dormantoj, stumblante transiris ilin, falis sur ilin, leviĝis kun mallonga sakro kaj stumbladis plu, elpelante la ĉevalojn.

La ĉevaloj, kiuj moviĝadis en la interna korto kaj ĝenis la dormantojn, moviĝadis jam sen la ligaĵoj ĉirkaŭ la antaŭaj kruroj. Jen la kaŭzo, kial ili venis en la korton, aŭ pro timo aŭ pro malsata jaguaro aŭ pumo, kiu ŝteliradis sur la paŝtejo aŭ allogitaj de la maizo surtavoligita tie en sakoj por servi kiel nutraĵo de la ĉevaloj je la mateno.

Tie kaj tie oni aŭdis la insultadon kaj sakradon de la soldatoj, kiuj pelite el la dormo kaj tretite de kamarado dum ties forlaso de la korto, ĉar tiu devis plenumi ekstere de la ĉirkaŭmuro privatan aferon kaj pro la tenebro ja ne povis vidi, kien ili tretas.

Post malpli ol kvin minutoj finiĝis la stranga bruo, la insultado kaj sakrado de la homoj, la maltrankvila stamfado de la ĉevaloj tiom subite, kiom ĝi aperis. La hundoj denove ŝanĝis la tonon de la bojado kaj bojadis

nur siajn kutimajn noktajn interparoladojn. Kelkaj uloj, kiuj leviĝis, sed ne foriris de sia loko, ankoraŭ parte endorme rekuŝiĝis kaj dormis plu, ĝojigite pri tio, ke ili ankoraŭ ne estis skuataj por leviĝo, ĉar certe ankoraŭ mankis kelkaj belaj horoj antaŭ ol *El Corneta* komencos trumpeti. Post dek minutoj ree ronkis la tuta soldataro, eĉ pli profunde kaj pli bonfarte ol antaŭe.

Kiam la kornsignaloj lade sonis trans la ranĉon, kiam ĉiu komencis etendi siajn membrojn kaj ĉiu komencis oscedi tion, ke li minacis vori sin mem kaj poste ĉiu komencis grati sin je kapo, dorso, brusto kaj gamboj, kvazaŭ troviĝus troa tavolo da haŭto sur lia korpo, estis la unuaj vortoj, kiujn diris ĉiu, ĉu simpla soldato ĉu oficiro, al sia najbaro: „Damne, ĉu mi nur sonĝis tion en la lasta nokto, ĉu ĉi tie efektive dum certa tempo infere spektaklis?!“ Kaj la najbaro pro tio respondis: „Do sekve mi ne sonĝis tion, se ankaŭ vi aŭdis tion. Tie sur la prerio certe estis kvindek pumoj, kiuj enpelis ĉiujn ĉevalojn ĉi tien kaj tretadis sur mia ventro.“ Kaj la diviziestro diris al la kapitano, kiu sidis sur la najbara lito, oscedis kaj gratis sin: „La serĝenton de la kavalerio mi suke vangofrapos, ĉar li ne pli bone protektis la ĉevalojn. He, ĉe la diablo, kien mi metis mian kanonon? Tiel ebria mi ja tute ne estis, ke mi ne plu scias, kien mi ĵetis la zonon kun mia kanono. Mi scias tute precize, ke mi pendigis la zonon je la lita rando, proksime ĉemane.“

La diviziestro serĉis dekstre kaj serĉis maldekstre, li serĉis sub la lito, serĉis ĉe la lignaj fostoj de la argila vando, li palpadis ĉie sian ventron kaj diris poste kun mirigita vizaĝo: „He, dio damnu ĝin, kien, ĉe mil diabloj, mi ĵetis mian „artilerion“ lastnokte. Diru, kapitano, ĉu mi vere estis tiel ebria, ke mi ne plu sciis, kion mi faras?“

„Certe ne, *mi general*. Mi havis la impreson, ke vi estis sobra kiel pastro antaŭ la unua matena meso.“

„Ĉu pastro ĉiam sobras antaŭ la matena meso, tion mi ja ankoraŭ pridubas“, respondis leviĝante la diviziestro, kiu rigardis al siaj gamboj, esperante trovi, ke lia kanono pendas inter la gamboj. „Sed ĉu pastro ebria ĉu neebria, mia pistolo estas for, tion mi scias kun certo.“

„Eble la servoknabo prenis ĝin al si por purigi ĝin“, diris leŭtenanto.

„Li ŝajne kunprenis tuj ĉiujn revolverojn por la purigado“, opiniis iu alia el la oficiroj, kiu same serĉis dum kelkaj minutoj per la flagranta kandelo sian pistolon sub la mato, en siaj botoj kaj inter sia vesta bulo.

Ekstere antaŭ la domo, en la vasta korto okazis la kutima kirlado de la soldatoj post la vekiĝo. Estis ankoraŭ tiam tenebra nokto, sed en kelkaj lokoj de la korto brulis jam bivakfajretoj, kiuj lumigu la korton.

„He, Klaŭdio!“ oni aŭdis voki viron el la pelmelo, „ĉu vi ne vidis mian damnitan karabenon? Scias nur la diablo, kien ĝi perdiĝis.“

„Ne demandu min, azeno, dum duono de horo mi faras nenion alian krom serĉi mian pafilon. Ankaŭ la bajoneto estas mi ne scias kie.“

Serĝento kriis ĉagrenite trans la aliajn: „Kiu el vi, muknazaj kanajloj, renversis la fusilpiramidojn? Eĉ ne unu bastono videblas.“

La pelmelo de la uloj fariĝis pli kaj pli granda kaj pli maltrankvila. Tuj poste oni aŭdis el ĉiuj anguloj kaj anguletoj de la korto ĉiam nur la saman ĉagrenan kaj koleran demandon: „Kiu malica putinhundido formetis mian karabenon?“ Poste denove: „Kie estas mia pafilo, ĉe la diablo?!“ Kaj el alia angulo: „Tion mi ja povas ĵuri al la

damnita virkapro, se mi kaptos la ulon, kiu kaŝis mian knalilon, mi draŝos lin tiom, ke ĉiuj liaj dentoj elrompiĝos en la faŭko; foriĝu inferen la tuta bando, ja kien malaperis mia diodamnita fusilo? Dum la tuta nokto ĝi kuŝis proksime apud mi kiel magra fianĉino, kaj nun ĝi foriĝis.“

La kornisto blovis, ke oni enviciĝu por la matena parado. La tago ekgrizis. Kiam oni nombris ĉion, montriĝis, ke mankas cent tridek karabenoj, ok oficiraj revolveroj, du mitraloj, kvar kestoj kun mitralomunicio, ĉiuj portoseloj de la mitralotaĉmento, cent kvindek plenigitaj kartoĉozonoj kaj certa nombro da bajonetoj, tranĉiloj, malgrandaj armehakiloj kaj ĉirkaŭ dudek sakoj plenaj de maizo. Kiam la kavalerio ekrajdis al la parado, glitis la soldatoj iom post iom de la ĉevalodorsoj, kaj la timigitaj ĉevaloj sovaĝe forkuris. Montriĝis, ke oni tratranĉis ĉiujn selorimenojn je du trionoj, kaj ke ili nepre estis disŝirontaj, kiam ĉevalo komencis galopi aŭ ekprovis saltadi.

„Kia pedikohava fibando de soldatoj vi estas!“ kriis la diviziestro. „Ĉu tio jam iam okazis en armeo? Ke iuj lasis

fortiri siajn pafilojn de sub la postaĵoj, kiel vi. Dum tri monatoj mi lasos vin punekzercadi, por ke la verda supo ŝprucu de vi el ĉiu kunkudraĵo. Kaj al ĉiu, kiun mankas la ŝprucilo, mi kroĉos dek tagojn da arestĉelo. Mi instruos al vi, kiom valoras viaj armiloj, fiularo! Ĉiu, kiu ne plu havas fusilon, detranĉu bastonon. Kaj kun tiuj bastonoj vi ataku la kotulojn, kiuj forŝtelis la armilojn de sub viaj postaĵoj. Aŭ, ĉe Satano, mi pafmortigos la tutan bandon ĉi tie. Forpaŝu matenmanĝen!“

„Kaj vi, *caballeros*“, diris la diviziestro, dum la oficiroj sidiĝis por manĝi, „mi krome rimarkis, ke ankaŭ vi ne plu havas revolverojn. Kiun senkulpigan respondon vi havas pro tio?“

La oficiroj, kiuj ja sciis, ke ne nur al ili, sed ankaŭ al la komandanta generalo perdiĝis la revolvero senspure, diris unue nenion. Ili provis nur konfideme okulume rideti al la generalo. Sed la diviziestro respondis kun serioza grimaco, kiu ekskludis ĉiun pluan konfidemon.

Leŭtenanto ŝajne rapide kompreninte tiun seriozan kaj neproksimigeblan grimacon, rigardis al la dekstra kokso de la diviziestro kaj donis al la kamaradoj kunpinĉita okulo la signalon, ke ili sekvu la direkton de lia rigardo.

Sur la dekstra kokso de la diviziestro pendis laŭinstrukcie 45-kalibra armea revolvero. Ili ĉiuj pensis, ke la diviziestro ĝis tiu momento havis ne armean revolveron, sed laŭordan *Aŭtomatic*-on. Sed ĉiu el ili pensis, ke tio eble estis eraro kaj, ke la diviziestro pro tiu marŝo



kontraŭ la ribeluloj interŝanĝis sian *Aŭtomatic-on* kontraŭ revolvero, tiel, ke neniu rimarkis tion ĝis tiu momento.

La diviziestro nun facile povis paroli kun grandaj gestoj kontraŭ ĉiu, kies armilo en la nokto estis ŝtelita. Tuj, kiam li jam serĉis dum kelkaj sekundoj sian *Aŭtomatic-on* kaj ne trovis ĝin, li rememoris pri la stranga pelmelo en la nokto kaj venis en lian kapon alludo de ideo, kio eventuale okazis. Sen serĉi plu, li haste kuris el la ĉambro kaj iris al la pordo de la dua ĉambro en la domo, kie dormis la ranĉisto kun sia edzino. Vespere antaŭe li rimarkis, ke la ranĉisto posedis preskaŭ tute novan pezan 45-kalibran revolveron. Kaj tuj kontante paginte per sumo, por kiu aĉetebus de la ranĉisto du novaj revolveroj kaj sufiĉe da mono reteneblus por aĉeti ankoraŭ aldone kelkajn skatolojn da municio, akiris la diviziestro tiun revolveron kun la kondiĉo, ke la ranĉisto ĵuru je sia honoro, ke li perfidos nenion pri tiu komerco.

„Mi demandas vin ankoraŭfoje, sinjoroj miaj, kion vi povas diri por senkulpigi vin?“ La diviziestro ripetis la demandon kun la tuta ĉagreno, kiun li sentis pri tio, ke la

ribeluloj povis mistifiki lin tiel. Sed tio, kio plifortigis lian ĉagrenon eĉ ĝis kolerego, estis ne sole la rabado de la armiloj, sed, ke tiuj kotaj kaj pedikohavaj *muchachos* kuraĝis tiom fie konduki al li kaj al la laŭleĝaj federaciaj trupoj, kontraŭ la fiero de la nacio, ke ili montris tiom malmulte da respekto pri la flagoj hisitaj en la korto, ke ili distranĉis tiujn flagojn en pecetojn kaj priŝmiris ilin per freŝa koto.

La oficiro, kiu laŭaĝe estis la dua, ekstaris, militece mansalutis kaj diris: „Kun via permeso, *mi general*, en la nomo de miaj kamaradoj mi devas doni la sekvan klarigon: Ni havas neniun senkulpigon kaj staras je via dispono!“

La diviziestro rigardis sian plej junan leŭtenanton plej akre kaj neniige: „Vi, leŭtenanto Manero, ja deĵoris en la kampadejo. Ĉu ĝuste?“

„*Si, mi general*, mi deĵoris.“

„Ni ankoraŭ interparolos, *teniente* Manero, pli poste.“

„*A sus ordenes, mi general!*“

La diviziestro kapjesis al si mem.

En tiu momento la knabinoj portis sur teleroj pecetigitajn papajojn al la tablo kiel matenmanĝan frukton.

La diviziestro, kiun oni priservis unue, rigardis kun vakaj okuloj sur la teleron, kvazaŭ li ne vidus ilin. Li kapjesis ankoraŭfoje. Poste li kaptis mekanike la tranĉilon kaj la forkon, detranĉis pecon de la suka frukto kaj ŝovis ĝin en la buŝon, kiun li malfermis nekutime vaste, kvazaŭ li volus enŝovi pecon, kiu estas trifoje pli granda.

Dum li softe dispremis la frukton inter palato kaj volbita lango, por tute elgustumi la frukton, li ankoraŭ kapjesis al si mem. Kiam li estis malpleniginta la teleron kaj devis atendi kelkajn minutojn, antaŭ ol oni enportis la ovojn, li diris, ĉiujn oficirojn rigardante laŭvice: „Laŭ pramalnovaj militecaj reguloj kaj principoj, kiuj kompreneble neniam estas akceptitaj en la regularoj, mi nun fakte estus devigita honorplene adiaŭi min de la Tero per bona pafotaŭro tra mia supra kesto.“

Laŭta protesto de la oficiroj sekvis, kiel tio ja estas la devo

de la oficiroj kontraŭ pli alta rangulo. „Ni ne estas en milito, *mi jefe*.“ „Tio estas ja malnova stulta sensencaĵo.“ „Ni estas modernaj soldatoj, *mi general*.“ „Tio estas malnova ŝimokovrita superstiĉo.“

Leŭtenanto Manero distingiĝis speciale per laŭta kaj energi plena: „Mi, *mi general*, sole mi havas la tutan kulpon. Mi deĵoras. Mi ne agis laŭdeve. Estas mi tiu, kiu devas adiaŭi sin. Mi petas pri la permeso adiaŭi min kun ĉiuj honoroj.“

Kia viro! Kia granda kiel oficiro! En la historio de la bataliono li eterne vivus plu kiel la oficiro, kiu preferis la morton al perdita honoro. Jen la materialo, el kiu la oficiroj de la gloriĉa ameo estas formitaj. Tiom longe, kiom ekzistas tia spirito ĉe la oficiroj, tiom longe ne estas eĉ la plej eta danĝero, ke la nacio eble eĉ povus esti estingita. Sen laboristoj kaj similaj fibandoj, kiuj eterne deliras pri malsatado kaj eterne volas striki, kiuj eterne devas kritikaĉi la registaron, nacio tute bone povus elteni kaj tamen postuli la laŭan respekton de ĉiuj civilizitaj nacioj de l' Tero; sed sen tiaj oficiroj kia leŭtenanto Manero, neniu nacio povus vivi eĉ nur dum unu tago.

Tion tuj ĝuste komprenis ĉiuj ĉeestantaj oficiroj, kiuj ekkriis trifojan „*Viva, Manero!*“ , dum ĉiuj aliaj leviĝis, kun la escepto de la diviziestro.

La diviziestro interrompis la hurladon de la tro honorsaturitaj fajrodancistoj per kurta dura: „Leŭtenanto Manero, por tia infaneca sensencaĵo mi ne donas mian permeson. Ĉu komprenite? Kio estas eĉ pli, mi malpermesas al vi, kiel via plej altranga oficiro ĉi tie, turni la armilon kontraŭ vi mem. La trupo estas sur la batalkampo, suicido sur la batalkampo estas kvazaŭ la sama kiel dizerto antaŭ la malamiko. Ĉu komprenite, leŭtenanto Manero?!“

„*A sus ordenes, mi general!*“ La leŭtenanto estis ekstaranta kaj salutis al sia generalo.

Estis la plej honorinda, sendubiga kaj bone militeca savado de la situacio. Pri logiko tiu speco de savo ne postlasis dezirojn rilate la neatakeblecon. La diviziestro ne povus komandi ion, kion li mem ne estus preta akcepti. Ordonon donita de li validis por la tuta trupo. Li estis parto de tiu trupo. Suicido sur la batalkampo estis

senhonta kaj senhonora dizerto. Malpli ol iu ajn alia povus dizerti, povas permesi tion al si komandanta generalo de la trupo. Karabenoj anstataŭigeblis. Sed ne generalo. Ankaŭ tio estas pripensinda. Tial nenio alia fareblis ol fini la matenmanĝon kun la kutima ĝuo, sen malavantaĝe influi per suicidpensoj la digeston.

Kiam la matenmanĝo kun ĉiuj partoj estis finita kaj ankaŭ la dentpurigiloj eluzitaj, ne plu restis senkulpigo ankoraŭ pli longe ĉi tie sidi ĉe la tablo.

La diviziestro kunvokis kelkajn soldatojn por porti la krudajn kaj rigidajn seĝojn, sur kiuj sidis la oficiroj, en la portikon, kien li vokis ĉiujn oficirojn kaj la unuarangajn serĝentojn.

„Serĝento Morones, kiom da fusiloj restas al ni?“ li demandis la ĉefserĝenton, kiun li estis komisiinta nombri ĉiujn postrestintajn kaj uzeblajn armilojn kaj la municion.

Laŭ la opinio de la diviziestro estis sufiĉe da ili por ne rezigni pri la planita antaŭmarŝo. La *muchachos*, laŭ li, eĉ se ili posedas trifoje pli da armiloj ol la *federales*, komprenas tiel malmulte uzi la armilojn, ke, kiel samopinie supozis ĉiuj oficiroj, ĉiu armita soldato valoras tiom, kiom dudek armitaj *rebeldes*, do dudek ribeluloj. La indiĝenoj, kiel la diviziestro bone sciis kaj kiel sampensis ĉiuj ceteraj oficiroj, tenas la fusilkapon al la malamiko

anstataŭ kontraŭ propra ŝultro. Tiuj el la insurgentoj, kiuj kapablas teni la fusilbuŝon al la malamiko, kunpremas la fusilokapon inter la genuoj, aŭ antaŭ la ventro, aŭ kuŝigas ĝin plate sur la teron kaj kaŭras sin dum la pafado apud ĝi, esperante, ke la kugloj ĝuste iru tien, kien la indiĝeno deziras havi ilin. Ŝtonojn, lancojn aŭ sagojn la pedikohava indiĝeno ja pli ĝuste traktus, sed modernaj pafiloj laŭ la indiĝeno trafas ja tute per si mem la celon, kiun oni deziras trafi. Tio estis tute klara, kaj ĉiu oficiro kaj ĉiu serĝento sciis tion ja ankaŭ tute persone pro multnombraj bataloj kontraŭ strikantoj, insurgentoj kaj ribelaj indiĝenaj kamparanoj. En tiu kazo tio laŭ ili ne estis alia afero, des pli, ĉar la ulo, kiu lasas nomi sin generalo de la ribeluloj, sin tiel kondutas kaj moviĝas kvazaŭ li estus trivita viŝĉifono. Por tio la diviziestro havas fidindan raporton de vidatestanto, la leŭtenanton Bailleres.

Ankaŭ la kvanto de la ribeluloj laŭ ili estis konata. Laŭ ĉiuj spionadoj kaj pridemandoj kaj precize kalkulate laŭ tio, kiom da ili mortis batale kaj kiom estis ekzekutitaj, ilia kvanto aktuale ne povas esti pli granda ol cent aŭ cent



dudek da viroj, el kiuj aldone granda parto certe estas vundita kaj same granda parto tute ne kapabla uzi armilon kaj tial maldanĝera por oficiale rekonataj soldatoj.

Sed per tiu atako la soldatoj supozeble aldone rericevos siajn ŝtelitajn armilojn; ili gajnos aldone la armilojn pli frue ŝtelitajn aŭ iel alie glitintajn en la manojn de la ribeluloj, kaj la trupo post tio marŝos kun ĉiuj honoroj hejmen en la garnizonon.

Kun ĉio, kion la diviziestro proponis dum tiu oficista interkonsiliĝo, konsentis la aliaj sen kontraŭdiro, ĉar ĝi estis militece ĝusta kaj, rigardate el la vidpunkto de honoro, neevitebla. „Unue ĉiam la honoro, *caballeros!*“ ripetis la diviziestro ĉe ĉiu okazo, se li ne sciis, kion diri, kion ordoni kaj kion proponi en diskuto.

Ĉefserĝento Morones, kiu partoprenis la oficistan interkonsiliĝon kun la ceteraj unuarangaj serĝentoj, estis sekve de sia longa servotempo kaj sia sperto tre ŝatata de la diviziestro. La komandanto rigardis la serĝenton samranga al oficiro kaj li jam antaŭ certa tempo sendis al

la militministerio la petskribon nomumi la serĝenton Morones kiel subleŭtenanton kaj per tio envicigi lin en la oficistaron. Tiun rangaltigon oni certe konsentos.

Morones pri ĉiuj aferoj rajtis permesi al si pli da liberoj ol la pli junaj oficiroj, kiuj ĵus venis de militista akademio. Ili en ĉiu rilato estis rigardataj kiel flavbekuloj, kun la ŝiraĵoj de la vindotukoj, kiuj ankoraŭ pendis de iliaj postaĵoj.

Estis do serĝento Morones, kiu nun en tiu momento diris: „Se vi permesas al mi, *mi general!*“

„Ekparolu, serĝento Morones, tial ni estas ĉi tie, por interparoli kaj proponi ion. Kompreneble, multe da interkonsiliĝo en tiu kazo ne necesos. Ni ekmarŝos kaj traktos la kanajlaron tiel, ke sufiĉos por ĉiam. Ke ni entute interkonsiliĝas, okazas nur tial, ĉar mankas al ni armiloj kaj la municio ne abundas tro. Do, kion vi celas, Morones?“

„Mi pensas, *mi general*, ke ĉi tie pri la afero io ne estas en ordo, se mi rajtas paroli tiel, *mi general.*“

„Kio do? Kion vi opinias, serĝento Morones?“ La diviziestro demandis strange koncize kaj dure. Li timis, ke serĝento Morones eble eĉ povus kritiki la geniajn planojn de la komandanto, aŭ, kio estus pli terure, trovi eĉ eraron en la plano. Sed li ankaŭ konsciis, ke la serĝento estis bone edukita, precipe kiel soldato, kaj tre lerte evitas trovi erarojn en la planoj de altrangaj oficiroj.

Junaj leŭtenantoj en tiu rilato estis multe pli mallertaj kaj pli sentaktaj. Iafoje ili prezentis kelkajn novajn elegantajn ideojn, kiujn ili ja ne lernis kiel kadetoj, ĉar oni ankoraŭ instruis ilin laŭ la metodoj de Cezaro, Hanibalo kaj Aleksandro kaj ĉar la metodoj de Napoleono ankoraŭ estis rigardataj kiel modernaj; sed ili trovis tiajn supermodernajn ideojn en libro pri moderna franca taktiko, ili komprenis ilin nur parte kaj ne digestis ilin, kaj poste ĉeokaze provis brili per tiaj ideoj, se la komandanto ellaboris la planojn por bataalkampaj ekzercoj kaj al tio komande invitis la flavbekajn oficirojn, por delektiĝi je ties nelerta rigideco.

Sed la vizaĝo de la diviziestro eklumis plaĉe, kiam la serĝento, preskaŭ kiel lernanto, tute naive demandis:

„Kial, *mi generalo*, vi supozas, ke la ribeluloj ne murdis ĉiujn niajn soldatojn en la nokto?“ Tiel facilpaŝe kaj senbrue, kiel ili ŝteliradis inter niaj viroj por ŝteli niajn armilojn, ili facile ja certe povintus tratanĉi ankaŭ ĉies ĝorĝon. Kaj car ili ne faris tion, *mi general*, mi supozas, ke en tiu kazo io ne estas en ordo.“

La diviziestro ridetis. Kun patreca rideto sur la rozkoloraj kaj grasaj lipoj li rigardis la oficirojn laŭvice. Poste li kapjesis al la serĝento kaj diris akordiĝeme, favore kaj instrue: „Serĝento Morones, viaj demandoj kaj via rimarko montras, ke vi estas brava soldato, kaj ke vi kapablas pensi mem kaj metas demandojn al vi dum tiaj nekutimaj okazaĵoj, kiel pri tiu de la lasta nokto. Sed la demando estas facile respondebla, serĝento Morones.“

La oficiroj, el kiuj neniu trovis menciinda la konduton de la ribeluloj, kvankam ĝi estis atentofrapa, atentis kun streĉitaj mienoj la klarigon de la komandanto. La graveco de la rimarko de la serĝento nur en tiu momento konsciigis al ili. Sed la diviziestro pretervidis tiun gravecon tute. Lia klarigo estis ekzemplo por la pigriĝinta penskapablo de ĉiuj viroj, kiuj en la diktaturo estis en

honorinda ofico. Inteligentaj viroj kapablis eĉ ne dum ses monatoj teni sin en publika ofico en la lando.

„Simplas, sinjoroj miaj. Nenio surtere estas pli facile klarigebla ol la konduto de tiuj kotkovritaj porkuloj. Tiuj pedikohavaj kanajloj scias tre bone, ke per la morto estas punota ĉiu, kiu aŭdacis ataki la vivon de persono, kiu prezentas aŭtoritaton. Tio rilatas ne nur al *El Caudillo*, sed same al oficiroj, soldatoj kaj policistoj. Eĉ la provo nur tuŝi la vivon, ja nur minaci ĝin estas punata per mortpafado aŭ pendumado. Jen tio, *caballeros*, kion tiu senhonta fibando timas. Ili scias tre bone, tiuj favaj hundidoj, ke la ŝtelado de armiloj en pacotempoj estas nur punenda kiel ĉiu alia ŝtelado, per kelkaj monatoj en prizonaresto, ne per pli. Tial oni kurbigis eĉ ne haron de iu el niaj viroj. Estas la palvizaĝa timo de tiuj hundidoj, kaj ili ĉiuj agas tiel, kiel tio atendeblas de tiaj friponoj. Ili alŝteliĝas en la nokto por ŝteli. En hela lumanta tago, kiam brilas la suno de Dio, ili rampas en siajn kadavrokavernojn por kaŝi sin. Tio estas ja ankaŭ la kaŭzo, la ununura kaŭzo, kial ili ne ekmarŝas al ni kaj ne venos tien, kie ni bonvoleme pretis atendi ilin por kroĉi al

ili la delonge merititajn drastajn batojn kaj tiam pendumi ilin, se estas sufiĉe da ŝnuroj. Je sendefenduloj, kiel al nia leŭtenanto Bailleres kaj al niaj kompatinde malbonŝancaj tri kamaradoj, ili metas manojn, tion ili kuraĝas. Sed alfronti publike honestan soldaton sur la batalkampo, por tio mankas al la pedikovoruloj la pipro en la intestoj. Tio estas klara al vi, serĝento Morones, mi pensas.“

„*Si, mi general, muchas gracias*, tio estas nun tute klara al mi.“ Serĝento Morones diris tion kun la tute senkulpa mieno kaj kun ĉiu respekto de subulo al tia altranga ĉefo. Sed en lia tono, sen lia volo, iel kunsonis, ke li sentas sin eĉ ne je joto pli prudenta ol antaŭe kaj, ke li pensas alie pri tio. Kiel bona kaj sperta soldato, kiu krome ankaŭ scias, ke lia rangaltigo al oficiro dependas de tio ĉiam jesigi ĉefojn, ĉiam esti taktoplena kontraŭ pli altaj ranguloj kaj okupiĝi pri nenio, kion oni ne eksplicite ordonis al li, li gardis sin atente ankoraŭfoje menci iujn dubojn, kiuj restis al li, post kiam la altrangulo diris sian opinion.

## Ĉapitro 13

01

La militeca ekzercado de la serĝento limiĝis je tiuj praktikaj konoj, kiuj al ĉiu kutima soldato en armeo estas instruebla dum unu jaro per pli-malpli da ripopuŝoj, vangofrapoj kaj alkriadoj.

La profundaj sekretoj de la pli alta militarto restis fermitaj al li, tial li kiel soldato tute ne havis la perspektivon atingi en la armeo pli ol en la plej bona okazo rangon de unuaranga serĝento, kaj kiel serĝento li havis neniun alian respondecon ol atenti pri tio, ke la viroj de lia grupo je la komandita tempo estu ŝirataj el la dormejoj kaj je la ordonita tempo staru en vico.

La diviziestro male al tio, kiel filo de nobla familio, je duono de itala deveno kaj je duono de franca-hispana, frekventis sukcese militistan akademion, kie li lernis ĉion tion, kion armeestroj ekde la tempoj de la babilonoj ĝis Wellington diris, instruis, ordonis kaj rekomendis. Per tiu studado li iom post iom estis disigita de la kutimaj homoj,

de la tielnomataj civilfriponoj kaj pliproksimigita konsiderindan kvanton da ŝtupoj al la dioj. Tiu ŝanĝado de kutima mortinto al tre granda prezentanto de Dio surtere komencis evolui ekde la unua tago de lia eniro en militista akademio kaj laŭ precize elprovitaj reguloj.

La unua afero estis, ke li devis uzi tute novan kaj komplete ŝanĝitan lingvon kaj ŝanĝi la tonon de tiu lingvo tiel, ke tuj, se li senkroĉigis siajn makzelojn, ĉiu kutima homo tuj ekkonas, ke li enkorpigas la honoron de la patrio kaj de Dio estas elektita skribi unu aŭ kelkajn novajn ĉapitrojn de la fama kaj glora historio de la armeo.

La antaŭpreparo por tia granda tasko kostis kompreneble multe da penoj, oferoj, pacienco kaj dura laboro.

En la unuaj semajnoj post la eniro en militistan akademion, la kadetoj, kiuj esperis fariĝi post la eniro en la Militista Akademio iam divizio-generaloj, devis envicigi sin noktmeze kaj vestite nur per noktoĉemizoj kaj kun brulantaj kandeloj ĉemane en la ĉambroj de la pli aĝaj kadetoj kaj evidentigi per antaŭmontrado de certaj objektoj, kiagrade ili jam lernis purigi militistajn botojn



laŭ instrukcio.

Dum la tagmanĝo, se oni ĝuste antaŭmetis al ili grandiozan pecon da suka rostaĵo kaj ili kun kunfluanta salivo en la buŝo intencis ĵetiĝi sur ĝin, vokis pli aĝa kadeto al ili, ke ili rakontu al la tabla rondo, kio estas sablo.

Por estonta generalo sablo ne estas tio, kio ĝi ŝajnas esti por civilfripono. Tiel simpla tio ne estas por estonta armegvidanto en la diktaturo. Por devfervora, patriota, servopreta, lernavida kaj sciomalsata pedikohava kadeto en la unua jaro sablo estas io tute alia. Jam dum la unua servoĵaro li devas lerni kompreni, ke por kadeto sablo estas la sekva: Certa aŭ certaj pli-malpli malgrandaj geologiaj formaĵoj, kiuj parte grajne kaj parte kristalsimile aperas, sed montriĝas parte ankaŭ en ĉiuj aliaj iel eblaj kaj penseblaj konataj kaj nekonataj geometriaj formoj, kaj kies deveno, se oni konkludas tiun laŭ ties montriĝantaj okulfrapaj ecoj, ekestis per erozio aŭ pro la ĉiamaj enfluoj de atmosferaj rilatoj al la rokaj partoj de la terĝlobo, do amaso konsistanta el lozaj kunigitaj eroj, kiuj, se ili estas laŭe disvastigitaj sur

ekzercada loko, servas al la ununura, sed vivnecesa tasko, ke sur ĝi grupo de novaj flavbekaj, nematuraj, duone uniformitaj, malbone purigitaj, fibubaj kaj pekemaj kadetoj, kiuj sin ĉiam tro malfrue starigas en vico por ekpreni marŝdirekton por ekzerco de la anseromarŝo kaj laŭ kontraŭreglamenta maniero kaj ĉiam en la malĝusta direkto taĉmente svarmas flanken kaj samtempe plenumu kelkajn pluajn elmontrojn de fizikaj movfortoj, por ke fine ili lernu kompreni, ke oni ne uzu la gambojn de pedikohava kadeto por boradi en sia nazo aŭ en tiu de kadeto el pli aĝa servojaro, kiu ĉiam kaj eterne estu rigardenda kiel ties ĉefo, sed, ke oni per ĝi firme rektigu la genuojn, ke oni kuntiru la ventron, ke oni ŝovu la bruston kiel tuberon antaŭen, ke oni samtempe ne staru kiel graveda indianino, kaj ke oni metu la manojn tiel al la ekstera, sed ne al la maldekstra intera pantalonkunkudraĵo, ĉar tio estigus malfacilaĵojn, laŭ tia formo kaj maniero, kia sekvas tradician moron kaj formon, ke la malgranda fingro kun sia finmembreto tuŝu ĝuste nur silke mole ankoraŭ la militecan tolon, el kiu la pantalono konsistas, dum la internaĵo de la mano volbu sin eksteren tiel, ke antaŭe rigardate en ĝi ankoraŭ ne

tute plenkreskinta muŝo de la kutima speco, science esprimata *Muridae*, povu kaŝi sin kaj la etendita montroŝingro restu mole tuŝanta la jam antaŭe menciitan kaj precize priskribitan tolon, sed sen firme tuŝi ĝin, dum per softa palpado nepre atentendas, ke ambaŭ kubutoj estu iom kurbigitaj sen aspekti tro ambiciaj, kaj ne pli proksime sed ankaŭ ne pli malproksime de la ledozono, tiel, ke oni povu traŝovi inter kubuto kaj la zono platan manon de normalstatura suboficoro sen bezoni por tio specialan fizikan aŭ spiritan fortostreĉon, jen tio, kio estas militece ĝuste kaj laŭregulare esprimita, sablo. Tion aŭ similan tekston ĉiutage, escepte de dimanĉo devi diri, ĝuste, kiam la plej bona pelvo staras antaŭ novulo, kroĉis la pli aĝaj kadetoj tiom longe ŝerce al la noviniciato ĝis la junulo kaj estonta generalo povis regurdi tiun frazon sen eraroj kaj sen interrompo tiel rapide, ke li finis la frazon jam antaŭ ol la avidataj pelvoj de la servsoldatoj estis forportitaj, ĉar ankoraŭ sekvos la dolĉa frandaĵo.

En la kuro de la tempo la diviziestro fariĝis mem pli aĝa kadeto kaj kroĉis nun al la novuloj tute la saman, kion oni faris kun li, sen tio, ke la spiritaj fortoj de unu el la

estontaj armeestroj iam ajn sufiĉis, eltrovi ion novan sur tiu tereno aŭ ekkompreni, kiel idiote ili aranĝas sian propran vivon.

Milito kontraŭ la tradicia malamiko ne okazis, ĉar la tradicia malamiko sen milito sciis pli elmastrumadi el la lando ol ĝi kapablus fari iel per milito. Se oni rigardas tion tute detale, tradicia malamiko eĉ tute ne ekzistis. La vortojn tradicia malamiko oni uzis nur ĉeokaze, por ne permesi la lamigon de la intereso de la impostopagistoj pri la neceso de forta landodefendo. Estis la tradicia malamiko, de kiu oni devis aĉeti ĉiujn kanonojn, mitralojn, karabenojn, revolverojn, sabrojn kaj la militistan ekipaĵon, ĉar en la propra lando la industrio ne estis sufiĉe evoluita por produkti tiujn armilojn kaj ekipaĵojn mem.

Kiel kapitano, majoro kaj kolonelo la diviziestro ĉeokaze havis la eblon kontroli la batalplanojn de Hanibalo, Aleksandro, Atilo kaj Napoleono pri ties taŭgeco kaj genieco kontraŭ strikantaj teksistaj laboristoj, ribelantaj minlaboristoj kaj insurekcioj de indiĝenaj etkamparanoj. Montriĝis en ĉiuj ĉi bataliroj, ke la bazaj principoj de

strategio kaj taktiko, kiel uzis ilin Hanibalo kaj  
Napoelono kun sukceso, ankaŭ aktuale plu tute taŭgas kaj  
ne ekzistas kaŭzo cerbumi pri novaj teorioj.

La diviziestro rigardus tion hontego, se li uzus kontraŭ la ribelula ĉefrabisto la samajn aŭ similajn militistajn taktikojn, kiel li uzis ilin en manovroj kontraŭ same edukitaj generaloj, al la soldatofakuloj, kiel li nomis ilin. Kontraŭ ribeluloj li ne agis kiel generalo, sed kiel inspektoro de polica trupo, kiu estas elsendita kapti eskapintajn krimulojn.

La unua, kion li intencis fari, tuj kiam li estos encirklinta la ribelulojn, estas, voki al ili, ke ili senkondiĉe rezignu pri rezisto, je pereco aŭ nepereco, ke ili transdonu la gvidintojn kaj ĉiujn armilojn dum tridek minutoj. Se tio estus okazinta, li pendumus ĉiujn gvidintojn. El la ceteraj kanajlaj ribeluloj li elektus ĉiun kvinan kaj ankaŭ ilin pendumus. La restaĵon de la insurgentoj, viroj, inoj kaj idoj, li vendus kontraŭ la pago de la kostoj, kiujn kaŭzis tiu punekspedicio, al kafoplantejoj, monterioj kaj bienoj.

Oficiro, kiu eĉ nur iom atentus sian honoron, ne uzas iujn el la militistecaj metodoj kontraŭ ribeluloj, kiujn oni instruis al li, kaj kiuj validu nur kontraŭ organizitaj

militistaj trupoj. La diviziestro sentus sin neimageble ridinda, se li serioze traktus la rabistokapitanon eĉ nur dum kvarono de horo por rekoni lin dumrenkonte kiel soldaton. Kontraŭ ribeluloj oni ne batalas. Ribelulojn on ĉasas kiel leporon, kaj la atako okazu kiel pelĉaso.

Generalo kontraŭe al tio, ne havante honoron, ne konante devizojn de Napoleono, ne pensis eĉ dum minuto pri pelĉaso. Li traktis la diviziestron sufiĉe serioze. Li traktis serioze ĉion, kion la diviziestro laŭ lia opinio certe lernis dum longa militeca kariero. Des pli li traktis serioze la simplajn soldatojn, ĉar li sciis, ke ili povas pafi pli bone kaj pli precize ol la *muchachos*, ĉar ili estis pli bone trejnitaj, pli bone organizitaj kaj plenumas ordonojn pli rapide kaj pli lerte.

Kaj tial, ĉar li ne certis pri sia venko, kaj ĉar li ankaŭ ne certis gajni la sekvan batalon, tial li ellasis eĉ ne unu el ĉiuj antaŭpreparoj, pri kiuj li supozis, ke ili povos sekurigi la venkon por li.

La diviziestro, kiam ties trupo proksimis ok kilometrojn de la ribelula kampadejo, komandis halti kaj tranokti.

Li decidis ne tuj ataki, kiel estis lia origina ideo, sed atendi la sekvan matenon, por entrepreni pli sukcesan pelĉason. La proksimeco de la nokto ebligus eskapi en la vepron aŭ la montojn al multaj leporoj. Sed, se li entreprenos la ĉaspelon matene kun satdormintaj trupoj, li havos longan tagon antaŭ si, kaj liaj precizpafistoj atentos pri tio, ke eĉ ne unu el tiuj ribelulaj hundidoj eskapu.

Post kiam lia bela alta tendo estis starigita kaj li havis kun la kuiristo longan interparoladon pri tio, kion li je la vespermanĝo preferas, kaj kion li deziras ricevi je la matenmanĝo, li translasis al la pli junaj oficiroj okupiĝi pri la cetero. Por tio ili ja ĉeestis, tiuj flavbekuloj, por transpreni de li tiajn malgravajn laborojn. Li devis batali la batalon, pro tio li estas la diviziestro. Kaj ĉar temis ja nur pri pelĉaso de pedikohavaj ribeluloj, kaj ne pri ordigita, militeca batalo, li sentis sin devigita ne trompi la



junajn oficirojn pri la okazo agi kaj foje ĉion ĉi praktike uzi, kion ili lernis en Militista Akademio.

Tiuj oficiroj, kiuj estis konvinkitaj pri la graveco de sia tasko kaj plene konsciaj, ke ili, eĉ se ili batalas kontraŭ siaj propraj popolamikoj, tamen servas al la patrolando, fariĝis viglaj.

Ili elsendis tri spionojn, por elspioni la pozicion de la kampadejo kaj la pozicion de la ribeluloj. Kiam ili faris tion, ili kunvokigis denove la soldatojn, kiuj jam kuiris sian vespermanĝon, por envicigi ilin kun purigitaj fusiloj. Tio okazis kaj pro la militpreteco kaj aliflanke tial, ĉar la diviziestro havis pro tio la impreson, ke la oficiroj serioze ekagas. Ĝi aspektis grava. Ĉiam, se oficiro, altranga aŭ subranga ne scias, kion fari, li ordonas al siaj soldatoj enviciĝi por inspektado. Estas ĉiam io, kio inspektendas. Kaj oni ne devas pensi ion novan. Eĉ, se foje inteligenta homo fariĝas oficiro kaj li do vere kapablas krei novajn metodojn, li gardas sin uzi ilin aŭ eĉ nur paroli pri ili ĉe la aliaj oficiroj. Por ne aspekti ridinda aŭ iel alie frapi la atenton, kio ne estus favora al ilia kariero, ili penas ne elstari trans la averaĝan gradon de inteligenteco de siaj

kamaradoj. Ĉar tio estus sen-takta kaj nekamaradeca. En la tuta militeca vivo, kie ajn ĝi troviĝas, ĉiu breĉo, egale de ĉiu speco, ĉiam sukcese plenigeblas per inspektadoj kaj per unuopa marŝo laŭ ansero. En neniuj aliaj profesioj oni povas kaŝi tiel facile kaj kun tiom da malmultaj rimedoj erarojn, neperfektaĵojn kaj neglektemojn, sed speciale la mankon de inteligenteco. La uzebleco ne nur de bona soldato, sed des pli de oficiro, ankaŭ de generalo, ĉie estas mezurata kaj prijuĝata laŭ tio, kiom malmulte oni kapablas pensi memstare, kaj kiom malmulte oni uzas sian cerbon. Penspigrado fariĝas en diktaturo virto; sed en la demokratio ĝi signifas putriĝo.

Kiam la tri spionoj revenis kaj salutante prezentiĝis por la raporto, sidis ĉiuj oficiroj ĉe la vespermanĝo.

La diviziestro, maĉante kun plena buŝo kaj mansalutante per tranĉilo, diris: „Ekformarŝu! Ĉion ĉi vi povos raporti al mi morgaŭ, se mi estos jam komandinta saltantan paŝadon trans la friponojn.“

Sed unu aferon li tamen priatentis. Li vokis la deĵorantan oficiron al si kaj ordonis ne neglekti la gardistostaradon; ĉar la friponoj kaj krimuloj povus aŭdaci denove ŝteli kvindek karabenojn, kaj pri tiuj oni ĉifoje ne povus rezigni.

Ankaŭ Generalo elsendis spionojn. Sed li aŭskultis la raporton de ĉiu atenteme; tiel atenteme, ke li forgesis pro tio la vespermanĝon.

Celso diris tiam: „Kion vi pensas, Generalo, eble ni povus forpreni de ili eĉ la reston de la karabenoj, ĉar ili nun jam estas tiom proksimaj.“

„Kompreneble ni povus fari“, Generalo kapjesis. „Kaj tion certe atendas ankaŭ la diviziestro. Kaj ĝuste tial, ĉar li atendas tion de ni, ni ne faros. Jen kaŭzo por tio, la alia kaŭzo estas, ke la uniformitoj en tiu kazo ne povus ataki nin. Sed ni bezonas viglan batalon. Por refreŝigi niajn *muchachos* kaj por ekzercado.“

Post tio li kunvokigis ĉiujn siajn kapitanojn, interkonsiliĝis kun ili pri sia elpensita plano kaj poste disdonis la ordonojn.

La diviziestro decidis malfrue vespere de la sekva tago ree esti en la ĉefkampadejo. Ke li kiel venkinto revenos, li ne pridubis, des malpli, ĉar ja ne temis pri venko, sed nur pri pelĉaso. Ĉe pelĉaso de leporoj oni ne parolas pri venko, sed nur pri la predokvanto de la kompatindaj leporetoj.

Kaj tial, ĉar la diviziestro intencis esti sekvmatene ree en la ĉefkampadejo, kie li havos en la ranĉo ĝustan tegmenton super la kapo kaj laŭordan liton anstataŭ la aĉa soldatolito, kie li devis kuŝi dekstre kaj maldekstre sur la ferorandoj, kiuj kaŭzis tuberojn kaj truojn sur lia grasa korpo. Pro tio li frutempe finis la kampadon, kaj lia trupo estis jam antaŭ sunleviĝo antaŭ la kampadejo de la *muchachos*. Kun siaj adjutanto kaj kornisto li starigis sin sur monteto, dum liaj soldatoj, rampante tra la vepra subkreskaĵo kaj la preriaj herboj, lerte encirklis la kampadejon de la *muchachos*, por ke eĉ ne kuniklo povu fuĝi.

Ĉio okazis kiel ordonite. „Ili estas perfektaj azenoj, tiuj pedikohavaj kanajloj, tion vi ja povas vidi, *teniente*“, li

diris al la adjutanto. „Nek gardistojn ili metis nek ili zorgis sin pri kio ajn. Kaj kontraŭe al tiaj sencerbuloj atendas la militministerio de mi, ke mi traktu ilin serioze. Ridinde. Jen vi vidas, *teniente*, la tuta banditaro okupiĝas nur pri sia manĝaĉo. Ankoraŭ dek minutojn, kaj tiam ni vidos salti ilin. Eĉ ne la mitralon, kiun ili ŝtelis de ni, ili tenas okupita. Per lazo oni povus forkapti ĝin de ili, se oni penus pri tio.“

La diviziestro observis tute ĝuste. La *muchachos* kaŭris ĉirkaŭ la bivakfajro kaj kuiris sian matenmanĝon. Ili estis tiom enprofundiĝintaj en sian kuiradon, ke ili sidis kliniĝinte kaj apenaŭ rigardis supren. De tempo al tempo, tie kaj tie, iu leviĝis kaj iris al alia grupo, por kunpreni ion de tie, aŭ por rigardi, kion faras la aliaj. Ili ĉiuj ŝajne ankoraŭ havis fermgluitajn okulojn, tiel dormema estis la kampadejo.

„Kiom da uloj, *teniente*, eble estas tie?“ demandis la diviziestro.

„Eble cent da, aŭ cent dudek, aŭ tridek, *mi general*. Malfacile konstateblas.“

„Ĉu ili povus esti ankaŭ ĉirkaŭ ducent?“

„Povus esti, *mi general*. Jen la kavetaĵoj en la tereno, la altaj herboj, arbustaĵoj, montetoj, tiel, ke oni ne povas supervidi ĉion. Dekoj da ili certe ankoraŭ dormas, ĉar mi vidas konsiderindan kvanton el ili, kiuj kuŝadas tie en siaj lankovriloj kaj ĉifonoj.“

„Tiujn vidas ankaŭ mi, *teniente*. Mi volis nur certigi, ke mi kunhavas la tutan bandon, kaj ne devos pluan fojon marŝi antaŭen. La eterna grimpado en tiuj dezertoj ĉi tie ekstere kaj la aĉega manĝo en la ranĉoj ne tre bonfartigas miajn rompiĝemajn ostojn. Al vi mi ja trankvile povas malkaŝi tion. Mi povus emeritiĝi. Sed mi bezonas la monon. Mi havas tro da elspezoj. Kaj se mi emeritiĝus, kion mi estus tiukaze? Nenio. Civila persono kiel ĉiu alia pantalonfekulo, kiel ĉiu fatrasulo en Balun Canan, kiu devas vendi siajn varojn sur foirplacoj.“

La diviziestro rigardis sur sian poŝhorloĝon. Poste li prenis sian binoklon kaj rastis la terenon. „Jen la unuaj eltransaj signaloj de leŭtenanto Manero. Li okupis sian pozicion kaj estas preta. Kaj tie transe ekfulmas ankaŭ la

spiegulo de serĝento Junco, ankaŭ li okupis sian pozicion. Post kvin minutoj komenciĝos la ĉasopelo.“

La diviziestro ekbruligis cigaredon. Li kaŭris sur la tero. Sian ĉevalon li lasis malantaŭe piede de la monteto por eviti ties trafitecon, se kelkaj pafoj celus al la monteto. La monteto estis sufiĉe alta, por ke la diviziestro, eĉ kaŭranta sur la tero, bone povu superrigardi la batalan terenon.

„Kiel ridinde tiuj friponoj kondukatas“, li diris kun rikano al la adjutanto. „Vi povas konkludi tion el tio, ke ili eĉ ne dum sekundo pripensis okupi tiun monteton per mitralo, aŭ eĉ nur per observanta gardisto. Tio estus tre dure por ni kaj kostus nenecesajn viktimojn, se la banditoj estus pensintaj pri tiu monteto.“

Li rimarkis, ke ankaŭ taĉmentoj liaj jam okupis sian pozicion dekstre kaj maldekstre de la monteto kelkajn centojn de metroj malproksime. Al tiuj taĉmentoj li ordonis ĉirkaŭvojon, ĉar tie la tereno estis alta kaj la ribeluloj povus vidi la almarŝon. Kiam li ricevis tiam ankaŭ de tiuj taĉmentoj la signalon, ke ili troviĝas sur la ordonita loko, kaj ke per tio la cirklo estas tute fermita, li



eltiris la revolveron kaj pafis trifoje en la aeron. Tiuj tri pafoj signifis por lia trupo la signalon por la ĝenerala atako de la kampadejo. Samtempe li signis, ke *El Corneta* blovu: „*Adelante!*“

Apenaŭ la pafoj kaj la kornosignalo elsonis, tuj la mitralo komencis kudrilmaŝinece pripafi la kampadejon.

La atako estis malfermita, kaj montriĝis eĉ ne unu eraro en la bonege gvidata almarŝo de la trupo.

Sed nun okazis certa stranga afero. Estis afero, kiun la diviziestro dum sia tuta longa kariero kiel militisto ankoraŭ neniam ekvidis. Estis afero, kiu vekis ne nur la ekmiron de la diviziestro, sed tio, kio kaŭzis la unuan konfuziĝon de liaj soldatoj kaj oficiroj. En la unua momento montriĝis tiu konfuziĝo nur kiel mallonga hezitado en la atako.

La diviziestro, kiu tenis sian binoklon rekte antaŭ la okuloj, atendis kiel ĉiuj oficiroj, ke dum la unuaj pafoj de la mitralo la *muchachos* eksaltos kvazaŭ fulmtrafite. Sed la kampadejo, rigardate kiel unu aĵo, restis kvieta. Nur kelkaj *muchachos* ŝajne kliniĝis unu al la alia kaj kelkaj aliaj, evidente same trafita de pafoj, sinkis teren kaj ne plu moviĝis. Tie kaj tie kuris kelkaj *muchachos* tre kliniĝinte tien kaj tien, kvazaŭ ili volus instigi vekigi la ulojn, kiuj ŝajne dormis. Krom tiuj malmultaj tien kaj tien hastantaj viroj ne konstatablis movo.

Dum la mitralo plu samtakte bruis kaj kvazaŭ falĉis la kampadejon, por tiel antaŭprepari la grandan atakon kaj

plifaciligi ĝin, avancis la kliniĝintaj soldatoj kun malsuprenklinitaj bajonetoj de ĉiuj flankoj lante al la kampadejo por pli malgrandigi la cirklon.

La diviziestro ordonis blovi duan signalon: *Caballeria*, antaŭen! La kavaleria trupo staris kvincent metrojn pli malantaŭe, elseliĝinte kaj kaŝite post arbustaĵoj, atendante la signalon de la diviziestro por vastarke bari la terenon kaj tiel malhelpi, ke ribeluloj povu fuĝi.

La kavalerianoj surseliĝis kaj rajdis softe galopante por ekformi cirklon. Antaŭ ol tiu vasta cirklo de ĉiuj flankoj estis fermita, avancis la infanteriistoj pli proksimen al la kerno de la kampadejo.

La diviziestro supozis, ke, tiam, kiam la mitralo ekbruos, la kampadantoj tumulte eksaltos. Sed kiam tio ne okazis, li supozis, ke temas pri ruzaĵo de la *muchachos*, kiuj ne volas iri en kaptilon de la soldatoj, sed rigardas al breĉoj, tra kiuj ili intencas eskapi. Kiam nun la *infantes* proksimiĝis al la kampadejo kaj de la kampadejo bone observeblis, kiam de la kampadeja flanko sendube ankaŭ la almarŝo de la *caballeria* rimarkendis, kaj tamen la

kampadejo restis strange kvieta, la diviziestro fariĝis maltrankvila. Li ekstaris kaj rigardis tra la binoklo pli atenteme al la kampadejo. Kiel jam antaŭe li vidis nur tie kaj tie sinki viron teren de la pafoj de la mitralo, kiu seninterrompe pafis kaj kies teamo havis la ordonon, nur tiam halti, kiam la soldatoj ekatingos la kampadejon.

Ankaŭ la adjutanto havis sian binoklon antaŭ la okuloj. Subite li diris: „*Mi general*, ĉu vi vidas tion, kion vidas mi, ĉu mi nur eraras?“

„Kion do?“ demandis la diviziestro sen forpreni la binoklon de la okuloj.

„Jen kvar viroj iris renkonte al la mitralo, starigita meze de la kampadejo, kaj ili malaperis. Kaj nun ankaŭ la mitralo foriĝis, kvazaŭ ĝi sinkis en la teron.“

La diviziestro turnis la glason al la loko, kie li vidis antaŭ nur kvin minutoj sian ŝtelitan mitralon. Li devis koncedi, ke ĝi ne plu ĉeestas.

Li rastis per sia binoklo la batalejon kaj vidis, ke la soldatoj de ĉiuj flankoj estis nur kvindek metrojn

malproksime de la eksteraj grupoj de la kampadejo kaj de la *muchachos*.

En la fono ankaŭ la kavalerio jam tute finis la encirkladon. La kavalerianoj sidis sur siaj ĉevaloj, kun la karabenoj apogitaj sur la dekstran genuon, firme tenante la bridilojn per la maldekstra mano, atendente, ke la atakitaj ribeluloj post malmultaj sekundoj komencos forkuri. La infanterio, obeante al kornsignalo kaj obeante al kelkaj fajfsonoj de siaj oficiroj, haltis dum mallonga momento. La viroj rektiĝis el sia klinita pozicio, kolektis kuraĝon, prenis pli firmpugne siajn karabenojn kun la kurtaj surmetitaj bajonetoj kaj estis atakontaj. En tiu sinteno ili restadis dek sekundojn. Poste sekvis nova kornsignalo, fajfsonoj de ĉiuj flankoj, kaj la soldatoj eksturmis.

Apenaŭ ili komencis kuri, ekaŭdeblis el la mezo de la kampadejo mitralo, kiu trankvile kaj atente raste pripafis la tutan ĉirkaŭan cirkon. Estis la sama mitralo, kiu antaŭnelonge ankoraŭ tiel pigra kaj forlasita estis starigita enmeze de la *muchachos* en la kampadejo. Kaj de kiu nun nur plu videblis la facilaj fumnubetoj, kiuj

leviĝis el la cirkanta mitralbuŝo.

La atakantaj soldatoj hezitis nur du sekundojn, tiam ili daŭrigis la kuradon, sed ne plu tiel ekzercece kiel antaŭe. Tie kaj tie iu stumblis, evidente trafite, eble ankaŭ intence stumblante por povi postresti de la unua linio. Ĉar dek sekundojn poste ankaŭ la plej stulta soldato ekkonsciiĝis, ke la promeno finiĝis leviĝis la trista perspektivo devi fini la freŝe ĝojan soldatan vivon kun buŝpleno da tero. Tio eĉ la plej kuraĝan soldaton ne ĝojigas, des malpli, ĉar li ne plu povos aŭdi la kvazaŭ gurditajn laŭdoparolojn, kiujn oni honorige tamburas al li kaj li ne plu plu povos plezuriĝi pri ili. Nur la aliaj plezuriĝos pri tio.

Ne restis – eĉ se ili volus fari alian – alia eblo ol avanci kaj konkeri la kampadejon. Se ili tiumomente returniĝus, oni nur des pli sovaĝe pripafus ilin, kaj la rezulto estus la sama. Multajn paŝojn la sturmantaj soldatoj ankaŭ en alia kazo ne malproksimiĝus, eĉ se ili efektive restus sanaj; ĉar pli malproksime staris la envicigita kavalerio, kiu ne tralasuk, sed repelus ilin al la kampadejo.

La saltantaj paŝantoj perdis sian belan ordon kaj

komencis sovaĝe antaŭenkuri por atingi pli rapide la kampadejon kaj kapti la mitralon, kiu fariĝis serioze malagrabra kaj detruis ĉiujn komandojn kaj antaŭajn marŝoplaneojn fride kaj senkomplete.

Kelkajn respektplenajn paŝojn starante malantaŭ la diviziestro, troviĝis la staba kornisto. La diviziestro rememoris lin kaj dum sekundo intencis ordoni al li blovi al la kavalerio la signalon, ne kiel origine ordonite kapti kurantajn fuĝantojn, sed por sekvi la infanterion por pli rapide transpreni la regadon pri la kampadejo. Sed samtempe la diviziestro ekhavis la penson, ke tia ordono verŝajne estigus konfuziĝon, ĉar li donis al la gvidanto de la kavaleritaĉmento, al kapitano Ampudia, la eksplicitan ordonon, neniukaze enmiksiĝi la batalon, ĉar la kavalerio nepre necesas, por ke ne fuĝu eĉ iuj leporoj.

La diviziestro suĉis forte kaj sen ĝuo la cigaredon. Konsciĝis al li, ke tie io ne estas en ordo. Li sentis, ke lia plano malsukcesas, se tio ne jam okazis. Sed eĉ ne per unu penso li kapablis percepti, kio fakte okazis.

La antaŭen kurantaj infanteriistoj estis nun proksime de

la kampadejo.

Kaj tiumomente, la diviziestro supozis, ke li fine ekkomprenas la planon de la ribeluloj. Ili evidente volis havi la atakantojn en la kampadejo, por buĉi ilin tie. Jen la kaŭzo, kial ili ŝajne tiel trankvile sidis ĉe siaj bivakfajroj. Ili kiel indiĝenoj sentas sin pli certaj pri sia venko, se ili batalas viro kontraŭ viro, se ili anstataŭ uzi fusilojn, uzas tranĉilon kaj maĉeton, kiujn ili scias pli bone trakti. En tiu kazo tiumomente nur la kavalerio povus ebligi turnadon. Li donis al la kornisto la signalon blovi la atakon al la kavalerio. La rajdistoj rektiĝis kaj ekgalopis.

La antaŭaj vicoj de la infanterio estis nun en la kampadejo. Per sia binoklo vidis la diviziestro kiel la atakantoj kuraĝe pikadis la ribelulojn kaj ĵetis ilin teren. Sed estis strange, ke la *muchachos* ne defendis sin, ke ili eĉ ne suprensaltis kaj ne provis forkuri, dum la soldatoj sturmis renkonte al ili. La *muchachos* renversiĝis kaj ne plu movis sin. Tiam la diviziestro rimarkis konfuzigan pelmelon interne de la atakantaj soldatoj. Ili provis tiri siajn bajonetojn el la korpoj de la mortbatitoj kaj dum ili



faris tion, flugis la korpoj alte en la aeron. Ili disfalis flagrante. Sub la disŝiritaj kovriloj kaj falantaj ĉapeloj montriĝis sekaj maizaj spadikoj.

Ĉar, sendepende de dudek aŭ dudekkvin *muchachos*, kiuj kuradis en la kampadejo por ŝajnigi la kampadejon vigla kaj por perfektigi la militan trukon, nenio atakeblis, la atakantaj soldatoj ekhaltis sen atendi ordonon kaj restis senkonsile starantaj.

Kelkaj el tiuj ĉi tien kaj tien kurantaj *muchachos* kompreneble estis trafitaj. Tiujn inter ili, kiuj vundite falis kaj ne kapablis leviĝi, oni senkompate trapikis. Sed la plimulto atingis la truon, el kiu la mitralo senafliktite plu pafadis.

La oficiroj kaj serĝentoj fajfis por ke oni denove eku ataki kaj sekvu al la origina ordono, kaj en ĉiu kazo silentigu la mitralon. Sed la pafado de la mitralo balais tiel trankvile kaj tiel dormeme samtakte sur la terenon, ke ju pli la soldatoj proksimiĝis des pli grandaj fariĝis la perdoj.

Pluan fojon eksonis fajfsonoĵoj. La soldatoj ĵetiĝis teren por

tiam, antaŭenrampante, konkeri la mitralon kun malpli da perdoj.

Apenaŭ elsonis la lastaj fajfsonoj, kaj ĝuste en la momento, kiam la alrajdanta kavalerio atingis la eksteran randon de la kampadejo, komencis hajli pafoj de ekstere kaj el ĉiuj direktoj sur la kampadejon. Intertempe eksonis aldone eĉ la hakanta klakado de kelkaj mitraloj, same venante el granda distanco ekstere, ekstere de la atakanta ringo.

Kaj tiam sekvis sovaĝa, ne home sonanta bruoj, kriegoj kaj hurlado. Kaj el la kvar anguloj de la tereno, vaste distriĝante trans la perion, kuregis la aroj de *muchachos* al la kampadejo.

La soldatoj, kiuj antaŭ dek minutoj ankoraŭ supozis, ke ili encirkulis la kampadejon de la ribeluloj, estis tiam kompreneble enmeze de la kampadejo konkerita de ili.

Sed la encirkliroj estis ili.

La diviziestro turniĝis nun al sia staba kornisto. Li intencis doni la ordonon por blovi la retromarŝon por la tuta trupo kaj translasi tion al la trupo mem, kiel foriĝi el tiu cirkaŭpreno. De la monteto, sur kiu li staris, li povis vidi kelkajn breĉojn, kie fuĝo kun ne tro grandaj perdoj povus sukcesi al la soldatoj. Sed li ne sciis kiel alie sciigi siajn konojn al siaj oficiroj ol per simpla ordono de retiriĝo.

Tute turniĝinte kaj ne vidante korniston, ankaŭ ne sian adjutanton, li turniĝis maldekstren, kaj tie staris du ĉifonvestitaj *muchachos* kaj rikanis impertinente al lia vizaĝo.

La diviziestro kaptis sian revolveron kaj trovis, ke la ingo estas malplena. Unu el la *muchachos* alte tenis la revolveron kaj diris: „Ĉu eble estas tiu, kiun vi serĉas, diviziestro?“

La diviziestro paliĝis. Sed li tuj regajnis sian kutiman staton, kaptis la revolveron kaj tiris ĝin al si.

„Nu do, reprenu ĝin dum kelkaj minutoj“, diris ridante la *muchacho*, kiu tenis la revolveron antaŭe en mano, „ŝarĝita ĝi ne estas, do, stultaĵojn vi ne povos entrepreni.“

La diviziestro kaptis haste al la kartoĉozono. Sed ankaŭ la kartoĉozono estis for, tratanĉita kaj forprenita.

Tio kolerigis lin, kaj li kriis: „Kion vi volas ĉi tie, pedikohavaj friponoj? Ĉu ankaŭ vi apartenas al la ribeluloj?“

„Jes“, respondis la pli laŭta ridulo el ambaŭ „iom ni ja apartenas al la ribeluloj. Mi estas nur generalo. Ne pli. Kaj tiu“, li signis dikfingre al la akompananto, kiu simile ridis, „estas unu el miaj kapitanoj.“

La diviziestro turniĝis serĉante al ĉiuj flankoj kaj vokis poste kun laŭtega voĉo, kiel li kutimis fari tion sur ekzercejo, se io tre ĉagrenis lin: „Kie do estas miaj *ayudante* kaj mia *corneta*?“

„Ili forvojaĝis kun nia helpo“, diris Generalo seke.

„Forvojaĝis, ĉu? Kien?“ demandis la diviziestro koncize.

„Ni ne havis tempon longe pridemandadi ilin“, rediris la kapitano. Estis Santiago.

„Foriĝu kaj tuj, damnitaj kotuloj, mi ja zorgos por tio mortpafi vin, eĉ antaŭ ol vi estos en Balun Canan.“ La diviziestro fariĝis blua kaj ruĝa sur la vizaĝo.

„Certe“, diris Generalo rikane sen eĉ nur iomete atenti la koleron kaj la kriadon de la diviziestro. „Vi povos nin ĉiujn kune mortpafi, se vi venos al Balun Canan. Sed nun unue ni tenas vin eĉ la nuko, kaj ĉu vi efektive iam ajn venos al Balun Canan, tio dependos de tio, kiu kunprenos vin. Rigardu foje tien transen, tie transe neniu atendas vin, por vin kunpreni.“

Ekde tiu momento, kiam la diviziestro komprenis, ke li estas en la manoj de la *muchachos*, li sciis, ke ne estos espero por li. Eĉ se okazus la miraklo, ke lia trupo eble atingus lin tie kaj lin batale liberigus, ĝi ne trovus lin vivanta. La diktaturo ne havis kompaton kaj ne konis pardonon al iu, kiu rezistis al ĝi. Kaj neniu, kiu iel aŭ en iu ofico iam servis al El Caudillo, povis esperi pardonon aŭ kompaton, kie ajn ribeluloj estis la venkintoj.

Sed li hontus ankoraŭ mil jarojn post sia morto, se li montrus timon pro pedikohavaj peonoj. Tiu emfazita sentimemo ne kaŭzis persona kuraĝo. Lia kuraĝo neniam estis elprovita. Kiu estas sur la flanko de la potenco, ne devas esti kuraĝa.

Tio, kio donis al li en tiu tute desperiga situacio ankoraŭ certan kuraĝon, estis nur la scio, ke tio ne ŝanĝos ion je lia sorto, egale, ĉu li timas aŭ ĉu li kondutas kuraĝe; egale, ĉu li petas surgenu pri pardono kaj promesas ĉiun sian monon, ĉu li kriadas al la venkinto kaj per ofendoj ekscitas lin ĝis kolerego. Eĉ, se li ofertus siajn servojn kaj

spertojn al la ribeluloj, kio en tiu kazo estus certe neverŝajna, ili ne akceptus tion, kaj je lia sorto tia oferto ŝanĝus nenion. Kaj tial, ĉar por li ne estis espero, kiu povus ŝanĝi lian situacion, li vere povis permesi al si inde kondukti al la ribeluloj, en kies manojn li falis.

Li prenis la tempon rigardi dum kelkaj sekundoj transen al la kampadejo, kie ne nur sorto lia, sed ankaŭ tiu de lia trupo, kaj en multaj rilatoj eĉ tiu de la tuta federacia ŝtato jam estis decidita. La soldatoj, kiuj ankoraŭ kapablis kuri, forĵetis ĉiujn siajn armilojn por povi fuĝi pli rapide. Sed kien ajn ili kuris, ili falis sur la tranĉilojn de la *muchachos*.

La mitraloj de la *muchachos* pafis ne plu al la fuĝanta infanterio, sed nur al la konfuzita kavalerio, kiu ne havis sufiĉe da tempo sian atakon svingoplene elrajdi. La uloj, kiuj apartenis al la mitrala taĉmento, translasis la mulojn al ties sorto, ĉar ili trovis sin pro la ŝarĝitaj bestoj malhelpitaj dum sia fuĝo. Ili translasis al la bestoj libervole sekvi. Kelkaj infanteriistoj atingis la bestojn, kiuj sovaĝe kuris tien kaj tien, detranĉis ilian ŝarĝon kaj svingiĝis sur la dorsojn de la bestoj por ne preterlasi iun

eblon vivante eskapi.

„Santiago“, vokis Generalo al sia kapitano, „trenu nian gaston, la tiel bele uniformitan diviziestron, transen en la novan kampadejon. Vi ja scias, kien. Mi ankoraŭ devos paroli kun li. Pli poste. Sed nun mi devos denove enmiksiĝi tie. Ili dispafadas laŭ mia opinio tro multe da municio. Tio ne havas plu valoron, ni devas ŝpari ĝin.“

Dum tio li kuris malsupren de la monteto kaj ĵetis sin sur la ĉevalon, kiun li postlasis tie por fari respektoviziton al la diviziestro, kaj fulmis transen al la bataalkampo.

En la truo, kie la mitralo nun ĉesis pafi, ĉar la mitralotubo estis tro hejtgita, li trovis Kolonelon kaj ties taĉmenton.

„Bone, ke la aĵo per si mem ĉesis pafi“, li vokis de la ĉevalo. „Lasu la malmultajn postrestintojn sur ties kaprinoj trankvile forsalti. Mi bezonas ilin kiel leterportistojn, por ke ili portu la novan sciigon al la ĉefa kampadejo, mi volus tiel volonte havi la restaĵon de la brigado ĉi tie, por ke ni liberigu la vojon al Balun Canan.“

Kolonelo, kiu malvestis la ĉemizon, ke li pli bone povu



moviĝi, komencis nun serĉi ĝin. Per la nudaj piedoj de lia teamo ĝi estis stamfita en la malsekan koton, kiu estis formiĝinta en la truon, en kiun oni metis la mitralon.

„Donu la fekŝmiritan ĉemizon al mi“, li vokis al la *muchacho*, kiu preteriris la truon. Sen longa atendo li forŝiris ĝin de la *muchacho* trans ties kapon, kaptis bastonon, surpikis la ĉemizon kaj flirtigis ĝin super si tien kaj tien.

Tuj post tio en ĉiuj anguloj kaj anguletoj de la tereno silentiĝis la pafado de la karabenoj. La *muchachos*, kiuj ankoraŭ persekutis la fuĝantajn soldatojn, postsendis ankoraŭ kelkajn pafojn kaj lasis ilin, se ili ne ĵus falis, rapide kuri hejmen.

Generalo galopis al sia kornisto kaj komandis al li, ke li blovu la signalon „Kolektiĝu!“

Proksimume cent *muchachos*, kiuj nun proksimiĝis al la kampadejo, havis eĉ ne unu vestaĵon sur la korpo. Nur la kartoĉozonoj pendis nodite trans la nudaj ŝultroj. Je rimenoj volvitaj nodite ĉirkaŭ iliaj koksoj troviĝis iliaj tranĉiloj kaj maĉetoj.

Ili rasis la kampadejon pro siaj pantalonoj, ĉemizoj, ĉapeloj kaj sandaloj, kiujn ili uzis por vesti en la nokto la maizpajlajn pupojn laŭ ordono de Generalo.

Kiam ili kunhavis siajn ĉifonitajn vestaĵojn kaj tion, kio mankis ankoraŭ kiel vesto, detiris de la mortintaj kaj vunditaj soldatoj, ili enordigis la batalejon. Neniu vundito kaj neniu kaptito transvivis la tagmezon. La diviziestron ili provizore lasis vivi ĝis vespere, ĉar Generalo ankoraŭ intencis paroli kun li.

La armilopredo estis tiel abunda, ke de tiam ne nur ĉiuj *muchachos* estis armitaj, sed ankaŭ la inoj kaj junuloj ricevis aŭ revolveron aŭ karabenon, kaj ili eĉ tiam konstatis plu troon da armiloj.

Profesoro konsilis ĉiujn superflujajn armilojn enfosi en la vepro kaj tie konservi ilin por la kazo, se ili eble perdos en estonta batalo armilojn.

„Enfositaj armiloj senvaloras“, respondis Generalo.

„Krome la bienuloj povus trovi ilin aŭ la *rurales* aŭ la *federales* aŭ mi ne scias kiu plu, kiu estas krome kontraŭ ni kaj kontraŭ ni volas uzi la armilojn. Mi havas alian uzadon por ili. Ni de nun en ĉiuj bienoj, vilaĝoj kaj urboj, kiujn ni vizitos kaj okupos, kaptos la fortikajn ulojn kaj envicigos ilin ĉe ni. La armiloj estos pli utilaj al ni ol tiukaze, se ni enfokus ilin kaj postlasus ilin ĉi tie.“

„Tute bone“, opiniis Profesoro, „bone elpensite. Leviĝas nur la demando, ĉu la uloj de ni forkuros aŭ perfidos nin kaj kunprenos eĉ la armilojn.“

„Nur ne afliktiĝu, Profesoro, se ni foje estos irintaj iom de la vojo antaŭ ni, ĝojos miloj de junuloj kaj viroj, ke ili efektive estos envicigataj ĉe ni. Ili venos kaj eĉ surgenue petos rajti kunmarŝi. Kaj tiam, se ili estos iom

kunmarŝintaj, venos al ĉiu el ili la fino de la revolucio tro frue. Kaj tiam centoj el ili proprakoste daŭrigos la ribelon. Estas multe pli facile por ni trovi novajn kaj bonajn soldatojn ol denukigi ilin, se ili ne plu estos bezonataj kaj ni volos vivi en paco.“

„Pri tio ni zorgos sufiĉe frutempe, ke ili ĉiuj volonte reiros hejmen“, enmiksiĝis Andreo. „Ili marŝos kaj batalos kun ni ĝis ili estos certaj, ke la terpeco, kion ni donos al ili aŭ kion ili elbatalos al si, ne plu konkereblos de la bienuloj. Tiam ili iros volonte hejmen. Ja kiun ili kontraŭbatalu, se neniu plu ĉeestos, kiu pribatalemblos aŭ kiun pribatali indas la penon? Tial mi pensas, ke Generalo pravas, antaŭ ĉio ni nun bezonos amason da soldatoj, kaj, se ili ne venos libervole, ni kaptos ilin mem. Kiel ni pli poste denukigu ilin, pri tio ni povos interkonsiliĝi, se ni regos en la lando. Ĉu vi ne pensas, ke ankaŭ mi havus sufiĉe da kaŭzoj migri hejmen? Sufiĉe da kaŭzoj, tion mi povas diri al vi. Kaj ankaŭ la plejmulto el vi certe prefere irus hejmen ol plu vadadi ĉi tie en la koto kaj buĉi soldatojn. Sed vi scias tiel bone kiel mi, ke tiukaze, se ni volus marŝi hejmen, kiam la revolucio nur ĵus komencis, ni estos post

ses monatoj aŭ jam pli frue en la sama mizero kiel antaŭe aŭ eĉ en pli aĉa, kaj ĉu ni sukcesos duan fojon ekigi ribelon, nu, tio povus daŭri tre longe.“

„Ju pli ofte ni tion diros al ni, des pli bone tio estos, Andreĉjo, des pli bone por ĉiuj.“ Profesoro ĝemis, kiam li diris tion. Li havis du pafvundojn en la skapolo kaj Fidel prilaboris la vundojn per tranĉilo por eligi la kuglon, kiu ankoraŭ troviĝis en la ŝultro. La alia kuglo trairis. „Des pli bone por ni ĉiuj kaj por la laboranta popolo, mi ripetas. Nur ne tro frue halti kaj eventuale eĉ priatenti la flateman mielan paroladon de tiuj, kiuj parolas pri paco inter fratoj kaj pri krimoj kontraŭ la popolo. Jen sensencaj banalaj vortoj. Estos nur tiam paco inter la fratoj kaj ĉiu fratobatalo ĉesiĝos nur tiam tiukaze, se la balanco en la lando estos ekvibriligita kaj justeco ricevblos senkoste kaj ĉiu rajtos diri, kio afliktas ties koron, ĉu tio plaĉas al aliaj ĉu ne. Revolucio tro frue finita, estas pli terura ol tute neniu. Kaj tial vi ja pravas, Generalo, ni kaptu la soldatojn, kiujn ni bezonas. Se ni ne kaptos ilin, tiukaze tiuj ĉe la manĝotrogo de la diktaturo kaptos ilin. Pri tio mi ne tuj pensis, kiam mi objctis, ke ili eble povus forkuri

de ni, kaj eĉ kun la armiloj.“

## Ĉapitro 14

01

Estis subtropika abia arbaro, en kiu troviĝis la nova kampadejo de la ribeluloj. Tiu ĉi nova kampadejo estis jam serĉita kaj trovita kelkajn tagojn antaŭ la batalo, en kiu la *federales* tiel neatendite malvenkis. Inojn, infanojn, vunditojn kaj malsanulojn oni transigis en la kampadejon, kiam Generalo ricevis la sciigon pri la almarŝo de la bataliono, kiun gvidis la diviziestro kontraŭ li, por unufoje kaj por ĉiam enordigi la aferon pri la ribeluloj. Estis la intenco de Generalo krei en tiu tereno specon de loĝkampadejo anstataŭ la kutima militkampadejo. Li planis de tie entrepreni invadojn, rabataki bienojn, disdividi la terajn parcelojn inter la peonoj, ataki federaciajn trupojn kaj trupojn de la polico, kie ajn ili renkonteblus, kaj se oni ne renkontus ilin, logi ilin per lertaj manovroj kaj rabtakoj kontraŭ malgrandaj lokoj kaj bienoj tien, kie oni kun sukceso povus superforti ilin, kaj tiel malpliigi ilian kvanton.

En daŭra kampadejo sukcesus al li plej bone trejni ĉiujn ribelulojn por soldata uzebleco, por krei armeon, kun kiu li povus marŝi al la ĉefurbo de la federacia ŝtato, por okupi la registarajn konstruaĵojn kaj tiel meti ilin sub la komandon de la revoluciuloj.

La tereno de la kampadejo konsistis parte el arbaro, parte el prerio kaj parte el pluraj hektaroj da vepro, kiu kun nur malmulte da peno ŝanĝigeblus en agrojn, por kultivi sur ĝi maizon, fazeolojn kaj akran kapsikon. Jam post kvin aŭ ses semajnoj oni povus rikolti.

La tereno apartenis al unu el la du grandaj bienoj, kiuj du semajnojn antaŭe estis okupitaj kaj disdividitaj inter la peonoj.

La tereno ofertis ĉion, kion armeo de indiĝenoj bezonas por povi vivi tie dum jaroj, ja dum tutaj generacioj. Larĝa rojo kun klara akvo, kiu eĉ ne elsekiĝas dum la sekaj periodoj, serpentumis tra la tuta tereno de tiu nova loĝloko de la ribeluloj.

Kontraŭ atakoj ĝi estis bonege protektata. Je tri flankoj ĝi



estis ĉirkaŭata de rokecaj montoĉenoj, tra kiuj kondukis nur kvar malvastaj ŝtonecaj padoj, kiuj facile gardeblis kaj kie dudek viroj povus malhelpi la antaŭmarŝon de duono de brigado. La kvara flanko estis limigita de marĉa ebenaĵo, kiu en la aktuala jarsezono tute ne transireblus, kaj en la seka tempo nur en kelkaj malmultaj lokoj, kiuj leviĝis super la ebenaĵon kaj parte elsekiĝis, se dum longa tempo ne pluvus. Sed tiuj lokoj estis tiom raraj kaj tiel bone observeblaj, ke ankaŭ ili, tiel, kiel la montaraj padoj per kelkaj viroj tiel bone gardeblis, ke atako entrepreneblus nur malfacile. Se okazus, ke tia atako tamen sukcesus, la tuta armeo povus kaŝi sin tiel bone en la sulkoj, sulketoj kaj fendoj, kiuj ĉiuj estas priskreskataj per dorna tropika vepro, ke certe apenaŭ eblus ellogi la armeon de tie, des malpli, ĉar la ribeluloj konis la terenon kaj el siaj kaŝejoj post arbustaĵoj kaj rokoj tiel bone povus bridati la atakantajn trupojn per amaso da kugloj, kvazaŭ la ribeluloj sidus en ampleksa fortikaĵo.

Estis tial tute kompreneble, ke la *muchachos*, certaj pri longa restado, komencis konstrui kabanojn kaj *chozas* de la facila speco, tiaj, kiajn ili kutimis en la monterioj.

Nur ses, maksimume dek tagoj estos pasintaj ĝis tiu kampadejo simile aspektos kiel iu alia indiĝena vilaĝo. Kvankam oni tiam ne pensis pri tio, tamen eblis, ke la ribeluloj tie setlos daŭre. Se tio sukcesus renversi la diktaturon, povus facile okazi, ke demokrata registaro, kiu alternus la diktaturon, estus preta havigi al tiuj ribeluloj leĝajn posedorajtojn por la setlejo fondita de ili. Demokrata registaro agnoskus des pli volonte tiajn rajtojn akiritajn en la revolucio, ĉar per tio la iamaj ribeluloj estus plej bone konservataj de tio, pelataj de mizero evolui eĉ al kutimaj banditoj. Pri tia aŭ simila fino de la ribelo efektive pensis Profesoro, Generalo, Andreo, Kolonelo, Celso kaj multaj aliaj el la pli inteligentaj *muchachos*, kaj speciale la inoj en la trupo parolis dum semajnoj ĉeokaze pri tio.

Tiu ĉi nova kampadejo troviĝis ĉirkaŭ dekkvin kilometrojn malproksime de la kampadejo, sur kiu la aktuala batalo estis elbatalata, fininta kun venko de la ribeluloj.

La *muchachos*, kiuj marŝis kun la kaptita diviziestro al la nova kampadejo, rapidis survoje. La diviziestro estis tro grasa kaj tro pezpaŝa por povi forkuri de ili. Ĉiam post dek minutoj li ĝemetis kaj ĝemis kaj denove devis sidiĝi por ripozi. Eble li troigis sian pezpaŝecon kaj lacon kun la espero, ke eble la kolonelo postsendis helpbatalionon, kaj ke tiu nun estas proksima por ŝanĝi la malvenkon en venkon, kaj ĉe tio liberigi la diviziestron. Sed la diviziestro sciis, ke tia espero estas tute senbaza, ĉar ja li mem ordonis al la kolonelo, ke li ne entreprenu trupomovadon sen ricevi por tio eksplicitan ordonon.

Alia espero estis, ke vagadas ĉi tie kelkaj devojiĝintaj soldatoj de la bataliono, kiuj, ekvidante sian diviziestron, deŝirus lin de la manoj de la tri viroj kondukantaj lin en la kampadejon. Ankaŭ tiu espero fariĝis ju pli vana, des pli

li malproksimiĝis de la batalejo, kaj des pli li proksimiĝis al la nova kampadejo. Al liaj soldatoj, kiuj mem ĉasataj kaj konfuzitaj serĉis sian sekurecon per fuĝo, neniam sukcesus liberigi lin. Ĉar sur la tuta vojo mizera kaj marĉigita, ĵus elhakita en la vepro, li rekontis grupojn de la ribeluloj, kiuj migris al la ĉefkampadejo aŭ de tie denove al la batalejo, por tie gardi postene aŭ entrepreni postrikolton de la kampo pri armiloj kaj municio.

La senlima kolero, kiun la diviziestro unue sentis, ĉar li kiel kaptito estas forkondukata de pedikohavaj, kotaj kaj stinkantaj indianoj, sur tiu peniga vojo iom post iom foriĝis. Li certe sciis ankaŭ, ke neniel helpus al li, se li restus kolera kaj ŝarĝus sian ĉagrenon al la *muchachos*. Se li rifuzus marŝi, ili certe traktus lin per pugnoj. La sola fakto, ke ili montris eĉ ne la plej etan restaĵon de respekto al li, al aŭtoritato, antaŭ kiu la samaj viroj antaŭ kelkaj monatoj ankoraŭ falis surgenuen, kiam ili renkontis tian, pruvis al la diviziestro pli ol la perdita batalo, ke la kuro de la lando troviĝis antaŭ ŝanĝiĝo kiel neniam antaŭe, de kiam la lando denukigis la hispanan reĝan kronon.

De tempo al tempo li provis paroli kelkajn vortojn kun la

*muchachos*. Tio okazis kun la malforta, ja tre malforta espero, ke li eble povus subaĉeti la virojn kaj promesi al ili altan pagon, por ke ili konduku lin sur ĉirkaŭvojo al la ĉefkomandejo. Sed la unuaj provoj jam malsukcesis. Aŭ la *muchachos* efektive ne komprenis la hispanan aŭ ili sufiĉe komprenis ĝin kaj nur ŝajnis, ke ili ne komprenis tion, kion li proponis al ili.

Kiam li sidiĝis survoje por ripozi kaj ekbruli novan cigaredon, la *muchachos* en certa distanco sidiĝis same, dum ili, ŝajne apenaŭ atentante lin, kune interparolis aŭ ridis. Kiam li montris la intencon iri plu, ankaŭ ili ekstaris kaj marŝis post li.

Tiu, kiu trovas tiun etan grupon, certe pensus, ke la diviziestro migras, kaj ke la *muchachos* estas liaj servobuboj, kiujn li ricevis kiel akompanantojn, por ke li ne eraru pri la vojo. Kiom ajn da tempo la diviziestro prenis al si por hezitigi la marŝon, ĉiam kun iomete da espero, ke io ajn okazu, kio liberigu lin el lia situacio, li fine tamen alvenis la novan kampadejon.

De siaj akompanantoj, eĉ sen tio, ke ili ricevis komision

pri tio, li estis tiel lerte gvidata ĉirkaŭvoje tra la vepro al la kampadejo, ke li, se li estus eskapinta, apenaŭ iam retrovus la kampadejon. La indiĝenoj, ĉiam misfidemaj kontraŭ ĉiu, kiu ne apartenas al la komunumo, agis tiel laŭ pura instinkto. Ili faris similan, se ili kondukis iun, eventuale komerciston, al siaj setlejoj, kaj se temis pri setlejoj en la vepro, en ĝangalo aŭ en la *sierra*, kiujn ili pro bonaj kaŭzoj deziris kaŝadi al la ekstera mondo, speciale al oficistoj kaj aliaj aŭtoritatoj.

La tuta kampadejo dum la alveno de la diviziestro okupiĝis pri nenio alia krom pri la kuirado de la vespermanĝo. La vespermanĝo tiutage devis anstataŭi ĉiujn ceterajn manĝojn ellasitajn, de la viroj en la lastaj tridek ses horoj, ĉar la antaŭpreparo de la tiutaga batalo lasis nek al la viroj nek al la inoj tempon pensi pri la manĝo, kaj des malpli pri kuirado. Tie kaj ĉi tie, tiam kaj tiam, iu vore glutis kelkajn buŝplenojn de frida kaj tenaca tortiljo aŭ ŝovis manplenon da parte ŝimaj *frijoles* en la buŝon. Tial la kampadejo nun dediĉis al la kuirado, banado, lavado kaj al similaj okupoj, kiuj memoris pacan hejman vivon, kaj ili faris tion kun tiaj sindono kaj pasio, kiuj preskaŭ samis al volupto.

Nenio memoris pri tio, ke tiuj ĉi samaj viroj je tiu ĉi sama tago furioze batalis, batalo, en kiu ili havis tridek mortigitojn kaj ĉirkaŭ kvindek vunditojn, kvankam tiu batalo finiĝis por ili per decida venko.

Ĉar neniu en la kampadejo iel okupiĝis pri io, kio rigardeblus kiel antaŭpreparo por nova batalo, sciis la

diviziestro, ke neniu trupo estas survoje por liberigi lin. Li intertempe lernis, kie serĉi kaŭzon de la malvenko. La spiona servo de la ribeluloj estis dekfoje pli bona kaj centfoje pli preciza kaj pli fidinda ol la mesaĝoservo de lia divizio. Jam ne plu estis dubo por li, ke ĉiu peono de bieno, ĉiu migranta kaj ŝajne tute maldanĝera kaj senscia indiĝeno, verŝajne eĉ la soldatoj de la federacia armeo kun indiĝena deveno, spione servas al la ribeluloj.

Neniu en la kampadejo estis scivola pli proksime rigardi la diviziestron, kiam tiu kun akompano alvenis. Neniu interesiĝis pri la ĉeesto de tiu viro, kies sakroj ekstremigis divizion de la federaciaj trupoj. Tie en la kampadejo de la ribeluloj ĉiuj laŭte ridus pri li, se tiu rekonata alta oficiro postulus de iu el la pedikohavaj indianoj, ke tiu montru al li la necesan respekton kaj plej obeeme salutu lin.

Oni kondukis lin al granda bivakfajro, kiu brulis en la mezo kaj estis rigardata kiel la bivakfajro de la *Estado-Mayor*, do de la ĉefkomandejo.

Proksimiĝante, li tre mirigite vidis kaŭri sian unuarangan leŭtenanton Bailleres, kiu manĝis kun pedikohavaj



*muchachos* tortiljojn kaj *frijoles* kaj trinkis kafon.

Leŭtenanto Bailleres troviĝis en la batalo matene en la manoj de *muchacho*, kiu ĝuste intencis trafranĉi lian ĝorĝon, sed en la sama momento, pretervenis Andreo kaj rekonis la leŭtenanton.

„Haltu, bubo!“ li vokis al la kamarado. „Prefere atendu. Bone ligu lin kaj pli poste konduku lin al la kampadejo. Eble Generalo volas fari lin pluan fojon herolda rajdisto. Liaj armiloj kompreneble apartenas al vi.“

Tial la leŭtenanto nun post la reordigado de la batalejo estis kondukata tien. Tiu leŭtenanto Bailleres kaj la diviziestro estis ambaŭ la lastaj, kiuj kiel kaptitoj ankoraŭ vivis post la batalo.

La mirigita diviziestro en la unua momento ne certe sciis, kion pensi pri lia unuaranga leŭtenanto, kiam li vidis lin kaŭri tiel trankvile, ŝajne tiel trankvile ĉe la bivakfajro kaj manĝanta kun la *muchachos*, kvazaŭ li apartenus al ili.

Lia unua penso estis, ke la leŭtenanto certe kulpis la armiloŝteladon de la antaŭhieraŭa nokto kaj des pli la hontigan fiaskon matene. Eblis, ke li estis aliancano de la ribeluloj kaj intence sciigis malĝustajn indikojn pri ties kvanto, armado kaj pozicio.

Sed tiu suspekto daŭris nur kelkajn sekundojn. Vidalvide kun la sangaj bandaĝoj, kiujn la leŭtenanto volvis ĉirkaŭ la orelojn, kaj vidalvide kun la sangokrustigita stumpo de lia nazo tia suspekto ne daŭrigeblis.

Denove rigardante al sia leŭtenanto, la diviziestro denove fariĝis malcerta. Povus esti, ke la leŭtenanto estis traktita de la ribeluloj ne tiel hontege, sed de kolerigita ranĉisto aŭ bienulo, kies edzinon aŭ filinon li sekse delogis. Estis tute ne malofte, ke trompitaĵoj edzoj aŭ patroj, kies filinoj

estis senhonorigitaj senkonscienciproĉe, tiel venĝis.

Kvankam la tri kapoj, kiujn la leŭtenanto kunportis kiel donacon al la diviziestro, eble efektive estis detranĉita jde la ribeluloj, eblis, ke la leŭtenanto ŝarĝis sian propran senhontigon same sur la ribelulojn por ne devi koncedi, ke li dankis tion al aventuro kun damo, kaj tute ne estis en la kampadejo de la ribeluloj, sed en la sama tempo en la manoj de ranĉisto, kiu sentis sin devigita repurigi sian sangomakulitan honoron per sangolavado.

„Estu bonvena, diviziestro“, salutis Generalo, kiam la kaptito sen ceremonio estis kondukata al la bivakfajro. „*Bienvenido, Divisionario*“, ripetis Generalo. „Sidiĝu sur iun el la konferencaj foteloj, kiujn vi vidas kuŝadi ĉi tie, kaj sentu vin tute hejme.“

Generalo mansignis al unu el la krudaj arbotrunkoj, kiuj kuŝis proksime de la fajro kaj el kiuj kelkaj ankoraŭ estis neuzataj.

„*Gracias!*“ diris mekanike la diviziestro. Sed krude li tuj aldonis: „Tion vi ankoraŭ ege pentos, *muchacho*, tion mi povas diri jam nun al vi. Oni disŝiros vin en kvar pecojn kaj poste surnajlos kaj verŝos petrolon sur vin.“

„Ĝojige, diviziestro, ke mi tion scias, ke mi scias tion jam hodiaŭ. Kompreneble, unue tiuj, kiuj volas permesi al si tian plezuron je mi, certe devos havi min antaŭe. Kaj tio diviziestro, certe ankoraŭ daŭros kelke da tempo, tion supozas mi. Intertempe ni ja unue povus permesi tian plezuron al ni mem, kaj ja pere de vi, diviziestro. Via

propono ne estas malbona, laŭŝajne unuamomente. Kion pensas vi pri tio, leŭtenanto Bailleres?“

„Tio ne estas afero mia“, li diris kun maĉanta buŝo.

La diviziestro turnis sin al sia leŭtenanto: „*Buenas noches, teniente* Bailleres, bonan nokton, leŭtenanto.“

La leŭtenanto faris koncizan geston por aludi, ke tio signifas leviĝon, klinis iom la kapon antaŭen kaj redonis: „*Muy buenas noches, mi general, gracias!*“ Li ankoraŭfoje klinis la kapon rapide kaj denove okupiĝis pri sia interrompita vespermanĝo.

La diviziestro evidente ne bone sidis en la profunda softa fotelo, kiun ofertis la *muchachos* al li.

Li ŝoviĝis tien kaj tien sur sia grasa postaĵo. Ĉiam, kiam li moviĝis, tio kaŭzis brueton kvazaŭ lia tuta korpo estus vestita en seka knaranta led. Ĉu la sono ekestis pro la altaj novaj rajdaj botoj, kiujn li surhavis aŭ pro la tre larĝa ventrozono kaj pro la iom malpli larĝa brustzono aŭ ĉu li havis sub sia uniformo firme ligitan ledan kamizolon, tio por kaŝi la ampleksegan ventron, per unu

fojo ne estis precize direbla. Ĉiukaze la viroj havis la impreson, ke la tuta viro, korpo, membroj, kapo, cerbo, animo, koro kaj la intestoj konsistis el freŝa ledo, kiu ĝuste venis de la selfaristo kaj ankoraŭ ne travivis pluvon.

Pro la longa marŝo li fariĝis sufiĉe malsata, tiom, ke lia fiero ne sufiĉis rifuzi la manĝon, kiun ofertis la *muchachos* al li, kaj kiu estis la sama kiel tiu, kiun ili manĝis mem. Li prenis la varmegajn tortiljojn, la *frijoles* spicitajn per verda kapsiko, la sekan viandon rostitan sur varmegaj lignokarboj kaj la kuiritan kafon, kvankam ĉio ĉi venis de la pedikohavaj kotuloj. Ke li povus esti iam tiom proksima al ili, li antaŭe certe eĉ en sonĝo ne rigardis ebla. Li akceptis la manĝon kun granda plezuro, kvankam li ja divenis, ke tio verŝajne estos lia lasta manĝo en tiu ĉi mondo. Tamen li tre penis konduti tiel, ke iu, kiu de ekstere rigardus, povus pensi, ke li ofertas grandan honoron al la viroj, ĉar li kaŭras kun ili ĉe la sama bivakfajro por ŝanĝi kun ili la duone disrompitajn kaj duone rompiĝemajn argilajn pelvetojn kaj kruĉetojn kaj ĉeokaze demandas kaj humile kaj arogante desupre: „Ĉu mi povas havi iom da salo, *muchachos*? Ĉu vi

ankoraŭ havas postrestintan kruĉeton da varmega kafo?  
Eventuale vi ankoraŭ povus doni du aŭ tri tortiljojn al mi,  
ĉu? *Muchas gracias, gracias!*“

La *muchachos*, kiuj kaŭris tie ĉe la granda bivakfajro,  
kondukis tiel, kvazaŭ ili estus tute inter si mem kaj solaj.  
Ili atentis nek la diviziestron nek la leŭtenanton. Ili  
parolis, ridis, rikanis, rakontis historiojn kaj ŝercojn  
saturitajn de suko kaj spermo; kaj ili eĉ interparolis, sen  
respekto al la tablogastoj, pri tio, kiel ili tradraŝos ĉe la  
venonta fojo la federaciajn trupojn kaj la ruran policon eĉ  
pli mizerige ol en tiu tago, kiel ili pendumos ĉiujn  
bienulojn kaj lasos iri ties inojn kaj filinojn de mano al  
mano, kaj fine kiel ili sopire deziregis veni al Balun Canan  
kaj al aliaj grandaj garnizonoj, kiel ili atakos kaj okupos  
tiujn urbojn por neniu alia celo krom solide sursalti la  
inojn, filinojn kaj konkubinojn de la oficiroj.

Estis eble, ke nek la diviziestro nek la leŭtenanto pri tio,  
kio estis dirata tie, komprenis multon, ĉar la *muchachos*  
ne interparolis elegantan hispanan, sed tiel, kiel ili sciis  
kaj kutimis, kaj tio estis koruptita hispana sen reguloj, je  
duono miksita kun la vortoj kaj frazoj el tri diversaj

indiĝenaj idiomoj. Ĉiukaze ambaŭ oficiroj ne rimarkigis, ke ili entute aŭskultis, kion parolis la aliaj.

Subite diris la diviziestro, turnante sin iom al la leŭtenanto: „Mi ĝojas, *teniente* Bailleres, rajti kalkuli vin al la transvivintoj.“

La iom ironia tono, kun kiu la diviziestro diris tion, ne maltrafis la celon, la intencitan efikon al la leŭtenanto. Li kliniĝis iom kaj diris: „La ĝojo estas tute je flanko mia, *mi general*.“

„Vi ja ne eble eĉ supozas, *teniente*, ke mi tion, kion mi en tiu momento ankoraŭ rajtas nomi vivon mian, elaĉetis de tiuj kotkovritaj brunaj stinkantaj diabloj?“

La leŭtenanto ridetis tiel, ke la diviziestro komprenu, ke tiu rideto nur ekstere estis surgluita, kaj, ke malantaŭ ĝi kaŝiĝas moko. La diviziestro komprenis tion tute bone. Li ne atendis respondon, sed aldonis: „Mi devus supozi tion ja multe pli pri vi, *teniente*, ĉar vi estas ĉi tie tiel bone konservata kaj sidas kun la kanajloj ĉe la bivakfajro kaj mi trovas, ke vi fumas eĉ ties cigarojn.“



La leŭtenanto kapjesis, ridetis denove, profunde enspiris la fumon de la cigaro kaj elblovis ĝin poste. „Tiu cigaro estas la lasta, kion mi fumas en mia vivo, *mi general*. Tiu cigaro, kvankam nekutime longa kaj dika, membrulumita de unu el la *muchachos*, havas alian celon ol la eleganta cigaredo, kiun vi ofertis al mi. La lasta enspiro el la lasta stumpeto de la cigaro signifas por mi la fanfarsignalon por la ekmarŝo el tiu ĉi mondo. Vi certe en via vivo ankoraŭ fumos pli da cigaredoj ol mi cigarojn.“

„Kion vi celas per tio, *teniente* Bailleres, fanfarsignaloj, ĉu?“

Retiriĝinte dum certa tempo, Generalo revenis al la bivakfajro.

„La fanfarsignalon, la militestro, kiu tradraŝis nin, ja certe tuj klarigos al ni, ĉi tie, tiel, ke mi povas rezigni pri klarigo al vi, *mi general*.“

Generalo, kvankam li certe aŭdis tiujn vortojn, diris nenion. Sed Kolonelo, kiu same revenis al la bivakfajro, rigardis al la cigaro de la leŭtenanto kaj diris: „Vi estas bona fumanto, *teniente*. Kaj ĉe tiu okazo trudiĝas en mian kapon, ke nia *ĵefe* urĝe konsilis al vi, ke vi neniam denove lasu revidi vin en tiu ĉi regiono, kiam vi vizitis nin je la lasta fojo.“

La diviziestro movis sian kapon tiel vigle, unue en la direkto al Kolonelo kaj poste en la direkto, en kiu kaŭris la leŭtenanto, ke ŝajnis kvazaŭ li estus ŝirita el sia dormo. Legeblis sur lia vizaĝo, ke li travivis miregon. Lia grasa buŝo klake malfermiĝis kaj restis dum certa tempo malfermita, dum li denove rigardis jen al la kolonelo jen

al la leŭtenanto.

La leŭtenanto suĉis denove sian cigaron, li rigardis ĝin tiel mediteme, kvazaŭ li volus kalkuli, kiom longe ĝi povus daŭri. Perfingre li forviŝis la cindron, rikanis kaj tiam diris: „Jes, mi rememoras, *muchacho*, estis dirite al mi, ke mi ne ripetu mian viziton ĉi tie. Tio estas ĝusta.“

„Kaj por ke ne ekestu eraro“, daŭrigis Kolonelo, „rilate al la ĝusta persono, al kiu ni diris, ke ties vizito ĉi tie ne estas dezirata, nia *jefe* opiniis necesa marki tiun personon per ekkonebla eksteraĵo, kio, bedaŭrinde sekvigis la perdon de du belaj oreloj kaj de nazpinto.“

„Tio okazis evidente pro la opinio“, respondis la leŭtenanto, „ke mi dum dua fojo ne kiel peono, sed kiel porkopelisto povus enŝteliĝi en vian duan kampadejon, kaj por esti tute certa pri mi, ke estas mi, mi devis postlasi mian nazon kaj miajn orelojn ĉe vi.“

„Ĝuste.“ Kolonelo trinkis gluton da varmega kafo, kiun li verŝis el ladokruĉeto en la argilan poteton. „Vi tiam ne estis invitita, leŭtenanto, kaj nun vi same ne estas invitita,

ja eĉ malpli. Kaj tamen vi sendis al ni kelkajn centojn el viaj viroj, por ke ni forprenu de ili la karabenojn, la kartoĉojn kaj la amatan vivon. Sed tiel vi kompreneble ne opiniis tion. Kaj metite la kazon, ke ni estus ricevintaj la batojn, kaj vi estus gajninta la kampadejon kaj la batalon, kion vi farus en tiu kazo al ni?“

La leŭtenanto rigardis al sia diviziestro kaj diris: „Tiukaze ni vin ĉiujn enfokus ĝis la koloj kaj poste ni ekzercus kurpaŝadon sur trans viajn kapojn. Ĉu ne tiel, *mi general?*“

„Mi tion ne ordonis, *teniente*“, respondis la diviziestro kun strangole sonanta glutado en la voĉo.

„Tio pravas, *mi General*, vi ĉifoje ne ordonis tion. Sed ni tiel faris tion ĉiam, kiam temis pri ribeluloj, insurgentoj kaj kontraŭstaremaj peonoj. Nur stratrabistojn ni traktis alie. Tiujn oni simple tuj mortpafis. Sed de ĉiuj tiuj kanajloj, kiuj konfuze babilaĉis pri libero kaj rajtoj, oni distamfis la kapojn displitige, por ke neniu el iliaj mizeraj cerboj fariĝu heredaĵo.“

La diviziestro montris afliktitan vizaĝon. Li diris eĉ ne vorton, tiris nur la ŝultrojn supren.

„Ĉifoje, kompreneble“, daŭrigis la leŭtenanto per laŭta voĉo, por ke ĉiu komprenu tion ĉe la bivakfajro, „ĉifoje, kompreneble, *mi general*, vi alian komandis. Vi ordonis, ke oni traktu la kaptitojn milde. Neniu estu mortigita. Oni nur kaptu ilin kaj konduku ilin al Balun Canan, por ke oni pridemandu ilin fare de laŭorda milittribunalo, kie ĉiu laŭ sia maniero rajtu defendi sin kaj konvinki la juĝiston, ke li agis nur pro bezono kaj turmentanta mizero, sed ne aliĝis pro kontraŭstaremo al la registaro la ribelulojn.“

La diviziestro kapjesis, kvazaŭ li volus konfirmi la vortojn. Sed dum tio li ne rigardis al la leŭtenanto. Ŝajnis, kvazaŭ li fariĝus pro la efiko de tiu bela mensogo kelkajn jarojn pli juna ol li aspektis laŭŝajne dum la lastaj du horoj.

Celso vokis: „Jen vi aŭdas, *muchachos*, ni estis nur kaptotaj, poste iomete kaptitaj kaj nenio plu. Kiel bele estas sur tiu ĉi mondo, kiel fajnsentaj kaj karaj estas la soldatoj.“

La ridado fariĝis pli laŭta. Profesor vokis trans la grupon: „Domaĝe, ke ni ne eksciis ĉi ĉion pli frue. *Muchachos*, ni tiukaze marŝus kun floroj enmane kaj verdaj branĉoj ligitaj al niaj maĉetoj kontraŭ la *federales, rurales* kaj bienuloj kaj anstataŭ niaj mahagonkantoj kaj ribelulaj ĥoraj kantadoj ni kantus: Ni laŭdas la plejpotencan Sinjoron, kiu tiel saĝe gvidas ĉion!“

„He, diviziestro“, vokis Celso, „kial vi ne sendis per via sendito, per tiu *teniente* Bailleres tiun belan mesaĝon? Ne pensu eble eĉ, ke ni irus en tiun kaptilon. Ne ni. Sed ĝi farus belan impreson al ĉiuj, kiuj ŝatas esti gratitaj en la hararo, por ke ili ne mem devu skrapi sin pro la pedikoj. Belaj paroladoj pri la paco kaj humaneco ni povas mem paroli al ni, por tio ni ne bezonas generalojn.“

„Estis bele parolite, *teniente* Bailleres“, diris Generalo, kiu nun enmiksiĝis ankaŭ. „Sed tiu bela parolo ĉi tie ne helpas plu. Vi venis tro malfrue. Kiom multe forbrulis jam de via cigaro? Dek minutojn ĝi ankoraŭ brulos. Vi estis avertita, ke vi ne denove montru vin ĉi tie. Ĉu tio estas prava, ĉu ne?“

„Ne cidiru al mi, pedikohava kotmalpurulo naskita de putino.“

Generalo rikanis pro tiu ofendo. „Ne tiom troigu rilate la cidiradon. Oni ĉiam cidiris al ni. Nun estas ni en la vico cidiri al la aliaj. Kio koncernas vin, *teniente* Bailleres, post horo eĉ la larvoj cidiros vin, kaj plej malgaje tiukaze estos, ke vi eĉ ne povos malpermesi tion al ili.“

Li ĉirkaŭrigardis, mansignis al *muchacho* kaj diris al li: „Konduku la tri *salvajes*, la tri sovaĝulojn al mi, Pablo.“

La viro forkuris por alkonduki la sovaĝulojn.

Kiam la tri postulitoj venis proksimen, Generalo turnis sin denove al la leŭtenanto Bailleres. „Duan fojon, *teniente* Bailleres, mi ne povos foririgi vin. Tio kostus al ni denove tridek aŭ eĉ pli da *muchachos*. Vi ricevis vian bonŝancon de mi kaj vi tre fie misuzis ĝin.“

La leŭtenanto ruĝiĝis pro kolero. La krustigita naza stumpo komencis krevi, kiam li malfermegis nun sian buŝon, por meti ĉiun mokon, kiun li kapablas, en siajn vortojn. En ĉiu alia ĉirkaŭo kaj situacio li vekus la impreson de speco de klaŭno, kun la bandaĝoj firme volvitaj ĉirkaŭ la kapo kaj volvitaj sub la mentono. La bandaĝoj estis malpuraj, malseka koto miksiĝis kun la sango, kiu penetris tra la bandaĝo kaj sekiĝis. Sur sian kranion li estis preminta sian militecan ĉapon, kiu aspektis pro la bandaĝoj multe tro malgranda por lia kapo. La vizaĝo estis nerazita kaj samtempe kovrita de kotŝprucaĵoj, kiuj parte jam defalis kaj postlasis grize blankajn makulojn. Sed neniu atentis, ke li aspektis kun sia nazoŝtumpo kaj la bandaĝoj kiel la pajaco de



povriĝinta cirko.

Li aĉe grincis larĝe grimace. Tiam li elpuŝis koncizan ridadon. Kaj kun tiu ridado li samtempe vokis: „Vi, kotulo kaj dezertulo kaj perfidulo, filo de putinsklavo kaj fava hundino, ĉu? Vi, vi do donis al mi bonŝancon, kiun mi fie misuzis, ĉu? Ĝuste tial, ĉar mi de vi, stinkanta ribelulkanajlo ne akceptas donacojn kaj neniun bonŝancon, kaj eĉ mian vivon mi ne volus havi kiel donacon de vi, tial mi uzis la enliberigon tiel, kiel ĝi plaĉas al mi, kaj ne al vi, kota kaj pedikohava hundulo, nomata indiano.“

„Dezertinto kaj perfidulo, mi, ĉu? Tre bone dirite, *teniente* Bailleres. Estas, kiel oni povas aŭdi ĉie, la plej granda honoro servi en armeo. Estis ankaŭ por mi honoro, kiam mi ekservis. Sed kiu el vi, el la oficiroj, permesis al mi kaj al miaj kamaradoj havi honoron? Oni batadis min kiel rekruton, kaj ankaŭ pli poste, kiam mi estis jam kaporalĉjo. Ne nur batadis, sed eĉ kraĉis min vizaĝen. Kaj ne nur tio. Se iu el vi, putinbuboj kaj malhonorigantoj de inoj, fihumuris, vi oficiroj, vin mi celas, aŭ ebriiĝis ĝis stinkado aŭ, se vi vian superfluan en

la saketo ne povis demeti ĉe inoj, ordonis al ni, ke ni surgenue aŭ longe etendite rampu trans la tutan kazernan korton aŭ purigu per dentobroso necesejojn aŭ oni fie agitis la malnovajn soldatjn nokte ataki la rekrutojn sur ties matoj, kaj ke ili ilin tie draste tradraŝu, kaj je la sekva mateno la turmentitoj devis eĉ mensogi, ke ili falis el fenestro, aŭ de tegmento, kie ili tute ne devis esti. Mi diras al vi, *teniente* Bailleres, la dezertinto, kiu forkuris kaj dizertis de la armea infero, kie oni eldraŝis, elturmentis kaj el-ofendis de li ĉiun ŝprucaĵeton de honoro, havas dekfoje pli da honoro en si ol tiuj, kiuj havas la postaĵon plena de mizera timo, kaj ĉion tion akcepte eltenas sen ekspiti. Tia dizertinto havas milfoje pli da honoro ol la oficiroj kaj suboficiroj, kiuj delektiĝas je sia aŭtoritato kaj refreŝigas sin per ĝi. Perfidulo mi, ĉu? La grandaj kaj efektivaj perfiduloj estas tiuj, kiuj tiom eldraŝas de la soldatoj ĉian honorsenton kaj ilin sklavigas tiom, ke ili eĉ ne plu scias, en kiu armeo ili servu kaj al kiu lando ili montru respekton. Perfiduloj estas tiuj, kiuj tiom longe fermas per ŝtopiloj la buŝojn de la popolo, kiuj tiom humiligas ĝin, kiuj tiom longe prirabas ĝin de ties laŭordaj rajtoj ĝis la popolo tion fine ne plu povas elteni

kaj preferas elfurioziĝi en civitana milito ol pli longe toleri tian malhontigon. Jen la perfiduloj, la faktaj, realaj kaj solaj landoperfidantoj, kiuj per potencavido, honoravido, trompoj kaj murdoj kreas la kaŭzojn por ribeloj kaj revolucioj. Eble post dek jaroj, eble post kvindek jaroj, oni iam diros, ke ni, la pedikohavaj kaj kotaj indianaj fatrasuloj, ribeluloj, insurgentoj, banditoj, murdobruligistoj kaj kiel ajn vi nomas nin aldone, estas la faktaj savintoj de la lando. Tion vi ne komprenas, *teniente* Bailleres. Tial vi ja venis ĉi tien, kvankam mi avertis vin.“

„Pri kio vi, pedika kanajlo, do rajtas averti min?“ vokis la leŭtenanto kolerigite kaj ĵetis la restaĵon de sia cigaro en la fajron. „Pri nenio vi rajtas averti min. Mi venas kaj foriras tiel, kiel mi volas, sciu tion!“

„Tion mi sciis jam antaŭe. Tial oni markis vin, por ke vi eble eĉ ne kamuflita per inaj vestoj revenu en nian kampadejon por spionadi ĉi tie. Hodiaŭ vi ne venis ĉi tien por servi al via generalo aŭ al la registaro, ankaŭ tion mi scias. Vi venis ĉifoje por kapti min, por kapti min vivanta kaj plezuriĝi je mi, pro viaj mankantaj oreloj kaj via

forputrinta nazo.“

„Ĝuste, *cabron*“, kriis la leŭtenanto, pli kaj pli koleriĝante. „Vin mi volis kapti vivanta. Kaj, ke tio ne sukcesis al mi, tio estas la ununura doloro, kiun mi sentos, kiam mi pagos mian finfumitan cigaron. Por ke vi sciu ankaŭ tion, kion mi farus kun vi, se mi estus kaptinta vin, tial mi diros al vi antaŭ ol estos tro malfrue kaj mia buŝo frostfermita. Mi ordonus vin ĵeti laŭ la tuta longo surteren, kaj tiam mi ordonus marteli lignan pinton tra via ventro, lante, colon post colo, kaj tiel mi firmajligus vin sur la tero, ĉar vi ja kapablas tiom bone kaj laŭte krii pri tero kaj libero. Mi ordonus plenŝtopi vin per tero ĝis vi krevus, kaj vi ricevus la liberon lante mortaĉi.“

„Proksimume mi ankaŭ tion sciis antaŭe, *teniente*, ke vi tion, ĝuste tion farus“, respondis Generalo glugle ridante. „Kaj, ĉar mi sciis tion, tial mi alvokis ne iujn el la kutimaj *muchachos*, por ke ili kunprenu vin por promeno, sed mi mendis tiujn *salvajes* por tiu vespera distro. Ĝuste pro tiaj malgrandaj vesperaj distroj, kiuj iam estis ekzercitaj je ili, ili fariĝis *salvajes*. Via cigaro estas finita. Ni ne plu havas ion por diri al ni, *teniente* Bailleres.“

„Certe ne, hundido.“

Generalo vokis al la *salvajes*: „Ĉu vi komprenis, kian specon de promeno al la infero la *caballero* elserĉis por si?“

„*Seguro*“, respondis la tri *muchachos* samtempe, ni aŭdis ĉiun vorton. *Tierra y libertad! Salud, general!*“

„*Tierra y libertad, muchachos!*“ salutis Generalo.

Unu el la tri viroj proksimiĝis al la leŭtenanto, puŝis la ripojn de li per maĉetotenilo: „Ek, amiketo, mi kantos al vi lulkanton tie ekstere de la kampadejo.“

La leŭtenanto eksaltis kvazaŭ li ne volus esti pelata de tiuj uloj. Li turnis sin al la diviziestro, kiu sidis dum la longa interparolado sur sia arbotrunko sen partopreni la interparoladon.

„Ĉu vi ne havas laŭordan gluton en via ĉekorpa botelo, *mi general?*“ demandis la leŭtenanto.

La diviziestro elŝiris elegantan kristalan botelon platan

kaj iom kurbigitan tiel, ke ĝi oportune portebblas enpoŝe. Ĝi povis teni ĉirkaŭ tri centilitrojn kaj estis ankoraŭ plenigita je duono.

„Trinku la duonon, *teniente*“, diris la diviziestro, kiam li transdonis la botelon al la leŭtenanto. „Postlasu la restaĵon al mi. Verŝajne mi bezonos ĝin iom pli poste same tiel, kiel vi.“

La leŭtenanto tuŝis perfingre la botelon tiel, ke li povis preni la ĝustan kvanton. Tiam li engorĝigis laŭordan glutegon, demetis la botelon kaj rigardis la randon ĉe la fingro, kaj kiam li trovis, ke li bonhavas ankoraŭ gluton, por akcepti sian parton tute ĝuste, li engorĝigis ankoraŭ duan gluton.

„Do, *mi general*, mi pensas, ke mi dividis ĝuste.“ Li ridis per unu flanko de sia buŝo, dum li redonis la botelon.

La diviziestro fermŝraubis ĝin kvazaŭ pie. Poste li levis la rigardon. Rekte al Generalo. „Sed *muchacho*, certe vi ne efektive intencas fari tian kruelaĵon al mia leŭtenanto, ĉu?“

„Komence tio certe ne estis mia intenco, diviziestro. Sed vi ja aŭdis, tiel bone kiel mi kaj kiel ĉiuj aliaj ĉi tie, kion via *teniente* intencis fari kun mi, se mi estus falinta en manojn liajn.“

„Tio estis nur soldata ŝerco“, trankviligis lin la diviziestro.“

„Tiukaze tio estis same nur soldataj ŝercoj, kiam kvanto de niaj kamaradoj estis kaptitaj de la *rurales* antaŭ kelkaj semajnoj, jen iom malantaŭe, en la bieno Santa Cecilia, oni tie enfosis ilin ĝis la kolo kaj rajdistoj tie tiom longe galopadis sur ties kapoj ĝis ili estis disstamfitaj. Bonaj soldataj ŝercoj, diviziestro.“

La diviziestro levis la ŝultrojn: „Brutalaj aferoj okazas en milito. Kaj ni estas en milito unu kontraŭ la alia. Sed tiaj brutalecoj estas esceptoj. Mi tiajn kaj similajn agojn ordonis neniam, kaj se mi estus estinta en tiu bieno, tiukaze mi ne estus permesinta tiajn fiajn traktadojn.

„*Teniente!*“ vokis Generalo al la leŭtenanto. „Ĉu vi povas respondi ion pri la soldata ŝerco, kiun la diviziestro ĉi tie

rakontas al ni?“

„Ne al vi, sterkohundo“, diris la leŭtenanto kaj distordis sian vizaĝon al malbela grimaco.

„Mi volas nun diri ankoraŭ la sekvan al vi, *teniente*. Vi estas kuraĝa ulo, tion vi certe pensas. Mi havas proponon por vi. Vi ne pensu, ke mi eventuale eĉ timas tian fian mizerulon nomatan naŭza spiono, kia estas vi.“

Generalo tiris sian tranĉilon el la ingo de la zono. Dum li faris tion, li turnis sin al la *muchachos* ĉirkaŭstarantaj kaj vokis: „Donu al la putinfilo de stinkanta kojoto nomata spiono tranĉilon, same tian longan, kian havas mi.“

Unu el la viroj eltiris sian tranĉilon kaj rigardis Generalon, kvazaŭ li ne sciis, ĉu li komprenis bone, ĉu ne.

„Nu, donu ĝin do al li.“ Generalo movis la kapon.

La leŭtenanto kaptis la tranĉilon per dubema gesto.

„Ne, ke vi pensu, ke mi devas meti la manojn al



sendefendulo. Ne mi, kaj neni el tiuj, kiuj ĉi tie ĉe ni havas rajton kunparoli kaj kunkomandi. Ek, prenu la tranĉilon, mi prenos mian, kaj tiu, kiu el ni venkos, faru kun la alia tion, kion vi intencis fari kun mi, se mi estus kaptita por viaj manoj.“

„Ĉu vi ekfreneziĝis, Generalo?“ vokis unu el la *muchachos*.

„Ĉu 'freneziĝis', Sebio? Mi estas en bona humuro. Sed tiuj favaj hunduloj, nomataj oficiroj, ne pensu, ke ni timas ilin, se la kondiĉoj estas la samaj. En la kazernoj ili vaste malfermegas siajn buŝaĉojn kaj kondukas kvazaŭ ili povus ĉiun el ni vori, se ili nur rigardas nin kaj ili tretas ĉiun postajen, kiam iu el ni preteriras ilin. Jen ni, la soldatoj, estas la sendefenduloj, kaj se iu el tiuj hundidoj ricevas vangoprapon sukan, kiun li meritas ĉiutage dudekfoje, oni pafmortigos la vangofrapinton.“

Generalo turnis sin al la leŭtenanto kaj rikane diris al li: „Venu, venu, ŝafido mia, nun ni ambaŭ estas samrajtaj, vi, hundulo nomata leŭtenanto kaj mi, la dezertinta serĝento. Vi havas tranĉilon tian, kian havas mi; kaj estas

neniu ĉi tie, kiu min nun pafmortigos, se mi larĝbatos la grimacon vian. Se vi volas, mi ĵetos eĉ mian tranĉilon teren. Mi eĉ ne bezonas ĝin kontraŭ karikaturo de oficiro tia, kia estas vi.“ Li forĵetis sian tranĉilon vastarke.

„Vi bonvolu reteni vian tranĉilon. Uzu la tranĉilon. Mi uzos nur miajn pugnoj, nenion plu, kaj se vi venkos min, jen iru sen molesto de ni reen al via nazmukhava grego kaj trenu min je lazo post vi.“

La leŭtenanto ĉirkaŭrigardis.

Granda bulo de *muchachos*, dum nur kelkaj sekundoj alkurintaj, kolektiĝis. Dum mallonga momento li ja estis preta akcepti la ofertitan batalon. Sed tial, ĉar Generalo forĵetis sian tranĉilon, spite al tio, ke la leŭtenanto rajtis uzi sian, kaj Generalo ekis ataki lin per nudaj manoj, kaj ŝajne intencis tordi per tiuj kotaj ostecaj manoj ties kolon kiel tiun de koko buĉota, perceptis la leŭtenanto vidalvide kun granda aro de rikanantaj kaj lin mokantaj *muchachos* kiel insultegon tioman, ke li devis rifuzi la duelon. Nur per tio, ke li rifuzis batali kun Generalo laŭ tia malsamŝanca maniero, eblis laŭ li konservi la lastan

eron de honoro, kiu ankoraŭ restis al li kaj preni ĝin kun si transmonden. Ĉar eĉ tiukaze, se li venkus, li ne povus elteni la hontigon esti akceptinta tian malsamŝancan batalon kun ĉifonvestita kaj pedikohava duonindiĝena ribelulo por savi sian haŭton. Ĉiuj, kiuj aŭdus pri tio, komentus tion kiel timon neindan al oficiro. Pli profunda humiligo ne fareblus al li ol faris Generalo per la simpla gesto forĵeti sian tranĉilon kaj permesi la tranĉilon al li. Li volis disgrati sian vizaĝon pro kolero pri tio, ke li mem ne unue forĵetis la tranĉilon, kaj ke li permesis al Generalo antaŭi lin per tiu gesto. Sen tranĉilo li kompreneble ne povus venki la fortikan labore harditan proleton, ne, se dependus nur de la pugnoj. Sed liaj kamaradoj parolus pri gloriĉa morto.

Tial nun nenio alia restis al li krom respondi laŭ maniero, kiu laŭ lia opinio decas por oficiro.

Li antaŭeniris paŝon. Plena de kolero rigardante Generalon, li antaŭenpuŝis la dentojn, kvazaŭ li volus manĝi lin, li levis brakon kaj ĵetis kun vehementa gesto la tranĉilon teren, tiel, ke ĝi pikiĝis ĝis la tenilo en la teran surfacon. Poste li kraĉis, ĝin tute prenante el la gorgo,

makulon sur la teron, proksime antaŭ la piedojn de sia kontraŭlo, kaj kriis perfingre montrante sur la makulon: „Jen, stinkanta hundido de pedikohava elĵetaĵo de indiana hundino, jen forleku tion. Vi ja ne serioze pensas, ke oficiro kun tia sterkovermo, kia estas vi, ĉi tie pugnobatalos. Fian nanon, kia estas vi, mi vangofrapas sesfoje vizaĝen, sed mi ne batalas kun vi, porko.“

Ĉe tiu kriadio la leŭtenanto fariĝis tute ruĝa sur la vizaĝo. El la krustoj de liaj vundoj gutis sango. Sed la efiko, kiun li atendis, kaj kiu evidentigu lin antaŭ la diviziestro kaj la bulo de la ĉirkaŭstarantaj *muchachos* kiel heroon, tute forrestis. Li esperis, ke Generalo pro tiu insultoparolo kvazaŭ ekfreneziĝos kolere kaj mortpafos lin. Por ke la tragedio rapide finiĝu.

Sed anstataŭ la atendita kolerkriadio sekvis nur moka ridado el ĉiuj flankoj. Generalo ja kriegis, sed ne pro kolero, sed pro ridado. Tiajn esprimojn de forto fare de oficiroj li aŭdis kiel soldato kaj serĝento tro ofte, por ke ili ankoraŭ povu havi eĉ la plej etan efikon al li. En la aktuala situacio la ofendoj de la leŭtenanto devis efiki ridinde al ĉiuj ĉeestantoj; ĉar ĉiuj, kiuj tie ĉirkaŭstaris kaj

ĝuste komprenis la situacion, ne povis ne percepti tiun, sub tiuj cirkonstancoj tute sengravan kriadon de la leŭtenanto, kiel la kvazaŭan kraĉospiradon, bojadon kaj dentargrincadon de kojoto, kiu estas senhelpe firmpinĉita en sia kaptilo kaj vidas stari la ĉasiston kun ridanta vizaĝo antaŭ si. Kaj ĉar tiuj ĝangalaj laboristoj tro ofte travivis la kraĉospiradon, kriadon kaj dentgrincadon de kaptitaj sovaĝaj bestoj el la ĝangalo, tial la konduto kaj gestado de la leŭtenanto estis por ili tiom ridinda, ĉar ĝi memoris ilin pri la konduto de kaptita kojoto.

La leŭtnanto povis kompreneble ne scii, kial lia insultado kaj gestado tiel mistrafis la heroan esprimon, kiun li intencis peri kaj kial ĝi nur estigis ridadon tioman, ke li perceptis sin dum sekundo kiel komikiston.

Kiam la efiko, kiun li esperis krei, kaj kiu estis intencita por dolĉigi sian adiaŭon de la mondo, ne nur forrestis, sed montris sin laŭ maniero, kiun li tute ne atendis, ja eĉ ne pensis ebla, inundis lin je la unua fojo ekde lia kaptiteco tute malgajiga sento de senhelpemo kaj forlasiteco. Li rigardis sian komandogeneralon per vastaj konfuzitaj okuloj, kiuj petegis pri helpo. Li esperis trovi

komprenon almenaŭ ĉe li pri tio, kio okazas tie. Bonfartigus lin, se la diviziestro tiumomente paŝus al li kaj ĉirkaŭbrakus lin kamaradece. Sed la diviziestro alfrontis la situacion same tiel senhelpema kiel lia leŭtenanto; ĉar ankaŭ li atendis kolereksplodon de la generalo kaj de la *muchachos*, same tiel, kiel la leŭtenenanto, li estis eble eĉ pli surprizita de la neatendita efiko ol la viro, kiu tiumomente petis lin pri morala subteno.

Kvankam la situacio daŭris apenaŭ tridek sekundojn, por la leŭtenanto ĝi ŝajnis esti eterneco. Lia malĝojo profundigis ju pli dum ĉiu plia sekundo des pli longe li rigardis la ridantajn kaj rikanantajn vizaĝojn de la *muchachos*. Ĝi puŝis kaj premsufokis lian gorĝon. Se li estus estinta pli juna en tiu momento, li krius nun, ke venu lia patrino, tiel senhelpa kaj forlasita li sentis sin. Dum kelkaj sekundoj li forgesis sian ĉirkaŭon kaj rememoris pri tio, kun la rapidego kaj klareco de fulmo pri epizodo en sia vivo, kion li rigardis kiel la plej malĝojan, kion li travivis iam ajn.

Ankoraŭ antaŭ ol li fariĝis kadeto en militeca akademio, li konis knabinon, kiu tiam ankoraŭ ne estis dekkvarjara. Ili profunde enamiĝis reciproke, kaj ili ĵuris, ke ili geedziĝos, tuj kiam li estos nomumita leŭtenanto. Ili skribis ĉiusemajne dufoje leterojn reciproke, kaj kiam li forpermesis, ili pasigis ĉiun posttagmezon kune. Ŝi estis lia diino kaj sanktulino. Ĉiu el ili promesis al la alia fidelecon eĉ post la entombiĝo. Sed kiam li estis meze de

sia lasta jaro en la akademio, li ricevis leteron de ŝi, en kiu ŝi petis lin pri pardono, ĉar ŝi geedziĝis antaŭ ses semajnoj. Lia unua penso estis fini sian vivon per plumbokuglo krake pafitan en sian kapon. Sed li iris nur en sian loĝoĉambron. Kaj kiam li pensis pri ĉio tio, kio la knabino estis por li kaj kiel ŝi ĵuris centfoje eternan fidelecon al li, eĉ en la preĝejo surgenu antaŭ la okuloj de sanktulo, jen li sentis sin tiom soleca en la mondo, tiom senkonsola, tiom senhelpa, ke li ploris dum horoj. Pli poste li rakontis al siaj kamaradoj, kiuj mistifikis lin pro lia larmŝvelinta vizaĝo, ke li havas la plej malicajn dentdolorojn, kiujn kadeto povus havi.

Tiu epizodo, tute neatendite saltinte en lian memoron, plenumis nun lian spiriton. Inundis lin la sama malgajeco, la sama sento de forlasiteco kiel tiam, kiam li ricevis la leteron kaj sentis plorojn ekflui en si.

Li vere estus ekplorinta, se li estus havinta eĉ nur dek sekundojn pli da tempo por koncentrigi sin al tiu epizodo kaj forŝovi ĉe tio la ĉirkaŭon. Sed malhelpis lin elvoko.

„*Caray!*“ vokis Generalo, forte apogante la brakojn per la



koksoj, „jen rigardu lin. Tion mi ja sciis, ke mi havas mizeran malkuraĝulon antaŭ mi, eĉ mizeran karikaturon de malkuraĝulo, kaj li eĉ surhavas sian uniformon. Unue li timis, ĉar mi havis tranĉilon kaj li ne; poste li timis, ĉar mi donis tranĉilon al li kaj mian ĵetis en la koton, kaj nun li timas, ĉar ni povus firmnajli lin surtere per pintigita ligno, tiel, kiel li volis fari tion al mi. Ankaŭ tial li timas, la vermeto. Tial tiu uniformita bufo kraĉis kaj blekis al mi, por ke mi koleriĝu kaj pafu ses kuglojn en lian kadavron, por ŝpari al li esti firmnajlita per fosto. Kaj tiu estas leŭtenanto! Jen oficiro de la gloriĉa armeo! Jen *cobarde*, malkuraĝulo, nenio alia, kaj mi nun hontas, ke mi volis batali kun tia *cobarde*. Maljuna lama ino en nia armeo havas pli da kuraĝo en elfalema dento ol tiu kadavro de oficiro. Jen mi, ĉe la diablo, damne, hodiaŭ vespere prefere volas manĝi hundokoton ol puŝi mian honorindan tranĉilon en lian mizeran kadavron.“

Sekvis mokega ridado de la *muchachos*.

La leŭtenanto aŭskultis la parolon kun teruriĝo tia, ke ĝi profundigis per ĉiu plua vorto. Li kapneis kvazaŭ li timus, ke lia cerbo konfuziĝas. Duonlaŭte li diris: „*O Dios mio*,

ho, bona Dio mia en la ĉielo, kiel vi povas permesi, ke homo tiom profunde humiliĝeblas kiel mi?!“

Poste li malfermis la buŝon por laŭte krei inter la mokegan parolon de Generalo, ke tio estas miskompreno, ke li kraĉis ne tial antaŭ la piedojn de Generalo por instigi lin pro kolero pafmorti lin, sed ĝuste ofendis male pro sen-timemo kaj aŭdaco tiel malice Generalon.

Sed antaŭ ol li parolis tiel, li trovis, ke li farus sin eĉ ĉiam pli ridinda, se li parolus pri tio, ke temis en tiu kazo pri miskompreno. Idiote tio devus efiki laŭ li, se li asertus, ke li kraĉis antaŭ Generalon, por evidentigi sian kuraĝon.

Kiam Generalo laste finis sian parolon, la leŭtenanto estis tia pala kaj kunrompiĝema, ke ŝajnis, kvazaŭ la parolo jam mortigis lin. Denove li rigardis al sia diviziestro. Ĉifoje ne por trovi moralan subtenon, sed nur por certigi al si, kiel la diviziestro perceptis la humiligan parolon.

Tiu ne rigardis lin, sed intence rigardis for, kion la leŭtenanto ja rimarkis laŭsente. Jen li sciis, ke la parolo eĉ la diviziestron konvinkis, ke lia leŭtenanto pro timo kaj

ne pro aŭdaco provis kolerigi Generalon tiom por kaŭzi rapidan sendoloran finon.

Kaj tiumomente okazis, ke la leŭtenanto ne plu povis reteni sin plori. Li komencis plorsingulti, elprenis naztukon kaj kaŝis sian vizaĝon.

Generalo turniĝis kaj retroiris kelkajn paŝojn pli proksimen al la bivak-fajro. Li haltis, mane alsignis iun el la *salvajes* kaj diris: „Simple pendumu tiun vermon, senceremonie, kaj rapidu!“

La leŭtenanto sekigis haste siajn okulojn, iris renkonte al la diviziestro kaj diris al li: „*Mi general*, ĉu vi serioze pensas pri mi, ke mi alkriis tiun hundon nur tial, ĉar mi volis, ke – “ Li ne parolis plu. Li turniĝis parte flanken. Por si mem li diris: „Kiun sencon tio havu? Mi scias, kaj tio trankviligos min dum eterneco. Ĉu ankaŭ aliaj scias tion, kaj ĉu mi entute iel estus kapabla klarigi tion al iu ajn, tio post kvin minutoj estos tute sen signifo.“

Li rektiĝis kaj paŝis al sia komandanto, rigardis rekte al lia vizaĝo kaj diris militece rigide: „Pardonu, *mi general*, mi volas nur, ke vi forpermesigu min por nedifinita tempo. Petas mi vin pri tio!“

Post tio li salutis militece: „*Mi general*, *a sus ordenes!*  
*Adios, mi general!*“

La diviziestro etendis manon al li, tiris lin proksimen al si, brakumis lin, malkroĉiĝis, same salutis, kaj diris: „*Adios, Muchacho!* Forpermeso permesite! *Adios, teniente Bailleres!* Ni renkontiĝos post kelkaj horoj, *hasta la vista!*“

Aludo de rideto krispigis la lipojn de la leŭtenanto, kiam li salutis duan fojon.

Post tio li turniĝis rapide. Sen hezito aŭ atendo de komando li rapide iris antaŭ la viroj, kiuj forkonduku lin, kaj el kiuj unu el ili ĵetis ŝlimkovritan lazaron trans ŝultron de si.

Kelkajn sekundojn poste oni aŭdis voki iun el viroj: „No, *tenientito*, leŭtenanteto, ne tien, sed tien, en tiu ĉi direkto. Ek! Ek! Movu la gambojn!“

## Ĉapitro 15

01

La diviziestro ekkaŭris. Li kunfalis kiel sako kaj ŝajne perdis ĉiun intereson pri sia ĉirkaŭo. Aŭtomate li tiris el sia peza ora cigaredingo cigaredon kaj ekbrulis ĝin per ardetanta branĉo.

Iom post iom ĉe la bivak-fajro kaŭriĝis ankaŭ la *muchachos* apartenantaj al la stabo, dum la ceteraj retiriĝis al siaj grupoj.

Jen alvenis ulo, nomata Agapito, haltis kaj rigardis atente la diviziestron kaj poste Generalon tiel, kvazaŭ li volus taksi ambaŭ por boksbatalo.

Fine li diris: „Generalo, vi certe bone povus uzi la uniformon de la diviziestro. Tiukaze vi aspektus sufiĉe nobla kaj ĉiu, kiu vidus vin, tuj sciis, ke vi estas generalo nia. Mi pensas, ke la uniformo certe estas konvena al vi, ĉar vi estas simile altaj. Sed vi estas magra kiel bastono kaj la granda armea gvidanto, kiun ni havas ĉi tie, estas

grasigita kiel maljuna porkinaĉo.“ Sian trankvilan humuran parolon subite interrompante kaj ŝanĝante la tonon, li kriis al la diviziestro: „Ek, hopu kaj saltu, Generalĉjo, kaj foje demetu ĉiujn viajn vestaĉojn, por ke ni ĉi tie povu prove surmeti ilin.“

La diviziestro vigliĝis kaj ĉirkaŭrigardis al la parolanto. Li ŝoviĝis sur siaj larĝaj postpartoj tien kaj tien kaj evidente ne sciis kion fari, ĉu li nun obeu la ĉifonvestistan indianan ulon ĉu ne. Sendecide li rigardis Generalon kaj Profesoron, kiujn li akceptis kiel la ununurajn aŭtoritatojn kaj almenaŭ pretis akcepti, ĉar ja ne restis alia elekto al li. Sed kaj Generalo kaj ankaŭ Profesoro, Celso kaj la ceteraj, kiuj ŝajne havis la rajton serioze kunparoli, ne lasis ĝeni sin dum la parolado. Ili kondukis tiel, kvazaŭ neniuj aŭdus, kion diris Agapito.

Kiam la diviziestro poste ne montris eĉ per mieno, ke li komencos demeti la vestojn kaj evidente atendis, kion Generalo diros pri tio, Agapito puŝis lin per nuda piedo tiam forte sur la ripojn, ke la diviziestro renversiĝis. „Ĉu vi ne aŭdis, kion mi diris al vi?“ vokis Agapito. „Malsupren la vestaĉojn kaj rapide!“

La diviziestro nun rekolektis fortojn kaj fariĝis kolera. „Vi, hundido de pedikohava indiano, volas komandi al generalo?! La felon mi lasos detiri de vi pro tiu impertinenteco.“

„Ne parolu draŝitan fazeolopajlon“, rediris Agapito, sen eĉ iomete heziti pro la kolereksplodo de la diviziestro. Per fortaj brakoj li ŝiris la diviziestron supren, mangestis kelkajn el la ĉirkaŭstarantaj *muchachos* pli proksimen al si, kaj kvaronhoron poste staris la diviziestro antaŭ la *muchachos* en tre malpura verda kalsono, kiu atingis ĝis ties genuoj.

Nur nun la *muchachos*, kiuj babilis kun Generalo, ŝajne rimarkis la okazaĵon. Generalo rigardis la monteton da vestaĵoj. Li iris renkonte al ĝi, levis ĉiun pecon supren per mano kaj taksis ĝin tiel, kvazaŭ fatraskomercisto de malnovaj vestoj ofertus ilin al vendo.

„Do, tiaj vestaĉoj“, li diris fine kaj tre malŝate, „do tiaj vestaĉoj kun brilaj butonoj kaj oraj agloj sur la ŝultraĵoj klapoj faras grandan generalon.“



La *muchachos* laŭte ekridis kaj rigardis la diviziestron, kiu kunŝrumpis pro tiom da mokegaj vizaĝoj, provințe konduți sovaĝe dum kelkaj sekundoj. Li frostetis. Li rampis reen al la bivakfajro kaj kuntiriĝis tutkorpe. Ne estis nur la frideto de la pluva posttagmezo, kiu frostetigis lin. Estis multe pli la necerto de lia sorto, kiu malindigis lin, kaj eĉ pli la maloportuneco, kiun li, la kaptito, devis toleri, ĉar tiuj uloj traktis lin tiel. Li dekfoje preferus esti mortpafata de la *muchachos* kun sia uniformo sur la korpo, kaj fiere kaj inde staranta ol nun vestita nur kun duonlonga eĉ tre malpura kalsono kaj aldone eĉ esti ridmokata de la *muchachos*.

„Do, kio vi estas do“, demandis lin Profesoro, „tiel, kiel vi ĉi tie kaŭras? Eĉ *El Caudillo* ne supozus, ke vi estas generalo. Kaj se vi tiel, kiel vi aspektas, paŝas antaŭ vian divizion, krios al vi eĉ ne unu el la soldatoj „*Atencion!*“ Vi devus ja tre proksime paŝi al ili, por ke tiu aŭ tiu el ili rekonu vin kaj tiam eble dirus: „Ve, *dios mio*, tio estas ja nia diviziestro, kia li aspektas!“ Sen uniformo vi aspektas tute mizera, diviziestro, tion mi ja devas diri al vi. Ĉe vi estas nur la uniformo, kiu faras el vi generalon; ĉar

tiukaze, se vi estus ĝusta generalo, vi ne starus nun ĉi tie nuda antaŭ ni kun via tuta malgrandeco, sed ni estus viaj kaptitoj kaj vi ordonus nin ĉiujn enfosi.“

Arcadio kapjesis konfirmige kaj diris: „Tio, kion Profesoro diris, estas ĝusta. Jen, diviziestro, rigardu foje al la generalo, kiun havas ni. Li ne havas belan uniformon tian, kian vi, li tute ne havas uniformon. Ambaŭ ledogamaŝoj, kiujn li portas sur siaj piedostoj, estas dekstraj, ĉar iu alia havas la du maldekstrajn, aŭ ambaŭ maldekstraj restis sur la stilzoj de du el viaj oficiroj, kiam ili per la stilzoj transmondiĝis.“

„No, Arcadio“, interrompis lin Generalo, „tiel tio ne estas. Ambaŭ maldekstraj estis tiel dispartitaj, ke mi ne povis uzi ilin, tial mi havas nur la du dekstrajn.“

„Vi kompreneble rigardas nian generalon ne kiel ĝustan generalon, diviziestro, ĉu ne?“ demandis Celso. „Vi pensas, ke li estas ne ĝusta generalo, ĉar li ne surhavas belan uniformon tian, kia vi. Sed ni ne bezonas uniformojn. Por povi marŝi ni ankaŭ ne bezonas flagojn kaj aliajn viŝĉifonojn, kiujn bezonas vi por ekhavi

kuraĝon. Ni kuraĝas ankaŭ sen flagoj kaj sen tamburoj kaj timbaloj, kaj ni scias ĉiam, kien ni apartenas, kaj kie estas nia bataliono. Ni ankaŭ ne bezonas striojn sur la manikoj kaj ne stelojn aŭ aglojn sur la ŝultroj por buĉi iujn *federales* aŭ *rurales*. Ni scias, kion ni celas. Ĉiu unuopulo el ni scias, kion li celas. Vi kaj ĉiuj viaj soldatoj dum ĉiuj horoj de la tagoj devas esti komandataj, por ke vi sciu kion vi celu; ĉar neniu el vi mem scias, kion li deziras. Vi, la uniformitaj soldatoj, estas kiel ŝafoj, kiuj kuras tien kaj tien, se la ŝafisto ĵetas terbulojn al ili aŭ pelas la hundojn inter ilin.“

„Ĝuste dirite“, enmiksiĝis denove Profesoro, „tute ĝuste dirite, frateto. Jen la kaŭzo, kial ni gajnos la revolucion. Vi malvenkos, kaj ni gajnos ĝin, eĉ se la revolucio daŭros ankoraŭ kvin jarojn aŭ dek da; ĉar ni ĉiuj scias, kion ni celas, sed viaj ŝafoj ne scias tion, ĉar vi ne permesas al ili, ke ili mem celas ion, aŭ mem pensas ion por si mem. Se vi frostotremas, diviziestro, proksimiĝu trankvile al la bivakfajro. Ni ne voros vin. Almenaŭ ne jam nun.“

Generalo kliniĝis, levis la uniformveston de la diviziestro supren, tenis ĝin alte kaj vokis: „He, *muchachos*, kiu el vi volas havi bonan jakon?“

Unu el la *muchachos*, kiu havis tute disŝiritan ĉemizon kaj truigitan pantalonon, vokis: „Mi povas uzi la jakon. Nokte, se mi gardas, estas damne fride.“

Generalo ĵetis ĝin al li. La ulo kaptis la vestaĵon kaj tuj surmetis ĝin. Li disbutonumis ĝin kaj trovis, ke la jakco estas tro vasta. „Tio tute ne ĝenas min“, li diris ridante, „la sekva *haciendo*, kiun ni okupos, liveros la remburon, tie mi tiom grasmanĝigos min, ke la jakco de tiu putinĉasulo tute bone taŭgos al mi.“

„Lasu la aglojn senĝenite sur la ŝultroj“, vokis Celso al la *muchacho*, „el ni vin ja tamen neniu rigardos Generalo.“

Profesoro ridis: „Konsentite, Esteban, trankvile lasu la aglojn tie kaŭri plu, ili aspektas tiom belaj. Se vi iutage venos al Jovel kaj preteriros la kazernon, la tuta

gardistaro tuj saltos al la fusiloj. Vi povos iri en la kazernon kaj komandi ekmarŝi la tutan regimenton, tien, kien vi volas, aŭ eĉ konduki ĝin ĉi tien kun la kampokanonoj kaj la kartoĉoj. Neniu el la soldatoj rigardos al via vizaĝo, tion tute ne timu. Ili vidos nur viajn epoletojn, kaj se ili tie vidos tri stelojn aŭ eĉ la aglon, jen ili perdos la menson tute kaj fariĝos maŝino. Vi devos nur krii al la maŝino, kaj jam ili ekkuros, mezen de lago, se vi ordonos kuri al la maŝino. Ĉiu azeno povas kurigi ĝin, se li metas aglon aŭ kelkajn stelojn sur la ŝultrojn. Tion vi kompreneble ne pensas ebla, sed tiel estas.“

„Nu, kaj kiu volas havi la pantalonon? Ĝi havas postparton el pura softa ledo“, aldonis Generalo, kiam li tenis alte la pantalonon, por tuj transdoni ĝin.

„Nu do, donu ĝin al mi“, respondis Cecilio. Per unu movo li detiris la sakĉifonon, kiun li surhavis kiel pantalonon, kaj vestis sin per la eleganta pantalono de la diviziestro. Poste ekstarante kaj karese tuŝante la pantalonon, por vidi, ĉu ĝi taŭgas, li diris: „Jen tie malsupre mankas ja parto, kie ĝi estas?“

La *muchachos* ridis. Unu el ili vokis: „Jen tia pantalono, kian portas tiaj putinfiloj nomataj generaloj. Ĉu vi tie malsupre ne vidas la butonojn? Ili estas por tio, ke tiuj *caballeros* malsupre povas fermi la pantalonojn.“

Kaj alia diris: „Tio estas tre necesa por tiaj oficiroj, sciu, Cecilio, por ke ili malsupre povu fermbutoni siajn pantalonojn. Tiukaze oni ne vidas, se la merdosupo elfluas malsupren, ke ili pro timo plenigis siajn pantalonojn. Tio ĉiam tiel iras, kiam oni sendas ilin al ni, al la ribeluloj, se ni havas karabenojn kaj mitralojn. Nur se ni havas nenion en la manoj krom maĉetoj aŭ eĉ nur bastonojn, jen ili kuraĝas kiel malsataj leonoj.“

La diviziestro ne sciis, kion li faru mem. Ĉio, kion oni parolis tie kaj mokis kaj ridis, okazis je ties kostoj. Tiom malinda, tiel nudigita de sia moŝteco kaj tiom malgrava li ŝajnis al si mem, ke li eĉ ne plu kapablis kompati sin mem. Se li havus sian *Automatic* ĉemane, li tuj finus sian vivon. Kiam li pensis tion, li ekhavis la ideon, ke li ne mortpafu sin mem, sed ĝis la lasta kartoĉo pafu al la *muchachos* kaj bone atentu, ke Generalo ricevu la unuan bone celitan pafon. Dum la migrado de siaj pensoj tien kaj ĉi tien li ekimagis alian elirvojon, kiun li eble povus provi sukcese: eksalti kaj simple ekkuri. Eble ja sukcesus, ke unu el la *muchachos* knale postsendus kuglojn al li kaj surterigus lin tiel, ke li verŝajne ne plu devos elteni humiligajn tiajn, kiajn li jam trasuferis, ĉar tiukaze ili subite finiĝus. Li jam leviĝis genue kaj apogis ambaŭ manojn surtere por bone eksalti. Sed tiumomene li rimarkis, ke li surhavas nur la duonlongajn kalsonojn kaj neniujn botojn, sed nur truigitajn ŝtrumpojn sur la piedoj. Surŝtrumpe li nur malbone povus kuri sur tiu tero kaj firmteni per unu mano la kalsonon, por ke ĝi ne tute

malsuprenlitu de li. Imagante tion, li konsciiĝis, ke subtiaj cirkonstancoj li treege ridindigus sin, ke kontraŭ tio la ĝistiamaj hontigoj de lia persono ankoraŭ ŝajnis kvazaŭ toleremaj, des pli, ĉar li ne iniciatis tiun hontigon kaj ankaŭ ne povis malhelpi ĝin. Sed per sia propra forkurprovo li ja mem malhontigus kaj senhonorigus sin. Tial li restis sidanta kaj atendis sian mortverdikton, kiu, kiel li sciis, ankoraŭ en la sama horo estos decidita.



Revenis la *muchachos*, kiuj forkondukis la leŭtenanton kaj raportis: „Generalo, li pendas.“

„En ordo“, respondis Generalo, „kiam li sufiĉe longe estos pendumita, vi reiru tien kaj alportu la lazon al ni. Ni bezonas ĝin ĉi tie por nia najbaro, por la *General de Divison*. Ni ne povas permesi al ni preni por ĉiu nova ofiĉiro novan ŝnuregon. Tiom riĉaj ni ne estas, kaj la tempon mortbati lin per ŝtonoj ni ankaŭ ne havas. Kion pensas vi, diviziestro?“

„Vi ja certe povos cedi al mi ankaŭ la etan peceton da honoro mortpafi min. Pli ol unu kuglon vi ne devos disipi pro mi.“ La diviziestro provis kolekti fortojn por ridado, sed la rido flankeniĝis kaj restis firmgluita en sulko, kiu etendiĝis de la maldekstra buŝangulo ĝis la angulfino de la suba makzelo.

La *muchacho*, kiu ricevis la pantalonon de la diviziestro, ĵetis sian truigitan kaj disŝiritan pantalonon transen, rekte antaŭ la piedojn de la diviziestro.

„Tiujn mi ja nun rajtas surmeti, ĉu?“ demandis la diviziestro.

„Kompreneble“, diris Celso. „Ni estas tre ĝentilaj. Ni lasas neniun, eĉ ne divizian generalon, ĉiam kaj eterne kuradi en ties kota subkalsono. Kion pensu niaj inoj pri tio? Oni eble eĉ povus supozi, ke ni estas fie morala grego de sovaĝaj indianoj.“

Li turniĝis kaj vokis transen al grupo: „Kiu el vi havas superfluan malnovan ĉemizon por nia gasto? Vi ricevis hodiaŭ sufiĉe da novaj ĉemizoj, kiujn la *uniformados* alportis pro pura amo al ni kaj por nia granda ĝojo. Ek, ĵetu ĉemizon ĉi tien, eĉ se nur estus viŝĉifono! Ni fordonas volonte ion al la povruloj kaj nuduloj el tio, kion ni povas malhavi.“

Flava truigita lana ĉemizo, kiu pro ŝvito fetoris kiel pesttubero, alflugis de ie. Celso kaptis ĝin.

„Do, jen via ĉemizeto, diviziestro“, diris Celso, la ĉemizaĉon ĵetante al li. „Vi ja ne pensu, ke ni ne scias, kiel traktendas gastoj, kiuj venas al ni. Eĉ, se estas gastoj,

kiujn ni ne invitis.“

Denove li laŭte vokis: „Ĉu iu havas paron da trivitaj *huaraches*, kiun li ne plu bezonas? Ek, ĵetu ĝin ĉi tien.“

Paro da malnovaj sandaloj flugis rapide tra la aero. Ĝi falis antaŭ la diviziestron, kiu penis tiregi la disŝiritan ĉemizon sur sian grasan korpon.

*Muchacho* per piedo ŝovis la sandalojn pli proksime al la diviziestro. „Jen la rajdobotoj por vi, diviziestro, por ke vi ne tretu dornojn en viajn delikatajn piedetojn“, li diris, donante al sia voĉo kareseman tonon. Sed tuj poste li ŝanĝis la softan tonon kaj diris krude kaj preskaŭ kriante: „Pro ni neniŭ kiam ajn afliktiĝis pri tio, ĉu ni tretis dornojn pieden ĉu sur venenajn skorpiojn, aŭ ĉu ni vundis ĝissange niajn piedojn per pintaj ŝtonoj. Sed ni ne estas tiel senhontaj, kiel vi supozas, diviziestro. Ni estas treege honestaj homoj. Ni scias, kia sento estas, se oni kurante puŝas dornojn tricolajn tra niajn piedojn, tiel, ke la pinto ekvideblas surpiede.“

„Nun ni foje rigardu la kampadejon, kion faras la *muchachos*, kaj kion ili havas en siaj pelvoj kaj patoj por la vespermanĝo“, diris Generalo, dum li ekstaris. Ĉiuj *muchachos* apartenantaj al la stabo sekvis lin.

Kiam ili estis irintaj kelkajn paŝojn, Generalo turniĝis kaj vokis malantaŭen: „He, diviziestro, vi iru kompreneble kun ni. Ek, ek, aŭ ni helpos surpiedigi vin.“

La diviziestro ekiris, sufiĉe malvoleme, ĉar li devis obei al tiu pedikohava kotulo; ĉar tiukaze, se li ne estus obeinta, oni certe traktus lin per pugnoj. Kaj tion li tamen volis eviti.

La grupo promenis leĝere al la kampadejo.

„Vi havas ĉi tie bonegan kampadejon“, diris Generalo preterire.

„Tio estas prava“, konfirmis la diviziestro kaj ekbruligis cigaredon. „Tiu kampadejo lerte okupita kaj gardata kontraŭ la prerioj per kelkaj naturaj sulkaj tranĉejoj, ne

estas facile okupebla de trupo, kiu ne konas la terenon kaj ne scias, kiel ĝi estas gardata kaj fortikaĵigita. Mi povus defendi la kampadejon kun du batalionoj kontraŭ tuta divizio, dum monatoj, tion mi ja rajtas diri.“

„Tio ĝojas min, ke konfirmas ĝuste vi tion al mi, diviziestro.“ Generalo kapjesis, evidente kontentigite. „Mi elserĉis tiun kampadejon mem kaj asignis ĝin kiel kampadejon, ĉar ni bezonas dum sufiĉe longa tempo trankvilon. Ni estas elĉerpitaj, senfortaj, kaj ni devas ŝpari ankaŭ municion; tiel grase ni ja ne estas ekipitaj. Mi povas ja trankvile rakonti tion al vi, ĉar vi ne povos uzi tion, proksimume post horo ni fine devos forŝovi vin en la transmondon. Kiel ajn forte ni bedaŭros perdi tian noblan gaston, kia estas vi, kaj aldone eĉ tiel rapide.“

Ili iris plu, laŭ tiu kaj tiu direkto. Generalo montris al la diviziestro mitraloneston, kaj rimarkigis, ke la municio vere ne abundas. Ŝajne, ĉar la grandaj stokejoj kun municio kaj kun superfluaĵoj armiloj estis bone kaŝitaj.

„Ĉu vi havas kanonojn en Balun Canan, diviziestro?“ demandis Generalo, sen eĉ rigardi al li.

„Ses ni havas. Malpezajn. Sepdekvinkalibrajn. Kaj tion mi devas diri al vi, se ni estus havintaj nur tri da ili hodiaŭ ĉi tie, jen postrestus eĉ ne stumpo de vi.“

„Eble. Kiu povus scii? Tiaj aferoj okazas ĉeokaze. Mi esperas en tia kazo, ke via brigadisto aŭ unu el viaj koloneloj, se li venos la venontan fojon por fine draste tradraŝi niajn postaĵojn, kunportos ne nur tri, sed ĉiujn ses kanonojn, alikaze mi devus noti tion kiel grandan fiaĵon de li. Tion vi povas skribi al li, se vi volas. Mi donos al vi peceton da papero. Ni vere povus uzi la kampkanonojn, ankaŭ kelkajn kanonistojn aldone, kiuj montru al ni, kiel oni devas trakti tiajn aĵojn. Mi estas certa, ke estas malpezaj kanonoj, kiujn oni povas dismunti kaj ŝarĝi sur mulojn.“

„Certe tio eblas“, respondis la diviziestro. „Sed pri tio plej malmulte okupiĝu, *muchacho*, ĉu ili ŝarĝeblas ĉu ne. Se mi ĉi tie ne estus tia mizera kaptito, mi promesus al vi je mia ĵurvorto, ke vi certe ekvidus la kampkanonojn, sed kompreneble nur la buŝojn.“

„Certe mi komprenas tion“, diris ridante Generalo.  
„Domaĝe, ke ni ne plu povos ŝanĝi tion. Vi vidis tro multe ĉi tie. Vi nun bone konas la kampadejon. Kompreneble, mi ja ree povus meti ĝin al alia loko. Aŭ mi iros renkonte al vi sur alia vojo. Vere, dum mi pensas pri tio, diviziestro, mi preskaŭ ne povas plu deteni min lasi foriri vin libera. Ne, ne, ne objētu ion. Estas efektive tiel, mi volonte volus fari vin donaco al la gloriĉa armeo de *El Caudillo*. Kvazaŭ kiel speco de kontraŭdonaco, sciu tion, por la multaj belaj karabenoj, revolveroj, kaj mitraloj kun ĉiuj aldonaĵoj, kiujn vi sendis al mi tiel afable. Mi pensas vere tute serioze pri tio lasi forkuri vin, tia, kia vi estas nun. Kaj se estus nur tial, por ke vi kunprenu dum la venonta fojo ĉiujn viajn kanonojn kaj tiam fine faru finon al ni. Inter ni dirite, diviziestro, ni satas jam pri la tuta afero, ĝisgorĝe. Ĉiuj *muchachos* volas iri hejmen. Ankaŭ mi volus iri hejmen. Do, se vi tiam kunportus la kampkanonojn, tiukaze tio ne longe daŭrus ĝis ni havus bonan kialon por forkuri. La municio estas rara, kiel vi vidis mem, tro rara por ke ni ankoraŭ longe povus elteni.“

La diviziestro kapjesis kelkfoje. Sed estis videble, ke li

aŭdis nur malatente. Pripensante li ellaboris planon. Sed la plano konfuziĝis en lia kapo, ĉar li havis du planojn, kaj li daŭre eraris pri tio, kiu estas kiu. Foje li pensis pri tio, ĉu ne tamen ankoraŭ iel eblus fuĝi. Dum aliaj momentoj, la soldato, kiu li estis, lin ne lasis trankviliĝi. Li ellaboris atakoplanojn kaj surprizajn superruzajn manovrojn pri la maniero, kiel li superfortos la kampadejon, sub la antaŭkondiĉo, ke oni ofertos al li la okazon reatingi sian ĉefkomandejon.

Fine liaj tien kaj tien flugantaj pensoj bruske estis interrompitaj per tio, ke Generalo subite diris tute koncize: „*Muchachos*, rekonduku lin al la staba bivakfajro.“



Generalo vokigis la tri virojn, kiuj pendumis la leŭtenanton.

Ili venis al la granda fajro.

Generalo tiris ilin flanken kaj interparolis longe kun ili. El la gestoj de la *muchachos* ekkoneblis, ke Generalo per demandoj kaj respondoj certigis, ke la aliaj komprenas ĉion tute ĝuste.

Ili fine foriĝis kaj post certa tempo revenis al la staba fajro. Unu el ili portis nun maldekstre transŝultre lazon, kiu estis malpurigita de seka ŝlimo.

Ili staradis certan tempon por atendi pluajn ordonojn.

Ekvidante ilin, Generalo turniĝis al sia honorata gasto kaj diris: „Kiel mi vidas je mia granda bedaŭro, diviziestro, vi pretas nun forlasi nin, por sekvi vian leŭtenanton, kiu jam grandan distancon antaŭas al vi. Pro certaj rilatoj estas domaĝe, ke ni ne pli longe povos okupiĝi pri vi. Sed komprenu, frateto, je longa daŭro ĝi iam ekenuas kune

ludadi. Ni estus devintaj pikigi vin sur maĉeton jam ĉe la surprizo sur la monteto, de kiu vi gvidis la grandan batalon. Tamen komprenu, okazas tiom malofte, ke vizitas nin vera divizia generalo. Kaj tiel, kiel ni estas kreitaj, ni estas ja tiom avidaj kutimiĝi al aristokrataj kondukmanieroj, kaj tiujn ni povas lerni nur de niaj aristokrataj vizitantoj. Iu el ni eble iutage fariĝos guberniestro, kaj se la angla ambasadoro venos al li, li ja simple ne povos diri al li: „*Ay, que chingue a tu madre, cabron!*“ Ĉu vi ne same pensas, diviziestro?

Li turniĝis kaj vokis: „He, kiu el vi havas la ĉe-koksan botelon de nia gasto? Vi, ĉu? Redonu ĝin al la *caballero*.“

La *muchacho* transdonis ĝin al al diviziestro. Generalo ridis: „Diru dankon, diviziestro. Vi bezonos ĉiun guton de tiu botelo dum la sekvaj tridek minutoj.“

„Por tio mi ja vere devas danki. Do, *gracias!*“

„*No hay porque*. Ne necesas danki, mi volonte faris.“ La diviziestro engorĝigis sukan gluton kaj malaperigis la botelon en poŝo de la disŝirita lana pantalono, kiun li

surhavis. La pantalono estis tro malvasta por li; tiel, ke ĝi je la gamboj komencis krevi. Sur la ventro ĝi larĝiĝis kelkajn colojn, kaj estis plu kuntenata nur per ŝnuro, kiun la diviziestro firmligis ĉirkaŭ ĝin.

„Ĉu vi havas cigaredojn por la vojo, diviziestro? Niaj gastoj ne disvastigu pri ni, ke ni sendis ilin en la sekan dezerton sen malgrandaj donacoj de amikeco.

Kompreneble, tion, kion fumus ni, diviziestro, certe ne bonfartigos vian stomakon.“

Li ree turniĝis kaj vokis: „He, *muchachos*, kiu havas la oran cigaredingon de nia kara diviziestro?“

La *muchachos* rigardis sin reciproke. Poste vokis unu el ili: „Jen ĝi, Generalo. Jen en la poŝo de la jakto, kiun mi surhavas. Mi nur nun palpis, kio ĝi estas. Kaj ĉi tie estas ankaŭ lia eleganta fajrilo. Malbenite! Tio estas efektive eleganta. Sed mi ne povas eligi sparkon.“

Generalo malfermis la cigaredingon, nombris la cigaredojn kaj transdonante la ingon, diris al la diviziestro: „Ili tute sufiĉas por vi, diviziestro, por la sekva

horo. Pli poste al via pulmo mankos la movolibero por bezoni pliajn.“

„*Gracias!*“ diris la diviziestro denove, reprenante la cigaredingon.

Generalo nur kapjesis kaj rikanis: „Tio estas ja nun certe ĉio, kio farendis, diviziestro. Ni tre dankas pro via vizito. *Adios, adiosito, divisionario*, estis ĝojo por mi, al vi konatiĝi. *Adios. Vaya bien!*“

La tri *muchachos*, kiuj havis la taskon akompani la diviziestron, proksimiĝis al la diviziestro.

La diviziestro iris kelkajn paŝojn antaŭen. Tiam li haltis, turniĝis kaj vokis: „Sed vi estas tamen pedikohava kota hundido de stinkanta indianino, naskita en ŝlimo. Mi ja fine al vi ankoraŭ volis diri tion, kion mi pensas pri vi, antaŭ ol mi estos sendita transen.“

„Kaj tion li nomas aristokrata ĝentileco“, postvokis Generalo kun altvoĉa ridado al li. „Ni nutris lin, ni vestis lin, ni promeniĝis lin por lia digesto, ni donacis belegan kristalbotelon kun la plej fajna konjako al li, ni donacis al

li pezan oran cigaredingon por la vojo, kaj nun li krias fian impertinentaĵon al ni vizaĝen, kiel adiaŭon. Jen la ĝentileco de diviziaj generaloj. Li eĉ ne dankis por la tortiljoj kaj *frijoles*, kiujn ni donis al li, por savi lin de plorinda malsatmorto. Sed tiel ĝi iras en la mondo, kaj ni devas estas kontentaj pri tio, kion ni havas.“

Ĉion ĉi vokis Generalo kun laŭta ridado. Sed tiam li ŝanĝis la tonon kaj postkriis al la viroj forkondukantaj la diviziestron: „Donu al la olda merdulo kvin minutojn, por ke li povu preĝi kaj glatigi siajn finkalkulojn. Forkonduku lin sufiĉe malproksimen, por ke li ne fetorigu fie la kampadejon. Morgaŭ ni scios, kiu stinkas pli, ĉu diviziestro ĉu indiĝena ribelulo. Do marŝu sufiĉe eksteren, ses kilometrojn almenaŭ, ĉu komprenite, *muchachos?!*“

„*Seguro*, Generalo, certe“, vokis la uloj malantaŭen kaj puŝis la diviziestron en la dorson, por ke li moviĝu pli rapide.

Kiam la *muchachos* kun la diviziestro survoje eksteris sufiĉe for de la kampadejo, ili haltis.

Unu el ili diris: „Ni ja ĉiuj ne devas hasti, ĉu ne diviziestro? Kial ne sidiĝi ĉi tie kaj ne fumi cigaredon?“

„Ĉu vi volas gustumi cigaredon el miaj? Ili estas el Egiptio.“

„Povas esti. Eble ili estas bonaj. Sed ni fumas la proprajn kun pli granda plezuro. *Gracias.*“

La diviziestro eltiris sian ĉeflankan botelon kaj glutetis. Poste li frotis sian dikfingron frapsone sur la botelo kaj etendis la botelon al la *muchacho*, kiu sidis plej proksime apud li. „Prenu gluton, *muchacho*“, li diris konfideme. „Ankaŭ viaj *companeros* prenu gluton. Restos al mi ankoraŭ sufiĉe en la botelo.“

„Mi prefere akceptos neniun, *señor general*, ĉar tiukaze, se mia *jefe* flaros mian buŝon kaj rimarkos ke mi fetoras laŭ *aguardiente*, li batos per pugno sur mian grimacon,

ĉu ne estas tiel, *companeros*?”

„Eĉ multe pli terure“, respondis unu el ambaŭ, „li glate pafos pecojn da plumbo en niajn stomakojn, se ni fetoros laŭ *aguardiente*.“

La diviziestro tuj perceptis la alparolon „*señor general*“ ĉar li ne plu aŭdis ĝin ekde sia kaptiĝo. Ĝi bonfartigis lin, tiel kiel bonfartigas punkaptiton la sciigo, ke li estas enliberigota, ĉar finfine montriĝis, ke li sen kulpo estis punverdiktita kaj nun ricevos publikan honordeklaron.

„Via *jefe* certe estas tre severa tirano, kiu ne permesas al *muchacho* eĉ la plej etan ĝojon“, diris la diviziestro.

„Tio li kompreneble estas. Sed kion ni faru kontraŭ tio? Li havas la potencon pri ni.“

„Kaj cetere, kion vi povos atendi, *muchachos*? Li kaj Profeso ĉiutage hurlas al vi centfoje pri '*Tierra y libertad*'. Sed, se ĉiu tero estos detruita, kie vi do povos havi teron?“

„Tio estas ĝusta, *señor general*. Pri tio ni ne pensis.“

„Kaj mi povas diris al vi ankoraŭ eĉ alion, *muchachos*. Momente vi ja havas avantaĝon. Sed tio ne daŭros longe ĝis tutaj brigadoj, eĉ tuj kun tricent mitraloj kaj kvincent kanonoj, estos senditaj kontraŭ vi, tiam postrestos eĉ ne hartufo de vi. Kion vi faros tiam kun via *tierra y libertad*, se vi ĉiuj estos mortaj?“

„Jes ja, kion ni faros tiam, *companeros*?“ demandis unu el la akompanantoj. „La *señor general* pravas. Sed kion fari?“

„Ĉiu el via triopo estas sana kaj forta ulo“, opiniis nun la diviziestro. „Mi ja bone povus uzi vin kiel soldatojn, kun plena militsalajro. Tio estas amaso da mono. Kaj se vi tiam estos servintaj tri aŭ kvin jarojn, vi havos tiom da mono, ke vi facile povos aĉeti al vi iun ranĉon, kiu plaĉos al vi. Tie vi povos vivi en paco kaj kultivi viajn agroj, kaj ĉion, kion vi vendos, apartenos al vi, kaj neniu povos forpreni ĝin de vi.“

„*Señor general* vere pravas, *compañeros*, ĉu? Tute tiel, kiel li diras, statas la afero. Sed kion ni faru do?“



„Mi diros al vi la sekvan, *muchachos*. Nu, kiel vi nomiĝas? Tiel. Bone. La nomojn mi memortenos. Kaj nun bone aŭskultu. Kial vi pendumu min ĉi tie? Tio estus murdo. Kaj estus granda peko. Pri tio vi povas demandi ĉiun *cura*. Kaj pro tio vi ne alvenos en la ĉielon, sed en la inferon. Ja kial vi ĉiuj volas iri inferen, se la ĉielo malfermas al vi? Mi estas olda viro kaj ne longe vivos plu, tion vi povas vidi. Mi diros al vi la sekvan. Vi konduku min al la sekva ranĉeto, kie mi povos pruntepreni ĉevalon kaj rerajdi kaj pasigi en paco la restaĵon de mia vivo. Poste vi reiru al via kampadejo kaj rakontu al via *jefe*, ke mi estas bone pendumita, kaj ke mia lango elpendas duonon de metro el mia buŝo. Vi devos reiri en la kampadejon, ĉar alikaze ekestos suspekto kaj via *jefe* postsendos kelkajn *muchachos* sur ĉevaloj al mi. Alikaze mi tuj povus kunpreni vin, kaj tuj morgaŭ vi povus esti soldatoj.“

La *muchachos* aŭskultis lin tre atenteme.

„Sed estos pli bone, se vi reiros kaj diros, ke mi estas pendumita. Tiukaze via *jefe* postsendos neniun al mi. Tiam, morgaŭ aŭ postmorgaŭ vi povos forŝteliĝi kaj veni

al nia ĉefkampadejo. Kaj tie mi donos al ĉiu el vi cent pesojn.“

„Cent pesojn, *señor general*, ĉu vere?“ demandis la *muchachos* malfideme.

„Por ĉiu el vi cent arĝentajn pesojn. Kaj se vi volos, vi povos fariĝi soldatoj eĉ krome. Sed se vi ne volas fariĝi soldatoj, tiukaze ĉiu el vi prenu siajn cent pesojn kaj iru hejmen al sia vilaĝo. Mi eĉ skribos al vi leteron por via komunumo, ke vi estas bonaj homoj, kaj ke oni ne rajtas meti iun el vi en prizanon, ĉar vi ribelis. Ĉar ĉiuj aliaj ribeluloj estas mortpafendaj. Sed ne vi.“

„Kion vi diras pri tio?“ ili demandis sin reciproke. Kaj ĉiu respondis, ke li konsentas.

Sed la plej ruza el la triopo diris: „*Señor general*, sed estas pli bone, se vi tuj nun donos paperon al ni, por ke ni ricevu la cent pesojne efektive.“

„Kompreneble, kompreneble“, respondis la diviziestro, „tio estas tute ĝusta, ke mi skribu al vi notfolieton. Sed mi ne havas paperon. Ankaŭ ne krajonon. Ĉio ĉi restis en

mia jako kaj en mia pantalono. Mi povis savi nur miajn cigaredojn kaj la botelon. Ĉu vi ne fidas al generalo, *muchachos*?“

„Multaj homoj, ĉu generaloj ĉu ne generaloj nin tiom ofte trompis“, diris unu el ili, „ke ni fidas al neniu plu. Sed ĉiĉfoje ni pretas fari tion, *señor general*.“

„Vi ne seniluziiĝos, *muchachos*.“ La diviziestro leviĝis kaj aldonis: „Tiukaze ni ekiru, por ke ne fariĝu tro malfrue. Fariĝis ja jam nokto.“

„Ne afliktiĝu, *señor general*, ni konas la vojon ankaŭ en la nokto. Ni gardis ĉi tie en la eksteraj postenoj.“

Ili marŝis proksimume duonhoron. La pado estis aĉa, jen ŝtoneca jen marĉa jen dense prikreskata de arbustaĵoj.

Luno lante leviĝis, fariĝis videbla, ekprilumis la vojon kaj perdiĝis inter disŝiritaj nigraj nuboj, tiam denove montriĝadis kaj post kelkaj minutoj denove malaperadis. La diviziestro ĝemis. Lia paŝado fariĝis peza kaj laca. De la tria matene li estis surpiede. Kion li trasuferis je la ŝajne senfina tago, se oni eĉ ne pensas pri ties perdita batalo, rabe forprenus eĉ de juna viro fine de tia tago ĉiun forton el la piedoj.

La vojo malfermiĝis nun al senarbejo.

La diviziestro ekvidis grandan ŝtonon, iris renkonte al ĝi kaj peze spirante sidiĝis sur ĝin kaj diris: „*Muchachos*, mi supozas, ke mi ne povos iri plu. Mi devos pasigi la nokton ĉi tie.“

„Jen nia *jefe* tuj matene forkundukos vin de ĉi tie, *señor general*“, diris unu el la viroj.

„Certe, tute certe; kion mi faru?“ Li viŝadis per unu el la malpuraj manikoj de sia disŝirita surkorpa ĉemizo sian vizaĝon kaj la frunton.

Li ekbruligis novan cigaredon.

Duono de Luno denove videblis dum kelkaj minutoj.

La diviziestro, diligente fumante sian cigaredon, ĉirkaŭrigardis, jen al tiu certa direkto jen al tiu ĉi. Kien ajn li rigardis, li vidis la nigrajn vandojn de la vepro. Nur la senarbejo estis malfermita kaj klara, kun helaj herbotufoj kaj kun malhelaj makuloj kaŭzitaj de la ombroj de tiuj balailsimilaj herbotufoj.

Malproksime, en la direkto, en kiu troviĝas Balun Canan, la kampadeja loĝloko de lia divizio, flagre flirtadis de tempo al tempo la flugiloj de vetera lumado tra la nigra nokta ĉielo.

„La ĉefkomandejo de la divizio“, pensis la diviziestro.

„Kiel bone kaj mole estus tie ĝuste nun. Sidadi en la kazino kun kesto da bongustaj bierboteloj apud si, ludante domenon kun majoro Fernandez kaj kapitano

Munguia. *Capitan* Munguia, damne, kiel soldato li valoras eĉ ne tiom, kiom hundofekaĵo, kaj kiel *caballero* malpli ol sakĉifono. Sed en kazo de bezono oni povas voki lin por domenludo. Li venas ĉiam. Tiu piedlekulo.“

La diviziestro suĉis kun profunda enspiro la cigaredon. Eklumante ĝi ardetis blanke.

„*Dios mio*, sankta Dio en la ĉielo!“ li vokis kun laŭta tono kaj leviĝis rapide de la ŝtono, sur kiu li sidis. Li forĵetis la cigaredon.

„Sankta Dipatrino Maria, *Madre Santisima*, pri tio mi ne pensis. Sakre, pri tio mi tute ne pensis.“ Li diris tion laŭte, lia voĉo estis plena de neimageble akra teruriĝo.

Sen intenci tion, li lasis refali sin sur la ŝtonon. Lia okulpardo ekmigris, kvazaŭ tuŝante la nigrajn vandojn de la vepro, dekstren kaj maldekstren, maldekstren kaj dekstren, ade kaj samritme, kvazaŭ moviĝus lia kapo per si mem. Ĉe tio li levis kaj mallevis sian supran korpoparton.

Subite li haltis, ne plu moviĝis keĵ elpuŝis mallongan

krudan ridon.

„Do, jen tio, kion li intencas fie fari al mi. Do tio. Mi neniam supozis, neniel ajn, ke li vere kapablas elpensi tian malicon. *Gracias, o Dios mio*, dankon al vi, ho, Dio, ke mi ĝustatempe pripensis tion.“

Kvazaŭ malŝarĝite de granda ŝarĝo, li faciligite elspiris. Li prenis novan cigaredon kaj blovis kelkajn nubetojn de la fumo for de si.

La *muchachos* montris per neniu vorto kaj per neniu gesto, ke ili eĉ nur iomete afliktiĝas pri tio, ĉu la diviziestro ekhavas atakojn kramfajn aŭ ĉu li evidentigas nerezisteblan urĝon saltadi sur tiu senarbejo kiel faŭno.

Kvazaŭ li tute forgesis la *muchachos*, kiuj sternis sin sur la preria tero, sen tro malproksimiĝi de li, la diviziestro parolis tiel laŭte al si mem, kvazaŭ li parolus antaŭ kolektiĝintaj oficistoj, por klarigi al ili certan situacion. Dum li parolis, li fumis laŭkutime la cigaredon.

„Kion, ĉe la diablo, mi povus diri, se mi alvenus en la ĉefkomandejon? Jen ili ĉiuj ĉirkaŭstarus kaj gapus min.“

Mi alvenus sola, tute sola mi revenus, sen damaĝo kaj sana, eĉ sen grataĵo sur la vizaĝo. Eĉ ne kilogramon pli malpeza mi estus. Kaj mi alvenus kamufлита kiel senhejmulo kaj kiel pedikohava monteria indiano. Sen bataliono mi revenus. Neniu oficiro revenos. Neniu serĝento. Ili ĉiuj mortas. Revenos nur dudek sangantaj rajdistoj, kaj kelkaj lamiruloj alvenos sur senseligitaj muloj. Sed mi, la *General de Division*, revenus sen bataliono, sen armiloj, en ĉifonoj, sen grato survizaĝe, sana kaj vigla kiel el manovreto. Tion li elserĉis por mi. Tial li forsendis min kun tiuj viroj, kiujn li komisiis, ke ili akceptu subaĉeton fare de mi. Tiujn subaĉeti, ĉu? Tiujn, kiuj pendumis la leŭtenanton Bailleres kaj kiuj scias, ke mi scias kaj vidis tion. Tiuj estu subaĉetebaj, ĉu?“

Li turnis sin al la *muchachos*. „He, vi, ĉu vi bonvolos diri certan aferon al mi, se mi permesos al vi, ke mi ne plu vivos post duono de horo?“

„Eble, *señor general*“, diri unu el ili sen ekstari.

„Mi vidis, ke via *jefe* dum sufiĉe longa tempo parolis kun vi, antaŭ ol li forsendis vin.“



„Tion faris nia *jefe*.“

„Li diris al vi, ke vi lasu libere foriri min, ĉu li diris tion?“

„Tio estas nia ordono. Kaj vi, *señor general*, faru tion, kio plaĉas al vi. Ĉu vi estas morta post duono de horo aŭ ne, tio ne afliktas nin. Ni diros al nia *jefe*, ke ni volonte estus raportintaj al vi, kian ordonon ni havis. Li diris eĉ al ni, ke ni rakontu tion al vi, antaŭ ol ni forlasu vin.“

La diviziestro komencis cerbumi. Aŭtomate li ekbruligis novan cigaredon. Poste li faris grandan gluton el sia kristalbotelo.

„Ju pli proksima iu estas je la fino, des pli bone tiu komprenas la mondon kaj la homojn, kaj li ekrigardas la esencon de ĉio, kio okazas. Kiu tion iam diris? Ie mi legis tion. Li do volas, ke mi venos nevundita kaj sana al la ĉefkomandejo. Kaj tie mi do rakontu strangan historion pri tio, kiel mi liberigis min el mia kaptiteco. 'Kaj jen vi staras do, *caballeros*, kaj rigardas min malfideme. Ĉu vi eble pensas, ke mi mensogas, mi, divizia generalo, ĉu? Kial vi tiel rigardas min, *coronel* Arizmendi? Ĉar mi

staras sola antaŭ vi, ĉu? Ĉar neniu alia oficiro povis fuĝi, nur mi, ĉu? Ĉar nur manpleno de sangantaj konfuzitaj kaj preskaŭ freneziĝintaj uloj povis fuĝi, krome neniu, kaj ĉar tamen mi, la divizia generalo, staras nevundita kaj sana antaŭ vi, ĉu? Kompreneble, la uniformon, la monon, la horloĝon, ringojn ka la revolveron mi devis postlasi. Mi devis vesti min kiel ĉifonula indiano por veni senvundita kaj sana ĉi tien, kaj por esti en sekureco. Aŭskultu, majoro Maldonado, damne, kion vi arogas? Atentu! Kial vi kunpinĉas okulon? Ĉu vi ne plu povas rigardi rekte al la vizaĝo de via diviziestro? Kion? Nu, kion vi krimis, ke vi rigardas min kun kunpinĉita okulo kaj kun oblikve torditaj lipoj, kvazaŭ vi volus rikani? Atentu, sinjoroj miaj! Vi ja eble eĉ ne supozas – ja, *caballeros*, kio tio estu? Ĉu vi imagas efektive, ke mi donis al tiuj indianaj kotporkuloj mian monon, mian uniformon kaj mian revolveron por elaĉeti min por liberigi min? Mi, la *General de Division*, Petronio Bringas? Mi? *Gracias, caballeros*. Almenaŭ tion mi nomas honesteco. Dankon, sinjoroj miaj. Vi esprimis mian verdikton. Tiukaze mi ne havos alian eblon. *Adiós, caballeros! Adiós, camaradas y amigos!*“

La diviziestro ekteruriĝis. Li leviĝis kaj vokis kriĉante kontraŭ la nigraj vandoj de la vepro, pli kaj pli akresone: „*Adiós! Adiós, Caballeros! Adiós! Adiós!*“ Li kriis ĝin certe proksimume centfoje. Jen lia voĉo fariĝis raŭka kaj li ne plu kapablis malfermi la buŝon.

Li kaptis sian gorĝon, kvazaŭ li volus devigi ĝin obei.

Nun li falis en glugladon kaj mallaŭtan ridadon. Tiam li rekonsciiĝis, lasis denove fali sin sur la ŝtonon kaj spiris profunde kun malfermita buŝo.

Li palpis por nova cigaredo.

La *muchachos* ankoraŭ kuŝis surtere en lia proksimo.

Unu el ili transdonis fajrilon al li.

Redonante ĝin, li alridis la viron. „Mi estas ebria, *muchachos*, ebria, ebria, jen tio, kio mi estas. Ho, tiel terure ebria.“ Li prenis la botelon, metis ĝin al siaj lipoj kaj engorĝigis tiom de ĝi, ke postrestis ĝuste nur gluteto en la botelo.

Li tenis la botelon alte en la lunlumo. Rimarkante la

lastan gluteton, li forigis la oran ŝtopilon denove kaj movis la botelon, ankoraŭ nun tenante ĝin per la lipoj, tien kaj tien, kvazaŭ li volus elleki eĉ la tute lastan guteton.

„Jen transe, en tiu angulo, *muchachos*, ĉu vi vidas tie la belan arbon? Ĝi estas belega arbo. De ĉi tie rigardate ĝi estas ŝajne cedro. Ĉu cedro ĉu mahagono ĉu ebonarbo, tio estas tute indiferenta. Unu estas tiel bona kiel la aliaj. Donu al mi la ŝnuregon, *muchacho*, kiun vi tie havas sur ŝultro.“

Li kontrolis la ŝnuregon permane. „Diable dura kaj gratiga estas tiu fatrasaĵo. Mizera ŝnurego, sed firma, ankaŭ nodon kaj maŝon ĝi jam havas. Des pli bone. Mi mem ja neniel povas fari bonajn nodojn de tia speco, kiuj tiel bele kaj glate lasas ŝovi sin tien kaj ĉi tien.“

Li ekhezitis, kiam li ŝovis la maŝon kvazaŭ ludante tra la nodo tien kaj ĉi tien. „Tio ja eble ne estas eĉ la sama lazo, kiu gratis hodiaŭ posttagmeze la kolon de mia plej altranga leŭtenanto Bailleres, *muchachos*, ĉu?“

„Jen la sama, diviziestro“, diris unu el la *muchachos* sen montri iun specialan intereson.

„Tiukaze tiu lazo jam ekzerciĝis, ĉu?“ La diviziestro eligis hakecan ridadon.

„Ĝi ekzerciĝis“, diris la *muchacho* tiel seninterese kiel antaŭe.

„*Muchachos*“, diris nun la diviziestro, lastfine forlasante sian ironian tonon kaj serioziĝante: „Mi povas doni al vi nenion. Kion mi portas sur mia korpo estas pedikohavaj kaj kotaj ĉifonaĵoj, kiuj estas tiel disŝiritaj, ke eĉ viaj *compañeros* ne volis havi ilin kaj ilin forĵetis. La kristalbotelon kaj la cigaredingon mi ne povos donaci al vi, ĉar vi ja en ĉiu kazo prenos la aĵojn kaj ne lasos ilin en miaj ĉifonoj. Tio tiel estas ankaŭ en ordo. Ĉio, kion mi povas doni al vi estas seriozeca 'danko', jam antaŭe donita al vi pro tio, pri kio mi dezirus, ke vi faru ĝin. Mi neniam petis indianon pri io. Sed mi petas vin nun, *muchachos*, ke vi bonvolu detranĉi post mia lasta elspiro mian vizaĝon de mia kranio, por ke neniuj, kiu min eble trovos, ekkonu min. Ĉu vi bonvolos fari tion,

*muchachos?*“

„Tion ni povos fari por vi, *señor general*. Tio ne estas speciala peno por ni. Ĝi ne estas io precipa. Tion ni eĉ faris en la monterioj al vivantaj bestaĉoj, kiuj sekve de eraro de Dio ricevis homajn vizaĝojn.“

„*Mil gracias, muchachos*, por tiu eta korservo. Mil dankojn. Diru al via *jefe*, ke li povos reveni morgaŭ ĉi tien kaj leki min je la postaĵo, ankoraŭ antaŭ la matenmanĝo.“

„Ni sciigos tion al li, *señor general*.“

„Bone. Post kvin minutoj, prefere dek minutoj, *muchachos*, venu transen al mi. Tien, al tiu arbo. *Adiós*. Kaj ankoraŭfoje, multan dankon jam antaŭe, *muchachos!*“

„*No hay porque, señor general*, neniu kaŭzo. Vojaĝu feliĉe kaj kontente. Rapidu. Dek minutojn, vi diris. Tiom longe ni ja ankoraŭ pretos atendi.“

La diviziestro estis jam survoje, en la maldekstra mano li tenis la ŝnuregon kaj pendoligis ĝin tien kaj tien.

Li iris iomete ŝanceliĝante. Verŝajne sekve de la ofta gargarado per la enhavo de la kristalbotelo. Tie kaj tie li stumbletis pro dratecaj herbotufoj.

Kiam li atingis la elserĉitan angulon de la malgranda senarbejo, montris sin plenluno klare sur tiu vando de la vepro.

Li krucosignis sin kaj klinis la kapon. Li krucosignis sin denove kaj eltiris per la fadeno, kiun li portis ĉirkaŭ la kolo, nigran ĉifoneton, sur kiu estis kudrita kruco. Li prenis la ĉifoneton per ambaŭ manoj kaj kisis ĝin.

Li krucosignis sin denove.

Nun li kontrolante glitigis la lazon tra siaj manoj. Li rigardis supren en la branĉaron de la arbo, kaj per energi plena svingo li ĵetis la lazon super branĉon, kiu malproksime de la trunko elstaris en la senarbejon.

La *muchachos* palpebrume enue rigardis transen. Unu el ili diris: „Espereble li elserĉis larĝan kaj fortan branĉon, por ke li eble ne eĉ ankoraŭ derompiĝu. Li estas peza kiel olda grasa bovo. Ŝajnas, ke ĝi eltenas lin, la branĉo. Donu al mi la tabakon.“



Estis je kvarona horo poste. La tri *muchachos* intertempe estis irintaj transen al la larĝa arbo.

Unu el ili revenis nun al la senarbejo. Li ekkaŭris kaj komencis froti sian maĉeton je la herbotufoj. Ĉe tio li observis la ĉielon. Nun li vokis: „Tie malantaŭe en Balun Canan ili havas damne pezan fulmotondron. La ventego balaas terure.“

Unu el ambaŭ, kiuj ankoraŭ estis ĉe la arbo, vokis transen: „He, vi, kion vi diras, ĉu ni donacu la lazon al li aŭ ne?“

„Nenion ni donacos“, vokis la *muchacho*, kiu frotadis sian maĉeton ĝis ĝi estis seka, malantaŭen al ambaŭ. „Ĝi estas tro bela kaj tro forta lazo. Ĝi eĉ ne disŝiriĝas, se tia grasa ulo pendas je ĝi. Oni ankoraŭ ofte povos uzi ĝin, la lazon. Cetere, generalo eble levos stinkantan bruon, se ni ne reportos la lazon. Vi ja scias kiel li povas esti ĉeokaze. Li eĉ resendos nin ĉi tien, por ke ni reportu la lazon. Kiel ĝi aspektas, la diabla fulmotondro venos ĉi tien al ni, kaj

tiam mi ne volus fari ankoraŭfoje tiun iron sur tiu  
damnita mizera vojo.“

„Vi pravas, *manito*. Pli bone estas, se ni kunprenos la  
lazon“.

„Damne“, vokis la viro, kiu estis en la senarbejo, reen al la  
arbo, „ne paroladu tiom longe tie. Tiru lin nun fine  
malsupren kaj denodigu lin. Li jam delonge ne plu glutas.  
Rapidu. Mi estas malsata kiel lama kojoto.“

## Ĉapitro 16

01

Kvin semajnoj pasis. Eble estis ankaŭ sep, ok aŭ dek. Neniu penis nombri la tagojn kaj semajnojn. Ke povis esti neniel malpli ol kvin semajnoj, vidis la *muchachos* je la maturstato de la *milpas*, sur kiuj la rikolto rapide kreskis. La kampadejo kun siaj multnombraj *chozas*, *jacales* kaj *ramadas*, kiuj estis konstruitaj dum la lastaj semajnoj, havis la pacan, parte negocean kaj parte revantan aspekton de kutima indiĝena vilaĝo.

Ĉio ĉemanis, kio necesas por fondi komunumon kaj konservi ĝin. Tie estis arbaro, prerio kun bonkvalitaj herboj, fekunda vepra tereno kaj larĝa kaj neniam sekiĝanta rojo kun klara frida akvo. La homoj havis sufiĉe da maizo, fazeolojn kaj akran kapsikon, kaj novaj rikoltaj produktoj maturiĝis. Ili posedis ĉevalojn, mulojn, azenojn, bovinojn, virbovojn, junajn taŭrojn, kaprinojn, ŝafojn kaj eĉ porkojn. Se io mankus, tion devus liveri la bienoj de la regiono, libervole aŭ per subteno de

karabenoj.

Trupetoj de la *muchachos* ĉiam vagadis. Ili rabatakis militajn postenojn kaj patrolojn de la *rurales*. De tempo al tempo okazis bataletoj kun la armitaj bienuloj kaj ties vasaloj, kiuj unuiĝis kiel defendaj grupoj por purigi la regionon de ribeluloj kaj banditoj.

La bienuloj estis konvinkitaj, ke temas nur pri izolitaj etaj gregoj de ribelantaj indiĝenoj, kiuj postrestis post la bataloj kontraŭ la federaciaj trupoj, kaj kiuj nun marodante vagadis. Tiaj gregoj ĉiam ekzistis en la respubliko, eĉ en la jaroj de la plej fereca regado de la diktatoro, kiam neniu kuraĝis eĉ nur pensi pri ribelo.

Evidente la militista ĉefkomandejo de la federacia ŝtato aliĝis al la konvinko de la bienuloj, ke nur tre malgrandaj, kaj nur tri aŭ kvar tiaj distritaj gregoj vagadas en la regiono, kaj ke ne necesas, pro tiuj du dekoj da banditoj, disponigi pli grandajn trupojn de la federaciaj armeoj, ĉar tiel kreskus nur la kostoj. La bienuloj dum kelkaj semajnoj ja mem farus finon al la gregoj, tiel kiel ili faris tion jam dum kvarcent jaroj.

Tiel Generalo, Profesoro, Celso kaj aliaj *muchachos* klarigis la situacion al si, speciale la fakton, ke ili de semajnoj vidis marŝi nek batalionojn nek eĉ *compañias* kontraŭ si mem.

### **Rimarkoj**

*choza* = pajlokabano

*jacal* = simpla kabano

*milpa* = kampeto

*ramada* = tegmentforma kabaneto

„Rigardu foje, kian birdeton mi kaptis“, diris Eladio, akompanante kampadejen inteligente aspektantan ladinon, kiu relative bone estis vestita sed jam dum tagoj ne razita.

La viro kondukis sian ĉevalon per bridilo malantaŭ si. Sekvis lin indiĝena junulo, simile ŝirtirante ĉevalon post si, dum li tenis kun la alia mano ŝnuron, per kiu li posttiris mulon, kiu kiel ŝarĝon havis du pakaĵojn kaj du tre trivitajn kofrojn.

La alkondukita viro rigardis al ĉiuj flankoj, sed ne timeme. Je lia vizaĝo kaj je liaj gestoj legeblis, ke li diris al si, ke ĉio iros ja laŭorde, kaj se ne, tio simple ne ŝanĝeblus.

La alvenintoj estis ĉirkaŭitaj de grego de hurlantaj kaj bojantaj hundoj el la kampadejo tiel, ke estis por ili sufiĉe komplike sekvi Eladion tiel rapide, kiel li paŝis.

Ili venis al malfermita halo kun tegmento, kiu estis parte

el palmoj, parte el prerihomboj kaj konstruita en la mezo de la kampadejo. Tiu grandspaca halo servis kiel urbodomo, kiel interkonsiliĝejo, kazino kaj provizore ankoraŭ eĉ kiel lernejo por infanoj kaj plenkreskuloj.

„Profesoro, jen ŝajne la veraj kantobirdetoj, kiujn mi kondukas al vi“, denove diris Eladio. „Ili venis ne rekte sur la vojo de ni okupata per postenoj. Ili tie preterrajdis. Sed mi pensis, ke ĝi estas bona afero, se vi foje rigardos la duopon. Mi pensas, ke ili volas spionadi ĉi tie.“

„Ne parolu sensencaĵojn, *muchacho*“, diris la ladino ridante. „Mi spionadu? Mi havas aliajn zorgojn. Tion vi povas fidi al mi. Kaj se vi ne fidas tion, tiukaze tio estas same egala al mi. Tia mizera plendinda vivo, tiukaze oni ja vere povas esti elkore ĝoja, se iu ĝin forprenos de ni. Spiono? Mi? Ĉu? Ne tiom ridindigu vin.“

Li ridis denove. Poste li diris: „Mi preferus, se vi donus al mi ion por maĉi kaj trinki tion. De hieraŭ tagmeze mi vidis eĉ ne flanon de bova fekitaĵo, kaj eĉ multe malpli ŝimajn tortilĵon. Kia vivo, *amigos!* Jen vivo damnita. Donu al mi unue ion laŭordan por manĝi, poste vi

trankvile pendumu min, se tio faros plezuron al vi. Nur ne pendumu min kun vaka stomako. Tio estus kruela de vi, kvankam vi aspektas ja ĉiuj tiel pacemaj.“

Profesoro sidis en la halo kun Andreo, ambaŭ okupiĝis pri libro, kiun antaŭ ne longe liveris bieno vizitita de ili.

Ili ĉiuj ekpartoprenis la ridadon de la alkondukita ladino, delektante sin je la salita humuro de la viro.

Estis ankoraŭ aliaj *muchachos* en la halo; ĉar la halo neniam estis senhoma, nek tage nek multe malpli en la nokto, kiam ĝi servis kiel dormohalo por pli ol dudek aŭ ĉeokaze eĉ tridek viroj.

Profesoro vokis la viron, kiu plej proksimis al li, kaj sendis lin al la *madre de campo*, al la kampadeja patrino, por alporti bongustan manĝon por la ladino.

„Tion mi nomas amikeco, *amigos*“, diris la ladino, „nutri malsatulon en dezerto estas pia ago tia, ke la anĝeloj en la ĉielo blovas pro tio la trombonojn, kaj ĝi estu kiel bona ago enskribita al vi ĉe *San Pedro*. Por tio mi zorgos, se mi renkontiĝos kun li kaj ĉe tio foje rigardos la ŝlosilon. Tiu



ŝlosilo ĉiam cerbumigis min, ĉu li do estas granda aŭ malgranda, el fero aŭ el arĝento, ĉu li pendas je ŝnureto aŭ je ora ĉeno ĉirkaŭ la kolo de la sanktulo Petro. Kaj kio koncernas vin, *muchachos*, ĉu vi estas do banditoj aŭ murdobliligistoj aŭ pacemaj kamparanoj, tio ne faras zorgojn al mi, tiom longe, kiom vi donos ion por manĝi al mi.“

„Mi volus nur scii, kio la viro estas, ke li tiom malsatas kaj parolas nur pri manĝo kaj pri nenio alia“, diris Andreo mallaŭte al Profesoro.

En la okuloj de Profesoro eklumis kompreno. Li ridis kaj diris: „Nu, mi scias nun, kio vi estas. Vi ne estas ladino. Vi ne estas komercisto.“

„Certe ne“, diris la viro, „mi ne asertis tion.“

„Vi estas lerneja instruisto . Kaj kio estas eĉ pli terura, vilaĝlerneja instruisto.“

„Viro surtera, tion povis eltrovi nur kolego. Vi pravas. Mi estas *profesor rural ambulante*. Vaganta vilaĝlerneja instruisto. Ĉiun duan monaton mi estas sendata al alia

vilaĝo, ĉar la salajro, kiu estas koncedita en la vilaĝo por la lernejo, sufiĉas ĉiam nur por du monatoj. Kaj la lastajn kvar semajnojn de tiuj du monatoj, la perspektivo estas jam tre trista, kaj mi devas ĝoji, se mi ricevos de la dua monato almenaŭ duonon de tio, kio estis permesita al mi. Kaj tiam mi ricevadas leteron de la *departamento*, en kiun ili skribas, kiel nomiĝas la sekva vilaĝo, al kie mi estas komandata. Tio estas kelkfoje distanco de tri aŭ kvar tagvojaĝoj ĝis la sekva vilaĝo al tie, kie mi estas mendita. Kaj kiel vojmonon mi ricevas de la *departamento* ses realojn, sepdek kvin centavojn, tute egale, ĉu mia sekva loko estas nur ĝuste tagon for aŭ aŭ sep tagojn, aŭ ok pro la mizeraj diodamnitaj vojoj. Ĉiam nur ses realojn. De tio mi manĝu, de tio mi pagu mian luitan ĉevalon, de tio mi pagu la knabon, kiu akompanas min, kaj kiu rekondukas la ĉevalojn, de tio la lupago de la ĉevalo de l' knabo, kiu la tutan vojon ja ne povas iradi en tiu ardo, de tio la lupago por la mulo, kiu portas miajn fatrasajn ĉifonaĉajn vestojn kaj miajn malmultajn librojn kaj kajerojn, kaj de tio mi aldone eĉ pagu la maizon por la ĉevaloj. Tion la *jefe* de la *departamento* foje montru al mi, kiel oni pagu ĉi ĉion de la sepdek kvin centavoj.“

„Tion mi konas“, interrompis lin Profesoro.

„Tiukaze do ankaŭ vi estas *profesor*?“

„Estis, amiko kaj kolego. Estis! Unue en la ĉefurbo en *secundaria* kun sufiĉe da salajro. Poste malsupren al *primeria*. Poste en pli malgrandan urbon. Poste ĉiam denove en eĉ pli malgrandan urbon ĝis mi fine venis ankaŭ en vilaĝojn.“

„Sed kial tio? Se oni jam foje sidas en *secundaria*, oni povas trankvile restadi sidante aŭ avanci pli supren al la *preparatorias* aŭ kien ajn plu, eĉ ĝis la posteno de direktoro.“

„Tio eblas, *amigo*. Tio tute bone eblas, se oni tenas fermita la buŝon. Sed la buŝon mi ne povis teni fermita kaj ankaŭ neniam lernos tion. Tial mi estas ja ĉi tie la *profesor*. Ĉi tie mi tute ne ricevas salajron, kaj fartas tamen ne malbone. Ja por kio taŭgu la tuta bona salajro, se oni ne fartas bone? Kaj, se mi ne rajtas malfermi la buŝon kaj diri tion, kion mi pensas, tiukaze eĉ cent pesoj da salajro ĉiutage ne povus glatigi tion, kion mi perdas

anime kaj kore pecon post peco. Oni ja ne estas besto kaj ne marioneto. Mi estas ja homo, ĉe la diablo! Kaj ĉi tie mi povas esti homo. Ni ĉiuj ĉi tie povas esti homoj. Kaj tion ni volas esti plu. Kaj tion ni defendos ĝis la lasta sangoŝprucaĵo kontraŭ *El Caudillo*, kontraŭ la diodamnita kaj malbenita diktaturo.“

Intertempe la manĝo estis portita en la halon. Je la maniero, kiel la alveninto ĵetiĝis sur la manĝon, kaj kiel li kunlekis ĉiun manĝereton kaj prilekis ĉiun el siaj fingropintoj, la *muchachos* pli bone ekkonis ol el liaj vortoj, ke la viro diris la veron.

Ankaŭ lia *muchacho* plenigis sian stomakon, kiu certe estis same malplena, kiel tiu de la *profesor rural ambulante*.

Manĝinte kaj elspirinte kun profunda bonfarto, la instruisto diris: „Mi nomiĝas Villalva, Gabino Villalva, *su servidor*. Mi tre dankas por la manĝo.“

„Nu, pri kio do temas nun pri li, Profesoro?“ demandis Eladio, kiu estis alkondukinta la duone malsatmortintan instruiston. „Ĉu li estas spiono, ĉu ne? Se ne, jen mi reiros denove al mia posteno.“

„Mi okupiĝos pri li, Eladio, iru do al via posteno, Eladio. Ĉiukaze estis bone, ke vi kondukis lin ĉi tien. Oni ja scias

neniam, kiu kaj kio ĉiu estas, kiu ŝtelire preteriras proksime ĉe nia limo.“

„Do, tio estas, *amigos*“, diris nun la instruisto, „ankaŭ vi havas zorgojn pro la gregoj de banditoj, kiuj svarmadas ĉi tie kaj kiuj malesperigas ĉiujn bienulojn. Vi pravas, memgardu, estas malica kanajlaro, kiu tage kaj nokte vagadas ĉi tie kaj neniun lasas en paco. Mi vidas, ke ankaŭ vi havas tie kelkajn dekojn da pendantaj karabenoj. Tio estas necesa en tempoj tiaj, kiaj la nuna.“

Generalo estis enveninta kaj aŭdis la lastajn vortojn. „La tempo estas aĉa, tiukaze vi pravas, *hombre*. Eĉ pli ol aĉa, ĉar oni ne scias, kiuj estas la banditoj efektivaj en la lando.“

„Tion vi bone diris, *amigo*“, respondis la instruisto, sin turnante al la generalo, kiu nun pli proksimiĝis kaj sidiĝis en la grupo. „Bone dirite. En tiu ĉi tempo oni ne scias, kiu regas kaj kio estas regata.“

„Tial ni diras „*Que muere El Caudillo! Abajo la dictadura!*“ enmiksiĝis Andreo.

La instruisto rigardis lin. Poste li rigardis al ĉiuj aliaj, kiuj sidadis ĉirkaŭe kaj observis, kun kia komforto li kvazaŭ pie trinketas sian kafon, kvazaŭ li neniam antaŭe trinkis tian bonan kafon. Lia demandema rigardo fine haltis ĉe Andreo. „Kial vi diras 'La morton al la gvidanto! La diktaturo surgenuiĝu!' Tion mi volus scii.“

„Ĉar ni ne povas esti liberaj kaj ne vivi liberaj, tiom longe, kiom la diktatoro subigas kaj tiranas la popolon“, diris unu el la *muchachos*.

„Kiun diktatoron vi opinias?“ demandis la instruisto mirigite.

„Tion scias ĉiu infano en la lando, pri kiu temas“, diris Andreo. „Ne ŝajnu vin tia stulta kaj naiva. Ĉi tie vi povas paroli libere, sen buŝstopilo. Ĉi tie ne estas priorelumantoj aŭ sekretaj policaj spionoj.“

Profesoro rigardis la instruiston kun misfidemo. „Nun mi tamen volus scii, kion mi pensu pri vi. Vi parolas tiel kaj tiel. Kio estas do la ĝusta pri vi?“

„Ĉu mi ĉi tie estas sur Luno aŭ en Afriko aŭ meze de Ĉinio

aŭ kie ajn?“ demandis la instruisto laŭ la okuloj sen kompreno, ĉiun rigardante laŭvice.

„Ni celas kompreneble *El Caudillo*-on, la gvidanton kaj kondukanton, *don Prudencio Dominguez*, ja kiun alian do?“ vokis unu el la *muchachos*.

„Tio mi kompreneble ne povis diveni, *amigos*“, diris pri tio la instruisto. „Se vi celas tiun *don Prudencio*, kiu en Meksiko mastrumadis tridek aŭ mi ne scias kiom da jaroj, nu, en tiu kazo vi tre malfruiĝis, ĉar li ekŝiĝis antaŭ ok, naŭ, dektri, nu, antaŭ dek ses monatoj, tiam li ekŝiĝis, ĉar li ne plu povis firmiteni la potencon. Li estas nun en Londono, tio estas urbo en Francio.“

„Anglujo“, objctis Profesoro.

„Pro mi ankaŭ Anglujo, Hispanio aŭ Nederlando, ĉiukaze li forvojaĝis.“

Andreo turnis sin al Profesoro kaj diris mallaŭte: „Dek ses monatojn, ĉu? Jen li ja jam ne plu regis, kiam ni ekmarŝis de la monterioj. Ŝajne estas tiel, Andreo mia. Kia ŝerco!“ li diris kvazaŭ al si mem. „Kia grandioza ŝerco!“ elkrevis



laŭte de li, ĉar li fakte kriis pro ridado.

„Ĉu ŝerco?“ opiniis la instruisto. „Ne estas multe por ŝerci momente, en la tuta lando ne.“

„Kiu do regas nun?“ demandis Profesoro.

„Tion ankaŭ mi volonte sciis“, respondis la instruisto.

„Tion volus scii ĉiu en la lando, povruloj kaj riĉuloj, kapitalistoj kaj laboristoj.“

„Sed devas ja ĉeesti registaro“, diris Generalo.

„Unu? Unu registaro, ĉu?“ La instruisto tordis sian buŝon. „Estas nun kvinmil registaroj. Kvin mil politikistoj parolas kaj krias, kaj ĉiu havas sian propran registaron. Jen ne unu parlamento, sed dek, dudek, kvardek, ĉiuj samtempe. Ĉiu ŝtato havas ne unu guberniestron, sed sep aŭ ok, kaj ĉiujn samtempe.“

„Ĉu ne ekzistas partio, ĉirkaŭ kiu la homoj kolektiĝas, por ricevi registaron elektitan de la popolo?“

„Tie estas ankaŭ partioj. Amaso. *Constitutionalistas*,

*institutionalistas, revisionistas, reformistas, re-  
eleccionistas, anti-re-eleccionistas, laboristas,  
comunistas, comunialistas, imperialistas, anti-  
imperialistas, indo-americanistas, agraristas,  
dominguezistas, separatistas, regionalistas,  
continentalistas, unionistas kaj ĉirkaŭ ducent pliaj istas-  
oj. La nomojn mi ne povas memorteni. Ĉiutage aldoniĝas  
novaj, kaj ĉiutage perdiĝas tiaj, kiaj ankoraŭ hieraŭ estis,  
tiuj, kiuj havis la plej multajn adeptojn.“*

„Kaj la armeo, ĉu? Kion faras la armeo? “ demandis  
Generalo.

„En la armeo scias neniu ordonanta generalo, kies  
ordonoj estas plenumendaj kaj kies ordonoj ne . Ĉiu  
generalo, majoro aŭ kolonelo ricevas ĉiutage dudek  
diversajn telegramojn kun ordonoj, kaj li ne scias, kiun  
ordonon li do sekvu fakte. Tiel li simple restas sidadi kun  
siaj homoj, tie kie li sidas kaj kasigas la pagojn, tute egale,  
kiu asignas ilin por li. Krome ekzistas momente ĉirkaŭ  
dek mil generaloj, kiuj de vespere ĝis matene titoligas sin  
generalo kaj poste ekmarŝas kun siaj uloj. La plimulto de  
tiuj generaloj havas ne pli ol dudek virojn, kiuj sekvas

ilin. Kaj ĉiuj ĉi dekmil generaloj atakas alian, ĉiu asertas subteni alian partion, kaj sekvatage ili batalas kontraŭ tiu, je kies flanko ili hieraŭ estis.“

„Jen tio ĉio efektive estas tio, kion *El Caudillo* kreis dum preskaŭ kvardek jaroj de senkompata diktaturo“, vokis Profesoro, suprensaltante kaj ĵetante siajn brakojn supren, tiel, kiel li faris tion kutime, se li ŝanĝis sian kutiman parolon al alparolo, kiun li diris al ĉiuj. „Jen tio, kion la diktaturo atingis: la kaoson, jen tio, kion ĉiuj ĉi homoj, kiuj komprenas homojn, centfoje antaŭdiris, kriis, verkis, presis kaj kriegis, kiujn oni pro tio torturis kaj mortbatis ilin kvazaŭ ili estus malsanaj hundoj. Tion li atingis, la idiota diktatoro, la frenezulo nomata ŝtatgvidanto. Li kreis la kaoson. Ja kiu estas tiuj, kiuj nun leviĝis kaj kiuj tiras la popolon tien kaj tien? Estas la samaj uloj, kiuj estis naskitaj sub lia diktaturo, kiuj estis edukitaj sub lia diktaturo, kiuj sub lia diktaturo plenkreskiĝis, kiuj sub lia diktaturo estis tondre verdiktitaj silenti, kiuj sub lia diktaturo ne havis rajton kaj neniun okazon politike pensi mem kaj eduki sin pri politika pensado. Tial nun ĉiu krias. Kaj ĉiu, kiu krias,

krias sian propran melodion, ĉar li ne scias alian kaj neniun alian aŭdis kaj neniun alian povis lerni. Tio estas tiel natura kiel ĝi estas natura, ke roĝo fluas malsupren de la monto kaj ne supren.“

La halo plenigis sin per viroj kaj inoj, kiŭj dense kunŝoviĝis por doni al ĉiuj la okazon aŭdi tion, kion diris Profesoro. La plimulto kompreneble ne tute komprenis, pri kio Profesoro parolis, ĉar ili ne aŭdis lin dekomence.

„Tio estas la terura fino de la diktaturo, de hontego, pro kiu nia lando suferos cent jarojn. Mi finparolis, *muchachos*.“

„*Bravo, Profesor!*“ ili vokis el ĉiuj flankoj. „*Abajo la dictadura! Tierra y Libertad!*“

La instruisto evidente kutimiĝis al tiaj paroloj per gazetoj, broŝuroj, flugfolioj, alvokoj, manifestoj kaj programoj, kiuj tiutempe inundis la landon, tiom, ke ili komencis lacigi lin. Li trinkis trankvile sian kafon kaj rulumis por si cigaredon el tiu tabako, kiun transdonis iu el la *muchachos* al li.

Profesoro sidiĝis kaj diris al la instruisto: „Tio estas efektive granda novaĵo, kiun vi sciigis al ni. Ni estas tiom flankaj, ke ni ne povis bone scii, kio okazis ekstere.“

„Povas esti. Al mi nur ne estas klare, kial vi ĉiuj krias ĉi tie kiel sovaĝuloj tiun *Tierra y Libertad!* Vi ĉiuj havas tiom da *tierra*, kiom vi bezonas, kaj koncerne la liberon mi pensas, ke vi havas ĉi tie pli da libero ol kiu ajn, multe pli da libero ol eĉ mi mem. Fakte mi havas tute neniun liberon. Mi estas sklavo, lernejosklavo, oni povus kontraŭdiri, sed tamen sklavo. La *jefe* de la *departamento* ordonas, kien mi iru, kaj mi do devos ekiri, kaj se mi ne iros tien, tiam mi havos eĉ malpli da manĝo ol nun. Kaj tion, kion mi kutime havas por manĝi,

ankoraŭ neniam satigis min. Kompreneble, kun malofta escepto tia, kia hodiaŭ“, li aldonis rikanante. „Mi ankoraŭ neniam en mia vivo tiel freŝige kaj bonfartige satiĝis. Hodiaŭ kaj ĉi tie je la unua fojo. Por tio mi ja certe devas diri mian *gracias!* Kaj mi diras tion elkore, ne, pli ĝuste dirate, elstomake.“

Li moviĝis nedecideme sur sia malalta sidloko tien kaj tien. „*Bueno*, ŝajnas al mi, ke mi havas momente ankoraŭ sufiĉe da tempo por povi atingi la sekvan ranĉeton, antaŭ ol fariĝos nokte. Tiukaze mi nun do devos survojiĝi, kun via permeso. Kvankam mi ege bedaŭras tion anime, mi ja ne pli longe povos ŝarĝi vian gastamikecon per mia malgrasa kadavro.“

Turniĝante malantaŭen, li mansignis al sia indiĝena knabo akompananta lin, ke li alkonduku la ĉevalojn kaj ree ŝarĝu la pakaĵojn sur la mulon.

Profesoro pripenseme postrigardis lin, kvazaŭ li intencus esplori lian karakteron kaj liajn estontecajn planojn el la vizaĝo. Evidente kontentiĝinite pri sia studado, li palpebrumis al Generalo, Celso, Andreo kaj Kolonelo,

kun demandema gesto. La gesto ŝajne estis respondita en tiu senco, kiun li atendis.

En la sama momento, kiam la instruisto volis leviĝi por foriri, Profesoro puŝetis ŝultron de li. La instruisto denove sidiĝis.

„Diru, Gabino Villalva, *profesor rural ambulante*, kial vi ne simple restos ĉe ni? Ĉiam, mi opinias. Ni certe povos uzi duan instruiston. Kaj instruiston por la plenkreskintoj kaj instruiston por la malgranduloj, ankaŭ Andreo kunhelpas. Se temas pri la salajro, tiu de tempo al tempo mankos. Dependos de tio, kiom la bienuloj havas kontante en la hejmkaso. Sed ĉu kun ĉu sen salajro, mi ja promesas al vi, ke vi tiom longe, kiom vi estos kun ni, ĉiam havos plenan stomakon.“

„Se estas tiel, amiko kaj profesia kamarado, por kio mi en tiu kazo bezonas salajron? Mia salajro ankoraŭ neniam sufĉis por satiĝi. Komprenbele mi restos ĉi tie. Cetere, kiel la vilaĝo ĉi tie nomiĝas?“

„*Solipaz*“, respondis Profesoro.

„Suno kaj paco. Belega nomo por vilaĝo. Sed, ĉe la diablo, kio vi efektive estas?“

Profesoro kliniĝis al la orelo de la instruisto kaj flustris vorton al li. Laŭte li diris kaj kun senkaŝa ridado: „Ne diru ĝin al alia, ankaŭ ne, se oni eventuale demandos vin. Ni diras tion al aliaj nur dum limigitaj, tre limigitaj okazoj. De kiam ni eĉ scias kaj oficiale scias, ke la diktatoro falis, ŝanĝiĝis tio, kio ni estis al tio, kio ni estas nun, oficiale estas, tute egale, kia registaro fine okupos la palacon.“

„Tio do. Preskaŭ mi ja povis pensi tion. Sed en tempo tia, kia la nuna, estas malfacile diveni la ĝustan. Kompreneble, nun mi restos eĉ pli volonte ĉi tie. Tion mi celis, de kiam mi estis okjara. Kaj mi devis fariĝi trideksepjara por trovi vin.“

Li leviĝis, tenis alte la maldekstran pugnon kaj diris salutante: „*Muchachos, Tierra y Libertad!*“

Kaj la *muchachos* respondis unuvoĉe: „*Tierra y Libertad!*“



## Glosaro

*adobo* = nebakita briko el argilo, sekigita de la suno

*ardilla* = sciuro

„*A sus ordenes, mi comandante!*“ = Je via dispono, mia komandanto!

*Ay, caramba!* = Ve! Ho ve! Damne!

*barbacoa con salsa* = rostkradaĵo kun saŭco

bierbarelaĵ etburĝoj = la esprimo certe devenas de la usona

„*Beer Barrel Man*“ (bierbarelviro)

*borrachos* = kirlitaj ovoĵoj kun ruĝa vino

*cabildo* = komunejo, urbodomo ks.

*cabrón* = virkapro, eŭfemisme tiu estas vira persono, kiu miskondutas, ĉar li tedas aŭ vundas aliajn. Do kanajlo, bastardo ks.

*cabrones* = pluralo de *cabrón*

*cantina* = kuntekste eŭfemisma vorto por trinkejo, kiu estas uzata kiel neoficiala bordelo, *cantina* en Meksiko kutime estas trinkejo

„*Camaradas, tierra libre para todos. Tierra sin capataces y sin amos.*“ = Kamaradoj! Liberu la lando por ĉiuj! Por tero sen submastroj kaj sen mastroj!

*canela* = cinamo

*caray!* = Hehe, ha, ho, oho, la vorto esprimas admiron, surprizon aŭ koleron

„Caray, que chinguen a todas las madres, cabrones y mulas...”

= Ho! Oni fiku ĉiujn patrinojn, bastardojn kaj mulojn..!

*choza* = pajlokabano

*corral* = elkurejo por ĉevaloj, bovoj ktp.

*divisionario* = diviziestro de armea parto

*diputado* = deputito, parlamentano

*ejidos* = komunumojn

*El Caudillo* = La gvidanto

*El Corneta* = La korno

*federales* = federaloj, registaraj polictrupoj

*feria* = foiro

*fiesta* = festo

*gato de monte* = sovaĝa kato

*gobernador* = guberniestro

*hermanos* = fratoj

*infierno* = infero

*jacal* = simpla, neluksa kabaneto

*jacalitos* = etaj kabanoj

*listo* = preta

*Marcha adelante!* = Marŝu antaŭen!

*m'ijito* = eta filo mia, fileto mia

*milpa* = kampeto

*muchachos* = knaboj, junuloj, eŭfemisme: servistoj

mulo = ido de ĉevalo kaj azeno, en Meksiko eŭfemisme

uzata ankaŭ por ŝtipkapulo, kiu insistas spite al certaj spertoj pri sia erara konduto aŭ kroĉiĝas obstine al misaj ideoj aŭ sintenoj

*muy bien* = tre bone

*patio* = korto (interna korto de hispanaj domoj)

*ramada* = tegmentoforma kabaneto

*rebozo* = granda tuko

*rurales* = sub Porfirio Diaz ili estis policaj helptrupoj de la registaraj polictrupoj (federaloj) kaj gardotrupoj de la diktaturo.

*salvajes* = sovaĝuloj

*teniente* = leŭtenanto

*Tierra y libertad!* = Tero kaj libero!

*Viva!* = Vivu!

„*Viva, Profesor! Arriba, General! La muerte a los tiranos y todos los patrones y dictadores! Libertad para todos!*“ = Vivu Profesoro! Supreniĝu Generalo! La morton al la tiranoj kaj al ĉiuj patronoj kaj diktatoroj! Liberon por ĉiuj!

**PS:** *Ĉe la tradukoj por la glosaro helpis al ni la meksika samideanino Martha Carmona Ríos. (cez)*